

Roberto Luizo Stevenson



Verko el la publika fako.

https://fr.wikisource.org/wiki/Le_Mort_vivant

HelleM 2019 _ 1 / 211

Personaro.

La ĉefaj gravuloj

Jozefo, Virmastro kaj Jakobo Finsinko (*FrV : Joseph, Masterman et Jacques Finsbury*): Tri fratoj, la 2 unuaj subskribiĝis en eta tontino, la tria tiam estis tro maljuna.

Miĥaelo Finsinko (*FrV : Michel Finsbury*): Filo de Virmastro Finsinko, kuzo de Maŭrico kaj Johano, kaj fama proceduristo.

Maŭrico kaj Johano Finsinko (*FrV : Maurice et Jean*): Du fratoj, filoj de Jakobo, la juna mortinta frato de Jozefo kaj Virmastro.

Ĝono Henrio Hazeltino (*FrV : John Henry Hazeltine*) eskviro, viro kun modesta riĉaĵo, kaj ŝajne, malmulte provizita per amikoj.

Julia Hazeltino (*FrV : Julia Hazeltine*) Filino de Ĝono Henrio Hazeltino metita de li sub la prizorgo de Jozefo.

Farado Bondo (*FrV : Faraday Bond*) Fama kuracisto.

Georgo (dirata la Granda) kaj Roberto Vanco (*FrV : Grand Vance*) Alia nomo de respektive Johano kaj Maŭrico Finsinko.

Vilhelmo Dento Fosulo (*FrV : William Dent Pitman*) Malriĉa vidva senfama artisto kaj instruisto de arto al knabinoj en pensiono.

Semitopoliso (*FrV : Semitopolis*) Viro kiu kontrabande sendis statuon de Italio al Fosulo.

Gideon Forsiso (*FrV : Gédéon Forsyth*) Advokato kaj konato de Julia Hazeltino, kaj nevo de Eduardo H. Florkampo, ankaŭ konata de Miĥaelo.

S^{ro} Bruno (*FrV : Brown*) Dum momento Miĥaelo faras sin nomi Brunoⁿ.

Ĝono Diksono (*FrV : John Dickson*) Alia dummomenta nomo de Miĥaelo kiu fariĝas riĉa aŭstralia koloniano.

Ezro Tomaso (*FrV : Ezra Thomas*) Alia dummomenta nomo de V. D.

Fosulo, kiu fariĝas riĉa usonano, fabrikisto de kaŭĉukaj galoŝoj.

Tarnoŭo (*FrV : Tarnow*) Ailanda grafo kiu loĝas en Hampton-Korto, kaj kies filino pretiĝis edziniĝi kun Ezro Tomaso.

Katerino (*FrV : Catherine*) Maljuna skota mastrumistino kiu servas Miĥaeloⁿ.

E. H. F. : Inicialoj de Eduardo Hugo Florkamp sub kiuj Gideono skribis sian romanon "*Mistero de la Omnibuso*".

Eduardo Hugo Florkamp (*FrV* : *Edouard H. Bloomfield*) Onklo de Gideono Forsiso kaj respektinda eminenta moŝtulo.

Ĵimsono (*FrV* : *Jimson*) Alia dummomenta nomo de Gideono fariĝinta komponisto de muziko.

sekundaraj gravuloj.

Jemo Ŝandlero (*FrV* : *Jem Chandler*) Kamionisto.

Vatso (*FrV* : *Watts*) Amiko de Ŝandlero kiu regas gastejon.

Vikhemo (*FrV* : *Wickham*) Amiko kun kiu Miĥaelo Finsinko vojaĝas per trajno.

Harkero (*FrV* : *Harker*) Junulo dungita ĉe luigisto de veturiloj en Padŭiko.

Brulmarko (*FrV* : *Brand*) Serĝento de la kolonia armeo kiu vojaĝas sur la veturilo de Harkero.

Rogersono (*FrV* : *Rogerson*) Unu el la kreditoroj de la firmao de ledaĵoj.

Musko (*FrV* : *Moss*) Komisiita al Maŭrico de mistera kliento kiu multekoste aĉetis la kreditoraĵojn de Rogersono.

Blomsburio : Urbo kie loĝas Jozefo, Maŭrico, Johano kaj Julia Karlo : Strato en Blomsburio en kiu loĝas Maŭrico kaj Johano Finsinko, ĉe la numero 16.

Burnmuto : Urbo kun pli pura aero kie iras resaniĝi la malsanuloj de Farado Bondo.

Brundekano : rebaptita (de la verkisto) stacidomo de Nov-Arbaro, urbo kie okazis akcidento.

Saŭtemptono : Urbo kie Jozefo Finsinko gastigis.

Norfolko : Strato en kiu loĝas majstro V. D. Fosulo ĉe la n^o 7.

Reĝo : Strato en kiu la proceduristo Miĥaelo Finsinko havis sian privatan loĝejon, ĉe la n^o 233.

Padŭiko : Vilaĝego kie Ĵimsono luprenis pavilonon por labori. stacidomo de la strato Ganono (haut p101)

Enhava tabelo.

Ĉapitro I.....	4
Ĉapitro II.....	19
Ĉapitro III.....	36
Ĉapitro IV.....	49
Ĉapitro V.....	54
Ĉapitro VI.....	65
Ĉapitro VII.....	83
Ĉapitro VIII.....	97
Ĉapitro IX.....	116
Ĉapitro X.....	131
Ĉapitro XI.....	141
Ĉapitro XII.....	158
Ĉapitro XIII.....	168
Ĉapitro XIV.....	180
Ĉapitro XV.....	198
Ĉapitro XVI.....	206

Ĉapitro I

La familio Finsinko.

Kiel multe la leganto, dum komforte sida ĉe la angulo de sia fajrujo li sin amuzas foliumi la paĝojn de romano, kiel multe li apenaŭ konscias pri la laciĝo kaj turmentiĝoj de la verkisto ! Kiel multe li neglektas imagi la longajn noktojn de luktoj kontraŭ ribelemaj frazoj, la seancojn de studadoj en la bibliotekoj, la korespondadojn kun erudiciaj kaj nekomprenablaj germanaj profesoroj, unuvorte la tutan grandegan skafaldon kiun la verkisto starigis kaj poste detruis, simple por havigi al li ja, la leganto, kelkajn momentojn de distraĵo ĉe la angulo de lia fajrujo, aŭ eĉ por mildigi al li la enuon de unu horo en la vagono !

Tiel estas kiel mi povus tre bone komenci ĉi tiun rakonton per kompleta biografio de la Italo **Tontio** : naskiĝloko, deveno kaj karaktero de la gepatroj, natura genio (verŝajne heredita de la patrino), rimarkindaj ekzemploj de frumatureco, ktp. Post tio mi ankaŭ povus trudi al la leganto laŭregulan traktaĵon pri la ekonomia sistemo, al kiu la supredirita Italo lasis sian nomon. Mi tie havas, en du tirkestoj de mia aktoŝranko, ĉiujn materialojn kiujn mi bezonus por ĉi tiuj du paragrafoj; sed mi malŝatas fanfaroni pri pruntoscienco. Tontio estas morta; mi eĉ devas diri ke mi neniam renkontis iun por bedaŭri lin. Kaj koncerne la sistemon de la **tontino**⁽¹⁾, jen per kelkaj vortoj, ĉio kion necesas ke oni konu pri ĝi, por la kompreno de la simpla kaj vera rakonto kiu tuj sekvos :

Pluraj gajaj junuloj kunigas certan sumon, kiu poste estos deponita en banko, kun réinvestitaj interezoj. La

1 Tiu traduko ne troviĝas en PIV, tio signifas ŝparasocion kaj estis kreita de Tontio.

deponintoj vivas sian vivon, mortas ĉiu laŭvice; kaj kiam ili ĉiuj estas mortaj krom ununura, estas al ĉi tiu lasta pluvivanto ke la tuta sumo alfalas, interezoj inkluzive. La koncerna pluvivanto troviĝas tiam esti, verŝajne, tiel surda ke li eĉ ne povas aŭdi la bruon vigligitan pri sia bonŝanco; kaj, laŭ ĉiu probableco, eĉ li mem havas tro malmulte da vivtempo por povi ĝui ĝin. La leganto nun komprenas tion kion la sistemo havas da poezio, por ne diri da fieco : sed samtempe estas, en tiu ĉi sistemo, io riskoplena, ŝajno de sporto, kiu iam estigis ĝin karan al niaj geavoj.

Kiam Jozefo Finsinko kaj lia frato Virmastro estis nur du knabetoj en pantalonetoj, ilia patro, bonhava komercisto de [Cheapside](#), subskribigis ilin en eta tontino⁽¹⁾ de tridek sep partoj. Ĉiu parto estis por mil sterlingaj pundoj⁽²⁾. Jozef Finsinko memoras, eĉ hodiaŭ, la viziton ĉe la notario : ĉiuj membroj de la tontino⁽¹⁾, geknaboj kiel li, kunvenigitaj en notariejo, kaj ĉiu siavice venantaj sidiĝi en grandan fotelon por subskribi siajn nomojn, kun la helpo de bona maljuna sinjoro kun okulvitroj kaj piedoj vestitaj de botoj kiel Velingtono. Li memoras, kiel post la kunsido li ludis kun la aliaj infanoj en herbejo kiu troviĝis malantaŭ la domo de la notario, kaj la belegan batalon kiun li ekigis kontraŭ unu el siaj kun-tonin-anoj, kiu sin permesis pinĉi al li la nazon. La bruego de la batalo venis interrompi la notarion, dum li sin okupis en sia oficejo regali la gepatrojn per kukoj kaj vino : tiel ke la batalantoj estis abrupte apartigataj, kaj Jozefo (kiu estis la plej malgranda el la du kontraŭuloj) ricevis la kontentekon aŭdi laŭdi sian bravecon de la maljuna sinjoro kun botoj kiel Velingtono, tiel ankaŭ kiel ekscii ke ĉi tiu, en lia aĝo, same kondukis. Tiam Jozefo demandis al si ĉu, en sia aĝo, la maljuna sinjoro jam havis etan senharan kapon; kaj

2 Laŭ mi, en 2020, [1 tiama pundo valorus +9€](#)

malgrandajn botoj kiel Velingtono.

En 1840, la tridek sep kotizantoj estis ĉiuj vivantaj; en 1850, ilia nombro malpliigis je ses; en 1856 kaj 1857, la Krimeo kaj la granda Hinda ribelo, helpantaj la naturan fluon de la aferoj, forprenis ne malpli ol naŭ el la tontinanoj⁽¹⁾. En 1870 nur kvin el tiuj restis vivantaj; kaj, je la dato de mia rakonto, restis nur tri el ili, inter kiuj Jozefo Finsinko kaj lia pli aĝa frato.

Je ĉi tiu dato, Virmastro Finsinko estis en sia sepdektria jaro. Delonge travivanta la malagrablajn efikojn de la aĝo, li finfine retiriĝis el la aferoj, kaj nuntempe vivis en absoluta emeritiĝo, sub la tegmento de sia filo Miĥaelo, la fama proceduristo. Jozefo, aliflanke, estis ankoraŭ memstara, kaj ankoraŭ prezentis nur duonrespektindan mienon en la stratoj kie li ŝatis promeni. La afero estis, mi devas aldoni, des pli bedaŭrinda ke Virmastro ĉiam sekvis (ĝis en la plej etaj detaloj) vere modelan anglan vivon. La aktiveco, la akurateco, la dececo kaj **iu rimarkinda gusto por la kvar procentoj**, ĉiujn ĉi naciajn virtojn kiujn oni konsentas konsideri kiel la bazojn mem de verda maljuneco, Virmastro Finsinko observis ilin en tre alta grado : kaj jen kie ili kondukis lin, ĉe la aĝo de sepdek tri jaroj ! Dum Jozefo, pli juna je apenaŭ du jaroj, kaj kiu estis en la plej enviinda stato de konservado, sin senhonorigis dum sia tuta vivo samtempe pro pigreco kaj pro originaleco. Unue kuntirita en la ledokomerco, li baldaŭ laciĝis pri komerco. Malfeliĉa pasio por ĝeneralaj nocioj, pro ne esti siatempe subpremita, de tiam komencis detruiri lian maturan aĝon. Tute ne estas pasio pli malvigliga por la menso, ol eble tiu juko publike paroli, kiu cetere estas sufiĉe ordinara akompano aŭ surogato. Pri la kazo de Jozefo, almenaŭ, la du malsanoj estis kunigitaj : iom post iom aperis la akra periodo, tiu kiam la malsanulo faras senpagajn prelegojn; kaj, antaŭ ol malmultaj jaroj pasis, la

malfeliĉulo alvenis ĝis la grado esti preta entrepreni kvinhoran vojaĝon por paroli antaŭ la gebuboj de bazlernejo.

Ne ĉar Jozefo Finsinko estis, eĉ iom, klerulo ! Lia tuta erudicio limiĝis en tio per kio provizis lin la elementaj lernolibroj kaj la ĉiutagaj gazetoj. Li eĉ ne leviĝis al enciklopedioj; estis, li diris, "la vivo kiu estis lia libro". Li estis preta konfesi ke liaj prelegoj ne estis direktitaj al universitataj profesoroj : ili estis direktitaj, laŭ li, "al la granda koro de la popolo". Kaj lia ekzemplo emus kredigi ke la "koro" de la popolo estas sendependa de ĝia kapo : ĉar la fakto estas ke, malgraŭ siaj stultaĵoj kaj siaj banalaĵoj, la cerbumaĉoj de Jozefo Finsinko estis, ordinaraj, favore akceptitaj. Li plezure rememorigis interalie la sukceson de la prelego kiun li faris al senlaboruloj, pri "Kiel ni povas komforte vivi kun du mil frankoj jare". La edukado, ĝiaj celoj, ĝiaj objektoj, ĝia utileco kaj ĝia graveco, altiris al Jozefo, plurloke, la respektaman konsideron de amaso da stultuloj. Kaj pri lia fama eseo pri la viv-asekuro rigardata laŭ siaj rilatoj kun la amasoj, la Reciproka Pliboniĝa Societo de Laboristoj de la Insulo de Hundoj, al kiu ĝi estis legita, estis tiel ĉarmita per ĝi (tio kio vere donas malĝojan ideon pri la kolektiva inteligenteco de tiu ĉi asocio) ke la sekvan jaron, ĝi elektis Jozefoⁿ Finsinkoⁿ kiel sian honoran prezidanton; titolo kiu, vere, estis eĉ malpli ol senpaga, ĉar ĝi implicis, flanke de sia posedanto, ĉiujaran donon al la kaso de la Societo. Sed la memestimo de la nova honor-prezidanto havis en ĝi ne malpli da kialo por esti alte kontenta.

Nu, dum Jozefo tiel konstruis al si reputacion inter la pli klerigita parto de la sensciuloj, lia hejma vivo estis subite plenigita de orfoj. La morto de lia plej juna frato, Jakobo, igis lin kuratoron de du knaboj, Maŭrico kaj Johano; kaj dum la sama jaro lia familio denove ŝveliĝis per la aldono de fraŭlineto, la filino de Ĝono Henrio Hazeltino, eskviro, viro

kun modesta riĉaĵo, kaj ŝajne, malmulte provizita per amikoj. Tiu ĉi Hazeltino nur unufoje vidis Jozefoⁿ Finsinkoⁿ, en konferencejo de Holovojo; sed ĉe la elirejo de ĉi tiu salono, li iris al sia notario, redaktis novan testamenton kaj testamentis al la preleganto la prizorgon de sia filino, tiel kiel ŝia malgranda riĉaĵo. Jozefo estis tio kion oni povas nomi "bonan infanon"; kaj tamen estis nur kontraŭvole ke li akceptis tiun novan respondecon, enpresis anoncon por peti gubernistinon kaj brokante aĉetis infanĉareton. Multe pli volonte li akceptis, kelkajn monatojn pli frue, siajn du nevojn, Maŭricoⁿ kaj Johanoⁿ; kaj tio ne tiom pro familiaj ligoj, kiom pro tio ke la ledokomerco (en kiu, kompreneble, li rapidis investi la tridek mil pundojn⁽²⁾ kiuj formis la riĉaĵon de liaj nevoj) manifestis ekde nelonge neklarigeblajn simptomojn de malkresko. Juna sed kapabla skoto estis poste elektita kiel administranto de la entrepreno; kaj neniam plu de tiam Jozefo Finsinko devis klopodi pri la malagrablaj zorgoj de negocoj. Lasinte sian komercon kaj siajn zorgatojn en la manoj de la kapabla skoto, li entreprenis longan vojaĝon tra la kontinento kaj ĝis Malgrand-Azio.

Kun plurlingva biblio en iu mano kaj frazlibro en la alia, li sinsekve boris al si sian vojon tra homoj de dek du malsamaj lingvoj. Li trouzis la paciencon de interpretistoj, ĉiam kiam li povis senpage akiri iliajn servojn; kaj mi ne bezonas aldoni, ke li plenigis amason da notlibretoj per la rezultoj de siaj observoj.

Li pasigis plurajn jarojn por ĉi tiuj fruktodonaj konsultoj de la granda libro de la homa vivo, kaj revenis al Anglio nur kiam la aĝo de siaj zorgatoj postulis siaflanke pli da zorgado. La du knaboj estis metitaj en lernejon, malmultekostan, tio estas evidenta, sed finfine sufiĉe bonan, kaj kie ili ricevis klaran komercan edukadon; tro klaran, eble

eĉ, ĉar la komerco de la ledaĵoj sin tiam trovis en situacio kiu meritintus ne esti tre atente ekzamenata.

Fakte, kiam Jozefo sin preparis redoni al siaj nevojn siajn kurator-kontojn, li malkovris, kun ĉagrenego, ke la heredaĵo de lia frato Jakobo ne kreskis sub lia protektorato. Supozante ke li lasu al siaj du nevojn ĝis la lasta speso de sia persona riĉaĵo, li konstatis ke li devos ankoraŭ konfesi al ili malprofiton de sep mil okcent pundoj⁽²⁾. Kaj kiam ĉi tiuj faktoj estis komunikitaj al la du fratoj, en ĉeesto de proceduristo, Maŭrico Finsinko minacis sian onklon per ĉiuj severejoj de la leĝo. Mi vere kredas ke li ne hezitus (malgraŭ la familia ligiteco) uzi ĝis la plej ekstremaj mezuroj, se lia proceduristo ne retenis lin.

- Neniam vi sukcesos ĉerpi sangon el ŝtono ! sagace diris al li tiu ĉi juristo.

Kaj Maŭrico komprenis la ĝustecon de la proverbo, kaj konsentis aranĝi kompromison kun sia onklo. Unuflanke, Jozefo rezignis pri ĉio kion li posedis, kaj konsentis al sia nevo grandan parton de la tontino⁽¹⁾, kiu komencis fariĝi spekulajo el la plej seriozaj. Aliflanke, Maŭrico promesis siakoste prizorgi sian onklon same kiel fraŭlinon Hazeltinoⁿ (kies malgranda riĉaĵo malaperis kun la cetero), kaj provizi ĉiun el ili, per unu sterlinga pundo⁽²⁾ monate, kiel poŝmono.

Tiu ĉi subvencio estis pli ol sufiĉa por la bezonoj de la maljunulo. Oni malfacile komprenas kiel male, ĝi povis sufiĉi por la juna fraŭlino kiu devis sin vesti, sin frizi, ktp., nur per tiu ĉi mono; sed ŝi sukcesis, Dio scias kiamaniere, kaj afero ankoraŭ pli miriga, ŝi neniam plendis. Ŝi cetere estis sincere ligita al sia kuratoro, malgraŭ la kompleta nekompetenteco de tiu ĉi por priatenti ŝin. Almenaŭ li neniam sin montris severa aŭ malica rilate al ŝi, kaj, finfine, estis eble io kortuŝa en la infana scivolemo kiun li sentis pro ĉiaj senutilaj scioj, kiel ankaŭ en la senkulpa ĝuo kiun havigis al li la plej

eta signo de admiro kiun oni vidigis al li. Ĉiaokaze, kvankam la proceduristo lojale avertis Juliaⁿ Hazeltinoⁿ ke la kombinaĵo de Maŭrico prezentis por ŝi domaĝon, la bonega knabino malvolis plie kompliki la malfacilaĵojn de onklo Jozefo. Kaj tiel la kompromiso efektiviĝis.

En granda, malluma, veaspekta domo de la strato Karlo, **Blomsburio**, ĉi tiuj kvar homoj kune loĝis; laŭŝajne familio, reale financa asocio. Julia kaj onklo Jozefo kompreneble estis du sklavoĵoj. Johano tute absorbita de sia pasio por la baĝo, la koncertkafejo, la drinkejo de artistoj kaj la sportaj gazetoj, estis persono denaske kondamnita ĉiam nur ludi duarangan rolon. Kaj, tiel, ĉiuj malĝojoj kaj ĉiuj ĝojoj de la mastrumado estis tute transdonitaj al Maŭrico.

Ni scias la kutimon kiun alprenis la moralistoj por konsoli la mensmalfortulojn, asertante al ili ke, en ĉiu vivo, la sumo de malĝojoj kaj tiu de ĝojoj ekvilibriĝas, aŭ preskaŭ tiel. Sed, certe, sen voli insisti pri la teoria eraro de tiu ĉi pia mistifiko, mi povas certigi ke, pri Maŭrico, la sumo de la amaraĵoj multe superis tiun de la dolĉecoj. La junulo ŝparis al si mem nenium laciĝon, kaj ankaŭ ne ŝparis ĝin al aliaj. Estis li kiu vekis la servistojn, kiu forŝosis la restaĵojn de la manĝoj, kiu gustumis la vinojn, kiu nombris la biskvitojn. Doloraj scenoj okazis ĉiun sabaton, dum la kontrolo de la fakturoj, kaj la kuiristino ofte estis ŝanĝita, kaj ofte la provizistoj sur la interŝtuparo de servado elverŝis sian tutan kolekton da insultoj, rilate pri diferenco de tri spesoĵoj. En la okuloj de malprofunda observanto, Maŭrico Finsinko riskintus esti rigardata kiel avarulon. En siaj propraj okuloj li simple estis viro kiu estis ŝtelita. La mondo ŝuldis al li 7.800 sterlingajn pundojn⁽²⁾, kaj li estis vere rezoluta fari al si repagi ilin.

Sed estis ĉefe per lia konduto kun Jozefo ke klare manifestiĝis la karaktero de Maŭrico. Onklo Jozefo estis

investo al kiu la junulo multe fidis : tial li neniam cedis al io ajn por konservi lin al si. Ĉiumonate, la maljunulo, malsana aŭ ne, devis trapasi zorgeman ekzamenon de kuracisto. Lia dieto, lia vestaĵo, liaj okazaj ekskursoj, ĉio ĉi estis altrudita al li kiel kaĉo al infanoj. Se la vetero estis iom malbona, malpermeso eliri. Okaze de bela vetero, precize je la naŭa matene, onklo Jozefo devis troviĝi en la vestiblo; Maŭrico ekzamenis ĉu li havas gantojn, kaj ĉu liaj ŝuoj eltenas la akvon; post tio la du viroj iris al la oficejo, brako en brako. Promenado kiu verŝajne tute ne estis gaja, ĉar la du kunuloj neniel zorgis vidigi amikecajn sentojn unu al la alia. Maŭrico neniam ĉesis kaj riproĉi al sia kuratoro la malprofiton de 7.800 pundoj⁽²⁾, kaj bedaŭri la plian ŝarĝon konsistigitan de fraŭlino Hazeltino. Kaj Jozefo, eĉ bona infano kiun li estis, sentis por sia nevo ion kiu multe similis al malamo. Kaj la iro eĉ estis nenio kompare kun la reveno; ĉar la nura vido de la oficejo, sen kalkuli kun ĉiuj detaloj de tio kio okazis tie, sufiĉintus por veneni la vivon de la du Finsinko^j.

La nomo de Jozefo estis ankoraŭ surskribita sur la pordo, kaj estis denove ankoraŭ li kiu tenis la subskribon de la ĉekoj. Sed ĉio ĉi estis nur pura politika manovro flanke de Maŭrico, celanta malkuraĝigi la aliajn membrojn de la tontino⁽¹⁾. Reale, estis Maŭrico mem kiu zorgis pri la ledkomerco; kaj mi devas aldoni ke ĉi tiu afero estis por li neelĉerpebla fonto de malĝojoj. Li provis vendi ĝin, sed ricevis nur seninteresajn proponojn. Li provis pligrandigi ĝin, kaj sukcesis nur pligrandigi la elspezojn; malgrandigi ĝin, kaj estis nur profitoj kiujn li sukcesis malgrandigi. Neniu iam kapablis eltiri unu speson el tiu ĉi leda komerco, krom la "kapabla" skoto kiu, kiam Maŭrico maldungis lin, instaligis en la ĉirkaŭaĵo de Banfo, kaj konstruigis al si kastelon per siaj profitoj. La memoron pri tiu ĉi trompema skoto, Maŭrico ne mankis eĉ unu tagon malbeni ĝin, dum sida en sia

skriboĉambro, li malfermis sian poŝtaĵon, kun la maljuna Jozefo sida ĉe alia tablo, atendanta liajn ordonojn kun la plej malafabla mieno, aŭ alie, furioze skribaĉanta sian subskribon sur li ne sciis kion. Kaj kiam la skoto intensigis la senhonton ĝis sendi sciigon pri sia geedziĝo (kun Davida, plejaĝa filino de la pastoro Baruĉo Mak Kraŭ), la malfeliĉa Maŭrico vere kredis ke li tuj spertos apopleksion.

La horoj de ĉeestado en la oficejo estis, iom post iom, reduktitaj al la honeste minimuma ebleco. Tiel ajn profunda estis la sento de Maŭrico pri liaj devoj (rilate al si mem), tiu ĉi sento ne iris ĝis doni al li la kuraĝon restadi inter la kvar muroj de lia oficejo, kun tie la ombro de ĉiutage plilongiĝanta bankroto. Post kelkaj horoj de atendado, estro kaj laboristoj suspiris, streĉiĝis kaj eliris, pretekstante meditati pri la enuo de la morgaŭo. Tiam la ledvendisto revenigis sian vivan kapitalon ĝis la strato Karlo, kiel salona hundo. Post tio, enmuriginte lin en la domo, li mem reiris esplori la butikojn de la brokantistoj, serĉante sigelringojn, la solan pasion de sia vivo.

Koncerne Jozefo, li havis pli ol la memkontentecon de viro, li havis la memkontentecon de preleganto. Li konfesis ke li malpravis, kvankam oni pekis kontraŭ li (interalie la "kapabla" skoto) pli ol li mem pekis. Sed li asertis ke, eĉ se li trempintus siajn manojn en sango, li tamen ne meritintus esti tiel traktata laŭ volo de juna bubaĉo, esti kaptita en la skriboĉambro de sia propra komercodomo, esti senĉese turmentata de ofendaj komentoj pri sia tuta pasinta kariero, vidi, ĉiumatene, sian kostumon ekzamenita de supre malsupren, sian kolumon malfaldata, la ĉeeston de siaj duongantoj sur la manoj severe kontrolata, kaj esti promenigata sur la strato kaj revenigata hejmen kiel bebo zorge de vartistino. Ĉe la pensado pri ĉio ĉi, lia animo ŝveliĝi de veneno. Li hastis pendigi al vestohoko, en la vestiblo, sian

ĉapelon, sian mantelon kaj la abomenajn duongantojn, kaj poste supreniri por rekuniĝi kun Julia kaj siajn notlibretojn. La salono de la domo, almenaŭ, estis ŝirmita kontraŭ Maŭrico, ĝi apartenis al la maljunulo kaj la juna knabino. Estis tie ke tiu ĉi kudris siajn robojn; estis tie ke onklo Jozefo makulis siajn okulvitrojn per inko, tute feliĉa registri sensekvajn faktojn, aŭ kolekti la ciferojn de senvaloraj statistikoj.

Ofte, dum li estis en la salono kun Julia, li bedaŭris la malbonŝancon kiu faris lin unu el la membroj de la tontino⁽¹⁾.

- Sen ĉi tiu malbenita tontino⁽¹⁾, li priĝemis iun vesperon, Maŭrico ne ŝatus reteni min ! Mi povus esti libera viro, Julia ! Kaj estus por mi tiel facile vivteni min prelegante !

- Certe, tio estus facila por vi ! respondis Julia kiu havis oran koron. Kaj estas malkuraĝe kaj malnoble, flanke de Maŭrico, senigi vin de io kio tiom amuzas vin !

- Ĉu vi vidas, infano mia, li estas estulo sen inteligenteco ! ekkriis Jozefo. Pensu iomete pri la grandega okazo lerni kiun li havas ĉi tie, ĉemane, kaj kiun tamen li neglektas ! La kvanto da diversaj konoj kiujn mi povus sciigi al li, Julia, se nur li konsentus aŭskulti min, ĉi tiu kvanto, ne estas vortoj por doni al vi ideon pri ĝi !

- Ĉiukaze, kara onklo mia, vi devas bone atenti ne incitiĝi ! dolĉe observigis Julia. Ĉar, vi scias, se vi ŝajnas eĉ iom malsana, oni tuj sendos serĉi la kuraciston !

- Estas vere, infano mia, vi pravas ! respondis la maljunulo. Jes, mi provos regi min ! Studo trankviligos min !

Kaj li estis serĉonta sian galerion da notlibretoj.

- Mi demandas al mi, li hazardis, mi demandas al mi ĉu, dum vi laboras per viaj manoj, tio ne interesus vin aŭdi...

- Jes ja, jes ja, tio multe interesus min ! ekkriis Julia. Nu, legu al mi unu el viaj observoj !

Tuj la notlibreto estis malfermata, kaj la okulvitroj firmigataj sur la nazo, kvazaŭ la maljunulo volis malebligi

ajnan eventualan returniĝon flanke de sia aŭskultantino.

- Tio kion mi proponas legi al vi hodiaŭ, li komencis iun vesperon post esti tusanta por heligi al si la voĉon, estos, se vi bonvolos permesi tion al mi, la notoj kolektitaj de mi, sekve de tre grava interparolado kun siria kuriero nomita Davio Abbas, "Abbas", eble vi ne scias tion, estas la latina nomo por abato. La rezultoj de ĉi tiu intervjuo bone kompensas la prezon kiun ĝi kostis al mi ĉar, ĉar Abbas komence ŝajnis iom malpacienigita de la demandoj kiujn mi metis al li pri diversaj punktoj de regiona statistiko, mi trovis min altrudita trinkigi lin el mia poŝo. Nu, jen tiuj notoj !

Sed ĉe la momento kiam, post esti denove tusanta, li pretiĝis komenci sian legadon, Maŭrico neatendite eniris en la domon, vigle alvokis sian onklon kaj ekde la sekva momento invadis la salonon, svingante en sia mano gazeton de la vespero.

Kaj, vere, li revenis ŝarĝita de bonega novaĵo. La gazeto sciigis la morton de generala leŭtenanto S^{ro} Glasgoŭ Begar, *KCSI*, *KCMG*, ktp. Tio signifis ke la tontino⁽¹⁾ nun havis nur du membrojn : la du fratojn Finsinko^{jn}. Finfine ŝanco venis por Maŭrico !

Vere ja la fratoj neniam estis komprenemaj. Kiam la famo pri la vojaĝo de Jozefo al Malgrand-Azio disvastiĝis, Virmastro, hejmama kaj rutina, incite sin esprimis. "Mi trovas la konduton de mia frato klare maldeca !" li flustris. Memoru tion kion mi diras al vi; li fine iros ĝis la Norda Poluso ! Vera skandalo por iu Finsinko ! Kaj ĉi tiuj amaraj paroloj estis pli poste transdiritaj al la vojaĝanto. Ankoraŭ pli malbona ofendo, Virmastro rifuzis ĉeesti la prelegon pri *Edukado, ĝiaj celoj, ĝiaj principoj, ĝia utileco kaj ĝia konsekvenco*, kvankam iu loko estis rezervita al li sur la podio. Ekde tiam, la du fratoj ne revidis unu la alian. Sed,

aliflanke, neniam ili malkaŝe kverelis, tiel ke ĉio kredigis ke kompromiso inter ili estus facilaĵo por konkludi. Jozefo (laŭ ordono de Maŭrico) devis profiti de sia situacio kiel duanaskito; kaj Virmastro ĉiam havis la reputacion esti nek troŝparema nek kverelema. Jes, ĉiuj elementoj de kompromiso inter la du fratoj kuniĝis ! Kaj Maŭrico, ekde la morgaŭo, tute vigligita de la perspektivo povi finfine rericievi siajn 7.800 sterlingajn pundojn⁽²⁾, rapidegis al la oficejo de sia kuzo Miĥaelo.

Miĥaelo Finsinko estis ia publika persono. Tre frue spertigita pri la leĝo, kaj tute sen protektantoj, li fariĝis la spertulo pri dubindaj aferoj. Ni konis lin kiel advokato pri senesperaj kaŭzoj. Oni sciis lin kapablan eltiri atestaĵon el ŝtupo, aŭ produktigi interezojn de orminejo. Kaj konsekvence, lia kabineto estis sieĝita de la multnombra kasto de tiuj kiuj ankoraŭ havas iom da reputacio por perdi, kaj kiuj estas perdontaj tiun malmulton kiu restas el ili, de tiuj kiuj faris bedaŭrindajn konatiĝojn, kiuj perdis kompromitajn paperojn, aŭ kiuj devis elteni provojn de ĉantaĝo de siaj eks-servistoj. En la intima vivo Miĥaelo estis plaĉa homo. Sed lia profesia sperto donis al li, kontraste, grandan guston por solidaj kaj sekuraj investoj. Fine, eĉ pli kuraĝiga detalo, Maŭrico sciis ke lia kuzo ĉiam mallaŭdis la aferon de la tontino⁽¹⁾.

Estis do kun preskaŭ la certeco sukcesi ke Maŭrico tiumatene sin prezentis antaŭ sia kuzo kaj febre pretiĝis por submeti al li sian planon. Dum pli ol kvaronhoru, la proceduristo, sen interrompi lin, lasis lin insisti pri la evidentaj avantaĝoj de kompromiso kiu permesus al la du fratoj partigi inter si la totalon de la tontino. Fine, Maŭrico vidis sian kuzon sin levi el sia brakseĝo kaj sonorigi por alvoki komizon.

- Nu ! evidente, Maŭrico, diris Miĥaelo, tio ne taŭgas !

Vane la komercisto de ledaĵoj pledis kaj rezonis, kaj revenis ĉiujn sekvajn tagojn por daŭre pledi kaj rezoni. Vane li proponis supergajnon de mil, du mil, tri mil pundoj⁽²⁾. Vane li proponis, en la nomo de sia onklo Jozefo, kontentiĝi je triono de la tontino⁽¹⁾ kaj lasi por Miĥaelo kaj lia patro la aliajn du trionojn. La proceduristo ĉiam donis al li la saman respondon : "Tio ne taŭgas".

- Miĥaelo ! finfine ekkriis Maŭrico, mi ne komprenas al kio vi volas alveni ! Vi ne respondas al miaj argumentoj, vi eĉ ne diras vorton ! Miaflanke mi kredas ke via sola celo estas kontraŭi min !

La proceduristo bonkorece ridetis.

- Estas iu afero kiun vi povas kredi, ĉiuokaze, li diris : estas ke mi estas rezoluta ne konsideri vian proponon ! Vi vidas ke mi hodiaŭ estas iom pli komunikema; ĉar estas la lasta fojo ke ni interparolas pri ĉi tiu temo !

- La lastan fojon ! ekkriis Maŭrico.

- Jes ! mia bonulo, perfekte ! La forira trinko ! respondis Miĥaelo. Mi ne povas oferi al vi mian tutan tempon ! Kaj, pri tio, ĉu vi mem ja havas nenion por fari ? Ĉu do la komerco de ledaĵoj iras per si mem, sen ke vi bezonas prizorgi ĝin ?

- Ho ! Vi nur provas malbonhumorigi min ! furioze grumblis Maŭrico. Vi ĉiam malamis kaj malestimis min, ekde la infanaĝo !

- Nu, ne, ne, mi neniam pensis malami vin ! rebatis Miĥaelo laŭ sia plej akordiga tono. Male, mi plivole havas amikecon al vi; vi estas persono, tiel miriga, tiel neatendita, tiel romantika, almenaŭ vidante vin de ekstere !

- Vi pravas ! diris Maŭrico sen aŭskulti lin. Ne utilas ke mi revenu ĉi tien ! Mi vidos vian patron mem !

- Ho ! Ne, vi ne vidos lin ! diris Miĥaelo. Neniu povas vidi lin !

- Mi ŝatus scii kial ? kriis lia kuzo.

- Kial ? Mi neniam sekretis tion; ĉar li estas tro suferanta !

- Se li estas tiel suferanta, kiel vi diras tion, kriis Maŭrico, des pli da kialo por ke vi akceptu mian proponon !
Mi volas vidi vian patron !

- Ĉu vere ? demandis Miĥaelo.

Post tio, ekstaranta, li sonorigis al sia komizo.

Tamen venis la tempo, kiam, laŭ la opinio de S^{ro} Farado Bondo, (la fama kuracisto kies nomon ĉiuj niaj legantoj certe konas, eĉ se nur pro tio ke li vidis ĝin piede de sanbultenoj publikigitaj en la ĵurnaloj), la malbonsorta Jozefo, tiu kokino kun ovoj el oro, devis esti transportita al la pli pura aero de **Burnmuto**. Kaj, kun li, la tuta familio iris ekloĝi en ĉi tiu eleganta dezerto de vilaoj : Julia, kontentega, ĉar foje okazis al ŝi, en Burnmuto, konatiĝi; Johano, senkonsola, ĉar ĉiuj liaj gustoj estis en urbo; Jozefo, tute indiferenta pri la loko kie li troviĝis, kondiĉe ke li havu ĉemane plumon, inkon kaj kelkajn gazetojn; fine Maŭrico mem sufiĉe kontenta por, resume, iom maloftigi siajn vizitojn al la oficejo kaj havi liberan tempon por pripensi pri sia situacio.

La kompatinda knabo estis preta por ĉia forofero; ĉio kion li petis, estis reakiri sian monon kaj sukcesi formeti la ledkomercon. Tiel ke, pro la modereco de liaj postuloj, ŝajnis al li tre strange ke li ne trovis rimedon instigi Miĥaeloⁿ al aranĝo. "Se nur mi povus diveni la kialojn kiuj inklinigas lin rifuzi mian proponon !" Li senfine ripetis tion al si. Kaj, tage, promenante en la arbaroj de **Branksomo**; nokte, sin turnante sur sian liton; ĉetable, forgesante manĝi; ĉebane, forgesante revesti sin, ĉiam li havis la menson hantata de ĉi tiu problemo : "Kial. Miĥaelo rifuzis ?"

Fine, iun nokton, li ekkuris en la ĉambron de sia frato, kiun li vekis per fortaj skuoj.

- Kio ? Kion okazas ? demandis Johano.

- Julia reiros morgaŭ ! respondis Maŭrico. Ŝi revenos al Londono, prepari la domon kaj dungi kuiristinon. Kaj, postmorgaŭ, ni ĉiuj sekvos ŝin !

- Ho ! Bone ! ekkriis Johano. Sed kial ?

- Johano, mi trovis ! serioze rebatis lia frato.

- Trovis kion ? demandis Johano.

- Trovis kial Miĥaelo ne volas akcepti mian kompromison ! diris Maŭrico. Kaj estas ĉar li ne povas akcepti ĝin ! Estas ĉar onklo Virmastro mortis, kaj li kaŝas lin !

- Ĉiopova Dio ! ekkriis la impresebla Johano. Sed pro kia kialo ? Por kia intereso ?

- Por malebligi ricevi la profiton de la tontino⁽¹⁾ ! diris lia frato.

- Sed li ne povas tion ! kontestis Johano. Vi rajtas postuli ateston de la kuracisto !

- Kaj ĉu vi neniam aŭdis paroli pri kuracistoj kiuj lasas sin subaĉeti ? demandis Maŭrico. Ili estas tiom oftaj kiom fragoj en la arbaroj; vi povas laŭvole trovi multe da ili po tri kaj duono pundoj⁽²⁾ pokape.

- Mi ja scias ke miaflanke, mi ne konsentus por malpli ol kvindek pundoj⁽²⁾ ! Ne sukcesis Johano sin retenigi por diri.

- Kaj tiel, Miĥaelo intencas trompi nin ! daŭrigis Maŭrico. Lia klientaro malpliĝas, lia reputacio malpliĝas, kaj kompreneble, li havas planon; ĉar la ulo estas terure ruza. Sed ankaŭ mi ja estas ruza, kaj plie mi havas miaflanke la forton de malespero. Mi perdis 7.800 pundojn⁽²⁾ kiam mi estis ankoraŭ orfo sub kuratoreco !

- Ho ! Ne rekomencu tedi nin per ĉi tiu rakonto ! interrompis Johano. Vi bone scias ke vi jam perdis multe pli da mono volante reakiri tiun ĉi !

Ĉapitro II

Kie Maŭrico prepariĝas por agi.

Konsekvence, kelkajn tagojn poste, la tri viraj membroj de tiu ĉi malĝoja familio povintus esti observataj (de leganto de [F. du Boisgobej](#)) envagoniĝantaj en la trajnon por Londono, ĉe la stacidomo de Burnmuto. La vetero, laŭ la aserto de la barometro, estis "ŝanĝa", kaj Jozefo surhavis la kostumon konforma al tiu temperaturo laŭ la preskribo de S^{ro} Farado Bondo; ĉar ĉi tiu eminenta praktikisto, kiel oni scias, estas ne malpli strikta pri aferoj de vesto ol pri dieto.

Mi kuraĝas diri ke estas malmultaj homoj kun neforta sano kiuj ne almenaŭ provis vivi konforme al la preskriboj de S^{ro} Farado Bondo. "Evitu ruĝajn vinojn, sinjorino, ĉiuj miaj legantinoj certe aŭdis diri tion al si, evitu ruĝajn vinojn, femuraĵon de ŝafido, oranĝajn marmeladojn kaj nerostitan panon! Enlitiĝu ĉiunokte, je la deka kaj kvarono, kaj (bonvolu) vestu vin per higiena flanelo supre kaj malsupre! Ekstere, la martesa pelto ŝajnas taŭga al mi! Ne forgesu ankaŭ havigi al vi paron da botetoj de la firmo Dalo kaj Krumbio!" Kaj poste, tre verŝajne, post kiam vi jam pagis vian viziton, S^{ro} Farado estos revokinta vin, ĉe la sojlo de sia konsultejo, por aldoni laŭ aparte firma tono: "Ankoraŭ nemalhavebla antaŭzorgo, se vi volas resti en la vivo, evitu boligitan sturgon!"

La malbonsorta Jozefo estis submetata kun terura rigoro al la kuracado de S^{ro} Farado Bondo. Li havis sur la piedoj san-botetojn; lia pantalono kaj lia jako estis el vera aerumiĝanta drapo; lia ĉemizo estis el higiena flanelo (el iom malpli valora kvalito, verdire), kaj li estis volvita ĝis la genuoj en la neevitebla peltaĵo el martesa pelto. Eĉ la oficistoj de

la stacidomo Burnmuto povis rekonigi en ĉi tiu maljuna sinjoro iun estulon de S^{ro} Farado, kiu cetere sendis ĉiujn siajn pacientojn al tiu restadejo. Estis, en la persono de onklo Jozefo, nur unu signo de individua gusto : tio estis turista kaskedo, kun pinta viziero. Ĉiuj insistaj petoj de Maŭrico malsukcesis antaŭ la obstino de la maljunulo por surmeti tiun ĉi kapveston, kiu rememorigis al li la antaŭnelonge spertintan emocion, kiam li fuĝis antaŭ duonmortinta ŝakalo sur la ebenaĵoj de Efeso.

La tri Finsinko^j grimpis en sian kupeon, kie ili tuj komencis kvereli : malgrava cirkonstanco en si mem, sed kiu montriĝis, tute samtempe, ege malfeliĉa por Maŭrico kaj, mi kuraĝas kredi tion, feliĉa por mia leganto. Ĉar se Maŭrico, anstataŭ absorbiĝi en sia kverelo, dum momento elkliniĝintus ĉe la pordo de sia vagono, la rakonto kiun ni estas legonta, ne povus esti skribita. Maŭrico, fakte, ne malsukcesus observi la alvenon sur la kajan kaj la eniron en najbaran kupeon de dua vojaĝanto vestita per la uniformo de S^{ro} Farado Bondo. Sed la kompatinda knabo havis ion alian en kapo, ion kion li konsideris (kaj Dio scias kiel li eraris !) kiel multe pli grava ol gapvagi sur la kajo antaŭ ol foriro de la trajno.

- Neniam ni vidis ion similan ! li ekkriis tuj sidinta, rekomencante diskuton kiu, por tiel diri, ne ĉesis ekde la mateno. Ĉi tiu bileto ne estas via ! Ĝi estas mia !

- Ĝi estas je mia nomo ! rebatis la maljunulo kun obstineco miksita kun amareco. Mi rajtas fari tion kion plaĉas al mi per mia mono !

La "bileto" estis ĉeko por okcent sterlingaj pundoj⁽²⁾, kiun Maŭrico, dum la matenmanĝo, transdonis al sia onklo por ke li subskribu ĝin, kaj kiun la maljunulo simple enpoŝigis.

- Vi aŭdas lin ! eligis Maŭrico. Lia mono ! Sed ne estas, ĝis eĉ la vestaĵoj kiujn li havas sur la dorso, kiu ne apartenas al mi !

- Lasu lin trankvile ! grumblis Johano. Vi ambaŭ komencas incitegi min !

- Tio ne estas taŭga maniero paroli kun via onklo, sinjoro ! kriis Jozefo. Mi estas rezoluta ne plu toleri ĉi tiun malrespekton ! Vi estas paro da ege malĝentilaj, arogantaj kaj scenciaj fijunuloj; kaj mi decidis ĉesigi ĉi tiun situacion !

- Malbeno ! eligis la afabla Johano.

Sed Maŭrico ne prenis la aferon tiel filozofie. La neantaŭvidita malobeemo de lia onklo tute konfuzis lin; kaj la lastaj paroloj de la maljunulo aŭguris al li nenion bonan. Li ĵetis al onklo Jozefo malkvietajn ekrigardojn.

- Bone ! Bone ! li fine diris. Ni provos finaranĝi ĉion ĉi kiam ni estos en Londono !

Jozefo, responde, eĉ ne honoris lin per rigardo. Per siaj tremantaj manoj, li malfermis numeron de la Brita Mekanikisto, kaj spite, absorbiĝis en la studadon de tiu periodaĵo.

"Mi demandas al mi tion kio povis subite igi lin tiel ribelema ? pensis lia nevo. Jen, ĉiuokaze, okazaĵo kiu ne multe plaĉas al mi !"

Kaj li gratis al li la nazon, kutima signo de interna lukto. Tamen la trajno daŭrigis sian vojon tra la mondo, kunportante kun ĝi sian ordinaran ŝarĝon de homaro, inter kiuj la maljuna Jozefo, kiu ŝajnis esti absorbiĝinta en sia revuo, kaj kiu dormetis kun la laŭdire ridigaj anekdotoj de "Legu min !", kaj Maŭrico kiu remaĉis en sia kapo tutan mondon da rankoroj, da suspektoj kaj da alarmoj. Estas tiel ke la trajno preterpasis la regionon de Kristokirko, Herno kun ĝiaj arbaroj de abioj, Lignoringo, kaj ankoraŭ aliaj stacidomoj. Kun mallonga malfruo, sed kiu mem estis nenio alia ol normala, li alvenis al stacidomo meze de **Nov-Arbaro**, stacidomo kiun mi alie nomos per la pseŭdonomo Brundekano, en la okazo se la Kompanio de la Sud-Okcidento sin riskus

ofendiĝi pro miaj maldiskretaĵoj.

Multaj pasaĝeroj rigardis tra la fenestro de sia kupeo. Inter ili estis ĝuste la maljuna sinjoro kies eniron en la trajnon Maŭrico neglektis observi. Kaj oni permesos al mi profiti la okazon por nun diri kelkajn vortojn pri tiu ĉi rolulo ĉi tie. Ĉar unue tio sendevigos min reparoli pri li, kaj poste mi ja kredas tion ke, dum la tuta daŭro de mia historio, mi neniam plu renkontos alian tiel respektindan personon. Ne gravas koni lian nomon, sed lian vivmanieron. Ĉi tiu maljuna ĝentlemano pasigis sian vivon vagante tra Eŭropo; kaj ĉar fine, tridek jaroj de legado de la *Mesaĝisto de Galignano* lacigis lian vidpovon, li subite revenis al Anglio por konsulti okuliston. De okulisto al dentisto, kaj de tiu ĉi al kuracisto, ĝi estas la neevitebla irado. Nuntempe, nia maljuna ĝentlemano estis inter la manoj de S^{ro} Farado Bondo; vestita per aerumiĝanta drapo, kaj sendita al restadejo de Burnmuto; kaj li estis reiranta al Londono, post fino de lia restado, por raporti pri sia zorgado al la eminenta praktikisto. Li estis unu el tiuj senkarakteraj, monotonaj maljunaj angloj kiujn ni ĉiuj vidis, centfoje, eniri al la komuna tablo kie ni manĝis, en Kolonjo, en Salcburgo, en Venecio. Ĉiuj administrantoj de hoteloj en Eŭropo konas laŭ iliaj nomoj la kompletan serion de tiuj vojaĝantoj, kaj tamen se morgaŭ, la kompleta serio malaperus subite, neniu ekkonscius pri ilian foreston. Ĉi tiu vojaĝanto, aparte, estis el preskaŭ ĉagrena senutileco. Li pagis sian fakturon ĉe Burnmuto antaŭ ol foriri; ĉiuj liaj transporteblaj posedaĵoj estis deponita, laŭ formoj de du kofroj, en la pakvagono.

Okaze de lia subita malapero, la kofroj, post la laŭleĝa tempolimo, estus vendataj al judo kiel nepostulita pakaĵo; la ĉambristo de S^{ro} Farado Bondo estus senigita, je la jarfino, da kelkaj ŝilingoj⁽³⁾ de trinkmono; la diversaj hotelestroj de

3 Dudekono de pundo(2), 1 penco = 1/12 ŝilingo.

Eŭropo, je la sama dato, konstatus etan malpliigon de siaj profitoj : kaj tio estus ĉio, absolute ĉio. Kaj eble la maljuna ĝentlemano pensis pri io simila al tio kion mi ĵus diris, ĉar li havis sufiĉe melankolian mienon, kiam li enŝovis sian senharan kranion ene de la vagonon, kaj kiam la trajno rekomencis fumi sub la ponton kaj transen. kun akcelata rapideco, pasante laŭvice tra la densejoj kaj maldensejoj de Nov-Arbaro.

Sed jen, je kelkcent metroj de Brundekano, okazis abrupta halto. Maŭrico Finsinko konsciis pri subita bruo de voĉoj, kaj sin ĵetis al la fenestro. Virinoj kriegis, viroj saltis sur la rando de la trako; la fervojistoj kriis al ili ke ili restu sur siaj sidlokoj. Kaj poste la trajno komencis malrapide retroiri al Brundekano; kaj poste, la sekvan minuton, ĉiuj ĉi tiuj diversaj bruoj perdiĝis en la apokalipsa sibilado kaj la tondra albatigo de la eksprestrajno kiu kontraŭsence alkuris.

La finan bruon de la kolizio, Maŭrico ne aŭdis ĝin. Eble li svenis ? Li nur havis konfuzan rememoron esti vidanta, kiel en sonĝo, sian vagonon renversiĝi kaj dispeciĝi, kiel kartodomo. Kaj la fakto estas ke, kiam li rekonsciigis, li kuŝis sur la grundo, kun malbona griza ĉielo super sia kapo, kiu terure doloris lin. Li direktis la manon al sia frunto, kaj ne miris konstati ke ĝi estas ruĝa pro sango. La medio estis plena de netolerebla zumado, kiun Maŭrico pensis ke li ĉesus aŭdi ĝin kiam la konscio finiĝintus reveni al li. Ĝi estis kiel la bruo de laboranta forĝejo.

Kaj baldaŭ, pro la instinkta sprono de scivolemo, li rektiĝis, sidiĝis kaj rigardis ĉirkaŭ si. La trako, en ĉi tiu loko, leviĝis laŭ abrupta kurbiĝo. Kaj, ĉiuflanke, ĉirkaŭantaj lin, Maŭrico videtis la restaĵojn de la trajno de Burnmuto. La disrompitaĵoj de la kontraŭiranta eksprestrajno estis plejparte kaŝitaj malantaŭ la arboj; sed, tutĝuste ĉe la kurbiĝo, sub nuboj de nigra vaporo, Maŭrico vidis tion kio

restis pri la du maŝinoj, unu sur la alia. Laŭlonge de la trako, homoj kuris tien kaj tien, kaj kriis kurante; aliaj kuŝis senmovaj, kiel dormantaj trampo.

Subite Maŭrico havis ideon : "Okazis akcidento ! li pensis, kaj la konscio pri lia sagaceco redonis al li iom da kuraĝo. Preskaŭ samtempe liaj okuloj falis sur Johano", kuŝita apud li, kaj kun terura paleco. "Kompatinda maljunulo mia ! Kompatinda kamarado mia !" li diris al si retrovante, sen scii de kie, malnovan lernejan terminon. Post tio, kun infana tenereco, li prenis en sia mano la manon de sia frato. Kaj baldaŭ, ĉe la kontakto de tiu mano, Johano malfermis la okulojn, abrupte eksidis kaj movigis la lipojn, sen sukcesi elirigi iun sonon. "Bus ! Bus !" li eligis fine, per fantoma voĉo.

La bruego de forĝejo kaj la fumo neelteneble daŭris. "Ni eskapu ĉi tiun inferon !" ekkriis Maŭrico. Kaj la paro helpis unu la alian surpiediĝi, sin skuis kaj rigardis la funebran scenon ĉirkaŭ ili. Samtempe, grupo da homoj alproksimiĝis al ili.

- Ĉu vi estas vunditaj ? kriis al ili malgranda viro kies palega vizaĝo estis tute kovrita de ŝvito, kaj kiu, laŭ la maniero kiel li estris la grupon, evidente devis esti kuracisto.

Maŭrico montris sian frunton; la vireto, post esti levanta la ŝultrojn, donis al li flakonon da brando.

- Jen, li diris, trinku gluton da ĉi tio, kaj poste transdonu la flakonon al via amiko, kiu ŝajnas eĉ pli ol vi bezoni ĝin ! Kaj poste, post tio, venu kun ni ! Necesas ke ĉiuj helpu nin ! Estas multe por fari ! Vi ĉiam povos fari ion utila, eĉ nur irante serĉi brankardojn !

Apenaŭ la kuracisto kaj lia sekvantaro malproksimiĝis, kiam Maŭrico, sub la vigliga influo de la kordialo, finis rekonsciiĝi pri si.

- Disinjoro ! li ekkriis. Kaj onklo Jozefo ?

- Ĉi-rilate, diris Johano, kien li ja sukcesis enŝoviĝi ? Li ne povas esti malproksime ! Mi esperas, ke la kompatinda maljunulo ne estas tro difektita !

- Venu helpi min serĉi lin ! diris Maŭrico per tute aparta tono de firma decido.

Poste, li subite eksplodis : "Kaj se li estus morta ?" li ĝemis montrante la pugnon al la ĉielo.

Tien kaj tien la du fratoj kuris, ekzamenante la vizaĝojn de la vunditoj, turnante la mortintojn. Ili tiamaniere detale ekzamenis certan dudekon da homoj; kaj ankoraŭ neniu spuro de onklo Jozefo. Sed baldaŭ ilia esploro alproksimigis ilin al la centro de la kolizio, kie la du maŝinoj daŭris vomi fumon kun surdiga bruego. Ĝi estis parto de la trako kie la kuracisto kaj lia sekvantaro ne ankoraŭ alvenis. La grundo, ĉefe ĉe la rando de la arbaro, estis plena de malglataĵoj : ĉi tie fosaĵo, tie teramaso superita de bosketo de genisto. Multe da korpoj povis esti kaŝitaj en ĉi tiu loko; kaj la du junaj nevoj esploris ĝin kiel montrahundoj dum ĉaso. Kaj subite Maŭrico, kiu paŝis antaŭe, haltis kaj etendis sian montroringron per tragika gesto. Johano sekvis la direkton de la fingro de sia frato.

Funde de truo de sablo kuŝis io kio antaŭnelonge estis homa estaĵo. La vizaĝo estis timige stumpigita, ĝis la grado esti tute nerekonebla; sed la du junuloj ne bezonis rekoni la vizaĝon. La kalva kapo disŝutita de maldensaj blankaj haroj, la peltaĵo el martesaĵo, la aerumiĝanta drapo, la higiena flanelo, ĉio, ĝis la san-botetoj de S^{roj} Dalo kaj Krumbio, ĉio certigis ke ĉi tiu korpo estas tiu de onklo Jozefo. Nur la kaskedo kun pinta viziero certe perdiĝis en la katastrofo, ĉar la mortinto estis nudkapa.

- La kompatinda maljuna besto ! eligis Johano kun iomete da vera emocio. Mi ja donus dek pundojn⁽²⁾ por ke ni ne envagonigus lin en tiun trajnon !

Sed estis emocio el tute alia naturo, kiu estis videbla sur la vizaĝo de Maŭrico, dum li restis klinita super la kadavro. Li pensis pri ĉi tiu nova kaj supera maljustaĵo de la destino. Li estis ŝtelita je 7.800 pundoj⁽²⁾ dum li estis orfo sub kuratoreco; li estis perforte dungita por komerco de ledaĵoj, kiu ne funkciis; ĝi estis embarasita de fraŭlino Julia; lia kuzo planis senigi lin de la profito de la tontino⁽¹⁾; li tute eltenis ĉion, li preskaŭ povis digne diri, kaj jen nun ke oni mortigis lian onklon !

- Rapide ! li diris al sia frato per anhelanta voĉo, prenu lin ĉe la piedoj; necesas ke ni kaŝu lin en la arbaron ! Mi ne volas ke aliaj povu trovi lin !

- Kia ŝerco ! ekkriis Johano. Por kio do ?

- Faru tion kion mi diras ! rebatis Maŭrico ekprenante la kadavron ĉe la ŝultroj. Ĉu vi do volas ke mi kunportu lin per mi mem ?

Ili troviĝis ĉe la rando de la arbaro; post dek aŭ dek du paŝoj ili estis ŝirmitaj, kaj iom pli for, en sableca senarbejo, ili demetis sian ŝarĝon; post tio, restariĝante, ili melankolie rigardis lin.

- Kion vi planas fari kun li ? murmuris Johano.

- Enterigi lin, kompreneble ! respondis Maŭrico.

Li malfaldis sian poŝtranĉilon, kaj komencis fosi la sablon.

- Neniam vi sukcesos ion per via tranĉilo ! kontestis lia frato.

- Se vi ne volas helpi min, vi, senvalora timulo, kriegis Maŭrico, iru diablen !

- Ĝi estas la plej ridinda frenezaĵo ! eligis Johano; sed ne estas dirota ke oni povu akuzi min esti malkuraĝulo !

Kaj li sin metis en pozicion por helpi sian fraton.

La grundo estis sableca kaj malpeza, sed tute plenega de radikoj de la ĉirkaŭaj abioj. La du junuloj kruele sangigis

siajn manojn. Unu horo de heroa laboro, ĉefe fare de Maŭrico, kaj apenaŭ la fosaĵo estis profunda je ok aŭ naŭ colojn. En ĉi tiun fosaĵon, la korpo estis metita, pli-malpli bone kiel eble; la sablo estis amasigita supren, kaj poste alia sablo kiun oni devis preni aliloken, ne malpli malfacile. Bedaŭrinde ! Ĉe iu fino de la malgajega tumulto, du piedoj daŭre vidiĝis ekster la sablo, vestitaj de okulfrapantaj sandalotetoj.

Sed domaĝe ! La nervoj de la tombistoj estis elĉerpitaj. Maŭrico mem ne plu eltenis. Kaj, similaj al du lupoj, la du fratoj forfuĝis al pliprofundaĵo de la apudan densejon.

- Ni faris nian plejbonon ! diris Maŭrico.

- Kaj nun, respondis Johano, eble vi kompleksos diri al mi tion kion ĉio ĉi signifas !

- Vere, ekkriis Maŭrico, se vi ne komprenas ĝin per vi mem, mi malesperas komprenigi ĝin al vi !

- Ho ! Mi ja komprenas ke estas io kio rilatas al la tontino⁽¹⁾ ! Rebatis Johano. Sed mi diras al vi ke tio estas vera frenezeco ! La tontino⁽¹⁾ estas perdita, jen ĉio !

- Mi rediras al vi ke onklo Virmastro estas morta ! kriis Maŭrico. Mi scias tion; estas en mi voĉo kiu diras tion al mi !

- Jes, kaj ankaŭ onklo Jozefo mortis ! diris Johano.

- Li ne estas morta, se mi ne volas tion ! respondis Maŭrico.

- Nu ! eligis Johano, ni konsentu ke onklo Virmastro mortis ! En ĉi tiu kazo, ni devas nur diri la veron, kaj ordoni Miĥaeloⁿ fari same !

- Vi ankoraŭ taksas Miĥaeloⁿ kiel stultulon ! rikanis Maŭrico. Ĉu vi ne kapablas kompreni ke li antaŭ jaroj aranĝis sian friponaĵon ? Li havas ĉion sub la mano : la flegistino, la kuracisto, la atestilo tute preta, sed kun la dato malplena. Ni malkaŝu nur la aferon kiu ĵus okazis, kaj mi vetas ke, post

du tagoj, ni ekscios pri la morto de onklo Virmastro ! Jes, sed bone aŭskultu ! Tio kion Miĥaelo povas fari, ankaŭ mi povas fari tion. Se li kapablas blufi min, ankaŭ mi povas blufi lin ! Se lia patro devas eterne vivi, nu ! kun Dio, mia onklo same faros !

- Kaj kion vi faras pri la leĝo en ĉio ĉi ? demandis Johano.

- Homo devas kelkfoje havi la kuraĝon obei al sia konscienco ! digne respondis Maŭrico.

- Sed ni supozu ke vi eraras ! Ni supozu ke onklo Virmastro estas viva kaj fartas bonege !

- Eĉ tiuokaze, respondis Maŭrico, nia situacio tute ne estas pli malbona ol antaŭe : eĉ, ĝi estas pli bona ! Onklo Virmastro nepre devos morti iun tagon. Dum onklo Jozefo vivis, ankaŭ li nepre devis fine morti iam : dum nun ni ne devas timi tiun alternativon. Tute ne estas limo al la kombinaĵo kiun mi proponas; ĝi povas daŭri ĝis la Lasta Juĝo !

- Se almenaŭ mi vidis tion kio ĝi estas, via kombinaĵo ! suspiris Johano. Sed, vi scias, kompatinda maljunulo mia, vi ĉiam estis tiel terura utopiulo !

- Mi ŝatus scii kiam mi iam revis ! kriis Maŭrico. Mi posedas la plej belan kolekton da sigelringoj kiu ekzistas en Londono !

- Jes, sed vi scias, estas la afero pri ledaĵoj ! sugestis la alia. Vi ne povas nei ke tio estas fiasko !

Maŭrico donis, en ĉi tiu cirkonstanco, rimarkindan pruvon de sia sinregado : li lasis pasi la aludon de sia frato sen ofendiĝi, sen eĉ respondi.

- Pri tio kiu estas la afero kiu ĉimomente okupas nin, li rekomencis, tuj kiam ni gardos la onklon hejme, en Blomsburio, ni estos ekster embarasoj. Ni enterigos lin en la kelo kiu ŝajnas esti farita intence por akcepti lin; kaj tiam mi devos nur ekserĉi kuraciston kiun ni povu subaĉeti.

- Kaj kial ne lasi lin ĉi tie ? demandis Johano.

- Ĉar ni besonos havi lin sub la mano kiam lia horo venos ! rebatis Maŭrico. Kaj plie, ĉar ni nenion scias pri ĉi tiu lando ! Ĉi tiu arbaro eble estas preferata promenejo por geamantoj. Ne, ne revu viaŭice, kaj pensu kun mi pri tio kio konsistigas la solan realan malfacilaĵon kiun ni havas antaŭ ni ! Kiel ni transportos la onklon al Blomsburio ?

Pluraj planoj estis proponitaj, diskutitaj, kaj forpuŝitaj. Kompreneble ne necesis pensi pri la stacidomo Brundekano, kiu nuntempe devis esti centro de intereso kaj klaĉoj, dum la ĉefaĵo estis ekspedi la korpon al Londono sen ke iu suspektu ion ajn. Johano timeme proponis barelon de biero; sed la objetoj estis tiel evidentaj ke Maŭrico malŝatis esprimi ilin. La aĉeto de pakkesto ankaŭ ŝajnis nepraktika : kial du ĝentlemanoj sen ia ajn pakaĵo bezonintus tian keston ?

- Ne, ni sekvas malĝustan vojstrekon ! kriis finfine Maŭrico. La afero devas esti esplorita per pli da zorgo ! Ni nun supozu, li rekomencis post silento, parolante per frazpecoj kvazaŭ li pensis laŭte, supozu ke ni pomonate luprenus vilaon ! La luprenanto de vilao povas aĉeti pakkeston sen ke oni pensas miri pro tio. Kaj eĉ, supozu ke ni hodiaŭ mem luprenus la domon, ke ĉi-vespere mi aĉetus la keston, kaj ke morgaŭ matene, per manĉareto kiun mi taskas al mi konduki tute sole, mi kunportus la keston al [Ringligno](#), aŭ al [Lindhursto](#), aŭ nu, al ajna stacidomo ! Nenio malebligas nin skribi sur ĝi : specimenojn, ĉu ? Johano, mi pensas ke ĉi-foje mi ĝuste trafis la solvon !

- Fakte, tio ŝajnas farebla ! malkontestis Johano.

- Estas evidenta ke ni uzus kaŝnomojn ! daŭrigis Maŭrico. Ne estus por fari, konservi niajn verajn nomojn ! Kion vi pensus pri "Virmastro", ekzemple ? Tio havigas al vi dignan kaj trankvilan aspekton !

- Dirlididi ! Mi ne volas esti nomata Virmastro ! rebatis lia frato. Vi povas preni la nomon por vi, se ĝi plaĉas al vi ! Koncerne min, mi nomiĝos Vanco, la Granda Vanco. Almenaŭ, jen nomo !

- Vanco ! ekkriis Maŭrico. Iu nomo de klaŭno ! Ĉu vi imagas ke ni ludas pantomimon por amuzi nin ? Neniu iam nomiĝis Vanco krom en la koncertkafejo !

- Jes, kaj jen ĝuste tio kiu plaĉas al mi pri ĉi tiu nomo ! respondis Johano. Tio tuj donas al vi aspekton de artisto ! Por vi, vi povas nomi vin kiel vi volas; mi volegas Vancoⁿ; kaj mi ne cedos pri tio !

- Sed ekzistas amaso da aliaj teatraj nomoj ! petegis Maŭrico; estas Lejburno, Irvingo, Brufo, Toole...

- Estas la nomo de Vanco kiun mi volas, diable, respondis Johano. Mi metis en mia kapo preni ĉi tiun nomon, kaj miaj deziroj estos plenumitaj !

- Bone ! diris Maŭrico kiu ja sentis ke ĉiu klopodo malsukcesus kontraŭ la obstino de sia frato. Mi mem do estos Roberto Vanco !

- Kaj mi estos Georgo Vanco ! ekkriis Johano, la nura originala Georgo Vanco ! Ek por la "nura originalo".

Reboniginte kiel eble plej bone la malordon de sia kostumo, la du fratoj Finsinko^j revenis, per ĉirkaŭvojo, al Brundekano, serĉante manĝon kaj lueblan vilaon. Ne estas ĉiam facile malkovri, improvize, meblitan domon, en loko kiu tute ne estas aktiva pri la akcepto de fremdulojn. Sed la bonŝanco de niaj herooj helpis ilin renkonti maljunan ĉarpentiston, terure surdan, kiu hazarde disponis lueblan domon. Ĉi tiu domo, situanta ĉirkaŭ unu kaj duono kilometro de ĉiu najbaraĵo, ŝajnis al ili tiel taŭga por iliaj bezonoj, ke ili interŝanĝis, ekvidante ĝin, ekrigardon de espero. Vidita de pli proksime, tamen, ĝi ne estis sen prezenti kelkajn malavantaĝojn. Ĝia situo, unue, ĉar ĝi estis lokita en kavon

de ia sekigita marĉo, kun arboj ĉiuflanke ĵetantaj ombron; tiamaniere ke oni preskaŭ ne klare vidis dum plena taglumo. Kaj la muroj estis makulitaj de verdaj makulegoj kies la sola ekvido sufiĉus por malsanigi. La ĉambroj estis malgrandaj, la plafonoj malaltaj, la meblaro nur nominalaj; strangaodoro de malsekeco plenigis la kuirejon, kaj la nura dormoĉambro enhavis ununuran liton.

Maŭrico, esperante ricevi rabaton, rimarkigis al la maljuna ĉarpentisto ĉi tiun lastan malagrablajn.

- Vere! rebatis la viro kiam finfine li aŭdis, se vi ne kapablas duope dormi en la sama lito, vi eble pli bone farus provi lupreni kastelon!

- Kaj plie, daŭrigis Maŭrico, ne estas akvo! Kiel ni havigos al ni akvon?

- Ni devas nur plenigi ĉi tion ĉe la fonto kiu estas tute proksime! respondis la ĉarpentisto, frapante per sia dika nigra mano sur malplenan barelon lokitan apud la pordo. Prenu! Jen sitelo por iri al la fonto! Tio vere estas sufiĉe plezuriga!

Maŭrico palpebrumis al sia frato, kaj ekezkamenis la barelon. Ĝi estis preskaŭ nova, kaj ŝajnis solide konstruita. Se ili ne estis anticipite rezolutaj lupreni ĉi tiun domon, la barelo finintus decidigi ilin. La kontrakto estis do tuj konsentita, la lupago de la unua monato estis senprokraste pagita, kaj unu horon poste, oni povus observi la fratojn Finsinko^j enirantajn en sia ĉarma dometo, kun grandega ŝlosilo, simbolo de ilia luado, alkoholprimuso kiu devis esti utila en la kuirejo, decaj porkripoj, kaj unu litro da la plej malbona viskio en la tuta **Hampŝiro**. Kaj jam ili rezervis, por la morgaŭo (pretekste ke ili estas du pejzaĝaj pentristoj), malpezan sed solidan ĉarumon; tiamaniere ke, kiam ili ekokupis sian novan loĝejon, ili rajtis diri al si ke la ĉefa parto de ilia afero estis aranĝita.

Johano ekpreparis la teon, dum Maŭrico, pro multe da esplorado de la domo, havis la bonŝancon trovi la kovrilon de la barelo, sur unu el la tabuloj de la kuirejo. Tiel, la pakada materialo estis tie, komplete ! Pro manko de pajlo, la litkovriloj tre bone povus servi por senmovigi la objekton en la barelo; ĉi tiuj kovriloj estis tiel malpuraj ke la du fratoj ne povis pensi pli bone utiligi ilin. Maŭrico, vidante la obstaklojn glatiĝi, sentis sin inundita per sento kiu similis al ekzaltiĝo.

Kaj tamen estis ankoraŭ unu obstaklo por glatiĝi : ĉu li konsentos resti sola en la domo ? Maŭrico longtempe hezitis antaŭ ol kuraĝi meti al li la demandon.

Ne gravas : estis kun reala bona humoro ke la du fratoj sidiĝis ĉe la du flankoj de la tablo el blanka ligno, kaj ektranĉis la porkripoj. Maŭrico fieris pro sia eltrovo de la kovrilo; kaj la Granda Vanco volonte aprobis la parolojn de sia frato, laŭ la vera stilo de koncertkafejo, kadence batante sian glason sur la tablo.

- La sukceso de la afero certas ! li fine ekkriis. Mi ĉiam diris al vi ke estus barelo kiu taŭgus por la ekspedo de la pakaĵon !

- Jes, estas vere, vi pravis ! rekomencis lia frato konsiderante la okazon favora por kaĵoli lin. Kaj nun, vi scias, necesos ke vi restu ĉi tie ĝis kiam mi kontaktos vin ! Mi diros ke onklo Jozefo ripozas en la resaniga aero de Nov-Arbaro. Neeblas ke ni kune reiru al Londono, vi kaj mi : neniam ni povus klarigi la foreston de la onklo !

La nazo de Johano plilongiĝis.

- Hej, etulo mia ! li sciigis. Ĉesu, hu ! Vi mem povas resti en ĉi tiu truo ! Mi, mi ne volas !

Maŭrico konsciis ke li ruĝiĝis. Je kia ajn kosto, necesis ke Johano konsentu resti !

- Bonvolu, Joĉjo, li diris, rememorigi al vi pri la pezo de

la tontino⁽¹⁾ ! Se mi sukcesos, ni ĉiu havos dudek mil pundojn⁽²⁾ por investi en bankon ! Jes, kaj eĉ pli proksime al tridek ol dudek, pro la interezoj !

- Jes, sed se vi malsukcesos ! rebatis Johano. Kio okazos en ĉi tiu kazo ? Kia koloro estos la banka investado ?

- Mi zorgos pri ĉiuj elspezoj ! asertis Maŭrico post longa paŭzo. Vi ne perdos speson !

- Nu ! eligis Johano kun granda rido, se ĉiuj elspezoj estas por vi, kaj por mi la duono de la profito, mi bonvolas konsenti resti ĉi tie unu aŭ du tagojn.

- Unu aŭ du tagojn ! ekkriis Maŭrico, kiu komencis koleriĝi kaj sin ankoraŭ retenis nur malfacile. He ! sed vi farus pli por perludi kvin pundojn⁽²⁾ sur ĉevalo !

- Jes eble ! respondis la Granda Vanco; sed tio estas mia temperamento de artisto !

- Tio signifas ke via konduto simple estas monstra ! rekomencis Maŭrico. Mi taskas al mi ĉiujn riskojn, mi pagos ĉiujn elspezojn, mi donas al vi duonon de la profitoj, kaj vi rifuzas trudi al vi la plej malgrandan penon por helpi min ! Tio ne estas taŭga, tio eĉ ne estas afabla.

La impeteco de Maŭrico ne estis sen estigi ian impreson sur la bonega Vanco.

- Sed supozu, li fine diris, ke onklo Virmastro estu viva, kaj ke li ankoraŭ vivu dek jarojn : ĉu necesos ke mi putru ĉi tie dum tiu tuta tempo ?

- Sed ne, ne, kompreneble ne ! rekomencis Maŭrico per pli akordiĝa tono. Mi petas al vi maksimume nur unu monaton. Kaj se onklo Virmastro ne estos morta post unu monato, vi povos foriri eksterlanden !

- Eksterlanden ? vikle ripetis Johano. Hej ! Sed, kial mi ne povus tuj foriri tien ? Kio malhelpus vin diri ke onklo Jozefo kaj mi iris por refortiĝi en Parizo ?

- Nu ! Ne diru stultaĵojn ! rebatis Maŭrico.

- Ne ! Sed fine, iomete pripensu ! eligis Johano. Iom rigardu ĉirkaŭ vi ! Ĉi tiu domo estas vera pork-stalo, kaj tiel tristema, kaj tiel malseka ! Vi mem diris tion, antaŭ momento, ke ĝi estis malseka !

- Nur al la ĉarpentisto ! precizigis Maŭrico; kaj mi diris tion nur por ricevi rabaton ! Verdire, nun kiam ni estas ĉi tie, mi devas konfesi ke oni vidis pli malbone ol tio !

- Kaj kion mi faros por mi ? ĝemis la viktimo. Ĉu almenaŭ mi povos inviti kamaradon ?

- Kara mia, se vi ne opinias ke la tontino⁽¹⁾ meritas etan oferon, diru tion, kaj mi sendos la aferon diablen !

- Ĉu almenaŭ vi vere certas pri la ciferoj ? demandis Johano. Nu ! li daŭrigis kun profunda suspiro, zorgu regule sendi al mi la "*Legu min !*" kaj ĉiujn gazetojn por ridi ! Kaj ja, ek la afero !

Laŭmezure kiel la posttagmezo pasis, la dometo pli intime memorigis pri sia naskiĝmarĉo; pika malvarmo invadis ĉiujn ĝiajn ĉambrojn; la kameno fumis; kaj baldaŭ ventoblovo sendis en la grandan ĉambron, tra la fendoj de la fenestroj, veran pluvegon. Intermite, kiam la melankolio de la du loĝantoj preskaŭ ŝanĝiĝis al malespero, Maŭrico malŝtopis la botelon da viskio; kaj unue ricevis kun ĝojo ĉi tiun distron. Sed la plezuro de la distro estis mallongdaŭra. Mi jam diris ke ĉi tiu viskio estis la plej malbona de la tuta Hampŝiro; nur tiuj kiuj konas la Hampŝiroⁿ, povos aprezi la ĝustan valoron de ĉi tiu superlativo; kaj, fine, la Granda Vanco mem, kiu tamen ne estis kompetentulo, ne plu trovis la kuraĝon alproksimigi al siaj lipoj la malbonegan dekoktaĵon. Imagu, aldoniĝante al ĉio ĉi, la veno de la mallumo, apenaŭ malhelpita de senvalora kandelo kiu obstinis bruli nur unuflanke : kaj ni komprenos ke, subite, Johano ĉesis fajfi inter siaj fingroj, ekzerco al kiu li sin dediĉis ekde unu horo por provi trovi iom da forgeso en la ĝojoj de la arto.

- Neniam mi kapablos resti unu monaton ĉi tie ! li sciigis. Neniu kapablos tion ! Via tuta afero estas freneza, Maŭrico ! Ni tuj foriru de ĉi tie !

Kun admirinda ŝajnigo de indiferenteco, Maŭrico proponis ludon de korko. Al kiaj koncedoj diplomato estas kelkfoje devigata malnobliĝi ! Ĝi estis cetere la ŝatata ludo de Johano (la aliaj ŝajnis al li tro intelektaj), kaj li ludis ĝin kun tiom da bonŝanco kiom da lerteco. La kompatinda Maŭrico, male, malbone ĵetis la spesojn, havis denaskan malbonŝancon, kaj plie apartenis al la speco de la ludantoj kiuj ne kapablas toleri perdi. Sed, tiun vesperon, li estis anticipe preta por ĉiaj sinoferoj.

Ĉirkaŭ la sepa, Maŭrico, post kruelegaj turmentoj, perdis kvin aŭ ses ŝilingojn⁽³⁾. Eĉ kun la tontino⁽¹⁾ antaŭ la okuloj, tio estis la limo de tio kion li kapablis suferi. Li promesis sin venĝi alian fojon, kaj atendante, proponis malgrandan vespermanĝon akompanitan de grogo.

Kaj kiam la du fratoj finis ĉi tiun lastan distrion, la tempo venis por ili eklabori. La akvobarelo estis malplenigita, rulita antaŭ la kuireja fajro, zorge sekigita; kaj la du fratoj ŝteliris eksteren, sub senstelan ĉielon, por iri elfosi sian onklon Jozefoⁿ.

Ĉapitro III

La preleganto en la libereco.

La filozofoj devus ja preni la penon, unu el ĉi tiuj tagoj, por serioze esplori ĉu, jes aŭ ne, la homoj kapablas kontentiĝi per feliĉo. Fako estas ke ne pasas monato sen tio ke filo de familio forkuru el sia hejmo por dungigi sur komerca ŝipo, aŭ ke dorlotita edzo forŝteliĝas ironta al Teksaso kun sia kuiristino. Oni vidis pastrojn fuĝi el siaj paroĥanoj; kaj eĉ troviĝis juĝistoj por libervole forlasi la juĝistaron.

Ĉiuokaze, la leganto tute ne tro surprizos se mi diras al li ke Jozefo Finsinko multfoje meditis fuĝplanojn. La destino de ĉi tiu bonega maljunulo, mi kredas povi asertion, ne realigis la idealon de feliĉo. Certe, S^{ro} Maŭrico, kiun mi ofte havis plezuron renkonti en la metroo, estas ĝentlemano el la plej estimindaj; sed, kiel nevo, mi ne kuraĝus proponi lin kiel modelon. Koncerne sian fraton Johano, li kompreneble estis brava knabo; sed se vi mem ne havus alian interrilaton ol li por reteni vin en via hejmo, mi imagas ke vi ne prokrastus nutri la projekton de eksterlanda vojaĝo. Estas vere ke maljuna Jozefo havis pli firman interrilaton ol la ĉeesto de siaj du nevoj, por reteni lin en Blomsburio; kaj tiu ĉi interrilato tute ne estis, kiel oni povus pensiti, la kompanio de Julia Hazeltino (kvankam la maljunulo sufiĉe amis sian zorgaton), sed pli ĝuste la grandega kolekto da notoj, en kiu li koncentris sian tutan vivon. Ke Jozefo Finsinko rezignis forlasi tiun ĉi kolekton, tio estas cirkonstanco kiu, verdire, malmulte honoras la familiajn virtojn de siaj du nevoj.

Jes, la tento de forfuĝo jam estis malnova je pluraj

monatoj en la animo de la onklo; kaj kiam ĉi tiu subite sin trovis tenanta en manoj ĉekon por 800 pundoj⁽²⁾, pagotan al li, la tento tuj ŝanĝiĝis al evidenta decido. Li konservis la ĉekon kiu, por viro kutime sobra kiel li, signifis riĉecon; kaj li promesis al si malaperi en la homamaso ekde sia alveno en Londonoⁿ, aŭ se li ne sukcesis tion, elŝteliĝi ekster la domo dum la vespero, kaj miksiĝi kiel sonĝo en la milionojn da loĝantoj de la ĉefurbo. Tia estis lia projekto : la aparta koincido de la volo de Dio kaj de misvojigo, faris ke li ne eĉ devis tiom longe atendi por realigi ĝin.

Li estis unu el la unuaj rekonsciiĝantaj kaj restariĝantaj post la katastrofo de Brundekano; kaj li apenaŭ malkovris la prostracian staton de siaj du nevoj ke, ekkomprenante sian bonŝancon, li forkuris tiel plej rapide kiel li kapablis. Iu viro je pli ol sepdek jaroj, kiu ĵus estis viktimo de fervoja akcidento, kaj kiu plie havas la malfeliĉon esti embarasita de la kompleta uniformo de la pacientoj de S^{ro} Farado Bondo, oni ne povus postuli de tia viro tre viglan kuradon; sed la arbaro estis je kelkaj paŝoj, kaj prezentis al la fuĝanto ŝirmejon, almenaŭ portempa. Al ĉi tiu ŝirmejo la maljunulo rifuĝis kun miriga rapideco; kaj poste, sentante sin iom disbatita post la skuo, li kuŝis sin grunden, meze de densejo, kaj ne prokrastis tre profunde endormiĝi.

La vojoj de la sorto ofte proponas spektaklon el la plej amuzaj al la senambicia observanto. Mi ne kapablas, mi konfesas tion, deteni min rideti pensante ke, dum Maŭrico kaj Johano sange vundis al si la manojn por kaŝi en la sablon la korpon de viro kiu estis neniu por ili, ilia onklo dormis per bona revigliga dormo je kelkcent paŝoj de ili.

Li estis vekata de agrabla sono de korno, venanta de la apuda ĉefvojo kie poŝtfiakro promenigis grupon da malfruiĝantaj turistoj. La sono gajigis la maljunan koron de Jozefo, kaj direktis liajn paŝojn tra la arbaro, tiel bone ke li

ne malfruis sin mem trovi sur la ĉefvojo, rigardante sub la viziero dekstren kaj maldekstren, kaj demandante al si tion kion li devis fari kun si. Baldaŭ bruo de radoj leviĝis de malproksime, kaj Jozefo ekvidis proksimiĝi pakaĵveturilon, ŝarĝitan de pakaĵoj, kondukatan de koĉero kun bonvola mieno, kaj vidiganta ambaŭflanke la surskribaĵon : "J. Ŝandlero, kamionisto". Ĉu estis malpreciza (kaj tre neantaŭvidita) poezia instinkto kiu sugestis al onklo Jozefo la ideon daŭrigi sian fuĝon en la ĉaron de S^{ro} Ŝandlero ? Mi plivole kredus al konsideroj de pli funde praktika ordo. La vojaĝo malmultekostus; eble eĉ, kun iom da lerteco, Jozefo povus ricevi senpagan vojaĝon. Restis ja la perspektivo malvarmumi sur la sidloko; sed post jaroj de duongantoj kaj de higiena flanelo, la koro de Jozefo avide sopiris al la risko de nazkataro.

Kaj eble S^{ro} Ŝandlero unue estis iom surprizata trovi, ĉe tiel izolita loko sur la ĉefvojo, tiel maljunan ĝentlemanon, tiel strange vestitan, kaj kiu tiel afable petegis lin bonvoli akcepti lin sur la sidloko de sia veturilo. Sed la kamionisto fakte estis bravulo, ĉiam feliĉa helpi; tiamaniere ke li volonte akceptis la fremdulon. Kaj plie, ĉar li konsideris diskretecon kiel esenca regulo de ĝentileco, li sin detenis meti al li ajnan demandon. La silento cetere ne malplaĉis al S^{ro} Ŝandlero; sed apenaŭ la veturilo denove removiĝis, kiam la inda kamionisto trovis sin devigata suferi la neatenditan ŝokon de prelego.

- La miksaĵo de kestoj kaj pakaĵoj kiujn enhavas vian veturilon, tuj diris la fremdulo, tiel kiel la vido de la bona flandra ĉevalino kiu veturigas nin, konjektigas min ke vi plenumas la oficon de kamionisto en tiu granda sistemo de publikaj transportoj kiu, kun ĉiuj ĝiaj mankoj, estas ĉiaokaze la orgoĵlo de nia lando !

- Jes, sinjoro ! malvigle respondis S^{ro} Ŝandlero kiu ne

tro sciis tion kion li devis respondi. Sed la institucio de la poŝtaj pakaĵoj jam alportis multe da malutileco al nia afero !

- Mi estas homo libera de antaŭjuĝoj, daŭrigis Jozefo Finsinko. Dum mia junaĝo, mi faris multajn vojaĝojn. Nenio estis tro malgranda por mia scivolemo. Sur maro, mi lernis la malsamajn manierojn nodi kablojn, kaj informiĝis pri ĉiuj teknikaj terminoj. En Napolo, mi lernis la arton pretigi makaroniojn; en Kanno, mi instruiĝis pri la principoj de fabrikado de konfinitaj fruktoj. Neniam mi iris aŭdi operon sen antaŭe aĉeti la libreton, kaj eĉ sen konatiĝi kun la ĉefaj arioj, ludante ilin per unu sola fingro sur piano.

- Vi certe vidis multajn aferojn, sinjoro ! rimarkigis la kamionisto vipante sian beston.

- Ĉu vi scias kiomfoje la vorto vipo aperas en la Malnova Testamento ? rekomencis la maljuna ĝentlemano. Ĝi ripetiĝas cent kaj (se mia memoro ne erarigas min) kvardek sep fojojn !

- Vere, sinjoro ! diris S^{ro} Ŝandlero. Jen tio kion mi neniam kredintus !

- La Biblio enhavas tri milionojn kvincent unu mil ducent kvardek naŭ literojn. Pri la versikloj, mi kredas ke estas pli ol dek ok mil. Estis multaj eldonoj de la Biblio; Viklif estis la unua por enporti ĝin en Anglio, ĉirkaŭ la jaro mil tricent. La "Paragrafa Biblio", kiel oni nomas ĝin, estas unu el la plej konataj eldonoj, kaj ŝuldas sian nomon al tio ke ĝi estas dividita en paragrafoj.

La kamionisto sin kontentis seke respondi ke "tio tute eblis", kaj uzis sian atenton al pli kutiman taskon por eviti ĉaron de fojno kiu proksimiĝis kontraŭsence, taskon cetere sufiĉe malfacila, ĉar la vojo estis mallarĝa, kun fosaĵoj ambaŭflanke.

- Mi vidas, komencis S^{ro} Finsinko kiam la ĉaro estis feliĉe preterpasita, ke vi tenas viajn kondukilojn per unu sola

mano. Vi devus teni ilin per ambaŭ manoj !

- Ho ! Ĉu vere, mi bone ŝatas tion ! malŝate ekkriis la kamionisto. Kaj kial do ?

- Tio kion mi diras al vi, estas scienca fakto, rekomencis S^{ro} Finsinko, kaj baziĝas sur la teorio de la levilo, kiu estas unu el la branĉoj de mekaniko. Ekzistas, pri ĉi tiu fako de scienco, kelkaj tre interesaj libretoj je dekdu spesoj pri kiuj mi opinias ke homo de via situacio gajnus legi. Mi timas ke vi apenaŭ praktikis la grandan arton de observado ! Jen preskaŭ duonhoro kiun ni estas kune, kaj vi ankoraŭ ne esprimis unu okazaĵon ! Tie ja kuŝas grava manko, kara amiko mia ! Ekzemple, mi ne scias ĉu vi observis ke, antaŭ momento, pasante apud ĉi tiu ĉaro de fojno, vi preteriris maldekstren ?

- Sed, kompreneble, mi observis tion ! ekkriis S^{ro} Ŝandlero kiu fariĝis kun malamika humoro. La ĉaristo estigintus al mi monpunon, se mi ne preteriris maldekstren !

- Nu ! En Francio, daŭrigis la maljunulo, en Francio kaj ankaŭ, mi kredas, en Usono, en Ameriko, vi estus dekstren irinta !

- Mi ja certigas al vi ke ne ! indigne asertis S^{ro} Ŝandlero. Mi estus maldekstren irinta !

- Mi rimarkas, daŭrigis S^{ro} Finsinko disdegnante respondi, ke vi riparas vian jungilaron per dika fadeno. Mi ĉiam protestis kontraŭ la neglekto kaj rutino de la malsuperaj klasoj en Anglio. En parolado kiun mi iam eldiris antaŭ klera publiko...

- Ĝi ne estas dika fadeno, interrompis mordeme la kamionisto : ĝi estas ŝnureto !

- Mi ĉiam subtenis, daŭrigis la maljunulo, ke en sia intima kaj familia vivo, tiel same kiel en la praktikado de siaj profesioj, la malsuperaj klasoj de ĉi tiu lando estas nesingardaj, rutinaj kaj neinteligentaj. Tiel estas, por

kontentiĝi per unu ekzemplo...

- Kion diable vi volas diri per viaj "malsuperaj klasoj" ?
kriis S^{ro} Ŝandlero. Estas vi mem kiu estas malsupera klaso.
Se mi povintus pensi ke vi estus tia aristokrato, mi ne lasus
vin supreniri en mian veturilon !

Ĉi tuj paroloj estis eldiritaj kun malagraba intenco la
malplej vualita en la mondo : evidente la du viroj ne povis
akordiĝi unu kun la alia. Pri plidaŭrigi la interparolon, necesis
ne pensi tion, eĉ por homo tiel babilema kiel S^{ro} Finsinko. La
maljunulo kontentiĝis mallevi super siajn okulojn la vizieron
de sia kaskedo, per rezignacia gesto; post tio, preninte el sia
poŝo notlibreton kaj bluan krajonon, li ne malfruis
enprofundiĝi en statistiko.

La kamionisto siaflanke rekomencis energie fajfi. Kaj
se, de tempo al tempo, li ĵetis ekrigardon al sia kunulo, estis
kun miksaĵo de triumfo kaj de timo. De triumfo, ĉar li
sukcesis ĉesigi ĉi tiun pluvegon da paroloj. De timo, ĉar li
demandis al si, ĉu subite la koncerna pluvego ne baldaŭ
rekomencos. Eĉ vera pluvego, ia skualo kiu subite falis sur
ilin kaj subite ĉesis, estis eltenita de ambaŭ en silento. Kaj
estis ankoraŭ silente ke ili eniris en la urbon de
Saŭtempo.

Noktiĝis, la montrufenestroj de la butikoj brilis en la
stratoj de la malnova urbo; en la privataj domoj, lampoj
lumigis la vespermanĝon. Kaj S^{ro} Finsinko ekpensis kun
kontenteco, ke li estis povonta ekloĝiĝi en ĉambron kie la
proksimeco de liaj nevoj ne riskos malkvietigi lian dormon. Li
zorge reordigis siajn paperojn, remetis ilin en sian poŝon,
tuis por liberigi al si la gorĝon kaj ĵetis heziteman
ekrigardon al S^{ro} Ŝandlero.

- Ĉu vi estos sufiĉe afabla, li riskis, por montri al mi
gastejon ?

S^{ro} Ŝandlero pripensis dum momento.

- Nu ! li diris, mi demandas al mi ĉu la Blazono de Tregonvelo ne taŭgos ?

- La Blazono de Tregonvelo perfekte taŭgos al mi, respondis la maljunulo, se ĝi estas pura kaj malmultekosta domo, kaj se la tieaj homoj estas ĝentilaj !

- Ho ! Ne estis pri vi kiun mi pensis ! naive respondis S^{ro} Ŝandlero. Mi pensis pri mia amiko Vatso, kiu regas la domon. Li estas malnova amiko mia, ĉu vi komprenas ? Kaj kiu pasintjare faris al mi grandan servon. Kaj nun mi demandas al mi ĉu mi konscie devas embarasi tiel bonan homon per kliento tiel kiel vi, kiu riskas tedegi lin per siaj klarigadoj. Jes, mi demandas al mi ĉu tio estus bone de mi flanko ? aldonis S^{ro} Ŝandlero kun la plena tono de homo turmentita de grava skrupulo de konscienco.

- Aŭskultu tion kion mi tuj diros al vi, mia amiko ! eligis la maljunulo. Vi bonvolis senpage preni min en via veturilo; sed tio ne rajtigas vin paroli al mi per tiu tono ! Nu, jen ŝilingo⁽³⁾ kiel via trinkmono ! Kaj fine, se vi ne volas konduki min al la Blazono de Tregonvelo, mi piediros tien, jen ĉio !

La vigleco de ĉi tiu alparolo timigis S^{ron} Ŝandleroⁿ. Li murmuris ion kiu ŝajnis kvazaŭ bedaŭro, renversis la ŝilingon⁽³⁾ inter siaj fingroj, silente enigis sian veturilon en kurban strateton, poste en aliajn, kaj finfine haltis antaŭ la vigle lumigitaj fenestroj de gastejo. De sia sidloko li alvokis : Vatso !

- Ĉu estas vi, Jemo ? kriis amika voĉo funde de la stalo. Eniru, oĉjo, kaj venu varmigi vin !

- Ho ! Dankon ! respondis la kamionisto. Mi haltas nur unu minuton, pasante, por engastigi maljunan sinjoron kiu volas manĝi kaj loĝiĝi. Sed, sciu, gardu vin kontraŭ li ! Li estas pli malbona ol membro de la Kontraŭalkohola Ligo !

S^{ro} Finsinko iom malfacile malsupreniris; ĉar la longa senmoveco sur la sidloko rigidigis lin, kaj plie li ankoraŭ

sentis la skuon de la katastrofo. La amika S^{ro} Vatso, malgraŭ la averto de la kamionisto, akceptis lin kun perfekta ĝentileco, kaj enirigis lin en la malgrandan malantaŭan ĉambron, kie estis bonega fajro en la kameno. Baldaŭ tablo estis servata en ĉi tiu sama ĉambro, kaj la maljunulo estis invitita sidiĝi antaŭ stufita kokaĵo, kiu ŝajnis esti atendinta lin ekde pluraj tagoj, kaj granda poto da elo freŝe eltirita el la barelo.

Tiu ĉi vespermanĝo redonis al li lian tutan vigecon : tiel ke, kiam li finis festeni, li iris sidiĝi pli proksime al la fajro, kaj komencis ekzameni la homojn sidantajn ĉe la najbaraj tabloj. Tie estis dekelke da drinkantoj, plejparte maturaĝaj, kaj, Jozefo Finsinko vere kontentiĝis konstati tion, ĉiuj apartenantaj al la laborista klaso. Ofte jam la maljuna preleganto havis okazon konstati du el la plej konstantaj trajtoj pri la karaktero de homoj de ĉi tiu klaso, nome, ilian apetiton por negravaj senrilataj faktoj, kaj ilian kul-ton al senbazaj rezonadoj. Tial nia amiko tuj decidiĝis ankoraŭ regali sin, antaŭ la fino de ĉi tiu memorinda tago, per la sana ĝuo de alparolo. Li elprenis siajn okulvitrojn el ilia ujo, fiksis ilin al sia nazo, elprenis el sia poŝo faskon da paperoj kaj disŝutis ilin antaŭ si sur tablon. Li malfaldis ilin, platigis ilin per kompleza gesto. Foje li levis ilin ĝis la alteco de sia nazo, evidente ravita pri ilia enhavo; foje, kuntirante la brovojn, li ŝajnis absorbita en la studo de kelka grava detalo. Diskreta ekrigardo en la ĉambro sufiĉis al li por certiĝi al si la sukceson de lia manovro : ĉiuj okuloj estis turnitaj al li; la buŝoj gapis, la pipoj kuŝis sur la tabloj; la birdoj estis ĉarmitaj. Kaj, ĉe la sama momento, la eniro de S^{ro} Vatso liveris al la oratoro la materialon por lia ekparolado :

- Mi rimarkas, sinjoro, li diris alparolante al la gastejestro, sed kun kuraĝiga rigardo por la cetero de la

aŭskultantaro, kvazaŭ li volis komprenigi ke ĉiu estis bonvena en lia konfido, mi rimarkas ke kelkaj el ĉi tiuj sinjoroj rigardas min kun scivolemo; kaj fakte, ne estas kutime vidi homon okupiĝi pri intelekta esplorado en publika ĉambro de taverno. Sed mi ne sukcesis deteni min relegi kelkajn kalkulojn kiujn mi faris ĉi-matene mem, pri la meza vivkosto en ĉi tiu lando kaj en aliaj landoj : unu temo (ĉu mi bezonas diri tion ?) treege interesa por la reprezentantoj de la laboristaj klasoj. Jes, mi kalkulis laŭ skalo de enspezoj etendiĝantaj inter okdek kaj ducent kvardek pundoj⁽²⁾ jare. La enspezo de okdek pundoj⁽²⁾ ne estis sen tre longe embarasi min; kaj eĉ nun, miaj ciferoj, pri tio kio koncernas ĝin, enhavas etan parton de hazardo; ĉar la malsamaj lesiv-manieroj, ekzemple, sufiĉas por krei gravajn diferencojn en la ĝeneralaj kostoj. Cetere, mi petos al vi la permeson legi al vi la rezultojn de miaj esploroj; kaj mi esperas ke vi ne faros al vi skrupulon rimarkigi al mi la negravajn erarojn kiujn mi povintus fari, ĉu pro manko de informo, ĉu pro malatento. Mi komencos, sinjoroj, per la enspezo de okdek pundoj⁽²⁾ !

Tiam la maljunulo, kun malpli kompato por ĉi tiuj kompatindaj diabloj ol li havus por bestoj, elverŝis siajn tedajn kaj sensencajn statistikojn. Li donis, de ĉiu enspezo, naŭ sinsekvajn versiojn, transportante laŭvice sian imagan personon al [Londono](#), [Parizo](#), [Bagdado](#), [Svalbardo](#), [Basra](#), [Korko](#), [Cincinnati](#), [Tokio](#) kaj [Niĝnij Novgorodo](#). Kaj ni ne miros ekscii ke, eĉ hodiaŭ, liaj aŭskultintoj en Saŭtemptono memoras pri ĉi tiu vespero kiel la plej ĝismorte enuiga el sia tuta vivo.

Longtempe antaŭ ol S^{ro} Finsinko atingis Niĝnij Novgorodoⁿ en akompano de tute fikcia homo ricevanta enspezon de cent pundoj⁽²⁾, lia tuta aŭskultantaro diskrete elŝteliĝis, escepte du maljunajn drinkulojn kaj S^{ron} Vatsoⁿ, ĉi-lastata suferante sian enuon kun admirinda kuraĝo.

Ĉiumomente, novaj klientoj eniris en la ĉambron, sed tuj servitaj, rapidis engluti sian likvoron, kaj kiel eble plej rapide reiris al alia taverno.

S^{ro} Vatso estis sola por scii tian kia povis esti, en Bagdado, la vivo de homo ĝuanta de enspezo de ducent kvardek pundoj⁽²⁾. Kaj apenaŭ ĉi tiu loko ĵus transportis sian imagan vivon al Basra, ke la gastejestro mem, malgraŭ sia tuta kuraĝo, devis forlasi la ĉambron.

S^{ro} Finsinko profunde dormis, post la multaj laciĝoj de sia tago. Li leviĝis la morgaŭon ĉirkaŭ la deka kaj, denove provizinte sin per bonega matenmanĝo, petis al la servisto alporti al li sian fakturon. Estis tiam kiam li ekkomprenis veraĵon pri kiu multaj aliaj ol li ekkonsciis : li malkovris ke peti sian fakturon kaj pagi ĉi tiun saman fakturon estis du malsamaj aferoj. La detaloj de la fakturo estis cetere trege moderaj, kaj la tuto atingis nur kvin aŭ ses ŝilingojn⁽³⁾. Sed la maljunulo vane zorgege esploris la enhavon de siaj poŝoj : la sumo de lia nuna riĉaĵo, almenaŭ per moneroj, ne superis unu ŝilingon⁽³⁾ kaj naŭ pencojn. Li petis ke oni venigu al li S^{ron} Vatsoⁿ.

- Jen, li diris al la gastejestro, ĉeko por okcent pundoj⁽²⁾, pagenda en Londono ! Mi timas ne povi enspezi la sumon antaŭ unu aŭ du tagoj, krom se vi mem kapablu diskonti ĝin al mi !

S^{ro} Vatso prenis la ĉekon, turnis kaj returnis ĝin, palpis ĝin inter siaj fingroj : "Vi diras ke vi devos atendi unu aŭ du tagojn ?" li fine eligis. "Ĉu vi ne havas alian monon ?"

- Iom da moneroj ! respondis Jozefo. Apenaŭ kelkaj ŝilingojn⁽³⁾ !

- Tiaokaze, vi povos sendi al mi la sumon de mia fakturo. Mi fidas al vi !

- Por sincere paroli al vi, daŭrigis la maljunulo, mi estas sufiĉe tentita plilongigi mian restadon ĉi tie. Mi bezonas

monon por daŭrigi mian vojaĝon.

- Se pruntodono de dek ŝilingoj⁽³⁾ povas helpi vin, mi tenas ilin je via servo ! rekomencis diligente S^{ro} Vatso.

- Ne, dankon ! diris Jozefo. Mi kredas ke mi plivole restos dum kelkaj tagoj ĉe vi, kaj diskontigi al mi mian ĉekon antaŭ ol reiri.

- Vi ne restos unu plian tagon en mia domo ! ekkriis S^{ro} Vatso. Estas la lasta fojo ke vi havis liton ĉe la Blazono de Tregonvelo !

- Mi intencas resti ĉe vi ! rebatis S^{ro} Finsinko. La leĝoj de mia lando donas al mi la rajton resti. Elirigu min kontraŭvole, se vi kuraĝas !

- Tiam, pagu vian fakturon ! diris S^{ro} Vatso.

- Prenu ĉi tion ! kriis la maljunulo enmetante la ĝireblan ĉekon en lian manon.

- Ĝi ne estas laŭleĝa mono ! respondis S^{ro} Vatso. Vi tuj eliros el mia domo, kaj tujtuj !

- Mi ne povas doni al vi ideon pri la malestimo kiun vi inspiras al mi, sinjoro Vatso ! rekomencis la maljunulo konsciante ke li devis rezignacii antaŭ la cirkonstancoj. Sed, pro ĉi tiuj kondiĉoj, mi avertas vin ke mi rifuzas pagi vian fakturon !

- Ne gravas pri mia fakturo ! respondis S^{ro} Vatso. Tio kio necesas al mi, estas via foriro de ĉi tie !

- Nu ! Sinjoro, vi estos kontenta ! eldiris emfaze S^{ro} Finsinko. Post tio, kaptante sian kaskedon kun pinta viziero, li profunde firmigis ĝin sur sian kapon.

- Aroganta kiel vi estas, li aldonis, vi eble ne volos sciigi al mi la horon de la venonta trajno al Londono ?

- Ho ! Sinjoro, estas bonega trajno post tri kvaronhoroj ! rebatis la gastejestro reafabliĝanta.

Kaj kun pli da diligenteco ol li montris por proponi la dek ŝilingojn⁽³⁾ : "Vi povos trafi ĝin sen devi hasti !"

La situacio de Jozefo estis el la plej embarasaj. Iuflanke, li ŝatintus povi eviti la ĉefan linion al Londono, ĉar li tre timis ke liaj nevoj estus embuskitaj en la stacidomo, gvatantaj lian alvenon por kapti lin; sed, aliflanke, estis por li io treege dezirinda, kaj eĉ absolute necesega, diskontigi sian ĉekon antaŭ ol liaj nevoj havus tempon malpermesi tion. Li do decidis iri al Londono per la unua trajno. Kaj nur unu punkto restis por li pripensi : la punkto scii kiel li sin aranĝos por pagi sian vojaĝon.

Jozefo Finsinko preskaŭ ĉiam havis malpurajn manojn, kaj mi dubas ke, vidante ekzemple kiamaniere li manĝis, vi rigardus lin kiel ĝentlemanon. Sed li havis pli bone ol la aspekton de ĝentlemano : li havis en sia tuta persono ion samtempe kaj dignan kaj allogan kiu, se eĉ malmulte li volis tion, neniam mankis produkti sian efikon. Kaj kiam, tiutage, li alproksimiĝis al la staciestro de Saŭtemptono, liaj ekscesaj riverencoj estis vere orientaj : la eta oficejo de la staciestro subite ŝajnis ŝanĝiĝi en bosketon de palmarboj, kie la samumo kaj la **bulbulo**... sed mi lasos al tiuj el miaj legantoj kiuj konas la Orientoⁿ pli bone ol mi, la zorgadon daŭrigi kaj kompletigi ĉi tiun metaforon. La vesto de la maljunulo plie influis favore al li : la uniformo de S^{ro} Farado Bondo, tiom maloportuna kaj okulfrapa kiom ĝi estis, certe ne estis vestmaniero kiu riskis esti elektita de friponoj; kaj la elmonro de poŝhorloĝo, sed ĉefe de ĉeko por okcent pundoj⁽²⁾, kompletigis tion kion komencis la belaj manieroj de nia heroo. Tiamaniere ke, kvaronhoron pli poste, kiam alvenis la trajno al Londono, S^{ro} Finsinko estis rekomendata al la trajnostiristo de la staciestro, kaj respekte sidigata en unuaklasan kupeon.

Dum la maljuna ĝentlemano atendis la foriron de la vagonaro, li estis vidanta malmultan interesan incidenton per si mem, sed kiu devis havi decidigan influon ĉe la postaj

destinoj de la familio Finsinko. Giganta pakkesto estis alportita al la kajo de kelkdekdu portistoj, kaj tre malfacilege suprenlevis de ili en la pakvagonon. Estas ofte la konsola tasko de la verkisto, direkti la atenton de siaj legantoj al la celoj aŭ (por respekte diri tion) la artifikoj de la Providenco. En ĉi tiu bagaĝvagono de la trajno kiu veturigis Jozefoⁿ Finsinkoⁿ de Orienta Saŭtemptono al Londono, la ovo de tiu ĉi romano troviĝis, por tiel diri, en nekovita stato. La grandega kesto estis adresita al iu Vilhelmo Dento Fosulo, "en la domo de la stacio Vaterlo"; kaj la pakaĵo kiu apudis ĝin, en la pakvagono, estis solida barelo, kun mezaj dimensioj, tre zorge fermita, kaj surhavanta la adreson : S^{ro} Finsinko, 16 strato Karlo, Blomsburio.

Transporto pagita.

La apudmeto de ĉi tiuj du pakaĵoj, ĝi estis spuro da pulvo sagace preparita de la Providenco : mankis nur mano de infano por ekbruligi ĝin.

Ĉapitro IV

Magistrato en bagaĝvagono.

La urbo [Vinĉestero](#) estas fama pro posedi katedralon, episkopon (sed kiu, bedaŭrinde, mortis antaŭ pluraj jaroj pro falo de ĉevalo; ĉio cetere kredigas ke li certe estis de tiam anstataŭigita), kolegion, konsiderindan sortimenton de soldatoj, kaj stacion tra kiu senlace pasas la trajnoj supren-kaj malsupren-irantaj de la linio Londona kaj Sudokcidenta Fervojo. La memoro pri tiuj diversaj "faktoj" certe ne malsukcesintus sin prezenti en la menson de Jozefo Finsinko, kiam la trajno kiu veturigis lin al Londono, haltis kelkajn momentojn en la menciita stacidomo; sed la bona maljunulo endormiĝis preskaŭ ekde Saŭtemptono. Lia animo, forlasante la kupeon de la vagono, provizore forflugis en ĉielon tute plenan de multehomaj konferencsalonoj, kun oratoraĵoj senfine sinsekvantaj. Kaj dume lia korpo kuŝis sur la kusenoj de la vagono, kun kruroj fleksitaj, kaskedo malantaŭe turnita, unu mano premanta sur la brusto iun ekzempleron de "[La Semajna Gazeto de Lloyd](#)".

La pordo malfermiĝas. Du vojaĝantoj eniras, kaj tuj ankaŭ eliras. Dio tamen scias ke ĉi tiuj du vojaĝantoj ne estis antaŭtempe por entrajniĝi ! Tandemo pelita ĝis sia plej alta rapido, sovaĝa invado de la biletgiĉeto, kaj poste ankoraŭ freneza kurado ebligis al ili atingi la kajon ĝuste en la momento kiam la maŝino eligis la unuajn zumojn de foriro. Ununura kupeo estanta alirebla de ili, ili sin ĵetis enen; kaj jam la plejaĝa el la du viroj metis sian irbastonon sur unu el la sidbenkoj kiam li rimarkis maljunan Finsinko".

- Bona Dio ! li ekkriis. Onklo Jozefo ! Ne eblas resti ĉi tie !

Post tio, li eltrajniĝis, preskaŭ renversante sian kunulon, kaj hastis refermi la pordon al la dormanta patriarko.

Ekde la sekvan momenton, la du kunuloj sin trovis sidantaj en la pakvagono.

- Kial diable vi ne volis enkupeiĝi apud via onklo ? demandis la pli juna vojaĝanto viŝante la ŝviton de siaj tempioj. Ĉu vi kredas ke li ne permesintus vin fumi ?

- Ho ne ! Mi ne scias ĉu la fumo ĝenas lin ! respondis la alia. Li cetere ne estas iu ajn, mi certigas tion, mia onklo Jozefo ! Iu maljuna ĝentlemano el la plej estimindaj. Li interesigis pri la ledkomerco; vojaĝis en Malgranda Azio; fraŭla bravulo; sed iu lango, kara Vikhemo mia, iu lango pli pinta ol la dento de serpento !

- Iu maljuna klaĉulo, ĉu ne ? sugestis Vikhemo.

- Tute ne ! respondis la alia. Li simple estas viro naturdotita de eksterordinara talento por tedi iun ajn kiu alproksimiĝas al li. Absolute terura tedulo ! Mi ne diras ke, sur senhoma insulo, vi ne fine akomodigŭs al lia kompanio; sed por fervoja vojaĝo, ne, ne necesas pensi pri tio ! Mi ŝatus ke vi aŭdus lin pri Tontio, la malbonaŭgura idioto kiu inventis la tontinojn⁽¹⁾ ! Iufoje faligita sur li, li ne plu finas.

- Sed fakte ! diris Vikhemo, vi estas ankaŭ interesata de ĉi tiu rakonto pri la tontino Finsinko, pri kiu la ĵurnaloj parolis ! Mi ne jam pensis pri tio !

- He ! reparolis la alia, ĉu vi scias ke tiu maljuna besto kiu dormas tie, apud ni, valoras por mi kvindek mil pundojn⁽²⁾ ? Aŭ, almenaŭ, estus lia morto kiu valorus tiom por mi ! Kaj li estis tie, dormanta, kun neniu krom vi por vidi nin ! Sed mi indulgis lin, ĉar mi fine komencas fariĝi vera konservativulo !

Dume S^{ro} Vikhemo, ĝoja sin trovi en bagaĝvagono, saltetadis tien kaj tien kiel aristokrata papilio.

- Jen ! li ekkriis, jen io por vi ! M. Finsinko, 16, Strato Karlo, Blomsburio, London. Ĉi tiu M. estas evidente Miĥaelo, dubo ne eblas ! Kaj tiel vi havas du hejmojn en Londono, maljuna fripono ?

- Ho ! La pakaĵo sendube estos por Maŭrico ! respondis Miĥaelo de la alia fino de la bagaĝvagono, kie li oportune sin etendis sur sakoj. Li estas kuzo de mi, kaj kiun mi ne malamas, ĉar li multege timas min. Estas li kiu loĝas en Blomsburio; kaj mi scias ke tie li faras kolekton de aparta speco, ovoj de birdoj, aŭ butonoj de gamaŝoj, fine io tute stulta kiun mi forgesis !

Sed S^{ro} Vikhemo ne plu aŭskultis lin. Mirinda ideo pasis tra lia kapo.

- Je Sankta Georgo, li diris al si, jen bona petolo por fari ! Se nur, per la martelo kaj la tenajlo kiujn mi vidas tie, mi povus ŝanĝi kelkajn etiketojn, kaj ekspedi ĉi tiujn pakaĵojn unu anstataŭ la alian !

En tiu momento, la gardisto de la pakvagono, aŭdinte la voĉon de Miĥaelo Finsinko, malfermis la pordon de sia eta kajuto.

- Vi farus pli bone eniri ĉi tien, sinjoroj ! li diris al la du vojaĝantoj kiam tiuj ĉi klarigis al li la kialon de sia entrudiĝo.

- Ĉu vi venas, Vikhemo ? demandis Miĥaelo.

- Ne, dankon ! Mi treege amuziĝas pro vojaĝi en pakvagono ! respondis la junulo.

Kaj tiel, Miĥaelo enirinta en la kajuton kun la gardisto, kaj la komunika pordo estanta refermita, S^{ro} Vikhemo restis sola inter la pakaĵoj, libera sin distri laŭ sia plaĉo.

- Ni alvenas al Biŝopstoko, sinjoro ! diris la gardisto al Miĥaelo, kiam kvaronhoron pli poste la trajno fajfis kaj komencis malrapidigi sian iradon.

- Ni baldaŭ haltos dum tri minutoj. Vi ne malfacile trovos lokon en kupeo !

S^{ro} Vikhemo, kiun ni lasis sin pretiganta por *ludi interrompitajn dirojn*⁽⁴⁾ per la etikedoj de pakaĵoj, estis tre riĉa juna ĝentlemano, kun agrabla aspekto, kaj dotita de la plej senokupa menso. Kelkajn monatojn pli frue, en Parizo, li submetis sin al tuta serio da ĉantaĝoj fare de la nevo de valaĥa *hospodaro*⁽⁵⁾ loĝanta (pro politikaj kialoj, kompreneble) en la ĝoja franca ĉefurbo. Komuna amiko, al kiu li konfidis sian senhelpecon, rekomendis al li sin direkti al Miĥaelo Finsinko, kaj efektive, la proceduristo, tuj kiam li estis informita pri la faktoj, tuj prenis sur sin la ofensivon, atakis la flankon de la valaĥaj trupoj, kaj en la daŭro de tri tagoj, havis kontentiĝon devigi ilin retransiri Danubon. Ne estas nia afero sekvi ilin en ĉi tiu retiriĝo, farita sub la patra aŭtoritato de la polico. Ni kontentiĝu aldoni ke, tiel liberigita de tio kion li ŝatis nomi "la bulgaran abomenaĵon", S^{ro} Vikhemo revenis en Londonoⁿ kun la plej grandegaj sentoj de dankemo kaj admiro por sia proceduristo. Sentoj kiuj apenaŭ estis reciprokitaĵ, ĉar Miĥaelo eĉ sentis certan honton pri la amikeco de sia nova kliento, kaj estis nur post multnombraj rifuzoj ke li fine akceptis iri pasigi unu tagon en la sinjorlando Vikhemo, sur la familia bieno de sia juna kliento. Li finfine devis rezignacii, kaj lia gastiganto nun veturigis lin reen ĝis Londono.

Saĝa pensulo (verŝajne Aristotelo) rimarkis ke la Providenco ne malŝatis uzi por siaj celoj eĉ la plej modestajn instrumentojn : la fakto estas, ke la plej hardita skeptikulo de nun estos devigita rekoni ke Vikhemo kaj la valaĥa hospodaro vere estis providencaj instrumentoj, elektitaj kaj preparitaj ekde la tuta eterneco.

Deziranta sin montri je siaj propraj okuloj personon

4 Malnova franca esprimo uzata kiam pluraj interparolantoj, ne komprenantaj unu la alian, parolas pri malsamaj aferoj.

5 Iama titolo de vasalaj princoj de la Sultano de Turkio metita ĉe la kapo de la rumanaj provincoj.

plenan de humuro kaj rimedoj, la juna ĝentlemano (kiu plie praktikis la oficojn de magistratano en sia denaska grafejo) apenaŭ estis sola en la pakvagono, kiam li sin pafis al la etiketoj de la pakaĵoj kun la tuta fervoro de reformisto. Kaj kiam en la stacidomo de Biŝopstoko li eliris el la pakvagono por iri sidiĝi kun Miĥaelo Finsinko en unuaklasan kupeon, lia vizaĝo radiis samtempe pro laciĝo kaj pro orgojlo.

- Mi ĝus faris admirindan ŝercon ! li ne sukcesis deteni sin diri al sia proceduristo.

Poste, subite kaptata de skrupulo :

- Diru do : pro nemalutila petolo, ĉu ? Mi ne riskas perdi mian postenon kiel magistratano ?

- Kara amiko mia, rebatis malatente Miĥaelo, mi ĉiam antaŭdiris al vi ke vi fine estos pendigita !

Ĉapitro V

S^{ro} Gideon Forsiso kaj la monumenta kesto.

Mi jam diris ke, en Burnmuto, Julia Hazeltino kelkfoje havis la okazon fari konojn. Estas vere ke ŝi apenaŭ havis tempon paroli kun ili, antaŭ ol denove la pordoj de la domo de Blomsburio refermiĝis antaŭ ŝi ĝis la sekva somero; sed tiuj ĉi nedaŭraj konatoj tamen estis distraĵo por la kompatinda knabino, sen paroli pri la amaso da rememoroj kaj da esperoj per kiu ili krome havis la meriton provizi ŝin. Nu, inter la homoj kiujn ŝi tiel renkontis en Burnmuto dum la antaŭa somero, troviĝis juna advokato nomita Gideon Forsiso.

En la posttagmezo mem de la memorinda tago kiam la magistratano sin amuzis interŝanĝi la etikedojn, ĉirkaŭ la kvara, iu iom revema kaj melankolia promenado hazarde kondukis S^{ron} Forsisoⁿ sur la trotuaron de la strato Karlo, en Blomsburio; kaj preskaŭ en la sama tempo, fraŭlino Hazeltino estis alvokata al la pordo de la numero 16 de ĉi tiu strato per vigle energia tintado de la sonorilo.

S^{ro} Gideon Forsiso estis sufiĉe feliĉa junulo, sed kiu estintus ankoraŭ pli feliĉa kun pli da mono kaj unu onklo malpli. Cent dudek pundoj⁽²⁾ jare konsistigis lian tutan enspezon; sed lia onklo, S^{ro} Eduardo H. Florkampo, pliigis ĉi tiun enspezon per malpeza monhelpo kaj per grandega amaso da bonaj konsiloj, esprimataj per lingvaĵo kiu probable ŝajnintus troa perforto surŝipe mem de piratŝipo.

Tiu ĉi S^{ro} Florkampo estis, verdire, figuro esence propra al la epoko de S^{ro} Ĝojŝtono. Maljuniĝinte sen akiri la plej etan sperton, li kunigis kun la politikaj sentoj de la radikala partio pasian viglecon kiun ni pli kutimas rigardi kiel la tradician propraĵon de niaj malnovaj konservativuloj. Li

admiris la pugnobatalon, li surhavis timigan tuberan klabon, li estis asidua al religiaj diservoj : kaj oni malfacile dirintus kontraŭ kiu lia kolero plej volonte furiozis, kontraŭ tiuj kiuj permesis al si defendi la fondita Eklezion aŭ kontraŭ tiuj kiuj neglektis partopreni en ĝiaj ceremonioj. Li plie havis kelkajn ŝatatajn epitetojn kiuj inspiris pravan timon al liaj konatoj : kiam li ne povis iri ĝis deklari ke tia kaj tia kriterio "ne estis angla", almenaŭ li ne mankis denunci ĝin kiel "ne estante praktikan". Estis sub la kondamno de ĉi tiu lasta ekskomuniko ke falis lia kompatinda nevo. La maniero per kiu Gideono komprenis la studado de la leĝo estis definitive taksita kiel "nepraktika"; kaj konsekvence lia onklo sciigis lin, dum brua interparolado ritmita de la tubera klabo, ke li devis aŭ kiel eble plej rapide trovi unu aŭ du kaŭzojn por defendi, aŭ alie sin pretigi por de nun vivi per sia propra mono.

Tial ni tute ne miros ke Gideono, malgraŭ sufiĉe ĝoja naturo, sin sentis invadata de melankolio. Ĉar, unue, li ne havis eĉ la plej etan deziron daŭrigi pli for ol li jam faris, la studon de la leĝo; kaj poste, eĉ supozante ke li rezignaciis al ĝi, ĉiam estis ankoraŭ parto de la programo kiu restis sendependa de lia volo. Kiel trovi klientojn, kaŭzojn por defendi ? La demando estis tie.

Subite, dum li senesperigis pro ne povi ĝin solvi, li trovis sian vojon barita de homamasiĝo. Veturilo de transportado estis haltita antaŭ domo; ses atletoj eligantaj ŝviton zorgis pri la delokigo de la plej giganta pakkesto kiun ili iam vidis; kaj, sur la ŝtupoj de la perono, la masiva vizaĝo de la koĉero kaj la gracila vizaĝo de juna knabino staris, kiel sur scenejo, kverelante.

- Tio ne povas esti por ni ! asertis la juna knabino. Mi petegas vin rekunporti ĉi tiun keston ! Ĝi ne sukcesus eniri en la domon, se eĉ nur vi sukcesus elpreni ĝin el via veturilo !

- Mi tiam lasos ĝin sur la trotuaro, respondis la koĉero,

kaj S^{ro} Finsinko elturniĝos kiel li volos kun la polico !

- Sed mi ne estas S^{ro} Finsinko ! protestis la knabino.

- Ne gravas al mi scii kiu vi estas ! respondis la kamionisto.

- Ĉu vi permesus al mi helpi vin, fraŭlino Hazeltino ? diris Gideonon alproksimiĝante.

Julia eligis etan krimon de plezuro.

- Ho ! Sinjoro Forsiso, ŝi ekkriis, mi estas tiel feliĉa vidi vin ! Imagu ke ili volas devigi min enirigi en la domon ĉi tiun abomenan aferon, kiu nur erare povis veni ĉi tien ! La koĉero deklaras ke necesas ke ni demetu la pordojn, aŭ ke masonisto malkonstruu parton de muro inter du fenestroj, manke de tio, la vojofico procesos kontraŭ ni, pro lasi niajn meblojn sur la pavimo !

La ses viroj, dume, finfine sukcesis demeti la keston sur la trotuaron; kaj nun ili staris, sin apogantaj kontraŭ ĝi, kaj rigardantaj, kun evidenta senhelpeco, al la pordo de la domo tra kiu ĉi tiu monstra kesto devis eniri. Ĉu mi bezonas aldoni ke ĉiuj fenestroj de la najbaraj domoj proviziĝis, kvazaŭ sorĉe, per scivolemaj kaj amuzitaj spektantoj ?

Prezentante la plej sciencan mienon kiun li povis doni al si, Gideonon mezuris per sia irbastono la dimensiojn de la pordo, dum Julia notis en sia akvarel-albumo la rezultojn de la taksadoj. Poste Gideonon, mezurante la keston kaj komparante la du arojn da nombroj, malkovris ke estis ĝuste sufiĉe da spaco por ke la kesto sukcesu eniri. Post tio, senvestigante sin de siaj jako kaj veŝto, li helpis la virojn forigi el iliaj hokoj la klapegojn de la pordo. Kaj, fine, dank'al la preskaŭ devigata kunlaborado de kelkaj el la ĉeestantoj, la kesto pene supreniris la ŝtupojn, grincis frotiĝante kontraŭ la muroj kaj sin trovis lokita en la enirejo de la vestiblo, preskaŭ obstrukcante ĝin laŭ sia tuta larĝo. Tiam la manlaboristoj de tiu ĉi venko rigardis unujn la aliajn

kun triumfa rideto. Ili verdire dispecigis buston de Apolono, kaj striis en la muro profundajn sulkojn; sed, almenaŭ, ili ĉesis esti unu el la publikaj spektakloj de Londono !

- Mi ne kredas tion, sinjoro, diris la koĉero, neniam mi vidis tian pakaĵon !

Gideonon elokvente esprimis al li sian simpatian enŝovante en la manon du monerojn de dek ŝilingoj⁽³⁾.

- Nu, mastro, kvin ŝilingojn⁽³⁾ pli, kaj mi taskos al mi saldi la konton al ĉiuj kamaradoj ! ekkriis la koĉero.

Tiel estis farita; post tio la tuta trupo da improvizitaj portistoj grimpis en la veturilon, kiu forkuris en la direkto de la plej proksima taverno. Gideonon refermis la pordon, kaj turnis sin al fraŭlino Hazeltino. Iliaj okuloj renkontiĝis; kaj freneza deziro ridi kaptis ilin ambaŭ. Poste, iom post iom, la scivolemo vekigis en la menso de la knabino. Ŝi alpaŝis al la kesto, palpis ĝin ĉiudirekten, ekzamenis la etiketon.

- Ĝi estas la plej stranga afero pri kiu ni povas revii ! Ŝi diris kun nova ekridado. La skribmaniero certe estas je la mano de Maŭrico, kaj mi ricevis leteron de li ĉimatene mem, dirantan al mi pretiĝi por ricevi barelon. Ĉu vi kredas ke tio ĉi povu esti konsiderata kiel barelon, sinjoro Forsiso ?

- Statuo, zorge manipulenda, fragila, legis laŭte Gideonon, ĉe unu flanko de la kesto. Ĉu vi bone certas ke vi ne estis antaŭsciigita pri la alveno de statuo ?

- Ne, certe ! respondis Julia. Ho ! Sinjoro Forsiso, ĉu vi ne pensas ke ni povas alĵeti ekrigardon enen de la kesto ?

- Kaj kial ne ? ekkriis Gideonon. Nur diru al mi kien mi povos trovi martelon !

- Venu kun mi en la kuirejon kaj mi montros al vi kie estas la marteloj ! diris Julia. La tabulo kie ni metas ilin, estas tro alta por mi !

Ŝi malfermis la kuirejan pordon kaj enirigis Gideononⁿ. Martelo rapide estis trovita, tiel kiel ĉizilo : sed Gideonon

surpriziĝis vidante neniun spuron de fornelo. Li ankaŭ malkovris, tamen, ke fraŭlino Julia havis tre malgrandan piedon kaj tre maldikan maleolon; malkovro kiu ĝenis lin tiom multe ke li tre ĝojis povi kiel eble plej rapide ataki la pakkeston.

Li diligente laboris, kaj ĉiuj liaj martelfrapoj havis admirindan precizecon, dum Julia, stara apud li, silente konsideris plivole la laboriston ol la laboradon. Ŝi pensis ke S^{ro} Forsiso estis forta, bela viro; neniam antaŭe ŝi vidis tiel fortikajn brakojn. Kaj subite Gideono, kvazaŭ li divenus ŝiajn pensojn, sin turnis al ŝi kaj ridetis al ŝi. Ŝi ankaŭ ridetis kaj ruĝiĝis : kaj ĉi tiu duobla ŝanĝo tiel bone konvenis al ŝi ke Gideono forgesis rigardi kien li frapis, tiamaniere ke, post kelkaj sekundoj, la kompatinda knabo donis fortegan baton sur siajn proprajn fingrojn. Kun kortuŝa spiritĉeesto, li sukcesis ne nur deteni, sed eĉ ŝanĝi al senofenda plendo la pitoreskan sakraĵon kiu estis elironta el liaj lipoj. Sed la doloro estis akra; la nerva skuo estis tro forta : kaj post kelkaj provoj, li ekkomprenis ke li ne povis pensi daŭrigi la operacion.

Tuj Julia kuris al sia ĉambro, alportis spongon, akvon, mantukon kaj komencis bani la vunditan manon de la junulo.

- Mi treege bedaŭras ! pardonpetis Gideono. Se mi havintus la plej etan bonkonduton, mi unue malfermintus la keston, kaj poste frakasintus miajn fingrojn ! Ho ! Tio jam fartas multe pli bone ! li aldonis. Mi certigas vin ke tio fartas multe pli bone !

- Jes, mi kredas ke nun vi fartas sufiĉe bone por kapabli direkti la laboron ! fine diris Julia. Komandu min, kaj mi estos via laborantino !

- Agrablega laboristino, vere ! deklaris Gideono, tute forgesanta la decregulojn.

La fraŭlino turnis sin, kaj rigardis lin kun ombreto de

kunŝoviĝo de brovoj; sed la malrespekta junulo hastis fordirekti sian atenton al la pakkesto. La ĉefa parto de la laboro, cetere, jam estis farita. Julia rapidis levi la unuan tabulon de la kovrilo, tio kiu aperigis tavolon da pajlo. Unu minuton poste la du junuloj estis surgenu, unu apud la alia, kiel kamparanoj okupataj pri turnado de la fojno; kaj ekde la sekvanta minuto, ili estis rekompencitaj pro siaj klopodoj per la vido de io blanka kaj glata. Ĝi estis, sen ia ebla eraro, grandega piedo el marmoro.

- Jen persono vere estetika ! diris Julia.

- Neniam mi vidis ion similan ! respondis Gideon. Ĝi havas suron kiel dikan sakon da mono !

Baldaŭ malkovriĝis dua piedo, kaj poste io kio ja ŝajnis esti iu tria. Sed ĉi tiu io sin montris esti, finfine, klabo baziĝanta sur piedestalo.

- He ! Evidente ! ĝi estas Herkulo, ekkriis Gideon. Mi devintus konjekti tion vidante ĝian suron ! Kaj mi povas plenfide aserti, li aldonis rigardante la du kolosajn krurojn, ke ĉi tiu estas samtempe la plej granda kaj la plej malbela el ĉiuj Herkuloj en la tuta Eŭropo ! Kio sukcesis decidigi ĝin veni ĉe vin ?

- Mi supozas ke neniu alia volis ĝin ! diris Julia. Kaj mi devas aldoni ke ni mem perfekte malhavis ĝin.

- Ho ! Ne diru tion, fraŭlino ! rebatis Gideon. Ĝi akirigis al mi unu el la plej memorindaj kunvenoj de mia tuta vivo !

- Ĉiukaze, kunsido kiun vi ne povos baldaŭ forgesi ! eligis Julia. Viaj malfeliĉaj fingroj rememorigos ĝin al vi !

- Kaj nun mi kredas ke necesas ke mi foriras ! diris malgaje Gideon.

- Ne ! Ne ! malakceptis Julia. Kial foriri ? Restu ankoraŭ dum momento, kaj trinku tason da teo kun mi !

- Se mi povus pensi ke tio vere plaĉus al vi, diris

Gideono turnante sian ĉapelon inter siaj fingroj,
kompreneble mi ĝojus !

- Sed, vere, tio estos agrabla al mi ! respondis la
junulino. Kaj plie, mi bezonas kukojn por trinki la teon, kaj
mi havas neniun kiun mi povas sendi ĉe la kukisto. Jen la
ŝlosilo de la domo !

Gideono haste surmetis sian ĉapelon kaj kuris al la
kukisto, de kie li revenis kun granda papersako plenplena de
krem-pufkukoj, bastonaj kremkuketoj kaj tortetoj. Li trovis
Juliaⁿ preparantan malgrandan tetablon en la vestiblo.

- La ĉambroj estas en tia malordo, ŝi diris, ke mi pensis
ke ni estos pli komfortaj ĉi tie, en la ombro de nia statuo !

- Perfekte ! ekkriis Gideono, kontentega.

- Ho ! kiaj ĉarmaj kremtortetoj ! eligis Julia
malfermante la sakon. Kaj kiaj frandindaj frag-pufkukoj !

- Jes, diris Gideono provante kaŝi sian elreviĝon. Mi
bone antaŭvidis ke la miksaĵo produktos ion tre belan.
Cetere, la kukistino ankaŭ antaŭvidis tion.

- Kaj nun, diris Julia manĝinte duondekduon da kukoj, mi
tuj montros al vi la leteron de Maŭrico. Legu ĝin laŭte : eble
estas detaloj kiujn mi ne vidis ?

Gideono prenis la leteron, malfaldis ĝin sur unu el siaj
genuoj kaj legis jenon :

*Kara Julia, mi skribas al vi el Brundekano, kie ni
haltis por kelkaj tagoj. La onklo estis tre skuita de
tiu terura akcidento pri kiu, sendube, vi estas leginta
la raporton en la gazeto. Morgaŭ, mi intencas lasi lin
ĉi tie kun Johano, kaj reveni sola en Londonoⁿ; sed,
antaŭ mia alveno, vi ricevos barelon enhavantan
specimenojn por amiko. Neniapreze malfermu ĝin,
sed lasu ĝin en la vestiblo ĝis mia alveno !*

*Hastege via,
M. Finsinko.*

P.S. : Ne forgesu lasi la barelon en la vestiblo !

- Ne, diris Gideon, mi vidas nenion en ĝi kiu rilatas al la monumento ! Kaj dirante tion li montris la krurojn el marmoro. Fraŭlino Hazeltino, li daŭrigis, ĉu vi permesas min meti al vi kelkajn demandojn ?

- Sed volonte ! respondis la junulino. Kaj se vi sukcesos klarigi al mi kial Maŭrico sendis al mi statuon de Herkulo anstataŭ barelon enhavanta "specimenojn por iu amiko", mi estos dankema al vi ĝis la fino de mia lasta tago. Sed, unue, kio tio povos esti "specimenoj por iu amiko" ?

- Mi ne havas la plej malgrandan ideon ! diris Gideon. Mi ja scias ke marmoristoj ofte sendas specimenojn; sed mi kredas ke, ĝenerale, ili estas pecoj de marmoro pli malgrandaj ol nia amiko la monumento. Cetere miaj demandoj rilatas al aliaj temoj. Unue, ĉu vi estas tute sola en ĉi tiu domo ?

- Jes nune ! respondis Julia. Mi alvenis antaŭhieraŭ por prepari la domon kaj dungi kuiristinon. Sed mi trovis neniun kiu plaĉis al mi.

- Tiel vi estas absolute sola ! diris Gideon, konsternita. Kaj vi ne timas ?

- Ho ! Tute ne ! respondis Julia. Mi ne scias pri kio mi timus. Mi simple aĉetis al mi mirinde malmultekostan revolveron, kaj petis al la vendisto montri al mi kiel uzi ĝin. Kaj fine, antaŭ ol enlitiĝi, mi tre zorgas barikadi mian pordon per tirkestoj kaj seĝoj.

- Ne gravas, mi ĝojas pensi ke via mondo baldaŭ revenos ! diris Gideon. Via izoliteco multe maltrankviligas min. Se ĝi devus plidaŭri, mi povus prezeni al vi mian maljunan onklinon, aŭ eĉ mian domservistinon, laŭ via elekto.

- Pruntedoni al mi onklinon ! ekkriis Julia. Ho ! Kia nobleco ! Mi komencas kredi ke estas vi kiu sendis al mi la Herkulon !

- Mi donas al vi mian honorvorton, ke ne ! protestis la junulo. Mi troege admiras vin por maltimi sendi al vi tiel monstran artaĵon !

Julia estis respondonta, kiam la du amikoj ekstremis : perforta bato estis frapita ĉe la pordo.

- Ho ! Sinjoro Forsiso !

- Nenion timu, kara infano mia ! diris Gideonon tenere premante sian manon sur la brakon de la knabino.

- Mi scias tion kion tio estas ! Ŝi flustris. Tio estas la polico ! Ĝi venas por plendi pri la statuo !

Nova bato ĉe la pordo, pli perforta, kaj pli urgema.

- Dio mia ! Estas Maŭrico ! ekkriis la junulino. Ŝi kuris al la pordo kaj malfermis.

Fakte estis Maŭrico kiu aperis sur la sojlo : ne la Maŭrico de ordinaraj tagoj, sed sovaĝaspekta viro, blanketa kaj konfuzita, kun sangoplenaj okuloj, kaj dutaga barbo sur la mentono.

- La barelo ? li ekkriis. Kie estas la barelo kiu ĉimatene alvenis ?

Li ĉirkaŭrigardis en la vestiblo, kaj liaj okuloj laŭvorte elstariĝis el lia kapo kiam li ekvidis la krurojn de la Herkulo.

- Kio estas tio ? li kriegis. Kio estas ĉi tiu manekeno el vakso ? Kio estas tio ? Kaj kie estas la barelo ? La barelo de akvo ?

- Neniu barelo venis, Maŭrico ! respondis malvarme Julia. Jen la sola pakaĵo kiun oni alportis !

- Tio ? ekkriis la malfeliĉulo. Mi neniam aŭdis paroli pri tio !

- Tamen ĝi alvenis kun adreso skribita de via mano ! respondis Julia. Ni preskaŭ devis malkonstrui la domon por enigi ĝin. Kaj mi kapablas diri nenion pli al vi !

Maŭrico rigardis ŝin kun senlima konfuziĝo. Li pasigis unu el siaj manoj sur sian frunton, kaj poste apogis sin al la

muro, kiel viro kiu estas svenonta. Sed, iom post iom, lia lango liberiĝis, kaj li komencis superŝuti la junulinon per torento da insultoj. Neniam ĝis tiam Maŭrico mem opinius sin kapabla por tiom da fajro, por tiom da vervo, ne eĉ por tia diverseco de maldelikataj dirmanieroj. La junulino tremis kaj ŝanceliĝis sub ĉi tiu freneza furiozo.

- Mi tute ne plu toleros ke vi pli parolu al fraŭlino Hazeltino per tia tono ! fine diris Gideono sin rezolute intermetanta.

- Mi parolos al ŝi per tono kiu plaĉos al mi, rebatis Maŭrico, en nova eksplodo de furiozo. Mi parolos al ĉi tiu mizera almozulino kiel ŝi meritas !

- Ne unu vorton pli, sinjoro, ne unu vorton ! ekkriis Gideono. Fraŭlino Hazeltino, li daŭrigis alparolante al la junulino, vi ne povas pli longe resti sub la sama tegmento ol tiu ulo ! Jen mia brako ! Permesu al mi konduki vin en lokon kie vi estos ŝirmita kontraŭ insulto !

- Sinjoro Forsiso, diris Julia, vi pravas ! Mi ne kapblas resti ĉi tie unu momenton pli, kaj mi scias ke mi konfidis min al viro de honoro !

Pala kaj rezoluta, Gideono proponis sian brakon, kaj la du junuloj malsupreniris la ŝtupojn de la perono, postsekvataj de Maŭrico, kiu postulis la ŝlosilon de la enirpordo.

Julia apenaŭ redonis al li lian ŝlosilaron, kiam malplena fiakro rapide pasis antaŭ ili. Ĝi estis alvokata samtempe de Maŭrico kaj de Gideono. Sed ĝuste kiam la koĉero haltigis sian ĉevalon, Maŭrico sin ĵetis en la veturilon.

- Dek groŝojn kiel trinkmonon ! li kriis. Stacidomo de Vaterlo, kiel eble plej rapide ! Dek groŝojn por vi !

- Elmetu unu ŝilingon⁽³⁾, sinjoro ! diris la koĉero. La alia ĝentlemano rezervis min antaŭ vi !

- Nu ! Bone unu ŝilingon⁽³⁾ ! kriis Maŭrico sekrete

pripensante ke li denove ekzamenos la peton alvenante al la stacidomo. Kaj la kôçero vipis sian beston, kaj la fiakro turniĝis ĉe la unua angulo de la strato.

Ĉapitro VI

La travivaĵoj de Maŭrico (unua parto).

Dum la fiakro rapidis tra la stratoj de Londono, Maŭrico strebis por kolekti ĉiujn fortojn de sia spirito. 1^e, la barelo enhavanta la kadavron devojiĝis; 2^e, nepris retrovi ĝin. Ĉi tiuj du punktoj estis klaraj; kaj se, pro providenca fortuno, la barelo ankoraŭ estus ĉe la stacidomo, ĉio povus bone sukcesi. Se la barelo ne estus ĉe la stacidomo, kaj ke ĝi jam estus inter la manoj de aliaj homoj erare ricevintaj ĝin, la afero pli embarase ekirus. Homoj kiuj ricevas pakaĵojn kies naturon ili ne komprenas, ĝenerale inklinas tuj malfermi ilin. La ekzemplo de fraŭlino Hazeltino (kiun unufoje pli Maŭrico malbenas) konfirmis nur tro bone tiun ĝeneralan principon. Kaj se iu jam malfermus la barelon... "Disinjoro !" ekkriis Maŭrico pro tiu ĉi penso, almetante la manon al sia tute ŝvitoplana frunto.

La unua konceptado de malobservo de la leĝo ofte havas, por la imago, ion stimula : la projekto, ankoraŭ en skiza stato, sin prezentas en vivaj kaj allogaj koloroj. Sed ne estas same kiam, pli poste, la atento de la krimulo sin direktas al lia ebla rilato kun la polico. Maŭrico nun diris al si ke li eble ne sufiĉe konsideris la ekziston de la polico, kiam li implikiĝis en sia entrepreno. "Mi devos tre atenteme manovri !" li pensis; kaj eta tremo pro timo trakuris laŭlonge de lia spino.

- La ĉefaj linioj, aŭ la antaŭurba zono ? demandis subite al li la koĉero tra la fenestreto de la plafono.

- Ĉefaj linioj ! respondis Maŭrico.

Post tio li decidis ke ĉi tiu viro tamen havos sian ŝilingon⁽³⁾ kiel gratifiko.

"Estus frenezaĵo altiri la atenton al mi ĉi-momente !" li diris al si. "Sed la sumo kiun ĉi tiu afero finfine kostos al mi, komencas efiki sur mi kiel inkubsonĝo !"

Li trairis la giĉetejon, kaj mizere, vagis sur la kajo. Okazis, en tiu momento, mallonga interrompo de la movo de la stacidomo; malmultaj homoj sur la kajo, apenaŭ kelkaj vojaĝantoj atendantaj ĉi tie kaj tie. Maŭrico konstatis ke li tute ne altiris la atenton, tio kio ŝajnis al li bonega afero; sed aliflanke, li pensis ke lia esploro ne multe progresis. Nepre, li devis fari ion, riski ion : ĉiu momento kiu pasis, aldoniĝis al la danĝero. Fine, kolektante sian tutan kuraĝon, li haltigis portiston kaj demandis al li ĉu hazarde li ne memoris esti vidinta alveni barelon per la matena trajno; aldonante ke li deziris informiĝi ĉar la barelo apartenis al unu el liaj amikoj. "Kaj la afero estas el la plej gravaj", li aldonis denove, "ĉar ĉi tiu barelo enhavas specimenojn !"

- Mi ne ĉeestis ĉimatene, sinjoro, respondis la pordisto; sed mi demandos al Berĉjo. He ! Berĉjo ! diru do, ĉu vi memoras esti vidinta alveni de Burnmuto, ĉi-matene, barelon enhavantan specimenoj ?

- Mi ne kapablas diri ion pri la specimenoj ! rebatis Berĉjo. Sed la burĝo kiu ricevis la barelon, kaŭzis al ni belan skandalon !

- Kio ? Kiel ? ekkriis Maŭrico, samtempe dum li febre enŝovis du groŝojn en la manon de la portanto.

- - Nu ! Sinjoro, iu barelo alvenis je la unua kaj duono, kaj restis ĉe la deponejo ĝis ĉirkaŭ la tria. Ĉe tiu momento, jen ke alvenas malgranda viro, kun tute malfortika aspekto, mi havas bonan ideon ke li devas esti iu vikario, kaj li diris al mi : "Ĉu vi ne ricevis ion por Fosulo ?", Vilhelmo Bento Fosulo, se mi bone memoras la nomon. "Mi ne precize scias, sinjoro, kiun mi respondis al li; sed mi ja kredas ke tio estas la nomo kiu estas skribita sur tiu barelo !" La vireto iras por vidi la

barelon, kaj faras konfuzitan mienon kiam li ekvidas la adreson. Kaj jen li kiu komencas riproĉi nin ne esti alportinta al li tion kion li volis. "He ! Ne gravas tio kion vi volas, sinjoro, ke mi diris al li; sed se estas vi kiu estas Vilhelmo Bento Fosulo, necesas ke vi prenu ĉi tiun barelon !"

- Kaj ĉu li kunprenis ĝin ? ekkriis Maŭrico apenaŭ spirante.

- Nu ! Sinjoro, rekomencis trankvile Berĉjo, ŝajnas ke estis granda pakkesto kiun tiu sinjoro atendis. Kaj ĉi tiu kesto fakte alvenis; mi scias tion, ĉar ĝi estas la plej granda pakaĵo kiun mi iam vidis. Tiam, eksciante tion, ĉi tiu Fosulo denove grimacis. Li petis al mi paroli kun la sekciestro, kaj ni venigis Tomoⁿ, la komisiiton, tiun kiu veturigis la keston. Nu ! Sinjoro, daŭrigis Berĉjo kun rideto, neniam mi vidis viron en tia stato ! Morte ebria, sinjoro ! Laŭ tio kion mi kredis kompreni, estis iu sinjoro, evidente freneza, kiu donis al la tiu brava Tomo unu sterlingan pundon⁽²⁾ kiel trinkmonon, kaj jen de kie venis la malfacilaĵo, ĉu vi komprenas ?

- Sed fine, kion li diris ? anhelis Maŭrico.

- Vere ! Sinjoro, li apenaŭ estis en stato por diri multon ! respondis Berĉjo. Sed li proponis pugnadi kontraŭ ĉi tiu Fosulo por bierpindo. Li ankaŭ perdis sian libron kaj siajn kvitancojn; kaj lia kunulo estis eĉ pli ebria ol li, se eblas. Ho ! Sinjoro, ili ambaŭ estis kiel... kiel lordoj ! Kaj la sekciestro senprokraste saldis ilian konton.

"Nu ! Jen io kiu tute ne estas tiom malbona ! pensis Maŭrico kun suspiro de kvietiĝo. Poste, alparolante al portisto :

- Kaj tiel ĉi tiuj du viroj ne sukcesis diri kien ili forveturigis la keston ?

- Ne, respondis Berĉjo, nek tio nek io alia !

- Kaj... kion faris Fosulo ? demandis Maŭrico.

- Li forprenis la barelon en kvarrada fiakro, respondis

Berĉjo. La kompatindulo estis tute tremanta. Mi ne kredas ke li ĝuas plenan bonfarton !

- Kaj tiel, murmuris Maŭrico, la barelo foriris ?

- Pri tio vi povas esti tre certa ! diris la portisto. Sed vi farus pli bone vidi la sekciestron !

- Ho ! Tute ne, la afero estas malgrava ! protestis Maŭrico. Ĉi tiu barelo enhavis nur specimenojn !

Kaj li hastis efektiviĝi sian eliradon.

Denove enfermita en fiakro, li strebis fari novan ĝeneralan taksadon de sia situacio. "Ni supozu, li diris al si, ni supozu ke mi akceptus mian malvenkon kaj tuj irus deklari la morton de mia onklo !" Li perdus la tontinon⁽¹⁾, kaj kun ĝi, sian lastan ŝancon enkasigi siajn 7.800 punktojn⁽²⁾. Sed, aliflanke, ekde la trinkmona ŝilingo⁽³⁾ donita al la koĉero de la fiakro, li komencis kompreni ke la krimo estas elspeziga en sia praktikado, kaj, ekde la perdo de la barelo, ke la krimo estis necerta en siaj konsekvencoj. Unue kviete, poste senĉese pli varme, li konsideris la avantaĝojn por li delasante sian projekton. Tiu ĉi forlaso implicis por li perdon de mono : sed, resume, kaj finfine, ne tre grandan perdon, nur tiun de la tontino⁽¹⁾, kun kiu li neniam tute kalkulis. Li retrovis funde de sia memoro kelkajn faktojn atestantajn ke fakte li neniam kredis tre serioze je la profitoj de la tontino⁽¹⁾. Ne, neniam li kredis je ĝi, neniam li havis la certan esperon enkasigi siajn 7.800 pundojn⁽²⁾; kaj se li implikiĝis en ĉi tiun aventuron, estis nur por sin defendi kontraŭ la tro evidenta mallojalecon de sia kuzo Miĥaelo. Li nun klare vidis tion : estis pli bone por li kiel eble plej rapide retiriĝi el la aventuro, por dediĉi ĉiujn siajn klopodojn al la leda komerco...

- Disinjoro ! li subite ekkriis eksaltante en sia fiakro kiel diablo en sia skatolo da trompaĵoj. Disinjoro ! Sed mi ne nur perdis la tontinon⁽¹⁾ ! Mi eĉ plie perdis la ledkomercon !

Kvankam monstra estis la fakto, ĝi estis strikte vera. Maŭrico tute ne havis aŭtoritaton por subskribi je la nomo de sia onklo. Li eĉ ne povis emisii ĉekon por tridek ŝilingoj⁽³⁾. Tiel longe kiel li ne montris laŭleĝan pruvon pri la morto de sia onklo, li estis nur senmona pario; kaj tuj kiam li montrus ĉi tiun laŭleĝan pruvon, la profito de la tontino⁽¹⁾ estis, por li, definitive perdita ! Sed pa ! Maŭrico ne rajtis heziti ! Li devis delasi la tontinon⁽¹⁾ kiel tro varman kaŝtanon, kaj streĉi ĉiujn siajn fortojn al la ledfirmao, tiel kiel al la cetero de sia malgranda, sed rajta, heredaĵo ! Lia decido estis prenita en momento. Sed, ekde la sekvanta momento, subite, malkovriĝis al li la tute plena amplekso de lia katastrofo. Deklari la morton de sia onklo, li ne povis tion ! Ĉar ekde kiam la kadavro estis perdita, onklo Jozefo fariĝis (laŭ la vidpunkto de la leĝo) senmorta.

Ne estis en la mondo sufiĉe granda veturilo por enteni Maŭricoⁿ kun lia malespero. La kompatinda knabo haltigis la fiakron, elveturiĝis, pagis kaj ekpaŝis li ne sciis kien.

- Mi komencas kredi ke mi tro haste implikiĝis en ĉi tiu afero ! li diris al si kun funebra ĝemo. Mi timas ke la afero estu tro malsimpla por homo kun mia intelekta kapableco !

Subite prezentigis al lia penso unu el la aforismoj de lia onklo Jozefo : "Se vi volas klare pripensi, skribu viajn argumentojn !", volonte ripetis la maljunulo. "He ! Ĉi tiu maljuna besto tamen havis kelkajn bonajn ideojn ! pensis Maŭrico. Mi tuj uzos lian sistemon, por vidi !"

Li eniris en tavernon, mendis fromaĝon, panon, ion por skribi, kaj solene sidiĝis antaŭ folio el blanka papero. Li provis la plumon; afero apenaŭ kredebla, ĝi perfekte funkciis. Sed kion li estis skribonta ?

- Mi scias ! finfine ekkriis Maŭrico. Mi faros kiel Robinsono Kruso, kun liaj du kolumnoj !

Tuj li faldis sian paperon, konforme laŭ tiu klasika

modelo, kaj komencis jene :

Malbona

1. Mi perdis la korpon de mia onklo.

- Haltu tie ! pensis Maŭrico. Mi lasas min kuntiri tro for per la genio de la antitezo. Ni rekomencu :

Malbona

1. Mi perdis la korpon de mia onklo.

2. Mi perdis la tontinon⁽¹⁾.

3. Mi perdis la komercon de ledaĵoj, kaj la tutan ceteron de heredo de mia onklo.

- Jes, sed tiuokaze mi iros en malliberejon ! Mi forgesis tion ! pensis Maŭrico. Pri tio, mi pensas ke mi pli bone farus ne halti ĉe ĉi tiu hipotezo. Homoj kiuj havas nenion por timi pri si mem, estas kvietaj por rekomendi al aliaj konsideri ĉiujn plej malbonajn ekstremaĵojn; sed mi opinias ke, en tia kazo, mia unua devo estas eviti ĉian okazon malkuraĝigi min. Ne, devas esti alia respondo al dekstra numero 3 ! Devas esti bonaĵo por kontraŭpezi ĉi tiun malbonaĵon ! Aŭ alie, sen tio, por kio utilis la invento de ĉi tiu duobla kolumno ? He ! Je Sankta Georgo, mi scias ! La respondo ĉe la numero 3 estas ĝuste la sama kiel ĉe la numero 2 !

Kaj li hastis reskribi la fragmenton :

Malbona

3. Mi perdis la komercon de

Bona

1. Sed Fosulo trovis ĝin.

Bona

1. Sed, tiamaniere, mi ne plu devas zorgi pri enterigi lin.

2. Sed mi ankoraŭ povus savi ĝin, se Fosulo malaperigus la korpon, kaj mi trovus tute senskrupulan kuraciston.

3. Sed mi tute ne perdus ilin, se Fosulo transdonus la korpon al la polico.

3. Sed mi tute ne perdus ilin,

ledaĵoj, kaj la tutan
ceteron de heredo de mia
onklo.

se mi sukcesus trovi
kuraciston kiu estu tute
senskrupula.

- Ĉi tiu koruptebla kuracisto finfine estas tre deziregi
por mi ! li diris al si. Mi bezonas lin, unue por doni al mi
atestilon certiganta ke mia onklo estas mortinta, por ke mi
povu daŭrigi la ledkomercon; kaj plie mi bezonas lin por doni
al mi atestilon certiganta ke mia onklo vivas... Sed jen ke mi
denove falas en antinomion !

Kaj li revenis al siaj konfrontoj :

Malbona

Bona

- | | |
|---|---|
| 4. Mi preskaŭ ne plu havas monon. | 4. Sed estas multe da ili en la banko. |
| 5. Jes, sed mi ne povas reakiri la monon kiu estas en la banko. | 5. Sed... Pri tio, tio bedaŭrinde ŝajnas nediskutebla. |
| 6. Mi lasis en la poŝo de onklo Jozefo la ĉekon por okcent pundoj ⁽²⁾ . | 6. Sed, se eĉ malmulte Fosulo estas malhonesto viro, la malkovro de tiu ĉi ĉeko decidis lin sekretigi la aferon kaj ĵeti la korpon en la kloakon. |
| 7. Jes, sed se Fosulo estas malhonesto viro kaj se li malkovras la ĉekon, li scios, kiu estas onklo Jozefo, kaj povos ĉantaĝi min. | 7. Jes, sed se mi ne eraras pri mia diveno pri onklo Virmastro, mi povas siavice ĉantaĝi mian kuzon Miĥaelo. |
| 8. Sed mi ne povas ĉantaĝi Miĥaelo ⁿ antaŭ ol havi pruvon pri la morto de lia patro. (Kaj plie ĉantaĝi Miĥaelo ⁿ estas sufiĉe danĝera afero.) | 8. Domaĝe ! |

9. La ledfirmao baldaŭ bezonos monon por la ordinaraĵoj, kaj mi havas nenion por doni.
9. Sed la ledfirmao estas dronanta boato.
10. Jes, sed ĝi estas tamen la sola boato kiu restas al mi.
10. Ĝuste.
11. Johano baldaŭ bezonos monon, kaj mi havas nenion por doni al li.
- 11.
12. Kaj la koruptebla kuracisto volos esti anticipe pagita.
- 12.
13. Kaj se Fosulo estas malhonesta kaj ne sendos min en malliberejon, li postulos de mi grandegajn monsumojn.
- 13.

- Ho ! Sed mi vidas ke la afero estas tre unuflanka ! ekkriis Maŭrico. Fine, ĉi tiu metodo ne havas tiom da valoro kiom mi supozis !

Li ĉifis la paperfolion kaj metis ĝin en sian poŝon; poste tuj li elprenis ĝin el sia poŝo, malfaldis ĝin kaj relegis ĝin de la komenco ĝis la fino.

- Laŭ ĉi tiu resumo de la faktoj, li diris al si, mi vidas ke estas rilate al financo ke mia situacio estas la plej malforta. Ĉu do vere ekzistus neniu rimedo trovi monon ? En granda urbo kiel Londono, kaj ĉirkaŭita de ĉiuj vivrimedoj de la civilizacio, oni ne kredigos min ke tiel simpla afero estu nebla por mi. Nu ! Nu ! Ne tiom da sinpelado ! Unue, ĉu estas io kion mi povas vendi ? Mia kolekto de sigelringoj ?

Sed pensante disigi sin de tiuj karaj trezoroj, Maŭrico sentis ke la sango alfluis al liaj vangoj.

- Ne ! Mi preferus morti ! li diras al si.

Kaj, ĵetante unuŝilingan moneron sur la tablon, li

forkuris en la straton.

- Nepras ke mi trovu monrimedojn ! li rekomencis. Mia onklo estanta morta, la mono deponita en la banko estas mia : mi volas diri ke ĝi devus esti mia, sen ĉi tiu malbenita sorto kiu turmentas min de kiam mi estis orfo sub kuratoreco ! Mi bone scias tion kion farus, en mia situacio, ĉiu alia viro de la Kristanaro ! Ĉiu alia viro, en mia situacio, farus falsaĵojn; krom ke, en mia kazo, tio ne povus esti nomata falsaĵojn, ĉar onklo Jozefo estas morta, kaj ĉar la mono apartenas al mi. Kiam mi pensas pri tio, kiam mi pensas ke mia onklo mortis antaŭ miaj okuloj, kaj ke mi ne povas pruvi ke li mortis, mia gorĝo kunpremiĝas antaŭ tia maljusteco ! Antaŭe, mi sentis min ĉagrenplenan pro memoro pri miaj 7.800 pundoj⁽²⁾ : kio estis ĉi tiu mizera sumo, kompare kun tio kion mi nun perdas ? Tio estas ke, ĝis antaŭhieraŭ, mi estis tute feliĉa !

Kaj Maŭrico trairis la trotuarojn, kun profundaj ĝemoj.

"Kaj plie tio ne estas ĉio ! li pensis. Sed ĉu mi sukcesos fari ĉi tiujn falsaĵojn ? Ĉu mi sukcesos imiti la skribmanieron de mia onklo ? Ĉu mi kapablos ? Kial mi ne prenis pli da skriblecioj kiam mi estis infano ? Ha ! Kiel mi nun komprenas la admonojn de miaj instruistoj, dirante al ni ke ni pli poste bedaŭros ne pli bone profiti de iliaj instruoj ! Mia sola konsolo estas ke, eĉ se mi malsukcesas, mi havos nenion por timi, almenaŭ de mia konscienco. Kaj se mi sukcesas, kaj se Fosulo estas la nigra fripono kiun mi supozas, nu ! mi nur devos provi trovi korupteblan kuraciston, tio kio ne devas esti malfacila trovi en urbo kiel Londono. La urbo devas esti plenplena de ili, tio estas tre certa ! Mi kompreneble ne aperigos anoncon en la gazetojn por peti kuraciston por subaĉeti, ne, mi nur devos laŭvice eniri ĉe diversajn kuracistojn, juĝi ilin laŭ ilia akcepto, kaj poste, kiam mi estos trovinta unun kiu ŝajnos al mi povi taŭgi, simple submeti al li mian aferon... Kvankam, eĉ tio, finfine, estas

sufiĉe tikla klopodo !"

Post longaj ĉirkaŭvojoj, li troviĝis apud la strato Karlo; li subite konsciis pri tio kaj decidis reiri hejmen. Sed, dum li turnis la ŝlosilon en la seruro, nova aflikta penso venis en lian menson : "Ĉi tiu domo mem ne estas mia, tiel longe dum mi ne povos pruvi la morton de mia onklo !" li diris al si. Kaj li tiel forte refermis la pordon post si, ke ĉiuj fenestraj ŝutroj klakis.

En la mallumo de la vestiblo, pro klimakso de malfeliĉo, Maŭrico stumblis, kaj peze falis sur la soklon de la Herkulo. La akra doloro kiun li travivis, elincitegis lin. En subita eksplodo de nesinregema furiozo, li kaptis la martelon kiun Gideono Forsiso lasis sur la planko, kaj sen vidi tion kion li faris, donis baton direkte al la statuo. Li aŭdis sekan krakon.

- Dio mia ! Kion mi ankoraŭ faris ? ĝemis Maŭrico.

Li ekbruligis alumeton kaj kuris serĉi kandelujon en la kuirejo.

- Jes, li diris al si rigardante en la lumo de sia kandelo la piedon de Herkulo kiun li ĝus frakasis, jes, mi ĝus kripligis antikvan ĉefverkon. Mi damaĝis ĝis milojn da pundoj⁽²⁾ !

Sed, subite, sovaĝa espero iluminis lin : "Ni iom vidu ! li rekomencis. Mi estas liberigita de Julia; mi havas nenion por pridiskuti kun tiu idiota Forsiso; la portistoj estis morte ebriaj; la du veturistoj estis maldungitaj. Perfekte ! mi simple neos ĉion ! Nek vidata nek konata. Mi diros ke mi scias nenion !"

Ekde la sekva minuto li estis denove stara, fronte al Herkulo, kun lipoj kunpremitaj, svinganta per sia dekstra mano la martelon uzenda por rompi la karbon kaj per la alia mano masivan haketilon por viando. Ankoraŭ iun minuton, kaj li rezolute atakis la pakkeston. Du aŭ tri bone lokitaj batoj sufiĉis al li por fini la laboron de Gideono. La kesto disrompiĝis, disŝutiĝis sur Maŭricoⁿ laŭ pluvego da tabuloj

sekvata de lavango da pajlo.

Kaj tiam la komercisto de ledaĵoj povis plene aprezi la malfacilecon de la tasko kiun li entreprenis; malmulte necesis por ke li senkuraĝiĝu. Li estis sola; li havis nur bagatelajn armilojn; li havis neniun sperton pri la arto de la ministro aŭ tiu de la ŝtonrompisto. Kiel li sukcesus elvenki kolosan monstron, tute el marmoro, kaj sufiĉe firman por konserviĝi sendifekte ekde (eble) Fidio ? Sed la lukto estis malpli neegala ol li imagis en sia modesteco; unuflanke, materia forto, jes, sed, aliflanke, morala forto, tiu heroa flamo kiu certigas la venkon.

- Mi ja fine tamen faligos vin, dikan bestaĉon ! kriis Maŭrico kun pasio simila al tiu kiu devis iam animi la venkintojn de la Bastilo. Mi fine faligos vin, ĉu vi aŭdas, kaj ne pli malfrue ol ĉi-vesperon ! Mi ne volas vin en mia antaŭĉambro !

La vizaĝo de Herkulo, kun sia maldeca esprimo de gajeco, apartege ekscitis la koleron de Maŭrico, kaj estis per la atako de la vizaĝo ke li komencis siajn operacojn. La alteco de la duondio (ĉar la soklo mem estis tre alta) riskis konsistigi, por la atakanto, gravan malhelpon. Sed, tuj post ĉi tiu unua bataleto, la inteligenteco pruvis sian triumfon super la materio. Maŭrico rememoris ke lia mortinta onklo havas en sia biblioteko, etan moveblan ŝtuparon, supren kiu li grimpigis Juliaⁿ por preni librojn el la supraj bretoj. Li kuris serĉi ĉi tiun altvaloran militilon, kaj baldaŭ, per la viand-haketilo, li havis la ĝojon senkapigi sian stultan malamikon.

Du horojn pli poste, tio kio estis la bildo de grandega ŝarĝisto, fariĝis nur senforma amaso da rompitaĵ membroj. La torso apogis sin al la piedestalo, la vizaĝo turnis sian rikanon al la keletaĝa ŝtuparo; la kruroj, la brakoj, la manoj kuŝis dise-mise en la pajlo, obstrukcante la vestiblon. Ankoraŭ duonhoron pli poste, ĉiuj derompitaĵoj sin trovis

demetitaj en angulon de la kelo; kaj Maŭrico, kun agrablega sento de triumfo, konsideris la scenejon kie okazis liaj heroaĵoj. Jes, ekde nun li povis tutsekure nei; nenio plu en la vestiblo, krom tio ke ĝi estis en eksterordinare ruiniĝinta stato, perfidis la trairon de unu el la plej gigantaj produktoj de antikva skulpturo. Sed estis iu tre laca Maŭrico kiu, ĉirkaŭ la unua matene, sin lasis fali sur sian liton, sen eĉ havi forton por sin senvestigi. Liaj brakoj kaj ŝultroj terure doloris lin; liaj mankavoj brulis; liaj kruroj rifuzis fleksiĝi. Kaj longatempe Morfeo prokrastis veni viziti la junan heroon; kaj je la unua matenradio, jam Morfeo denove fuĝis de li.

La mateno montriĝis priplorinda. Aĉa orienta vento hurlis sur la strato; ĉiumomente la fenestroj tremis sub pluvaj duŝoj, kaj Maŭrico, vestante sin, sentis glaciajn aerblovojn froteti siajn gambojn.

- Tamen, li diris al si kun amara malgajo, tamen, pro tio kion mi jam elportis, mi almenaŭ rajtus havi bonan veteron !

Ne estis pano en la domo, ĉar fraŭlino Hazeltino (kiel ĉiuj virinoj, kiam ili vivas solaj) sin nutris nur per kukoj. Sed Maŭrico fine malkovris tranĉaĵon de biskvito kiu, preparita per granda glaso da akvo, konsistigis por li ŝajnon de tagmanĝo; post kio li rezolute eklaboris.

Nenio estas pli stranga ol la mistero de homaj subskriboj. Ĉu vi subskribas vian nomon antaŭ aŭ post viaj manĝadoj, dum indigesto aŭ en malsata stato, dum vi tremas pro la vivo de infano aŭ kiam vi ĵus gajnis en vetkuro, en la studejo de enketjuĝisto aŭ antaŭ la okuloj de via amatino; por la vulgaruloj, viaj subskriboj malsamiĝos unu de la alia; sed por la fakulo, por la grafologo, por la bankkasisto, ili ĉiam restos iu sama nura fenomeno, kiel la Norda Stelo por astronomoj.

Kaj Maŭrico tion sciis. La interparoladoj kun lia onklo

Jozefo enkapigis al si (trude) la teorion pri skribado, same kiel la teorion de tiu ĉi sagaca arto de la skrib-falsaĵo, pri kiu li nun okupiĝis prepari sian debuton. Sed, feliĉe por la bonordo de komercaj transakcioj, skrib-falsaĵo ĉefe estas afero de praktiko. Kaj dum Maŭrico tiutage sidis ĉe sia tablo, ĉirkaŭita de aŭtentaj subskriboj de sia onklo kaj de bedaŭrinde senvaloraj imitprovoj, pli ol unu fojon li estis malesperonta. Temp' al tempe la vento sendis al li malgajan muĝadon tra la kamentubo; temp' al tempe etendiĝis super Blomsburio tiel densa nebulo, ke li devis leviĝi el sia brakseĝo por reekbruligi la gaslampon; ĉirkaŭ li regis la malvarmeco kaj la malordo de longe neloĝata domo, kun planko sen tapiŝo, sofo plenplena de libroj kaj tolaĵoj, plumoj rustaj, papero glazurita per dika polvotavolo; sed ĉio tio estis nur malgravaj bagateloj, kaj la vera fonto de la deprimado de Maŭrico konsistis en tiuj ĉi abortintaj falsaĵoj kiuj, iom post iom, komencis elĉerpi la tutan provizon de leterpapero.

- Tio estas la plej eksterordinara afero en la mondo ! li ĝemis. Ĉiuj elementoj de la subskribo enestas, la skribostrekoj, la ligoj; kaj la tuto obstine ne funkcias ! La unua bankkomizo venanta suspektos la falsaĵon ! Nu, mi vidas ke mi devos paŭsi !

Li atendis la finon de pluvego, sin apogis al la fenestro kaj, plenvide de la strato Karlo, paŭsis la subskribon de sia onklo. Tamen li realigis nur tre hontindan paŭsaĵon, mokindan, mallertan, kun ĉiaj ŝanceliĝoj kaj denuncemaj riparoj.

- Ne gravas ! Necesos ke tio estu akceptita ! li diris al si, malgaje konsiderante sian faritaĵon. Ĉiuokaze, onklo Jozefo estas morta !

Post tio li plenskribis la ĉekon, tiel ornamitan per falsa subskribo. Ducent sterlingajn pundojn⁽²⁾, li skribis sur ĝi; kaj li kuris al la anglo-patagonia banko kie estis deponita la

fonduso de la ledfirmao.

Tie, kun la plej indiferenta mieno kiun li povis doni al si, li prezentis sian falsaĵon al la dika rufhara skoto kun kiu li kutime traktis, kiam li venis ricevi aŭ deponi monon. La skoto ŝajnis mirigata vidante la ĉekon; poste li turnis ĝin laŭ iu flanko kaj laŭ la alia, eĉ ekzamenis la subskribon per lupeo; kaj lia surprizo ŝajnis ŝanĝiĝi en ankoraŭ pli malfavoran senton. "Ĉu vi bonvolu pardoni min por momento? li fine diris al la kompatinda Maŭrico malaperante en la plej foran profundon de la bankejo. Kaj kiam li revenis, post sufiĉe longa intertempo, li estis akompanata de unu el siaj estroj, iu eta maljuneta kaj diketa sinjoro, sed tamen, el tiuj kies oni diras ke ili estas "mondumanoj ĝis la pinto de la fingroj".

- S^{ro} Maŭrico Finsinko, mi kredas? demandis la eta mondumano surmetante sian nazumon sur sian nazon por pli bone vidi Maŭricoⁿ.

- Jes sinjoro! respondis Maŭrico tremante. Ĉu estas... ĉu estas io kio ne taŭgas?

- Estas tio... Jen tio kio estas, sinjoro Finsinko: ni iom miras ricevi ĉi tion! klarigis la bankisto montrante la ĉekon. Ne pli malfrue ol hieraŭ, ni estis sciigitaj ke ni ne plu devos liveri monon al vi!

- Sciigitaj! ekkriis Maŭrico.

- De via onklo mem! daŭrigis la bankisto. Kaj ni ankaŭ diskontis al sinjoro via onklo ĉekon por... ni vidu! Por kiom estis la ĉeko, sinjoro Beruo?

- Por okcent pundoj⁽²⁾, sinjoro Judkino! respondis la komizo.

- Bento Fosulo! murmuris Maŭrico kies gamboj ŝanceliĝis.

- Kiel, sinjoro? Mi ne aŭdis! diris S^{ro} Judkino.

- Ho! Estas nenio... Simpla maniero paroli!

- Mi esperas ke okazas al vi nenia malagrablaĵo, sinjoro

Finsinko ? diris afable S^{ro} Beruo.

- Ĉio kion mi povas diri al vi, ĵetis Maŭrico kun malĝoja rikanado, estas ke la afero nepre estas neebla ! Mia onklo estas en Burnmuto, malsana, nekapabla moviĝi !

- Vere ! eligis S^{ro} Beruo reprenante la ĉekon el la manoj de sia estro. Sed ĉi tiu ĉeko datiĝas de hodiaŭ, kaj de Londono ! Kiel vi klarigas tion, sinjoro ?

- Ho ! Tio estas dat-eraro ! balbutis Maŭrico dum viva sangalfluo kolorigis lian vizaĝon.

- Sendube ! Sendube ! Diris al li S^{ro} Judkino denove fiksante al li sian teruran rigardon.

- Kaj eĉ, riskis Maŭrico, se eĉ vi ne povas transdoni al mi grandajn monsumojn, ĉi tio estas nur bagatelo... ĉi tiuj ducent pundoj⁽²⁾ !

- Sendube, sinjoro Finsinko ! respondis S^{ro} Judkino. Tio kion vi diras, estas vera; kaj se vi insistas, mi certe submetos vian peton al nia administrantaro. Sed mi vere timas... unuvorte, sinjoro Finsinko, mi timas ke tiu subskribo ne estas tiel ĝusta kiel ni rajtas deziri...

- Ho ! Ĝi tute ne gravas ! haste murmuris Maŭrico. Mi petos al mia onklo refari ĝin. Vi vidas, li daŭrigis reakirante iom da memfido, vi vidas, sinjoro, mia onklo estas tiel malsana, ke li ne havis la forton por subskribi ĉi tiun ĉekon sen sin turni al mia helpo; kaj mi imagas ke la diferencoj en la subskribo estas ĉar mi devis teni lian manon.

S^{ro} Judkino ĵetis akre ekrigardon, rekte en la okulojn de Maŭrico. Poste li sin turnis al S^{ro} Beruo.

- Nu ! li diris, mi komencas kredi, ke ni hieraŭ estis trompitaĵ de fripono kiu sukcesis ŝajnigi sin kiel S^{ron} Jozefoⁿ ! Diru al sinjoro via onklo ke ni tuj informos la policon ! Koncerne ĉi tiun ĉekon, mi bedaŭras devi ripeti al vi ke, pro la maniero kiel ĝi estis subskribita, la banko ne povas preni sur sin... nian respondecon... vi senkulpigu nin !

Kaj li transdonis la ĉekon al Maŭrico, trans la kastablo. Maŭrico mekanike kaptis ĝin : lia penso tute estis al alia temo.

- En iu kazo kiel tia, li diris, la perdo nur koncernas nin, tio estas mian onklon kaj min !

- Tute ne, sinjoro, tute ne ! Estas la banko kiu respondecas. Aŭ ni reakiros ĉi tiujn okcent pundojn⁽²⁾, aŭ ni repagos ilin al vi el nia profito kaj perdo; vi povas kalkuli kun tio !

La nazo de Maŭrico ankoraŭ plilongiĝis; tiam nova radio de espero sin prezentis al li.

- Aŭskultu ! li diris. Lasu al mi la taskon solvi ĉi tiun aferon ! Mi ŝargas min per tio. Mi havas bonan ideon ! Kaj plie, detektivoj kostas tiom multe !

- La banko ne tiel konceptas ĝin, sinjoro ! respondis S^{ro} Judkino. La banko elportos ĉiujn kostojn de la enketo; ni elspezos la tutan monon kiun necesos. Fripono ne malkaŝita konstituas konstantan danĝeron. Ni plene klarigos ĉi tiun aferon, sinjoro Finsinko; vi povas kalkuli je ni, kaj trankviligi vian menson pri tio !

- Nu ! Mi prenas sur min la tutan perdon ! maltime deklaris Maŭrico. Mi petas vin forlasi la aferon !

Ĉiapreze, li estis decidita malhelpi la enketon.

- Mi pardonpetas, rekomencis la senkompata S^{ro} Judkino; sed nenio koncernas vin en ĉi tiu afero kiu estas tute inter ni kaj sinjoro via onklo. Se tiu ĉi samopinias kiel vi, kaj ke li venu por diri tion al ni, aŭ ke li bonvolu akcepti min apud li...

- Tute neblas ! ekkriis Maŭrico.

- Nu ! Vi vidas ke ni havas la manojn ligitaj ! Necesas ke ni tuj ekmovigu la policon !

Maŭrico maŝine refaldis la ĉekon kaj metis ĝin en sian monujon.

- Saluton ! li diris.

Kaj li eliris, li fuĝis el la banko.

"Mi demandas al mi tion kion ili suspektas ! li pensis.

Mi nenion komprenas ! Ilia konduto havas ion neklarigebla. Sed cetere, ne gravas. Ĉio estas perdita ! La ĉeko estis elspezita. La polico estos sur siaj piedoj. Post du horoj, tiu idiota Fosulo estos en malliberejo, kaj la tuta historio de la kadavro aperos en la vesperaj ĵurnaloj !"

Se tamen la kompatinda knabo povintus aŭdi la dialogon kiu okazis en la banko post sia foriro, li sendube estus malpli timigita; sed eble, interŝanĝe, li sentintus sin ankoraŭ pli afliktita.

- Jen tre stranga afero, sinjoro Beruo ! estis diranta S^{ro} Judkino.

- Jes, sinjoro, respondis S^{ro} Beruo; sed mi kredas ke ni donis al li bonan atentigon !

- Ho ! Ni ne plu aŭdos paroli pri S^{ro} Maŭrico Finsinko ! estis rekomencanta S^{ro} Judkino. Tio liaflanke estis nur la unua provo, kaj ni havis tiom da bonaj rilatoj kun la firmao Finsinko ke mi opiniis pli kompateme agi milde. Sed ĉu vi ja pensas kiel mi, sinjoro Beruo, ke ne eraro eblas pri la hieraŭa vizito ? Li fakte estis la maljuna S^{ro} Finsinko mem kiu venis enspezi siajn okcent pundojn⁽²⁾, ĉu ne ?

- Neniu eraro eblas, sinjoro ! eligis S^{ro} Beruo kun rideto. Li fakte estis S^{ro} Finsinko ! Li detale klarigis al mi la principojn de la diskonto !

- Tre bone ! Tre bone ! konkludis S^{ro} Judkino. La venontan fojon kiam S^{ro} Jozefo Finsinko venos, petegu lin veni en mian studejon ! Mi iom timas lian konversacion; sed mi opinias, pri la nuna kazo, ke ni nepre havas devon antaŭsciigi lin !

Ĉapitro VII

Kie Fosulo prenas konsilojn de juristo.

La strato **Norfolko** ne estas ĉefstrato; kaj ankaŭ ĝi ne estas bela strato. Oni ĉefe vidas eliri el ĝi servistinojn malpurajn, malkombitajn, evidente rabate dungitajn : oni vidas ilin, matene, irante serĉi provizojn en la najbaran straton, aŭ, vespere, promenante tien kaj reen, aŭskultante la amvoĉon. Dufoje tage, oni vidas la vendiston de pulmaĵo por katoj pasi. Fojfoje sensperta ludanto de gurdo sin riskas en la strato, kaj tuj reiras, naŭzita. Dum la festaj tagoj, la strato Norfolkko servas kiel areno por la junaj sportistoj de la najbarejo, kaj la loĝantoj havas la okazon studi la diversajn eblajn metodojn de individuaj atako kaj defendo. Kaj ĉio tio, cetere, ne malebligas ĉi tiun straton rajti esti rigardata kiel "respektinda"; ĉar, estante tre mallonga kaj tre malmulte trapasata, ĝi enhavas ne eĉ unu butikon.

En la tempo kiam okazis la ago de nia rakonto, la numero 7 de la strato Norfolkko havis sur sia pordo kupran platon kun ĉi tiuj vortoj : V.-D.Fosulo, artisto. Tiu ĉi plato ne altiris la atenton al si per sia pureco; kaj pri la domo, en sia tutaĵo, mi ne povas diri ke ĝi havis ion aparte allogan. Kaj tamen, ĉi tiu domo, laŭ nerefutebla vidpunkto, estis unu el la vidindaĵoj de nia ĉefurbo; ĉar ĝi havis kiel luanon artiston - kaj eĉ eminentan artiston, ĉu li havus por distingi sin nur sian malsukceson - al kiu neniam iu ilustrita revuo dediĉis artikolon ! Neniam iu lignogravuristo reproduktis "angulon de la malgranda salono" de tiu ĉi domo, nek "la monumentan kamenon en la granda salono"; neniu junulino, debutantino en verkado, laŭdis "la simplecon plenan de natureco", per kiu la

majstro V. D. Fosulo akceptis ŝin, "meze de siaj trezoroj". Sed, cetere, mi mem, tre bedaŭre, mi ne havos la plezuron plenigi ĉi tiun mankon; ĉar mi havas aferon nur en la antaŭĉambro, la studio kaj la kompatinda "ĝardeno" de la estetika loĝejo de majstro Fosulo.

La koncerna ĝardeno posedis fontanon el gipso (sen akvo, cetere), kelkajn senkolorajn florojn en potoj, kaj du aŭ tri statuojn el la postantikva epoko prezentantaj satirusojn kaj nimfojn laŭ pli mezbona realigo ol ĉio kion mia leganto povos imagi. Unuflanke, ĉi tiu ĝardeno estis ombrata de du malgrandaj atelieroj, subluitaj de Fosulo al la plej senfamaj kaj mallertaj reprezentantoj de nia nacia arto. Ĉe la alia flanko staris iom malpli malgaja konstruaĵo, kun malantaŭa pordo malfermiĝanta al strateton; estis tie kie S^{ro} Fosulo sin dediĉis, ĉiuvespere, al la ĝojoj de la arta kreado. La tutan tagon li instruis arton al junaj knabinoj en pensiono de **Kensintono**; sed liaj vesperoj almenaŭ apartenis al li, kaj li plilongigis ilin for en la nokto. Jen li pentris pejzaĝon kun akvofalo, per oleo; jen li skulptis, senpage kaj libervole (sed "el marmoro", kiel li ŝatis rimarkigi tion), la buston de iu publika eminentulo; jen ankoraŭ li modlis nimfon el gipso ("povantan servi kiel gaslampo en ŝtuparo, sinjoro!") aŭ la infanon Samuelo", trikvarone de natura grandeco, kiun oni povintus aĉeti al li por la salono de vartejo.

S^{ro} Fosulo antaŭe lernis en Parizo, kaj eĉ en Romo, koste de komercisto de korsetoj, lia kuzo, kiu bedaŭrinde ne malfruis bankroti; kaj kvankam neniu iam troigis sian artan nekompetentecon ĝis suspekti al li la plej etan talenton, oni povis supozi ke li iom lernis sian metion. Sed dek ok jaroj da instruado senigis lin de la maldika bagaĝo de liaj scioj. Kelkfoje la artistoj al kiuj li subluis atelierojn, ne povis sin deteni de rezonigi li; ili remontris al li, ekzemple, kiel neblis verki bonajn pentraĵojn sub la gaslumo, aŭ naturgrandecajn

nimfojn sen helpo de modelo. "Jes mi scias tion ! li respondis. Neniu scias tion pli bone ol mi en la tuta strato Norfolk. Kaj mi certigas al vi ke, se mi estus riĉa, mi ne hezitus dungi la plej bonajn modelojn de Londono. Sed, estanta malriĉa, mi devis lerni rezigni ilin ! Modelo kiu venus de tempo al tempo, ĉu vi komprenas ? utilis nur por konfuzi mian idealan koncepton pri la homa vazaĝo; for de esti avantaĝo, ĝi estus reala danĝero por mia artista kariero. Kaj pri mia kutimo pentri sub artefarita gasa lumo, mi konfesas ke ĝi ne estas sen malavantaĝoj; sed mi ja estis devigita adopti ĝin, ĉar ĉiuj miaj tagoj estas dediĉataj al instruaj laboroj !"

En la preciza momento, kiam mi devas prezenti lin al miaj legantoj, Fosulo troviĝis sola en sia ateliero, sub la mortonta lumo de malgaja oktobra tago. Li sidis sur brakseĝo Vindsoro (kun "simpleco plennatura", certe), kun la kapo kovrita per sia nigra felta ĉapelo. Li estis kompatinda eta brunulo, maldika, sendanĝera, kortuŝa, kun siaj funebraj vestoj, kun sia tro longa redingoto, sia rekta kaj malalta movebla kolumo, kun sia malklare eklezia aspekto, kiu estintus ankoraŭ pli klare sen longa barbo pinte finiĝanta. Kaj fakte estis arĝentaj fadenoj en liaj haroj kaj lia barbo. Li ne plu estis tute juna, la kompatinda viro; kaj vidveco, kaj malriĉeco kaj humila ambicio ĉiam kontraŭita, ĉio tio tute ne estis farita por rejunigi lin !

Antaŭ li, en angulo apud la pordo, staris fortika barelo. Kaj Fosulo vane sin turnis en sia brakseĝo; ĉiam estis ĉi tiu barelo kiu sin prezentis al liaj okuloj same kiel al liaj pensoj.

"Ĉu mi devas malfermi ĝin ? Ĉu mi devas resendi ĝin ? Ĉu mi devas tuj sciigi S^{ron} Semitopoliso ! li demandis al si. Ne ! li fine decidis. Ni faru nenion sen la opinio de S^o Finsinko !"

Post tio li ekstaris kaj iris preni el tirkesto eluzitan

submanumon el ledo. Li metis ĝin sur la tablon, antaŭ la fenestro, elprenis folion de tiu laktokaf-kolora leterpapero, kiu servis lin por siaj skribitaj rilatoj kun la direktorino de la pensiono kie li donis lecionojn, kaj pene, li sukcesis redakti la jenan leteron :

"Kara sinjoro Finsinko, ĉu estus tro fidi pri via komplezo peti al vi veni por momento viziti min ĉi-vespere mem ? La temo kiu zorgigas min, kaj pri kiu mi devas peti al vi konsilon, estas el la plej gravaj : ĉar temas pri la statuo de Herkulo, apartenanta al S^{ro} Semitopoliso, pri kiu mi jam havis okazon paroli kun vi. Mi skribas al vi en stato de granda agitiĝo kaj maltrankvilo; mi vere timas, ke ĉi tiu ĉefverko de antikva arto devojiĝis. Kaj plie mi havas por frenezigi min alian embarason, kiu cetere ligiĝas kun tiu ĉi. Bonvolu, mi petegas vin, pardoni la malelegantecon de ĉi tiu rapidskribaĵo, kaj kredu min vian tute sindonema."

Vilhelmo D. Fosulo.

Provizita de tiu ĉi letero, li ekvojiris, kaj iris sonorigi ĉe la pordo de la numero 233, en strato Reĝo, la najbara strato. Estis ĉe tiu ĉi adreso ke la proceduristo Miĥaelo Finsinko havis sian privatan loĝejon. Fosulo renkontis la proceduristo antaŭ kvar jaroj, en Ĉelsio, dum kunveno de artistoj; estante najbaroj, ili kune revenis; kaj Miĥaelo, kiu funde estis bonega knabo, tute ne ĉesis de tiam doni al sia najbareto iom disdegnan, sed helpeman kaj certan amikecon.

- Ne ! diris la maljuna domservistino de la Finsinko^j, kiu venis malfermi la pordon, S^{ro} Miĥaelo ne jam rehejmiĝis ! Sed vi ŝajnas tute malkontenta, sinjoro Fosulo ! Venu preni glason da Ŝereo, sinjoro, por revigliĝi vin !

- Dankon, sinjorino ! Ne hodiaŭ ! respondis la artisto. Vi estas tre bona, sed mi sentas min tro senenergia por

trinki ŝereon. Nur bonvolu, senmanke, transdoni ĉi tiun bileton al sinjoro Miĥaelo, kaj petegu lin pasigi momenton ĉe mi ! Li venu tra la malantaŭa pordo rigardanta al strateto, mi restos dum la tuta vespero en mia ateliero !

Kaj li reiris al sia strato, kaj malrapide eniris hejmen. Ĉe la angulo de la strato Reĝo, la montrofenestro de frizisto altiris lian atenton. Longe li konsideris la fieran, noblan, belegan damon el vakso kiu staris centre de ĉi tiu montrofenestro. Kaj, per ĉi tiu spektaklo, la artisto vekigis ene de Fosulo, malgraŭ la turmentiĝoj de la privatulo.

"Oni facile mokas tiujn kiuj faras ĉi tiujn aferojn ! li diris al li; sed tamen estas io en ĝi ! Estas, en ĉi tiu vizaĝo, io malfacile difinebla, io fiera, grava, vere eleganta ! Estas ĝuste la sama io malfacile difinebla kiun mi provis esprimi en mia Imperiestrino Eŭgena !" li suspiris.

Kaj, laŭlonge de sia tuta vojo, ĝis sia ateliero, li pensis pri ĉi tiu "io malfacile difinebla".

"Ĉi tiu tuja kontakto kun la realeco, li diris al si, jen tio kion oni ne instruas al vi en Parizo ! Ĝi estas angla arto, pure angla ! Nu mia kompatinda maljunulo, vi lasis vin rutinuligi ! Skuu vin ! Celu pli alten, Fosulo, celu pli alten !"

Dum la tuta tempo de sia teo, kaj pli poste, dum li donis al sia filo lian violonlecionon, la animo de Fosulo forgesis siajn zorgojn por forflugi al la lando de la idealo. Kaj, tuj kiam li finigis la lecionon, li kuris enfermi sin en sia ateliero.

Eĉ la vido de la barelo ne sukcesis malvigligi lian impeton. Li tute sin donis al sia verko, iu busto de S^{ro} **Ĝojŝtono**, laŭ foto. Kun eksterordinara sukceso, li venkis la malfacilaĵon kiun prezentis al li, pro manko de ia dokumento, de la malantaŭa parto de la kapo de sia famkonata modelo; kaj li estis komenconta la memorindajn pintojn de la ĉemiza kolumo, kiam la eniro de Miĥaelo Finsinko subite revenigis lin al la realo.

- Nu ! Kio estas kiu ne taŭgas ? demandis Miĥaelo antaŭeniranta al la kameno en kiu Fosulo, honore al li, preparis bonegan fajron.

- Neniu vorto sufiĉus por esprimi mian embarason ! diris la artisto. La statuo de S^{ro} Semitopoliso ne alvenis, kaj mi timas ke oni respondecigu min pri ĝia perdo. Tamen ne estas problemoj pri mono kiu maltrankviligas min ! Tio kio maltrankviligas min, sinjoro Finsinko, estas la perspektivo de skandalo ! Ĉi tiu Herkulo, kiel vi scias, kontrabande eliris el Italio. La romaj princoj kiuj posedis ĝin, ne rajtis seniĝi je ĝi, kaj estas por fordirekti la suspektojn ke S^{ro} Semitopoliso petis al mi, kontraŭ malgranda provizio, permesi ke la pakaĵo estu adresita al mi. Se la statuo restis survoje, ĉio estos malkovrata, kaj mi estos devigata konfesi mian partoprenon en tiu ĉi kontraŭleĝeco !

- jen io kio ŝajnas al mi afero el la plej seriozaj ! deklaris la proceduristo. Mi antaŭvidas ke ĝi postulos multe da trinkaĵo, Fosulo !

- Mi prenis decidon... prepari ĉion por vi kun ĉi tiu intenco ! respondis la artisto montrante sur la tablo, alkohol-lampon, botelon da ĝino, citronon kaj glasojn.

Miĥaelo preparis al si grogon kaj proponis cigaron al sia amiko.

- Ne, dankon ! diris Fosulo. Mi antaŭe havis la malvirton trege ŝati la tabakon; sed, vi scia, la odoro estas tiel tenaca, sur la vestaĵoj !

- Perfekte ! diris la proceduristo. Nun mi kapablas aŭskulti vin. Komencu vian rakonton !

Kaj la kompatinda Fosulo komplezeme elmontris siajn turmentigojn. Li antaŭ nelonge iris al stacidomo Vaterlo, esperante tie trovi sian Herkuloⁿ; kaj oni donis al li, anstataŭ la atendata koloso, barelon apenaŭ sufiĉe grandan por enhavi la Diskoĵetanton. Tamen, tute eksterordinara afero, la

barelo estis adresita al li, kaj venis el Marsejlo, de kie devis veni la Herkulo, kaj la adreso fakte estis de la mano de lia itala korespondanto. Kaj plie, ankoraŭ pli eksterordinara afero, li eksciis ke giganta pakkesto alvenis per la sama trajno, sed havanta alian adreson, kaj adreson de nun nemalkovreblan. "La kamionisto komisiita por forporti ĝin ebriiĝis, kaj respondis al miaj demandoj per vortoj kiujn mi ruĝiĝus ripeti al vi. Li tuj estis eksigita de la sekciestro, kiu cetere estis tre afabla, kaj promesis al mi informiĝi ĉe Saŭtemptono. Sed intertempe, kion mi devis fari ? Mi lasis mian adreson kaj kunportis la barelon ĉi tien; post tio, rememorante malnovan diraĵon, mi decidis malfermi ĝin nur en la ĉeesto de mia advokato.

- Kaj estas ĉio ? diris Miĥaelo. Mi ne vidas en ĉio ĉi la plej malgrandan kialon por maltrankviliĝi. La Herkulo estas survoje malfruiĝinta. Ĝi venos al vi morgaŭ aŭ la posta tago. Kaj koncerne tiun barelon, kedu min, ĝi estas memoraĵo de iu el viaj junaj lernantinoj. Laŭ ĉia probableco, ĝi enhavas ostrojn !

- Ho ! Ne parolu tiel laŭte ! ekkriis la malgranda artisto. Se oni aŭdus vin moki ĉi tiujn fraŭlinojn, mi tuj perdus mian postenon. Kaj plie, kial oni sendus al mi ostrojn el Marsejlo ? Kaj kial oni adresintus ilin al mi per la mano mem de S^{ro} Ricardo, la partnero de S^{ro} Semitopoliso ?

- Ni iom vidu la koncernan objekton ! diris Miĥaelo. Rulu ĝin ĝis ĉi tie, sub la gaslampo !

La du viroj rulis la barelon tra la ateliero.

- La fakto estas ke ĝi estas tro peza por enteni ostrojn ! observis sagace Miĥaelo.

- Se ni malfermus ĝin, sen pli prokrasti ? proponis Fosulo al kiu la kombinita influo de konversacio kaj grogo restarigis lian tutan bonan humoron.

Post tio, sen atendi respondon, li kuspis siajn manikojn

kvazaŭ por boksokonkurso, ĵetis en la paperkorbon sian moveblan kolumon de pastoro, kaj tenante ĉizilon en unu mano kaj martelon en la alia, vigle atakis la misteran barelon.

- Brave ! Vilhelmo Dento ! Jen bona laboro ! kriis Miĥaelo. Kian admirindan arbohakiston oni povus fari per vi ! Kaj ĉu vi scias tion kion mi kredas ? Mi kredas ke estas iu el viaj junaj lernantinoj kiu, por alveni ĝis vi, enfermis sin mem en ĉi tiu barelo ! Ĉu ne estas tia aventuro en la historio de Kleopatro ? Bone atentu ne enigi vian ĉizilon en la kapon de la belulino !

Sed la spektaklo de la agado de Fosulo estis kontraŭa. Baldaŭ la proceduristo ne plu povis rezisti al la deziro preni sian parton de la festo. Ĵetante sian cigaron en la fajron, li elprenis la ilojn el la manoj de sia amiko, kaj komencis siavice disbati la barelon. Kaj baldaŭ la ŝvito defluis, laŭ dikaj grajnoj de rozario, sur lian larĝan frunton; lia pantalono, el la plej nova modo, sin kovris per rustaj makuloj; kaj la tuta ateliero vibris ĉe ĉiu el liaj batoj.

Barelo ĉirkaŭbendita de feraĵo ne estas facila afero por malfermi, eĉ kiam oni lerte elturniĝas, sed kiam oni mallerte traktas ĝin, estas multaj ŝancoj ke, anstataŭ malfermiĝi, la barelo fine rompiĝu entute. Estas ĝuste tio kio okazis al la koncerna barelo. Subite la lasta fera ringo falis; kaj tio kio estis solida barelo, grandioza specimeno de nia provinca barelejo, estis nur konfuza amaso da rompitaĵ tabuloj.

Meze de ili, stranga pakaĵo da litkovriloj restis staranta dum kelkaj sekundoj, kaj poste peze sinkis sur la marmora slabo de la kameno. Kaj, en tiu sama momento, la kovriloj disiĝis, kaj nazumo el testudaĵo ruliĝis ĝis la piedoj de Fosulo konsternita.

- Silentu ! diris Miĥaelo.

Li kuris al la pordo de la ateliero, kiun li riglis. Poste,

tute pala, li revenis al la kameno, finis flankenpuŝi la kovrilojn kaj retropaŝis, tremante.

Estis longa silento en la ateliero.

- Diru al mi la veron ! fine demandis mallaŭte Miĥaelo.
Ĉu estas vi kiu faris tiun fiaĵon ?

Kaj, per la fingro, li montris la kadavron.

La malgranda artisto sukcesis nur eligi neartikulaciaĵajn sonojn.

Miĥaelo verŝis ĝinon en glason. "Prenu, li diris, trinku ĉi tion ! Kaj ne timu ĉion konfesi al mi ! Vi scias ke mi ĉiam restos via amiko !

Sed Fosulo remetis la glason sur la tablon sen havi la kuraĝon gustumi ĝin.

- Mi asertas al vi antaŭ Dio, li diris, ke ĉi tio estas por mi nova mistero ! En miaj plej malbonaj inkubsonĝoj, mi neniam sonĝis pri io simila. Mi ĵuras al vi ke mi ne estus homo por dispremi muŝon !

- Ĉio bone glatas ! respondis Miĥaelo kun profunda suspiro de kvietiĝo. Mi kredas vin, kompatinda maljunulo mia ! - Kaj li vigle premis la manon de sia amiko.

- Pardonu min, li daŭrigis post momento, sed ideo venis al mi ke vi eble liberigis vin de S^{ro} Semitopoliso !

- Mia situacio ne estus pli timiga se eĉ mi farintus tion ! ĝemis Fosulo. Mi estas perdita homo ! Ĉio estas finita por mi !

- Unue, diris Miĥaelo, ni forigu ĉi tion el nia vido, ĉar mi devas konfesi al vi, kara Fosulo mia, ke ĉi tiu vizito de via amiko nur tre malmulte plaĉas al mi. (Kaj li denove tremetis). Kien ni povos meti lin ?

- Vi eble povus transporti la aferon en la kameron kiu estas tie, se almenaŭ vi havas la kuraĝon tuŝi ĝin ! murmuris Fosulo.

- He ! kompatinda Fosulo mia, necesas ke unu el ni du

havu tiun kuraĝon, kaj mi timas ke ne estos vi kiu iam havos ĝin ! Iru ĉe la alian flankon de la tablo, turnu la dorson, kaj pretigu al mi grogon ! Tio nomiĝas la divido de la laboro !

Du minutojn poste, Fosulo aŭdis refermi la pordon de la kamero.

- Jen ! deklaris Miĥaelo. Jen kiu tuj havas pli intiman aspekton ! Vi povas returni vin, kuraĝega Fosulo ! Ĉu ĝi estas mia grogo ? li demandis prenante glason el la manoj de la artisto. Sed, ĉielo pardonu min, ĝi estas limonado !

- Ho ! Finsinko, mi petegas, kion ni faros kun ĉi tio ? murmuris Fosulo metante sian manon sur la ŝultron de sia amiko.

- Tio kion ni faros kun ĝi ? Enterigi ĝin meze de via ĝardeno, kaj super ĝi, starigi unu el viaj statuoj laŭ funebra monumento ! Sed unue, enmetu por mi iom da ĝino ĉi-enen !

- Sinjoro Finsinko, bonvolu, ne moku min pri mia malfeliĉo ! kriis la artisto. Vi vidas antaŭ vi homon kiu estis dum sia tuta vivo, mi ne hezitas diri tion, treege respektinda. Krom la eta kontrabando de Herkulo (kaj eĉ pri tio mi humile pentas !) neniam mi faris ion kio ne povis esti elmontrata en plena taglumo. Neniam mi timis la lumon ! ĝemis la malgranda viro. Kaj nun, nun...

- Nu ! Iom pli da vigleco, mil diabloj ! ekkriis Miĥaelo. Mi certigas al vi ke tiaj aferoj ĉiutage okazas ! Ĝi estas la plej ofta afero de la mondo kaj la plej bagatela ! Se nur vi absolute certas ne esti partoprenanta en...

- Kiajn vortojn mi trovos por aserti ĝin al vi ? komencis Fosulo.

- Mi kredas vin, mi kredas vin ! daŭrigis Miĥaelo. Oni klare vidas ke vi ne havas la sperton kiun supozus tia ago. Sed jen tio kion mi volis diri : se, aŭ pli ĝuste ĉar, vi scias nenion pri la krimo, ĉar la... la objekto kiu troviĝas en via kamero, estas nek via patro, nek via frato, nek via kreditoro,

nek via bopatrino, nek tio kiun oni nomas "ofendegitan edzon"...

- Ho ! Sinjoro, malaprobis Fosulo, ŝokita.

- Ĉar, unuvorte, daŭrigis la proceduristo, vi havis nenian eblan intereson pri ĉi tiu krimo, la kampo antaŭ ni estas tute libera. Mi eĉ dirus ke la problemo estas el la plej fascinaj. Kaj mi intencas helpi vin solvi ĝin, Fosulo, helpi vin ĝis la fino ! Ni iom vidu ! Jam delonge mi ne havis libertagon; morgaŭ matene mi sciigos al mia oficejo ke oni ne atendas min dum la tuta tago. Ĉiel mia tuta tempo apartenos al vi, kaj ni povos konfidi la aferon en aliajn manojn !

- Kion vi volas diri ? demandis Fosulo. En kiujn aliajn manojn ? En la manojn de policisto ?

- Diablen la polica inspektoro ! respondis Miĥaelo. Se vi ne volas uzi la plej mallongan rimedon, kiu signifus enterigi la objekton, ekde ĉi tiu vespero, en vian ĝardenon, necesos ke ni trovu iun kiu konsentos enterigi ĝin en la lian. Resume, ni devos transdoni la taskon inter la manojn de iu kiu havas pli da rimedoj kun malpli da skrupuloj.

- Privata detektivo, eble ? sugestis Fosulo.

- Aŭskultu, kara mia, estas tempoj kiam vi plenigas min per kompatato ! respondis la advokato. Kaj, pri tio, li aldonis per alia tono, mi ĉiam bedaŭris ke vi ne havu pianon ĉi tie en via kaverno ! Se vi mem ne scipovas ludi ĝin, viaj amikoj almenaŭ povus distriĝi muzikante, dum vi estas okupinta fingrumi koton !

- Mi povas akiri pianon, se tio konvenas al vi ! diris nerveze Fosulo deziranta plaĉi. Vi scias, cetere, ke mi iom ludas violonon...

- Jes mi scias tion ! diris Miĥaelo. Sed kio estas violono, ĉefe pro la maniero per kiu vi ludas ĝin ? Ne, tio kio necesas, estas polifonia instrumento ! Bona **kontrapunkto**, jen la revo ! Kaj, konsekvence, mi tuj diros al vi : ĉar ĉi-

vespere estas iom tro malfrue por ke vi povu aĉeti pianon, mi iun donos al vi !

- Mi multe dankas vin ! respondis Fosulo mirstulta. Ĉu vi volas doni al mi vian pianon ? Mi vere estas tre dankema al vi !

- Jes ja, mi donos al vi unu el miaj du pianoj, daŭrigis Miĥaelo, por ke morgaŭ la polica inspektoro distriĝu arpeĝante dum liaj detektivoj traserĉos vian kameron !

Fosulo mirege konsideris lin.

- Mi ŝercas ! rekomencis Miĥaelo. Sed, ankaŭ, vi nenion komprenas sen tio ke oni devu precizigi ! Atentu, Fosulo, bone sekvu mian argumentadon ! Mi intencas profiti de ĉi tiu fakto, tre avantaĝa, verdire, ke vi kaj mi estas absolute senkulpaj pri la murdo. Nenio ligas nin kun ĉi tiu akcidento krom la ĉeesto de... vi scias de kio. Ni sukcesu liberigi nin de... de tio, kaj ni ne plu devos timi ion. Nu ! mi do donos al vi mian pianon ! Morgaŭ ni eltiros ĉiujn kordojn, ni demetos... nian amikon... en ilia loko, ni fermos la instrumenton per ŝloso, ni metos ĝin sur ĉaron, kaj ni enkondukos ĝin en la salonon de juna sinjoro kiun mi laŭvide konas.

- Kiun vi laŭvide konas ?... ripetis Fosulo.

- Sed ĉefe, rekomencis Miĥaelo, kies apartamenton mi pli bone konas ol li mem konas ĝin. Tiu ĉi apartamento iam havis kiel luanton unu el miaj amikoj, mi nomas lin "mian amikon" por mallongigi, li nuntempe estas en punlaborejo. Mi defendis lin, mi savis lian vivon, kaj la kompatinda diablo, rekompence, lasis al mi ĉion kion li havis, inkluzive la ŝlosilojn de sia apartamento. Estas tie kien mi intencas transporti vian... ni diru : vian Kleopatroⁿ ! Ĉu vi komprenas ?

- Ĉio ĉi ŝajnas al mi tre stranga ! murmuris Fosulo. Kaj kio okazos al tiu kompatinda sinjoro kiun vi laŭvide konas ?

- Ho ! Mi faras tion por lia bono ! gaje respondis Miĥaelo. Li bezonas skuon por doni al si viklecon !

- Sed, kara amiko mia, ĉu vi ne pensas ke vi elmetas lin al la risko de akuzo de... akuzo de murdo ? balbutis Fosulo.

- He ! Li estos ĝuste en la sama situacio kiel ni ! respondis la proceduristo. Li estas same senkulpa kiel vi, mi povas certigi tion al vi ! Tio kio pendigas homojn, kara Fosulo mia, estas malpli la akuzo ol tiu malfeliĉa pligraviga cirkonstanco kiun oni nomas kulpecon !

- Sed vere ! Vere ! insistis Fosulo, via tuta plano ŝajnas al mi tiel stranga ! Ĉu ne estus pli bone, finfine, sciigi la policon ?

- Kaj okazigi skandalon ! rebatis Miĥaelo. La mistero de la strato Norfolk. Fortaj supozoj de senkulpeco favore al Fosulo. He ! Kian efikon tio kaŭzus en via pensio ?

- Ĉi tio rezultigus mian tujan elpelon ! konsentis la artisto. Jes, sen iu ajn dubo !

- Kaj plie, cetere, diris Finsinko, vi ja supozas ke mi ne implikiĝos en ĉi tia afero sen donaci al mi iom da amuziĝo, kontraŭ miaj klopodoj !

- Ho ! Kara sinjoro Finsinko mia ! ĉu ĉi tio estas taŭga konduto por fine superi tiel seriozan aferon ? ekkriis la kompatinda Fosulo.

- Nu ! Nu ! Mi diris tion nur por kuraĝigi vin ! respondis senhonte Miĥaelo. KREDU min, Fosulo, nenio estas tia en la vivo kia prudenta facilanimeco ! Sed neutile plu diskuti. Se vi konsentas sekvi mian konsilon, ni tuj eliru kaj iru serĉi la pianon ! Se vi ne konsentas kun ĝi, diru tion, kaj mi lasos vin fini la aferon laŭ via plaĉo !

- Vi bone scias ke mi absolute dependas de vi ! respondis Fosulo. Sed ho ! Ho ! Kian nokton mi devos pasigi, kun ĉi tio... ĉi tiu hororo en mia ateliero ! Kiel mi kapablos pensi pri tio, sur mia kapkuseno ?

- Ĉiukaze mia piano ankaŭ estos en via ateliero ! respondis Miĥaelo. Pensu pri ĝi, ĝi kontraŭpezos !

Unu horon poste, ĉaro eniris en la strateton; kaj la piano de Miĥaelo, grandvosta Erardo, cetere tre uzita, estis demetita de la du amikoj en la ateliero de Fosulo.

Ĉapitro VIII

Kie Miĥaelo proponas al si libertagon.

La morgaŭon ĝuste je la oka matene, Miĥaelo sonorigis ĉe la pordo de la ateliero. Li trovis la artiston kompatinde ŝanĝita, palega, kurbigita, senreaga, kun konfuzitaj okuloj, kiuj senĉese direktiĝis al la pordo de la eta formetejo. Kaj Fosulo siaflanke eĉ multe pli miris pro la ŝanĝo kiun li malkovris ĉe sia amiko. Miĥaelo, kutime, eble mi jam diris tion, fieris esti vestita laŭ la plej nova modo, kaj fakte lia vestaranĝo ĉiam estis senriproĉe eleganta, krom tio ke ĝi iomete aspektigis lin kiel viro invitata al geedziĝfestoj. Nu, en la koncerna mateno, li estis kiel eble plej malproksima de tia aspekto. Li surhavis flanelan ĉemizon, jakon kaj pantalonon el ordinara kruda ŝtofo; liaj piedoj estis ŝuitaj de eluzitaj botoj, kaj senzorga malnova supervesto finis ŝajnigi lin kiel vagantan vendiston de alumetoj.

- Jen mi, Vilhelmo Dento ! li ekkriis demetante la molan ĉapelon el felto per kiu li sin kapvestis.

Post tio, elprenante el sia poŝo du tufojn da rufaj haroj, li algluis ilin sur siajn vangojn, laŭmaniere de vangharoj, kaj komencis danci de iu fino al la alia de la ateliero, kun la afekta gracieco de baletistino.

Fosulo malgaje ridetis.

- Neniam mi rekonintus vin ! li diris.

- Jen tio pri kio mi estas plenkontenta ! respondis Miĥaelo reŝovante siajn vangharojn en sian poŝon. Sed nun ni tuj ekzamenos vian vestaron, ĉar estas via vico alvesti vin !

- Alvesti min ? ĝemis la artisto. Ĉu vere necesas ke mi alvestiĝu ? Ĉu do la aferoj atingis tiun ŝtupon ?

- Kara amiko mia, respondis Miĥaelo, alivestiĝo estas ĉarmo de la vivo. Kio estas la vivo, kiel tiel trafe diras la granda franca filozofa, sen la plezuroj de la maskovestoj ? Sed cetere, ni ne povas elekti : estas necese ! Necesas ke hodiaŭ ni estu nerekonablaj por multaj homoj, kaj speciale por S^o Gideon Forsiso, tio estas la nomo de la junulo kiun mi konas laŭvide, por la okazo se li troviĝus siahejme kiam ni alvenos tien !

- Sed se li troviĝus siahejme ĉi-momente, balbutis Fosulo, ni estus perditaj !

- Ba ! ni bone elturniĝos ! facilanime respondis Miĥaelo. Nu, vidigu al mi viajn vestaĉojn, por ke mi konsilu por transformi vin al novan viron !

En la dormoĉambro de Fosulo, Miĥaelo, post longa kaj zorgoplena ekzameno, elektis malgrandan jakon el nigra alpakon, tiel kiel someran pantalonon kun flave verda nuanco. Poste, kun ĉi tiuj du objektoj sur la brako, li procedis pri la ekzameno de la persono mem de sia amiko.

- Vi havas tie klerikan moveblan kolumon kiun apenaŭ plaĉas al mi ! li rimarkigis. Ĉu vi nenion vidas kiu povu anstataŭigi ĝin ?

La instruisto de desegno dummomente pripensis.

- Mi havas ie du ĉemizojn kun refaldita kolumo kiujn mi surmetis en Parizo, kiam mi studis pentrarton !

- Perfekte ! ekkriis Miĥaelo. Vi estos senpreze ridinda ! Jen, ĉasgamaŝoj ! li daŭrigis traserĉante funde de murŝranko. Ho ! La gamaŝoj nepre estas postulataj ! Kaj nun, maljunulo mia, vi tuj surmetos ĉion ĉi sur vin, kaj poste vi sidiĝos sur ĉi tiun seĝon, kaj vi pripensos pri kelkan estetikan problemon dum pli ol duonhoro ! Post tio, vi povos veni rekuniĝi kun mi en vian atelieron !

La mateno havis nenion allogan. En la ĝardeno de Fosulo, la orienta vento blovis per ekblovegoj inter la

statuoj, kaj ĝetis flakojn da pluvo sur la vitraron de la ateliero. Estis la momento kiam Maŭrico, en Blomsburio, atakis la centan version de la subskribo de sia onklo. Ĉe la sama momento, Miĥaelo, en la ateliero en la strato Norfolk, sin okupis ne malpli aktive forŝiri la kordojn de sia granda Erardo.

Duonhoron pli poste, Fosulo, enirante en sian atelieron, trovis la pordon de la kamero larĝe malfermitan, kaj la piankofron diskrete fermitan.

- Ho ! Sed temas pri tuj forigi tiun barbon kiun vi surhavas ! ekkriis Miĥaelo tuj kiam li ekvidis sian amikon.

- Mian barbon ! eligis Fosulo teruriĝinta. Ne, mi ne povas razi mian barbon ! Mi perdus mian postenon en la pensiono ! La direktorino estas tre severa pri ĉio kio temas pri la ekstera aspekto de la instruistaro. Mia barbo estas reale necesega por mi !

- Vi povos lasi ĝin rekreski ! rebatis Miĥaelo. Kaj dume, vi estos tiel malbela ke oni plialtigos vian salajron !

- Sed estas ke mi ne volas esti tro malbela ! petegis la artisto.

- Nu, neniam infanaĵoj ! diris Miĥaelo kiu malŝatis la barbojn, kaj estis feliĉa povi forigi unu el ili. Nu, estu viro, faru ĉi tiun fordonon !

- Se vi opinias tion nepre necesa ! murmuris Fosulo.

Kun profunda suspiro, li iris serĉi varman akvon en la kuirejon, lokis spegulon sur sian stablon kaj ekplenumis la dolorigan fordonon. Miĥaelo estis kontentega.

- Mirakla transformado, per mia honorvorto ! li deklaris. Kiam mi donos al vi la okulvitrojn el fenestrovitro kiujn mi havas en mia poŝo, vi fariĝos la perfekta tipo de la germana vojaĝanta komizo !

Fosulo, sen respondi, daŭre kompatinde rigardis en la spegulo la bildon de la nova viro kiun li fariĝis. Kaj Miĥaelo

komprenis ke li havis la devon konsoli lin.

- Ĉu vi scias, li demandis al li, tion kion la guberniestro de Sud-Karolino iam diris al la guberniestro de Nord-Karolino ? "Mi opinias, diris ĉi tiu potenca pensulo, ke la tempo ĉiam estas tre longa inter du glasoj da brando !" Nu ! Fosulo, se vi bonvolas serĉi en la maldekstran poŝon de mia supervesto, mi havas ideon ke vi tie trovos flakonon da viskio. Estas ĝi, dankon ! li aldonis plenigante du glasojn. "Trinku ĝin por mi, kaj vi tion certe aprezos !"

La artisto etendis la manon al la akvokruĉo, sed Miĥaelo haste haltigis sian movon.

- Ne eĉ se vi demandus al mi surgenu ! li kriis. Ĝi estas la plej bonkvalita viskio de tablo kiun oni povas trovi en la tuta Unuiĝinta Reĝlando !

Fosulo trinkis unu gluton, remetis la glason sur la tablon kaj suspiris.

- Vere, vi ja estas la plej malĝoja kunulo kiun oni povus deziri por libera tago ! ekkriis Miĥaelo. Se tio estas ĉio kion vi komprenas pri viskio, finita, maljunulo mia, vi ne plu havos ĝin; kaj dum mi finos la botelon, vi viavice eklaboros ! Ĉar, li daŭrigis, mi faris abomenindan mallertaĵon : mi devintus sendi vin mendi la ĉaron antaŭ via alivestiĝado ! Sed ankaŭ, Fosulo, amiko mia, necesas ja diri ke vi estas bona por nenio ! Kial vi ne sugestis tion al mi ?

- Mi eĉ ne sciis ke estis ĉaro por mendi ! ĝemis la artisto. Sed, se vi volas, mi ankoraŭ povas demeti mian alivestiĝon !

- Ĉiukaze, vi havus problemojn por remeti vian barbon ! observigis Miĥaelo. Ne, komprenu, ĝi estas mallertaĵon : unu el tiuj mallertaĵoj kiuj pendigas homojn, kompatinda Fosulo mia ! Rapide kuru al la agentejo por transporto de la strato Reĝo ! Vi diros ke oni venu preni la pianon de ĉi tie, ke oni konduku ĝin al stacidomo Viktoria, kaj ke de tie oni ekspedu

ĝin per fervojo al stacidomo de la strato Ganono, kie ĝi devos esti tenata je la dispono de sinjoro... Kion vi pensus pri sinjoro Viktoro Hugo ?

- Ĉu tio ne estas iom tro klara nomo ? sugestis Fosulo.

- Klara ? rebatis malŝate Miĥaelo. Tio estas ke tia nomo sufiĉus por pendigi nin ambaŭ ! "Bruno" jen kiu estas samtempe pli sekura kaj pli facile por elparoli ! Ne forgesu diri ke ĉi tiu piano devas esti transdonata al S^{ro} Bruno !

- Mi deziras, murmuris Fosulo, ke pro kompato al mi, vi ne faru tiom da aludoj al la pendumado !

- Ho ! Aludi ĝin, tio ne jam estas grava malbono, amiko mia ! rekomencis Miĥaelo. Sed nu, rapide, surmetu vian ĉapelon kaj iru ! Kaj ne forgesu ĉion pagi anticipe !

Lasita al si, la proceduristo komencis direktante sian tutan atenton al la flakono de viskio, tio kio plie havis kiel efikon konsiderinde plialtigi la bonhumorecon en kiu li estis ekde la mateno. Poste, kiam li estis malpleniginta la flakonon, li okupiĝis pri la aranĝo de siaj vangharoj antaŭ la spegulo.

- Bonege ! li malhumile diris al si, post esti longe sin kontemplanta; mi aspektas kiel komizo de intendantejo !

Subite, revenis en lia kapo la okulvitrojn el fenestrovitro (antaŭe destinitajn por Fosulo) kiujn li havis en sia poŝo. Li surmetis ilin sur sian nazon, kaj estis tuj ravita de la efiko.

"Ĝuste tio kio mankis al mi ! li rekomencis. Mi demandas min kiel mi nun aspektas ?" Kaj li prenis diversajn pozojn, antaŭ la spegulo, laŭte nomante ilin samtempe. "Imitado de liveranto de **manskribitaj** amuzaj gazetoj. (Sed por tio, necesus al mi pluvombrelo). Imitado de komizo de intendantejo. Imitado de aŭstralia kolonianto reveninta al Anglio por viziti la lokojn de sia infaneco ! Perfekte, jen tio kion mi bezonas !"

Li atingis tiun gradon de sia rezonado kiam liaj okuloj trafis la pianon. Kaj tuj neretenebla impulso kaptis lin. Li remalfermis la klavaron kaj, kun okuloj levitaj al la plafono, kurigis siajn fingrojn sur la sensonajn klavojn.

Kiam S^o Fosulo eniris en la atelieron, li trovis sian gvidanton kaj savanton plenumantan mirindaĵojn de virtuozezo sur la sensona Erardo.

- Ĉielo helpu min ! pensis la vireto. Li drinkis la tutan botelon, kaj jen li tute ebria !

- Sinjoro Finsinko ! li laŭte diris.

Kaj Miĥaelo, sen restari sin, turnis al li forte ruĝiĝintan vizaĝon, kiun borderis la rufaj tufoj de vangharoj, kaj meze de kiu sin montris la majestaj okulvitroj.

- Kapriĉo en G-minora por la foriro de amiko ! li kontentiĝis respondi daŭrigante la serion de siaj arpeĝoj.

Sed subite la indigno vekigis en la animo de Fosulo.

- Pardonu ! li ekkriis. Ĉi tiuj okulvitroj devis esti por mi ! Ili konsistigas esencan parton de mia alivestiĝo !

- Mi estas rezoluta surporti ilin mi mem ! respondis Miĥaelo.

Post tio li aldonis, ne sen ia ŝajno de vereco :

- Kaj homoj kapablus suspekti ion se ni ambaŭ havus okulvitrojn !

- Bone ! koncedis la bona Fosulo. Mi iom kalkulis kun ĉi tiuj okulvitroj, sed, kompreneble, ĉar vi insistas ! Kaj jen kamiono antaŭ la pordo !

Dum la tuta tempo kiam daŭris la forigo de la piano, Miĥaelo staris kaŝata en la kamero. Poste, tuj kiam la instrumento estis foririnta, la du amikoj eliris tra la ĉefa pordo de la domo, sin ĵetis en fiakron kaj ne malfruis veturi al la centro de la urbo. La tago restis malvarma kaj malagraba; sed malgraŭ pluvo kaj vento, Miĥaelo rifuzis fermi la fenestrojn de la veturilo. Li subite imagis preni la

rolon de ĉiĉerono kaj, pasante, montris kaj komentis al Fosulo la vidindaĵojn de Londono !

- Vere, kara amiko mia, li diris, vi ŝajnas al mi nenion scii pri via naskiĝurbo ! Kion vi pensus pri vizito al la Turo de Londono ? Ĉu ne ? Cetere, tio eble iom tro malproksimigus nin. Sed almenaŭ... He, koĉero, ĉirkaŭiru tra placo Trafalgaro !

Mi penintus doni al vi ideon pri tio kion Fosulo suferis en tiu fiakro. Malvarmo, malsekeco, timego, kreskanta malfido koncerne la estron sub kies ordonoj li aliĝis, sento de embaraso, preskaŭ de honto, kaŭzita de la foresto de la estiminda movebla kolumo, kaj sento, eĉ pli amara, de rangoperdo, sendube estigita de la abrupta forigo de la barbo : tiaj estis la ĉefaj ingrediencoj kiuj miksiĝis en la animo de la malfeliĉa artisto.

Unua kvietiĝo por li estis finfine alveni en la restoracion kie ili devis tagmanĝi. Dua kvietiĝo por li estis aŭdi Miĥaeloⁿ peti individuan kabineton. Kaj dum la du viroj supreniris la ŝtuparon, gvidataj de fremda kelnero, Fosulo kontentiĝe rimarkis ke, ne nur la restoracio estas preskaŭ malplena, sed ke la plimulto de la klientoj kiuj ĉeestis, estis ekzilitoj de la bela lando Francio. Neniu el ili, laŭ ĉia verŝajneco, rilatis kun la pensio kie Fosulo donis lecionojn : ĉar la instruisto mem de franco, kvankam li estis suspektata, esti katoliko, apenaŭ estis homo por frekventi tiel suspektindan konsumejon !

La kelnero enkondukis la du amikojn en malgrandan nudan ĉambron, kun tablo, sofo kaj la fantomo de fajro. Post tio Miĥaelo haste mendis aldonon da karbo, tiel kiel du glasojn da brando kun sifonbotelo da sodakvo.

- Ho ! Ne ! murmuris al li Fosulo. Ne pli da brando !

- Vi vere estas eksterordinara ! ekkriis Miĥaelo.

Tamen necesas ja ke ni faru ion; kaj vi ne estas sen scii ke

oni ne devas fumi antaŭ la manĝoj. Vi ŝajnas al mi absolute sen ia ajn nocio de higieno, kompatinda maljunulo mia !

Kaj li iris rigardi la pluvon fali ĉe la fenestro.

Fosulo, li, reabsorbiĝis en sian malgajan revadon. Tiel do li fakte sin trovis groteske razita, absurde alivestita, en la kompanio de ebria viro kun okulvitroj, en fremda restoracio ! Kion dirus la direktorino de lia pensiono, se ŝi povus vidi lin en ĉi tiu stato ? Sed ĉefe, kion ŝi dirus se ŝi povus scii por kia tragika kaj krima entrepreno li sin preparis ?

La proceduristo, vidante ke lia amiko estis tute rezoluta ne trinki la glason da brando kiun oni ĵus servis al li, ne kapablis tamen rezignacii trinki sole.

- Prenu, li diris al la kelnero, englutu ĉi tion por mi !

Kaj la kelnero englutis la tutan enhavon de la glaso, per du buŝplenoj, tio kio meritigis al li la plej vivan simpation de Miĥaelo.

- Neniam mi vidis homon trinki pli rapide ! li deklaris al Fosulo, kiam la kelnero estis elirinta. Tia spektaklo restarigas konfidon al la homa specio !

La tagmanĝo estis bonega, kaj Miĥaelo manĝis ĝin kun bonega apetito. Sed, per la plej formala tono, li rifuzis al sia kunulo la permeson trinki pli ol ununuran glason de la botelo da ĉampano kiu akompanis la manĝon.

- Ne, ne ! li konfidence diris al li. Necesas ke unu el ni du ne estu tute ebria ! Kiel diras la proverbo : "Unu ebriulo, bonega komerco; du ebriuloj, ĉio estas perdita !

Post la kafo Miĥaelo faris admirindan strebon por preni seriozan mienon. Li rigardis sian amikon rekte en la vizaĝon kaj, per iom peza sed severa voĉo, alparolis al li :

- Sufiĉe da malsaĝaĵoj ! li komencis tre prudente. Ni venu al nia afero ! Fosulo, bone aŭskultu tion kion mi tuj diros al vi ! Sciu ke mi estas aŭstraliano, aŭstralia koloniano ! Mia nomo estas Ĝono Diksono, ĉu vi aŭdas tion ? Kaj vi certe

ĝojos ekscii ke mi estas riĉa, sinjoro, tre riĉa ! La speco de entreprenoj kiujn ni meditas, Fosulo, ne povas esti preparita kun tro da zorgo. La tuta sekreto de sukceso estas en la preparado. Tial mi konstruis al mi ekde hieraŭ vespere kompletan biografion, kaj mi tre volonte detalus ĝin al vi, se pro malfeliĉo mi ne subite forgesus ĝin !

- Mi ne scias ĉu estas ĉar mi estas idiota... balbutis Fosulo.

- Tio mem estas ! ekkriis Miĥaelo. Tute stulta; sed ankaŭ riĉa, eĉ pli riĉa ol mi ! Mi supozis ke tio plezurigus vin, Fosuloⁿ, kaj mi decidis ke vi laŭvorte naĝus en oro. Sed, kompanse, mi devas konfesi al vi ke vi estas nur usonano, kaj krome fabrikisto de kaŭĉukaj galoŝoj. Sed via tuta malfeliĉo ne estas en ĝi ! Sciu, kompatinda amiko mia, ke vi estas nomita Ezro Tomaso ! Kaj nun, aldonis Miĥaelo per sia plej serioza tono, diru al mi, kiuj ni estas, vi kaj mi !

La malfeliĉa vireto estis trifoje sinsekve pridemandita, antaŭ ol esti plene lerninta parkere la duoblan lecionon.

- Jen ! fine ekkriis la proceduristo. Niaj planoj estas pretaj. Ne kontraŭdiri sin, estas tio kio estas esenca.

- Sed mi ne tre bone komprenas ?... obĵetis Fosulo.

- Ho ! Vi sufiĉe komprenos kiam la tempo venos ! diris Miĥaelo ekstarante.

- Sed estas ĉar vi nur diris al mi niajn nomojn ? rekomencis Fosulo. Mi ankoraŭ ne vidas kian historion ni devos rakonti ?

- He ! Ĉar mi diris al vi ke mi havis historion kaj ke mi ĝin forgesis ! rekomencis Miĥaelo. Ni devos nur suferi elpensi alian !

- Sed estas ke mi ne kapablas elpensi ! protestis Fosulo. Neniam mi sukcesis elpensi ion ajn, dum mia tuta vivo !

- Nu ! Vi devos komenci hodiaŭ, etulo mia ! respondis

simple Miĥaelo. Post tio li sonoregis por peti la konton.

La kompatinda Fosulo apenaŭ estis pli trankvila ol antaŭ la manĝo.

"Mi scias ke li estas tre inteligenta, li pensis, sed konscie, ĉu mi povas fidi homon en la stato en kiu li troviĝas ?"

Kaj kiam denove la du amikoj sin trovis en fiakro, li ne sukcesis sin deteni fari lastan provon.

- Ĉu vi ne opinias, li balbutis, ke eble, bone konsiderita, ni pli bone faru prokrasti ĉi tiun aferon ?

- Prokrasti ĝis morgaŭ tion kio povas esti plenumata hodiaŭ ! ekkriis Miĥaelo indignigita. Nu, nu, Fosulo, gajiĝu iom ! Ankoraŭ unu aŭ du horoj de pacienco, kaj la venko apartenos al ni !

En la stacidomo de la strato Ganono, la du amikoj informiĝis pri la piano de S^o Bruno, kaj ĝojis ekscii ke ĝi perfekte alvenis. Ili tiam iris al luigisto en la ĉirkaŭaĵo de la stacidomo, provizis sin per granda manĉaro kaj revenis reakiri la pianon. Post mallonga diskuto estis interkonsentita ke Miĥaelo trenos la ĉaron, kaj ke la rolo de Fosulo estos puŝi ĝin de malantaŭe.

La domo loĝata de Gideon Forsiso estis cetere tre proksima, tiel ke la vojaĝo de la piano en la ĉaro povis finiĝi sen tro da misaventuroj. Ĉe la angulo de la strato kie loĝis Gideon, la du amikoj konfidis la ĉaron al la protekto de oficiala ŝu-ciristo; kaj, sen hasto, ili sin direktis al la fina celo de sia ekspedicio. Unuafoje Miĥaelo vidigis ombron de embaraso.

- Ĉu vi bone certas ke miaj vangharoj estas ĉe siaj lokoj ? li demandis. Tio estus diable embarasa, se mi estus rekonata !

- Viaj vangharoj perfekte estas en loko ! respondis Fosulo post skrupula ekzameno. Sed mi, ĉu mia alivestiĝo

povos malhelpi min esti rekonata ? Kondiĉe ke mi ne renkontos iun el mia pensiono !

- Ho ! La foresto de via barbo sufiĉas por igi vin nerekonebla ! Mi nur rekomendas al vi ne forgesi malrapide paroli; kaj plie provu, se vi kapablas, iom malpli nazparoli ol vi kutimas !

- Sed mi ja esperas ke ĉi tiu junulo ne estos siahejme ! suspiris Fosulo.

- Kaj mi multe esperas ke li estos tie, kondiĉe tamen ke li estu tute sola ! respondis Miĥaelo. Tio ĉi diable simpligus al ni niajn taskojn !

Kaj, fakte, kiam ili frapis ĉe la pordo de malgranda apartamento sur la teretaĝo, estis Gideonono mem kiu venis malfermi al ili. Li enirigis ilin en iom maldense meblitan ĉambron, escepte tamen de la kamenbreton kiu estis absolute troplenigita de diversa sortimento da pipoj, da tabaksaketoj, da skatoloj da cigaroj kaj da francaj romanoj kun flavaj kovriloj.

- Sinjoro Forsiso, mi kredas ? estis Miĥaelo kiu tiel komencis la traktadon. Sinjoro, ni venis petegi vin bonvoli zorgi pri eta afero. Mi timas esti trudiĝema...

- Vi scias ke, principe, vi devas esti akompanata de via proceduristo... riskis Gideonono.

- Sendube, sendube, vi nomumos por ni vian ordinaran proceduriston, kaj tiamaniere la afero povos stari sur pli valida bazo ekde morgaŭ ! respondis Miĥaelo sidiĝante, kaj signante al Fosulo ankaŭ sidiĝi. Sed, komprenu, ni konas neniun proceduriston en ĉi tiu urbo; kaj ĉar oni parolis al ni pri vi, kaj ĉar urĝas, ni permesis al ni veni trovi vin !

- Ĉu mi povas demandi, sinjoroj, daŭrigis Gideonono, al kiu mi ŝuldas la rekomendon ?

- Vi perfekte povas demandi tion al ni, rebatis Miĥaelo kun petola rideto; sed oni petis nin ne diri tion al vi... almenaŭ

nuntempe !

"Bonkora afablaĵo de mia onklo, kompreneble !" diris al si Gideon.

- Mi nomiĝas Ĝono Diksono, daŭrigis Miĥaelo, tre konata nomo en Balarato, mi maltimas diri tion ! Kaj mia jena amiko estas S^{ro} Ezro Tomaso, el amerika Usono, la riĉa fabrikisto de kaŭĉukaj galoŝoj.

- Ĉu vi bonvolas atendi dum momento, por ke mi notu tion ? diris Gideon penante ŝajnigi kiel spertan praktikanto.

- Eble tio ne tro ĝenus vin se mi ekbruligus cigaron ? demandis Miĥaelo.

Ĉar li faris viglan klopodon por reakiri sian memregadon enirante ĉe sia juna kolego; sed nun lia cerbo denove komencis nubigi, samtempe kiam terura emo dormi invadis lin; kaj li esperis (kiel tiom da aliaj esperis tion en tia okazo !) ke cigaro malkonfuzos al li la ideojn.

- Ho ! Certe ne ! ekkriis Gideon senfine afabla. Jen, provu unu el ĉi tiuj, mi povas konfide rekomendi ilin al vi !

Li prenis skatolon da cigaroj sur la kameno kaj prezentis ĝin al sia kliento.

- Sinjoro, rekomencis la aŭstraliano, en la okazo se vi ne trovus min tute klara pri miaj klarigoj, eble estus pli bone antaŭe konfesi al vi, ke mi ĵus manĝis bonan tagmanĝon. Finfine, estas afero kiu povas okazi al ĉiu !

- Ho ! Certe ! respondis la komplezema advokato. Sed bonvolu, ne urĝiĝu ! Mi povas doni al vi..., kaj li haltis por penseme konsulti sian poŝhorloĝon, jes, okazas ke mi povas doni al vi la tutan posttagmezon !

- La afero kiu venigas min ĉi tien, sinjoro, rekomencis la aŭstraliano, estas diable delikata, mi ja povas diri tion al vi ! Mia amiko, S^{ro} Tomaso, estanta usonano de portugala deveno, kaj riĉa fabrikisto de pianoj Erardo...

- De pianoj Erardo ? ekkriis Gideon kun ia surprizo.

Ĉu S^{ro} Tomaso estus unu el la estroj de la firmao Erardo ?

- Ho ! Falsaj Erardo, kompreneble ! rebatis Miĥaelo.

Mia amiko estas la usona Erardo.

- Sed mi kredis esti aŭdinta vin diri, kontestis Gideon, jes, mi certe enskribis sur mia kajereto... ke via amiko estas fabrikanto de kaŭĉukaj galoŝoj ?

- Jes, mi scias ke tio povas unuatempe surprizi ! respondis la aŭstraliano kun radianta rideto. Sed, mia amiko... Resume, li kombinas la du profesiojn ! Kaj ankoraŭ multe da aliaj, multe, multe, multe da aliaj ! ripetis S^{ro} Diksono kun soleneco de ebriulo. La koton-ŝpinejoj de S^{ro} Tomaso estas unu el la strangaĵoj de Talahaseo, la tabakuzinoj de S^{ro} Tomaso estas la fiereco de Riĉmondo. Nu ! Mallonge, li estas unu el miaj plej malnovaj amikoj, sinjoro Forsiso, kaj vi senkulpigis min ne kapabli reteni mian emocion priskribante al vi sian aferon !

La juna advokato, dum ĉi tiu parolado, konsideris S^{ron} Tomasoⁿ, kaj estis tre agrable impresita de la modesta, preskaŭ timema sinteno de ĉi tiu vireto, de la simpleco kaj mallerteco de liaj manieroj.

"Kia mirinda raso estas ĉi tiuj usonanoj ! li pensis. Iom rigardu ĉi tiun tute timigitan vireton, vestitan kiel migra muzikisto, kaj pensu pri la multeco da interesoj kiujn li tenas en siaj manoj !"

- Sed, li laŭte reparolis, ĉu ni ne bone farus rekte iri al la faktoj ?

- Sinjoro estas praktika viro, laŭ tio kion mi vidas ! diris la aŭstraliano. Nu ! Jes, mi venas al la faktoj. Sciu do, sinjoro, ke temas pri rompo de edziĝpromeso !

La malfeliĉa Fosulo estis tiom malmulte preparita por ĉi tiu nova situacio ke li preskaŭ ne retenis krion.

- Dio mia ! diris Gideon, tiaj aferoj ofte estas tre malagrablaj ! Prezentu al mi ĉiujn detalojn de la kazo ! li

afable aldonis. Se vi volas ke mi helpu vin, nenion kaŝu al mi !

- Diru mem ĉion al li ! diris al sia kunulo Miĥaelo kiu, ŝajne, konsciis esti plenuminta sian parton de la rolo. Mia amiko tuj rakontos al vi ĉion ĉi ! li aldonis oscedante sin turnante al Gideon. Kaj vi pardonos min, ĉu ne ? se mi fermos la okulojn por momento ! Mi pasigis la nokton ĉelite de malsana amiko.

Fosulo, tute konfuzita, rigardis rekte antaŭ si.

Kolerego kaj malespero miksiĝis en lia senkulpa animo. Ideoj pri fuĝo, eĉ ideoj pri memmortigo venis al li, reiris kaj revenis al li. Kaj la advokato pacience plu atendis, kaj la artisto vane plu strebis trovi vortojn, kiajn ajn.

- Jes sinjoro ! Temas pri rompo de edziĝpromeso ! fine li mallaŭte diris. Mi... estas minacata de proceso pro rompo de edziĝpromeso...

Alvenante al ĉi tiu punkto de sia parolado, li volis tiri sian barbon, serĉante novan inspiron. Liaj fingroj sin fermis sur la nekutiman glatecon de razita mentono; kaj samokaze, li sentis ke ĉio kio restis al li de espero kaj kuraĝo, senrimede forlasis lin. Li sin turnis al Miĥaelo, kaj skuis lin per siaj tutaj fortoj :

- Vekiĝu ! li kolere kriis al li. Mi ne povas superi tion, kaj vi scias tion !

- Necesas ke vi pardonu mian amikon, sinjoro ! tuj diris Miĥaelo. La fakto estas ke li ne estas naturdotita por raportado. Sed cetere, li daŭrigis, la afero estas el la plej simplaj. Mia amiko estas homo kun pasia temperamento, al kutimiĝinta al la patriarka vivo de sia lando. Vi komprenas la aferon : malfeliĉa vojaĝo en Eŭropo, sekvata de malfeliĉa renkonto kun kvazaŭa alilanda grafo, kiu havas tre belan filinon. S^{no} Tomaso tute perdis la kapon. Li sin prezentis, li estis akceptita, kaj li skribis... skribis en stilo kiun mi certas, li nun devas tre bedaŭri ! Se ĉi tiuj leteroj iam estus

elmontritaj en tribunalo, la honoro de S^{ro} Tomaso estus detruita !

- Ĉu mi devas kompreni... komencis Gideon.

- Ne, ne, kara sinjoro, serioze reparaĵis la aŭstraliano, ne eblas al vi kompreni tiel longe ĝis kiam vi vidos la koncernajn leterojn !

- Jen, verdire, embarasa cirkonstanco ! diris Gideon.

Plena de kompato, li ĵetis rigardon al la kulpulo; poste, vidante sur la vizaĝo de tiu ĉi ĉiujn signojn de terura embaraso, li rapidis deturni la okulojn.

- Sed tio eĉ estus nenio, severe daŭrigis sinjoro Diksono, kaj, vere, sinjoro, vere mi tutkore dezirintus ke S^{ro} Tomaso tute ne malhonoris sin kiel li faris. Li estas sen ekskuzo, sinjoro ! Ĉar li estis fianĉigita en tiu tempo, tia li eĉ ankoraŭ estas, kun la plej bela juna knabino de Konstantinopolo, Ka.

- Ka ? demandis surprizite Gideon.

- Jes ja, komuna mallongigo ! diris Miĥaelo. Oni diras Kaⁿ, por Kartvelio, sammaniere kiel ni diras Ko por Kompanio.

- Mi bone sciis ke fojfoje oni tiel skribis, diris Gideon, sed mi ne sciis ke oni elparolas same !

- Ho ! Vi ja povas kredi min, kiam mi diras tion al vi ! respondis Miĥaelo. Kaj nun, sinjoro, vi povas mem kompreni, ke por savi mian kompatindan amikon, necesos malŝpari intensan kapablecon ! Pri mono, ĝi estas, kaj senlime ! S^{ro} Tomaso estas tute preta subskribi, ekde morgaŭ, ĉekon por cent mil pundoj⁽²⁾. Sed, cetere, sinjoro Forsiso, ni havas pli bonan ol tio ! Tiu ĉi alilanda grafo, la grafo Tarnoŭo, kiel li estas nomita, iam tenis magazeton de cigaroj en Bajsvatero, sub la pli modesta nomo de Ŝmito. Lia filino, se vere ŝi estas lia filino, bone atentu tiun punkton, sinjoro !, lia filino servis la klientojn en la vendejo. Kaj estas ŝi kiu nun pretendas geedziĝi kun viro el la sociala rango de S^{ro} Tomaso ! Nu ! Ĉu

vi finfine vidas tion kion ni volas ? Ni scias ke ĉi tiuj malŝatinduloj kovas friponaĵon, kaj ni deziras antaŭsciigi ilin. Rapide kuru al Hampton-Korto, kie loĝas la Tarnoŭo^J, kaj uzu la minacon, aŭ la subaĉeton, aŭ ambaŭ rimedojn, ĝis kiam vi transdonigos al vi la leterojn ! Se vi ne sukcesos, mia amiko Tomaso devos iri al tribunalo, kaj perdi sian honoron. Mi mem tiuokaze estus devigita rompi ĉiujn rilatojn kun li ! aldonis la malmulte kavalireca amiko.

- Mi ja kredas ke estas kelkaj ŝancoj de sukceso por ni en ĉio ĉi ! diris Gideono. Ĉu vi scias ĉu ĉi tiu Ŝmito estas konata de la polico ?

- Ni vere esperas tion ! diris Miĥaelo. Ni havas multajn kialojn por supozi tion ! Jam rimarku la fakton ke ĉi tiuj homoj loĝis en Bajsvatero ! Ĉu la elekto de ĉi tiu kvartalo ne ŝajnas al vi tre sugesta ?

Je la kvina aŭ sesa fojo ekde la komenciĝo de ĉi tiu rimarkinda interparolado, Gideono sin demandis ĉu li revis. "Sed ne, li diris al si, sendube la bonega aŭstraliano tro abunde tagmanĝis !" Kaj li laŭte aldonis :

- Al kia sumo mi povos iri ?

- Mi havas ideon ke kvin mil pundoj⁽²⁾ sufiĉus por hodiaŭ ! diris Miĥaelo. Kaj nun, sinjoro, ne lasu nin plu reteni vin ! La posttagmezo progresas; estas trajnoj por Hampton-Korto ĉiujn duonhorojn, kaj mi ne bezonas priskribi al vi la malpaciencon de mia amiko. Jen ! Prenu bileton de kvin pundoj⁽²⁾ por la unuaj elspezoj ! Kaj jen la adreso !

Kaj Miĥaelo komencis skribi; poste li haltis, ŝiris la paperon kaj enmetis la pecojn en sian poŝon.

- Ne, li diris, mi pli ŝatas dikti al vi la adreson; mia manskribo estas tro nelegebla !

Gideono zorge skribis la adreson : "Grafo Tarnoŭo, vilao Kurnolo, Hampton-Korto". Li poste prenis alian paperfolion, kaj ankoraŭ skribis sur ĝi kelkajn vortojn.

- Vi diris al mi ke vi ne elektis proceduriston ! li rekomencis. Jen la adreso de proceduristo kiu, por tia kazo, estas la plej sperta viro en Londono !

Kaj li prezentis la paperon al Miĥaelo.

- Ha ! Vere ! ekkriis Miĥaelo legante sian propran adreson sur la papero.

- Jes, mi scias, vi estas vidinta lian nomon miksitan en sufiĉe malhonestaj aferoj ! diris Gideonono; sed li mem estas perfekte honorinda viro kaj kun certa kapableco. Nur restas al mi, sinjoroj, demandi al vi kien mi povos trovi vin post mia reveno de Hampton-Korto?

- Ĉe la Ĉefhotelo Langhamo, kompreneble ! rebatis Miĥaelo. Kaj, senmanke, je ĉi-nokte !

- Certe ! respondis Gideonono ridetante. Mi povas veni iam ajn, ĉu ne ?

- Absolute, absolute ! ekkriis Miĥaelo jam stara por sin forpeli. Nu ! Kion vi pensas pri ĉi tiu junulo ? li demandis al Fosulo, tuj kiam ili sin retrovis sur la strato.

Fosulo murmuris ion kiel : "Iu perfekta idiotulo !"

- Tute ne ! protestis Miĥaelo. Li scias kiu estas la plej bona proceduristo de Londono, kaj nur tio sufiĉus por laŭdi lin ! Sed, fine diru do, ĉu mi estis sufiĉe brila ?

Fosulo diris nenion.

- Hola ! diris Miĥaelo metante la manon sur lian ŝultron. Ĉu ni povus scii kio estas la nova plendmotivo de Fosulo ?

- Vi ne havis rajton paroli pri mi kiel vi faris ! ekkriis la artisto. Via lingvaĵo estis tute malŝatinda ! Vi profunde ofendis min.

- Mi ! Sed mi ne diris unu vorton pri vi ! protestis Miĥaelo. Mi parolis pri Ezro Tomaso; kaj mi petegas vin bonvoli rememori ke ekzistas neniu kun tiu nomo !

- Ne gravas ! Vi devigas min elteni malagrabraĵojn ! murmuris la artisto.

Tamen la du amikoj atingis la angulon de la strato, kaj tie, sub la protekto de la fidela ŝu-ciristo, prizorgante ĝin kun granda mieno de virta respekto, tie atendis ilin la piano, kiu ŝajnis iom enui en la soleco de la ĉaro, dum la pluvo defluis laŭlonge de ĝiaj elegante vernisitaĵ piedoj.

Estis denove la ŝu-ciristo kiu estis rekviziita por iri serĉi kvin aŭ ses fortikajn knabegojn ĉe la plej proksima drinkejo, kaj kun ilia helpo komenciĝis la lasta batalo de tiu ĉi memorinda kampanjo. Ĉio sugestas ke S^{ro} Gideon Forsiso ne jam enloĝiĝis en sia kupeo de la trajno al Hampton-Korto, kiam Miĥaelo malfermis la pordon de la apartamento de la juna vojaĝanto, kaj kiam la portantoj, kun profesiaj gruntoj, demetis la grandan Erardoⁿ meze de la ĉambro.

- Jen, diris triumfe Miĥaelo al Fosulo post esti forpermesinta la virojn. Kaj nun, superan antaŭzorgon ! Ni devas lasi al li la ŝlosilon de la piano, kaj tiamaniere ke li ne povu ne trovi ĝin ! Ni vidu iom !

Centre de la fermoplato, sur la piano, li konstruis kvadratan turon per cigaroj kaj metis la ŝlosilon ene de la tiel konstruita malgranda monumento.

- La kompatinda junulo ! diris la artisto kiam ili denove sin trovis sur la strato.

- La fakto estas ke li estas en diabla situacio ! konfesis seke Miĥaelo. Des pli bone, des pli bone ! Tio revigligos lin !

- Kaj pri tio, rekomencis la bonega Fosulo, mi timas esti antaŭ momento montrinta al vi tre malbonan karakteron, kaj multe da maldankemo ! Mi havis neniun rajton, mi nun vidas tion, ofendiĝi de esprimoj kiuj ne rekte direktiĝis al mi !

- Sufiĉas ! diris Miĥaelo re-jungante sin al la ĉaro. Ne pli da vorto, Fosulo ! Via sentemeco honoras vin. Honesta viro certe ne povas ne suferi kiam li aŭdas insulti sian alian egoon.

La pluvo preskaŭ ĉesis; Miĥaelo estis preskaŭ sobrigita,

la "demetaĵo" estis transdonita en aliajn manojn, kaj la amikoj repaciĝis; tial la reveno al la luanto ŝajnis al ili, kompare kun la antaŭaj aventuroj de la tago, vera plezuraĵo. Kaj kiam ili sin trovis promenantaj sur la strando, brako en brako, sen ombro da suspekto kiu premis ilin, Fosulo eligis profundan suspiron de kvietiĝo.

- Nun, li diris, ni povas rehejmeniri !

- Fosulo, diris la proceduristo haltante, vi ĉagrenas min ! Kio ! Ni estis en la pluvo preskaŭ la tutan tagon, kaj vi serioze proponas rehejmeniri ? Ne sinjoro ! Grog kun viskio nepre necesas al ni !

Li reprenis la brakon de sia amiko, kaj necedeme kondukis lin en tavernon kun alloga aspekto, kaj mi devas aldoni (cetere je mia vera bedaŭro), ke Fosulo lasis sin sufiĉe volonte konduki tien. Nun kiam la paco restariĝis ĉe la horizonto, certa senkulpa gajeco komencis sin montri en la manieroj de la artisto. Kaj kiam li levis sian brulantan glason por tintigi kun tiu de Miĥaelo, la fakto estas ke li alportis al tiu ĉi gesto la tutan viklecon de romaneca pensionulineto ĉeestanta ĉe ŝia unua pikniko.

Ĉapitro IX

Kiel finiĝis la libertago de Miĥaelo Finsinko.

Miĥaelo estis, kiel mi jam diris, bonega knabo, kaj kiu ŝatis tiom elspezi sian monon, kaj eble eĉ pli, kiom gajni ĝin. Sed li akceptis siajn amikojn nur en restoracio, kaj la pordo de lia privata loĝejo preskaŭ ĉiam restis fermitaj. La unua etaĝo, havanta pli da aero kaj lumo, servis kiel loĝejo por la maljuna Virmastro; la salono preskaŭ neniam malfermiĝis; kaj estis la manĝoĉambro kiu formis la ordinaran restadejon de la proceduristo. Estas ĝuste tie, en ĉi tiu manĝoĉambro de la teretaĝo, kie ni retrovas Miĥaeloⁿ sidiĝantan ĉe la tablo por vespermanĝi, en la vespero de la glora libertago kiun li dediĉis al sia amiko Fosulo. Maljuna skota mastrumistino, kun tre brilaj okuloj kaj volonte moka buŝeto, respondecis pri la bona ordo de la domo. Ŝi staris apud la tablo dum ŝia juna mastro malvolvis sian buŝtukon.

- Mi kredas, timeme riskis Miĥaelo, ke mi volonte prenis iom da brando kun sodakvo.

- Tute ne, sinjoro Miĥaelo ! senprokraste respondis la mastrumistino. Ruĝan vinon kaj akvon !

- Bone, bone, Katerino, ni obeos al vi ! diris la proceduristo. Kaj tamen, se vi scius kiel tago estis laciga ĉe la oficejo !

- Kio ? eligis la maljuna Katerino. Sed vi ne metis piedon ĉe la oficejo dum la tuta tago !

- Kaj kiel fartas la maljunulo ? demandis Miĥaelo por ŝanĝi la temon de la konversacio.

- Ho ! Ĉiam estas la sama afero, sinjoro Miĥaelo ! respondis la mastrumistino. Mi ja kredas ke nun li fartos ĉiam same ĝis la fino de la kompatindulo ! Sed ĉu vi scias ke

vi ne estas la unua hodiaŭ por meti al mi ĉi tiun demandon ?

- Ba ! ekkriis Miĥaelo. Kaj kiu do faris ĝin al vi antaŭ mi ?

- Unu el viaj bonaj amikoj, respondis Katerino ridetante, via kuzo, sinjoro Maŭrico !

- Maŭrico ! Kion ĉi tiu almozulo venis serĉi ĉi tie ? demandis Miĥaelo.

- Li diris al mi ke li venis preterpasante por viziti S^{ron} Virmastroⁿ ! rekomencis la mastrumistino. Sed mi, vi vidas, mi havas mian ideon pri tio kion li venis fari. Li provis subaĉeti min, sinjoro Miĥaelo ! Ŝmiri min ! ŝi ripetis kun neimitebla ekmalestimo.

- Ĉu vere ? diris Miĥaelo. Mi almenaŭ vetas ke li ne devis proponi al vi grandan sumon !

- La sumo ne gravas ! diskrete rebatis Katerino. Sed la fakto estas ke mi resendis lin al liaj aferoj kiel decis ! Li ne hastos reveni ĉi tie !

- Vi scias ke necesas ke li ne vidu mian patron ! diris Miĥaelo. Mi ne intencas montri la kompatindan maljunulon al senvolora kreteno kiel li !

- Vi povas esti sen timo ĉi-flanke ! respondis la fidela servistino. Sed tio kio estas amuza, sinjoro Miĥaelo, atentu do ne verŝi saŭcon sur la tablotukon !, tio kio estas amuza, estas ke li imagas ke via patro mortis, kaj ke vi sekrete gardas la aferon !

Miĥaelo zumkantis melodion.

- La besto pagos al mi por ĉio ĉi ! li diris.

- Ĉu, kun la leĝo, vi povus nenion kontraŭ li ? proponis Katerino.

- Ne, almenaŭ ne nun ! respondis Miĥaelo. Sed diru do, Katerino ! Vere mi ne opĥnias ke ĉi tiu ruĝa vino estas tre sana trinkaĝo ! Nu ! Havu iom da koro, kaj donu al mi glason da brando !

La vizaĝo de Katerino akiris la harditecon de diamanto.

- Nu ! Ĉar tiel estas, grumblis Miĥaelo, mi ne pli manĝos ion !

- Estos kiel vi volos, sinjoro Miĥaelo ! diris Katerino.

Post tio, ŝi trankvile komencis demeti la tablon.

"Kiel mi dezirus ke ĉi tiu Katerino estu malpli sindonema servistino !" suspiris Miĥaelo refermante post si la pordon de la domo.

La pluvo ĉesis. La vento ankoraŭ blovis, sed pli milde, kaj kun malvarmeto kiu ne estis sen ĉarmo. Alveninte al la angulo de la strato Reĝo, Miĥaelo subite rememoris sian glason da brando, kaj eniris en brile lumigitan tavernon. La taverno estis preskaŭ plena. Tie estis du fiakristoj, duondekduo da profesiaj senlaboruloj; en angulo, eleganta ĝentlemano provis vendi al alia multe pli juna ĝentlemano, kelkajn estetikajn fotojn kiujn li mistere eltiris el leda skatolo; en alia angulo, du geamantoj diskutis la temon scii en kiu parko ili trovos la plej vastan ombrejon por fini la vesperon. Sed la centra loko kaj la granda altiro de la taverno estis malgranda maljunulo vestita de longa nigra redingoto, konfekcie aĉetita, kaj sendube de freŝdata akiro. Sur la marmora tablo antaŭ li, inter sandviĉoj kaj glaso da biero, kuŝis paperfolioj kovritaj de skribaĵo. Lia mano svingiĝis en la aero kun oratoraj gestoj, lia voĉo, nature maldolca, konformiĝis al la tono de la prelegejo; kaj, per artifikoj kompareblaj al tiuj de la antikvaj sirenoj, ĉi tiu maljunulo tenis sub nerezistebla fascino la servistinon de la drinkejo, la du koĉerojn, grupon da ludantoj kaj kvar el la laboristoj sen laboro.

- Mi ekzamenis ĉiujn teatrojn de Londono, li diris, kaj mezurante per mia pluvombrelo la larĝon de la pordoj, mi konstatis ke ili estis multe tro mallarĝaj. Neniu el vi evidente havis la eblecon kiel mi koni eksterlandajn landojn.

Sed, sincere, ĉu vi kredas ke, en bone regata lando, tiaj ekscesoj povus ekzisti ? Via inteligenteco, kiom ajn simpla kaj neklera ĝi estu, sufiĉas por aserti al vi la malon. Aŭstrio mem, kiu tamen ne fieras esti libera popolo, komencas ribeli kontraŭ la senzorgeco kiu lasas daŭri ĉispecajn ekscesojn. Mi ĝuste havas ĉi tie eltondaĵon de Viena gazeto pri tiu ĉi temo, mi tuj provos legi ĝin al vi, laŭmezure tradukante ĝin al vi. Vi povas konstati per vi mem, ĝi estas presita per germanaj signoj !

Kaj li prezentis al sia aŭskultantaro la koncernan pecon de gazeto, kiel prestidigitisto pasigas tra la ĉambro la oranĝon kiun li sin preparas malaperigi.

- Hola ! Amiko mia, ĉu estas vi ? diris subite Miĥaelo metante sian manon sur la ŝultron de la parolanto.

Tiu ĉi turnis al li vizaĝon tute distaŭzitan de teruro, ĝi estis la vizaĝo de S^{ro} Jozefo Finsinko.

- Miĥaelo ! li ekkriis. Ĉu vi estas sola ?

- Sed jes ! respondis Miĥaelo, post esti mendinta sian glason da brando. Mi estas sola. Kiun do vi atendis ?

- Mi pensis pri Maŭrico aŭ pri Johano, respondis la maljunulo evidente senŝarĝita de granda pezo.

- Kion vi volas, ke mi faru kun Maŭrico aŭ kun Johano ? respondis la nevo.

- Jes, estas vere ! respondis Jozefo. Kaj mi kredas ke mi povas fidi al vi ! Ĉu ne ? Mi kredas ke vi estos ĉe mia flanko !

- Mi nenion komprenas pri tio kion vi volas diri ! rebatis Miĥaelo. Sed se estas mono kiun vi bezonas, mi ĉiam havas unu aŭ du pundojn⁽²⁾ por via dispono !

- Ne, ne, ne estas tio, kara infano mia ! diris la onklo vigle manpremante lin. Mi rakontos al vi ĉion pli poste !

- Perfekte ! respondis la nevo. Sed, intertempe, kion mi povas proponi al vi ?

- Nu ! modeste diris la maljunulo, mi volonte akceptus alian sandviĉon. Mi certas ke vi devas esti tre surprizita, li daŭrigis, pro mia ĉeesto en tia loko. Sed la fakto estas ke, pri tio, mi apogas min sur tre saĝa sed malmulte konata principo...

- Ho ! Ĝi estas multe pli konata ol vi kapablu supozi ! rapidis respondi Miĥaelo inter du glutoj de sia brando. Estas sur ĉi tiu principo kiun mi mem ĉiam apogas min kiam venas al mi la deziro trinki glason !

La maljunulo, kiu nur deziris akiri la favoron de Miĥaelo, ekridis per rido sen gajeco.

- Vi estas tiom verva, li diris, ke aŭdi vin ofte amuzas min ! Sed mi revenas al ĉi tiu principo pri kiu mi volis paroli kun vi. Ĝi konsistas, resume, en ĉiam adaptiĝi al la kutimoj de la lando kie oni estas. Nu, ekzemple en Francio, tiuj kiuj volas manĝi iras al kafejo aŭ al restoracio; en Anglio, estas en lokoj kiel tiu ĉi, ke la popolo kutimas veni por sensoifigi sin. Mi kalkulis ke, per sandviĉoj, teo kaj okaze glaso da biero, unuopa viro povas vivi tre facile en Londono por dek kvar pundoj⁽²⁾ kaj dek du ŝilingoj⁽³⁾ jare !

- Jes mi scias ! respondis Miĥaelo. Sed vi forgesis enkalkuli la vestaĵojn, la subvestaĵojn kaj la ŝuojn. Koncerne min, enkalkulante la cigarojn kaj mallonga amuzaĵo de tempo al tempo, mi tre bone sukcesas elturniĝi per sep- aŭ ok-cent pundoj⁽²⁾ jare. Certe notu ĉi tion sur viaj paperoj !

Tio estis la lasta interrompo de Miĥaelo. Kiel bona nevo, li rezignaciis obeeme aŭskulti la reston de la prelego kiu, de politika ekonomio, enŝoviĝis en balota reformo, poste en la teorio de la barometro, por poste alveni al la instruado de aritmetiko en lernejoj por surdamutuloj. Post tio, la nova sandviĉo estanta finita, la du viroj eliris el la taverno kaj malrapide promenis laŭlonge de la trotuaro de la strato Reĝo.

- Miĥaelo, diris la onklo, ĉu vi scias kial mi estas ĉi tie ?

Estas ĉar mi ne plu kapblas elteni miajn du kanajlajn nevojn ! Mi trovas ilin premegaj !

- Mi tre bone komprenas vin ! aprobis Miĥaelo. Ne kalkulu kun mi por akcepti ilian sindefendon !

- Imagu ke ili volis neniam lasi min paroli ! daŭrigis amare la maljunulo. Ili rifuzis provizi min per pli ol unu kraĵono semajne ! La ĵurnalon, ĉiuvespere, ili kunportis ĝin al siajn ĉambrojn por malebligi min preni notojn en ĝi ! Nu, Miĥaelo, vi konas min ! Vi scias ke mi vivas nur por miaj kalkuloj ! Mi bezonas ĝui de la diversspecan kaj malsimplan spektaklon de la vivo, tiel kiel ĝi montriĝas al mi en la ĉiutagaj gazetoj ! Kaj tiel mia ekzistado fine fariĝis vera infero kiam, en la malordo de tiu ĉi benita kolizio de Brundekano, mi sukcesis eskapi. La du malŝatinduloj devas kredi ke mi mortis, kaj provi kaŝi la aferon por ne perdi la tontinon⁽¹⁾ !

- Kaj, pri tio, kiel vi aranĝas vin por la monrimedoj ? demandis kompleze Miĥaelo.

- Ho ! Mi estas riĉa ! respondis la maljunulo. Mi ricevis okcent pundojn⁽²⁾, sufiĉe por vivi dum ok jaroj. Mi havas plumojn kaj kraĵonojn laŭvole; mi havas je mia dispono la Britan Muzeon, kun ĝiaj libroj. Sed estas eksterordinare, kiom malmulte homo kun rafinita inteligenteco bezonas librojn post certa aĝo ! La ĵurnaloj perfekte sufiĉas por informi lin pri ĉio !

- Ĉu vi scias kion ? diris Miĥaelo. Venu loĝi ĉe mi !

- Miĥaelo, respondis onklo Jozefo, jen tio kio viaflanke estas tre afabla, sed vi ne konscias pri tio kiun apartigas mian situacion. Estas, vi komprenas, kelkaj etaj financaj komplikaĵoj kiuj malhelpas min disponi pri mi tiel libere kiel mi devus. Kiel kuratoro, vi scias, miaj klopodoj ne estis benitaj de la ĉielo; kaj, por tre ĝuste diri al vi la aferon, mi troviĝas tute sub la potenco de tiu kruda besto de Maŭrico !

- Vi devos nur maskovesti vin ! ekkriis Miĥaelo. Mi povas tuj pruntedoni al vi okulvitrojn el fenestrovitro, tiel kiel belegajn rufajn vangharojn.

- Mi jam nutris tiun ideon, respondis la maljunulo; sed mi timis estigi suspektojn en la modesta meblita hotelo kie mi loĝas. Mi konstatis, pri tio, ke la restadejo en meblitaj hoteloj...

- Sed diru al mi ! interrompis Miĥaelo. Kiel diable vi sukcesis havigi monon al vi ? Ne provu trakti min kiel fremdulo, onklo mia ! Vi scias ke mi konas ĉiujn detalojn pri la kompromiso, kaj pri la kuratoreco, kaj pri la situacio en kiu vi estas rilate al Maŭrico !

Jozefo rakontis sian viziton ĉe la banko, tiel kiel la maniero per kiu li enspezis la ĉekon, kaj malpermesis ke oni de nun antaŭpagu monon al siaj nevoj.

- Ha ! Sed pardonu ! Tio ne povas tiel iri ! ekkriis Miĥaelo. Vi ne rajtis tiel agi !

- Sed la tuta mono estas mia, Miĥaelo ! protestis la maljunulo. Estis mi kiu fondis la firmaon de ledaĵoj laŭ principoj de mia elpenso !

- Ĉio ĉi estas vera kaj bona ! diris la proceduristo. Sed vi subskribis kompromison kun via nevo, vi rezignis al li viajn rajtojn. Ĉu vi scias, kara onklo mia, ke tio simple signifas la galerpunon por vi ?

- Ne eblas ! ekkriis Jozefo. Neeblas ke la leĝo troigu maljustecon tiagrade !

- Kaj la plej ridinda pri la afero, daŭrigis Miĥaelo kun subita ekridido, estas ke, krom tio, vi fiaskigis la firmaon de ledaĵoj ! Verdire, kara onklo mia, vi havas strangan manieron kompreni la leĝon, sed, pri tio kio rilatas al humuro, vi estas netaksebla !

- Mi vidas nenion en ĝi kiu estu ridinda ! seke observigis S^{ro} Finsinko.

- Kaj vi diras ke Maŭrico ne havas povon por subskribi ? demandis Miĥaelo.

- Nur mi havas povon por subskribi ! respondis Jozefo.

- Kompatinda Maŭrico ! Ho ! Kompatinda Maŭrico !
ekkriis la proceduristo saltante pro plezuro. Kaj li kiu plie imagas ke vi estas morta, kaj pensas pri la manieroj kaŝi la novaĵon !... Sed diru al mi, onklo mia, kion vi faris per ĉiu tiu mono ?

- Mi deponis ĝin en bankon, kaj mi konservis dudek pundojn⁽²⁾ ! respondis S^{ro} Finsinko. Kial vi demandas tion al mi ?

- Jen kial ! diris Miĥaelo. Morgaŭ unu el miaj aktistoj alportos al vi ĉekon por cent pundoj⁽²⁾, kontraŭ kiu vi transdonos al li la bankkvitancon, por ke li iru kiel eble plej rapide redoni la okcent pundojn⁽²⁾ al la anglo-patagonia banko, provizante iun ajn klarigon kiun mi zorgos elpensi por vi. Tiel via situacio estos pli senripoĉa; kaj ĉar Maŭrico, tamen, ne povos elspezi speson el la banko, krom se li faras falsaĵon, vi vidas, ke vi ne bezonos rimorsi ĉe tiu flanko !

- Ne gravas, mi preferus ne dependi de via bonkoreco ! respondis Jozefo gratante al si la nazon. Mi preferus povi vivi per mia propra mono, nun kiam mi havas ĝin !

Sed Miĥaelo skuis lian brakon.

- Estos do neniam rimedo, li kriis al li, komprenigi al vi, ke mi nuntempe laboras por evitigi al vi la punlaborejon !

Tio estis dirita kun tiom da seriozeco ke la maljunulo estis timigata.

- Necesos, li diris, ke mi turnu mian atenton al la flanko de la leĝo; ĉi tio estos por mi nova kampo por esplori. Ĉar kvankam, kompreneble, mi komprenas la ĝeneralajn principojn de la leĝaro, estas multaj el ĝiaj detaloj kiujn mi ĝis nun neglektis ekzameni, kaj tio kion vi nun sciigas al mi, ekzemple, tute mirigas min. Tamen, eblas ke vi pravas, kaj la

fakto estas ke longa malliberigo miaaĝe riskus esti al mi iom malutila. Sed kun ĉio ĉi, kara nevo mia, mi tute ne rajtas vivi per via mono !

- Ne zorgu pri tio ! eligis Miĥaelo. Mi certe trovos rimedon por reakiri mian monon !

Post tio, notinte la adreson de la maljunulo, li adiaŭis lin ĉe stratangulo.

"Vere, kia maljuna fripono ! li diras al si. Kaj fine, kiel la vivo estas stranga afero ! Mi vere komencas kredi ke la providenco intence elektis min, hodiaŭ, por helpi sin. Ni iom vidu ! Kion mi faras ekde ĉi mateno ? Mi savis Fosuloⁿ, mi entombigis mortinton, mi savis mian onklon Jozefoⁿ, mi revigligis Forsisoⁿ, kaj mi trinkis sennombrajn glasojn da diversaj likvoroj. Se nun, por fini la vesperon, mi irus viziti miajn kuzojn, kaj daŭrigi apud ili mian providencan rolon ? Ekde morgaŭ matene, mi serioze provos profiti de ĉiuj ĉi novajn eventojn; sed, ĉi-vespere, ke nur la karitato inspiru mian konduton !"

Post dudek minutoj, kaj dum ĉiuj horloĝoj sonis la dekunua, la reprezentanto de la Providenco elveturiĝis el fiakro, ordonis al la koĉero atendi lin kaj sonorigis ĉe la pordo de la numero 16, en la strato Karlo.

La pordo tuj estis malfermita de Maŭrico mem.

- Ho ! Ĉu estas vi, Miĥaelo ? li diris, zorge blokante la mallarĝan aperturon. Estas tre malfrue !

Sen respondi, Miĥaelo antaŭeniris, kaptis la manon de Maŭrico, kaj premis ĝin tiel vigle ke la kompatinda knabo faris, kontraŭvole, retroiran movon, tion kiun lia kuzo profitis por eniri en la antaŭĉambron kaj poste pasi al la manĝoĉambro, kun Maŭrico tuj post li.

- Kie estas mia onklo Jozefo ? li demandis sidiĝante en la plej bonan brakseĝon.

- Li sufiĉe suferis dum ĉi tiuj lastaj tagoj ! respondis

Maŭrico. Li restis en Brundekano. Li prizorgas pri si, kaj mi estas sola ĉi tie, kiel vi vidas !

Miĥaelo aperigis nekomprenblan rideton.

- Estas ĉar mi bezonas vidi lin pro urĝa afero ! li diris.

- Ne estas kialo por ke mi lasu vin vidi mian onklon dum vi ne lasas min vidi vian patron ! rebatis Maŭrico.

- Neniel ! diris Miĥaelo. Mia patro estas mia patro; sed la maljuna Jozefo estas mia onklo de mi same kiel via, kaj vi tute ne rajtas enŝlosi lin !

- Mi ne enŝlosas lin ! diris kolere Maŭrico. Li estas suferanta; li estas danĝere malsana, kaj neniu povas vidi lin !

- Nu ! Mi tuj diros al vi pri kio temas ! deklaris Miĥaelo. Mi venis por interkonsenti kun vi, Maŭrico ! Ĉi tiun kompromison kiun vi proponis al mi, pri la tontino⁽¹⁾, mi ĝin akceptas !

La malfeliĉa Maŭrico fariĝis palega kiel mortinto, kaj poste ruĝiĝis ĝis la tempioj, en subita atako de furiozo kontraŭ la monstra maljusteco de la homa destino.

- Kion vi volas diri ? li ekkriis. Mi ne kredas eĉ unu vorton de ĝi !

Kaj kiam Miĥaelo certigis lin ke li serioze parolis :

- Tiaokaze, li ekkriis denove ruĝiĝante, sci ke mi rifuzas ! Jen ! Vi povas meti tion en vian pipon, kaj fumi ĝin !

- Ho ! Ho ! eligis akre Miĥaelo. Vi diras ke via onklo estas danĝere malsana, kaj tamen vi ne plu volas la kompromison kiun vi mem proponis al mi kiam li fartis bone ! Estas io dubinda en tio !

- Kion vi volas diri per tio ? kriegis Maŭrico.

- Mi nur volas diri ke estas en tio io kiu ne estas klara ! klarigis Miĥaelo.

- Ĉu vi aŭdacus fari insinuon celantan min ? rekomencis Maŭrico kiu komencis videti la eblecon timigi sian kuzon.

- Insinuon ? ripetis Miĥaelo. Ho ! Ni ne komencu uzi

tiajn gravajn vortojn ! Ne, Maŭrico, ni plivole provu dronigi nian kverelon en botelo, kiel du afablaj kuzoj ! "La du afablaj kuzoj", komedio, foje atribuita al Ŝekspiro ! li aldonis.

La cerbo de Maŭrico laboris kiel muelejo. "Ĉu li vere suspektas ion ? Aŭ ĉu li nur hazarde parolas ? Kaj kion mi devas fari ? Flataĉi, aŭ malmilde ĝisfunde trakti ? Bone pripensita, flataĉi estas pli bone, tio almenaŭ ŝparigos al mi tempon !"

- Nu ! li laŭte diris, kaj kun peniga ŝajnigo de koreco, ni antaŭ longe pasigis kune vesperon, Miĥaelo, kaj kvankam miaj kutimoj, kiel vi scias, estas treege moderaj, mi hodiaŭ faros escepton por vi. Pardonu min dum momento ! Mi tuj iros serĉi en la kelon botelon da viskio !

- Ne da viskio por mi ! diris Miĥaelo. Iom da maljuna ĉampano de onklo Jozefo, aŭ tute nenio !

Dum sekundo, Maŭrico hezitis, ĉar restis al li nur kelkaj boteloj de tiu maljuna vino, kaj li tre domaĝis ĝin; sed ekde la sekva sekundo, li eliris sen respondi vorton. Li komprenis ke, tiel senigante lin je la kremo de sia kelo, Miĥaelo senprudente sin endanĝerigis, kaj sin submetis al li.

"Unu botelo ? li diras al si. Je Sankta Georgo, mi donos al li du ! Ne estas tempo por ŝpari; kaj tuj kiam la besto estos tute ebria, estus mirinde se mi ne sukcesus eltiri de li lian sekreton !"

Estis do kun botelo sub ĉiu brako ke li revenis al la manĝoĉambro. Li elprenis du glasojn el la telermeblo, kaj plenigis ilin kun gastama graco.

- Mi trinkas je via sano, kuzo mia ! li gaje ekkriis. Ne ŝparu vinon, en mia domo !

Starante apud la tablo, Miĥaelo malplenigis sian glason. Li denove plenigis ĝin, kaj revenis sidiĝi en sian brakseĝon, kunportante la botelon kun li. Kaj baldaŭ tri glasoj da

maljuna ĉampano, sinsekve englutitaj, produktis rimarkindan ŝanĝon en lia sinteno.

- Ĉu vi scias ke mankas al vi sprita vigleco, Maŭrico ! li observigis. Vi estas profunda, eblas, sed mi volas esti pendigita, se vi havas rapidan menson !

- Kaj kio igas vin pensi ke mi estas profunda ? demandis Maŭrico kun mieno de amuzita simpleco.

- La fakto ke vi ne volas kompromison kun mi ! respondis Miĥaelo kiu komencis paroli kun multe da malfacileco. Vi estas profunda, Maŭrico, tre profunda, pro ne voli ĉi tiun kompromison ! Kaj vi havas tie tre bonan vinon ! Ĉi tiu vino estas la sola meritinda trajto de la familio Finsinko. Ĉu vi scias ke tio estas eĉ pli malofta ol titolo ! Multe pli malofta ! Sed kiam homo havas en sia kelo tian vinon, mi scivolas kial li ne volas kompromison !

- Sed, vi mem, vi ne volis ĝin, ĝis nun ! diris Maŭrico ankoraŭ ridetante. Ĉiu siavice !

- Mi demandas al mi kial mi ne volis ĝin ! Mi demandas al mi kial mi ne volis ĝin ! ripetis Miĥaelo. Mi demandas al mi kial ĉiu el ni pensas ke la alia ne volis la kompromison ! Diru do, ĉu vi scias ke tio estas problemo tre... tre ri... tre rimarkinda ? li aldonis, ne sen orgojlo pro esti finfine triumfinta super ĉiuj parolaj obstakloj kiujn li trovis sur sia vojo.

- Kaj kian kialon, vi kredas, ke mi havas por rifuzi ? lerte demandis Maŭrico.

Miĥaelo rigardis lin rekte en la vizaĝon, poste palpebrumis per unu okulo.

- Ha ! Vi estas inteligenta ! li diris. Post momento vi estos petanta al mi helpi vin eliri el via embaraso. Kaj la fakto estas ke mi bone scias ke mi estas la sendito de Providenco; sed tamen, ne tiamaniere ! Vi devos memstare elturniĝi, bona amiko mia, tio rekuraĝigos vin ! Kia terura

implikaĵo tio devas esti por juna orfo de kvardek jaroj : la komerco de ledaĵoj, la banko kaj la tuta cetero !

- Mi konfesas ke mi nenion komprenas pri tio kion vi volas diri ! deklaris Maŭrico.

- Mi ne certas mem kompreni multon pri tio ! diris Miĥaelo. Jen bonega vino, sinjoro, bon'ga vino. Sed ni revenu iomete al via afero, ĉu ? Do jen multvalora onklo kiu malaperis ! Nu ! Ĉio kion mi volas scii, estas jeno : kie estas tiu multvalora onklo ?

- Mi diris tion al vi; li estas en Brundekano ! respondis Maŭrico viŝante kaŝe sian frunton, ĉar ĉi tiuj ripetataj ataketoj komencis reale lacigi lin.

- Facile por diri, Brun... Brun... He, finfine, ne tiom facile por diri ! ekkriis Miĥaelo incitita. Mi volas diri ke vi facile povas respondi al mi ion ajn. Sed tio kion ne plaĉas al mi en ĝi, estas ĉi tiu kompleta malapero de onklo ! Sincere, Maŭrico, ĉu tio estas komerca ?

Kaj li malgaje balancis.

- Nenio estas pli simpla aŭ pli klara ! respondis Maŭrico kun multekoste pagata kvieteco. Ne ombro de mistero en ĉio ĉi ! Mia onklo ripozas en Brundekano por resaniĝi de la ŝoko kiun li travivis en la akcidento !

- Ha ! Jes, diris Miĥaelo, drasta skuo !

- Kial vi diras tion ? vikle ekkriis Maŭrico.

- Ho ! Mi diras ĉi tion apogante min kiel eble sur la plej bona aŭtoritato ! Estas vi mem kiu ĵus diris tion al mi ! rebatis Miĥaelo. Sed se vi nun diras al mi la malon, kompreneble mi devos elekti inter la du versioj. La fakto estas ke mi... ke mi elverŝis vinon sur la tapiŝon; oni diras ke tio bonefikas sur la tapiŝoj ! la fakto estas ke nia kara onklo... mortinta, ĉu ne ?... entombigita ?

Maŭrico ekstaris sur siaj piedoj.

- Kion vi diras ? li kriegis.

- Mi diras ke mi elverŝis vinon sur la tapiŝon ! respondis Miĥaelo same starante sin. Sed ne gravas, mi ne disverŝis ĉion ! Multe da amikaĵoj al kara onklo, ĉu ne ?

- Ĉu vi volas foriri ? demandis Maŭrico.

- He ! Kompatinda maljunulo mia, tio estas necesa ! Devigita iri priatenti malsanan amikon ! respondis Miĥaelo sin tenante ĉe la tablo por ne fali.

- Vi ne foriros de ĉi tie antaŭ ol vi klarigos al mi viajn aludojn ! deklaris Maŭrico per feroca tono. Kion vi volis diri ? Kial vi venis ĉi tie ?

Sed la proceduristo jam atingis la pordon de la vestiblo.

- Mi venis sen ia malbona intenco, mi certigas al vi ! li diris metante la manon sur sian koron. Mi asertas al vi ke mi ne havis alian intencon ol plenumi mian rolon kiel agento de la Providenco !

Poste li atingis la stratpordon, malfermis ĝin, ne sen problemo, kaj malsupreniris al la fiakro kiu atendis lin. La koĉero, neatendite vekata el dormeto, demandis al li kien necesis konduki lin.

Miĥaelo ekkonsciis ke Maŭrico postsekvis lin ĝis la sojlo de la domo; kaj brila inspiro venis al lia menso. "Tiu knabo bezonas esti serioze admonita !" li pensis.

- Koĉero, konduku min al **Metropola Polico** ! li laŭte diris tenante sin ĉe la rado. Ĉar finfine, koĉero, estas io suspektinda en ĉi tiu onklo kaj lia akcidento ! Ĉio ĉi meritas esti klarigita ! Konduku min al Metropola Polico !

- Vi ne povas vere peti al mi ĉi tion ! diris la koĉero kun la kora simpatio kiun ĉiam havas liaj kolegoj por mondumano en ebrieco. Aŭskultu, sinjoro, vi prefere faru revenigi vin hejmen ! Morgaŭ matene vi ankoraŭ povos iri al Metropola Polico !

- Vi kredas ? demandis Miĥaelo. Nu, tiukaze, konduku min plivole al la startrinkejo de la Gajeco !

- La startrinkejo de la Gajeco estas fermita, sinjoro !

- Nu, tiam, hejmen ! diris Miĥaelo rezignanta.

- Sed kien, sinjoro ?

- Vere ja, amiko mia, mi ne scias ! diris Miĥaelo

sidiĝante en la fiakron. Konduku min al la Metropola Polico, kaj tien ni demandos !

- Sed vi certe ja havas vizitkarton, diris la viro tra la la plafona pordeto. Donu al mi vian kartujon !

- Kia mirindega inteligenteco por iu koĉero de fiakro ! ekkriis Miĥaelo transdonante sian kartujon al la koĉero.

Kaj tiu ĉi laŭte legis sub la gaslumo :

- Miĥaelo Finsinko, 233, strato Reĝo, Ĉelsio. Ĉu tio estas ĝusta, sinjoro ?

- Perfekte ! ekkriis Miĥaelo. Konduku min tien, se vi sufiĉe vidi, pro ĉiuj tiuj domoj kiuj persistas resti malorde !

Ĉapitro X

Gideono Forsiso kaj la granda Erardo.

Mi certegas ke neniu inter vi legis la "*Mistero de la Omnibuso*", de E. H. B., romanon kiu troviĝis dum pluraj tagoj ĉe la montrofenestroj de librovendistoj, kaj poste kiu tute malaperis de la surfaco de la terglobo. Tio kio fariĝas la libroj unu aŭ du semajnojn post siaj publikigoj, kien ili iras, por kia uzo oni utilas ilin; ĉi tiuj estas tiom da problemoj kiuj oftege turmentis min dum sendormaj noktoj. La fakto estas ke neniu, miascie, legis la "*Mistero de la Omnibuso*", de E. H. B., tamen mi povis certigi min ke hodiaŭ ekzistas nur tri ekzempleroj de ĉi tiu verko. Unu sin trovas en la biblioteko de la Brita Muzeo, cetere farita por ĉiam neakirebla pro eraro dum la registrado en la katalogo; alia sin trovas en la formetejaj keloj de la biblioteko de la Advokatoj en Edinburgo; fine, la tria, marokene bindita, apartenas al nia amiko Gideono Forsiso. Por klarigi al vi la tre malsaman sorton de tiu ĉi tria ekzemplero, la plej simpla estas supozi ke Gideono admiris la rakonton. Kaj, mi povas diri tion al vi, vi ne eraros pro ĉi tiu supozo. Gideono, eĉ hodiaŭ, ankoraŭ admiras la "*Mistero de la Omnibuso*"; li admiras ĝin kaj amas ĝin, kun tute patra tenereco, ĉar estas li mem kiu estas la verkinto. Li subskribis ĝin per la inicialoj de sia onklo, S^{ro} Eduardo Hugo Florkampo; sed estas li sola kiu tute skribis ĝin. Li unue demandis al si, antaŭ la publikigo, ĉu li almenaŭ ne konfidus al kelkaj amikoj la sekreton de sia patreco; sed post la publikigo, kaj la grandega fiasko kiu renkontis ĝin, la modesteco de la juna romanisto fariĝis pli prema; kaj sen la malkaŝo kiun mi faras al vi hodiaŭ, la nomo de la verkisto de ĉi tiu rimarkinda verko riskintus resti por ĉiam nekonata.

Tamen, dum la jam malproksima tago kiam Miĥaelo Finsinko diris sian faman adiaŭon, la libro de Gideono apenaŭ aperis, kaj unu el ĝiaj ekzempleroj estis elmontrita ĉe la montrofenestro de la gazetvendistino en stacidomo Vaterlo; tiel ke Gideono povu ĝin vidi antaŭ ol eniri en la trajnon kiu estis kondukanta lin al Hampton-Korto. Sed, ĉu oni kredos tion? La vido de lia verko okazigis al li nur disdegnan rideton. "Kia vana ambicio de pigruloj, li diris al si, tiu de faristo de libroj!" Li hontis ke li sin humiligis ĝis praktiki tiel infanan arton. Tute kaptita de la penso pri sia unua afero, li fine sentis sin fariĝinta homo. Kaj la muzo kiu direktas al felietono (sinjorino kiu sendube devas esti de franca deveno) forflugis de apud li, por iri denove miksiĝi en la danco de siaj fratinoj, ĉirkaŭ la senmortaj fontanoj de Helikono.

Dum la tuta duonhoro de la vojaĝo, klaraj, fortikaj kaj praktikaj pripensadoj vigligis la animon de la juna advokato. Ĉiumomente li elektis por si, tra la pordo de la vagono, la kamparan dometon kiu baldaŭ fariĝos la rifuĝejo de lia vivo. Kaj jam, kiel perfekta posedanto, li projektis plibonigojn por la domoj kiujn li vidis. Al unu li aldonis stalon; al la alia, tenisejon; li imagis la ĉarman aspekton kiun havus iu tria kiam vidalvide al ĝi, sur la rivero, li estus konstruigita lignan pavilonon. "Kaj kiam mi pensas, li diris al si, ke antaŭ apenaŭ unu horo, mi ankoraŭ estis senzorga juna malsaĝulo, nur okupata de remado kaj de felietonoj! Mi preterpasis flanke de la plej ĉarmajn kamparajn domojn sen eĉ honoro ilin per rigardo! Kiel necesas malmulte da tempo por maturigi homon!"

La inteligenta leganto tuj rekonos, kaj laŭ tiu ĉi simpla monologo, la malordigon okazigitan en la koro de Gideono de la belaj okuloj de fraŭlino Hazeltino. La advokato, elirinte la straton Karloⁿ, kondukis la junan fraŭlinon en la domon de sia

onklo, S^o Florkampo; kaj tiu ĉi persono, eksciinte de sia nevo, ke ŝi estas viktimo de duobla subpremo, brue prenis ŝin sub sian protekton.

- Mi scivolas kiu estas la pli malbona el la du, li ekkriis, ĉi tiu senskrupula maljuna onklo, aŭ ĉi tiu malsprita juna fripona nevo ! Ĉiukaze mi tuj skribos al [Pall Mall](#) por denunci ilin ! Kio ! Ĉu vi diras ne ? Pardonu, sinjoro, oni devas denunci ilin ! Tio estas publika devo... Kiel ? Ĉu vi diras ke ĉi tiu onklo estas radikala konservativulo ? En ĉi tiu kazo, jes, vi pravas, la afero devas esti direktata kun pli da deteniĝo ! Mi certas ke tiu kompatinda onklo estis skandale trompata !

De ĉio ĉi rezultis ke S^o Florkampo ne plenumis sian planon de letero al la Gazeto. Li nur deklaris ke fraŭlino Hazeltino devis esti ŝirmata kontraŭ la probablaj serĉadoj de ŝiaj persekutantoj; kaj ĉar estis ke li posedis jakton, li juĝis ke neniu alia rifuĝejo povus esti pli sekura por la malfeliĉa junulino. La matenon mem de la tago kiam Gideon iris al Hampton-Korto, Julia, akompanata de gesinjoroj Florkampo, forlasis Londonoⁿ surŝipe de la familia jakto. Kaj Gideon, kiel ni imagas tion, tre ŝatintus partopreni en vojaĝo, sed lia onklo ne opiniis necesa doni al li ĉi tiun favoron. "Ne, Giĉjo ! li diris al li. Oni certe sekvos vin; necesas ke oni ne vidu vin kun ni !" Kaj la junulo ne kuraĝis kontraŭi tiun ĉi strangan iluzion; ĉar li timis ke lia onklo forgesu sian belan fervoron por la protekto de Julia, se li malkovris ke la afero ne estas tiel romantika kiel li imagis tion. Cetere, la diskreteco de Gideon ricevis sian rekompencan, ĉar la maljuna Florkampo, metinte sur lian ŝultron sian pezan manon, aldonis ĉi tiujn vortojn kies signifo estis tuj komprenita : "Mi bone divenas tion kion vi havas en la kapo, Gideon ! Sed se vi volas akiri ĉi tiun junan fraŭlinon, necesos ke vi laboros, knabego mia, ĉu vi aŭdas ?"

Ĉi tiuj agrablaj vortoj jam kontribuis gajigi la

advokaton kiam, adiaŭinte la vojaĝantojn, li revenis hejmen por legi romanojn; kaj nun, dum la trajno forportis lin al Hampton-Korto, estis ankoraŭ ili kiuj formis la fundamentan bazon de liaj virecaj revadoj. Kaj kiam li eltrajniĝis kaj komenci enpeniĝis pri la tikla komisiono kiun li taskis al si, li tiam ankoraŭ havis en la okuloj la delikatan vizaĝon de Julia, kaj en la oreloj la adiaŭajn parolojn de sia onklo Eduardo.

Sed baldaŭ fortaj surprizoj komencis plui sur lin. Li unue eksciis ke en la tuta Hampton-Korto ekzistis neniu vilao Kurnolo, neniu grafo Tarnoŭo, aŭ eĉ iu ajn grafo. Tio estis tre stranga, sed, bone pripensita, li ne juĝis ĝin tute neklarigebla. S^{ro} Diksono tiel bone tagmanĝis ke li kapablis erari donante al li la adreson. "Kion devas fari en tia cirkonstanco homo praktika, prudenta kaj kutimita al la aferoj?" demandis Gideon al si. Kaj li tuj respondis al si: "Telegrafi mallongan kaj klaran depeŝon!" Dek minutojn poste, niaj naciaj telegrafdratoj transsendis al Londono la jenan gravan mesaĝon: "Diksono, Hotelo Langhamo, Londono. Vilao kaj persono nekonataj ĉi tie; supozas adres-eraron; alvenos per venonta trajno. Forsiso". Kaj, efektive, Gideon mem ne malfruis eliri el fiakro antaŭ la perono de la Hotelo Langhamo, kun sur sia frunto la kunigitaj signoj de ekstrema hasto kaj de granda mensa strebo.

Mi ne kredas ke Gideon iam forgesu la hotelon Langhamoⁿ. Tie li eksciis ke, same kiel la grafo Tarnoŭo, Ĝono Diksono kaj Ezro Tomaso ne ekzistis. Kiel? Kial? Ĉi tiuj du demandoj dancis en la konfuzita cerbo de la junulo; kaj, antaŭ ol la kirlado de liaj pensoj kvietiĝis, li sin trovis demetita de alia fiakro antaŭ la pordo de sia domo. Tie, almenaŭ, sin prezentis al li gastigema kaj trankvila rifuĝejo! Tie, almenaŭ, li povis pripensi laŭ sia plaĉo. Li transiris la koridoron, metis sian ŝlosilon en la seruron kaj malfermis la pordon, jam sereniĝinta. La ĉambro estis tute senluma, ĉar

nokto venis. Sed Gideono konis sian ĉambron, li sciis kie estis la alumetoj, en la dekstra angulo, sur la kamenbreto. Kaj li senhezite antaŭeniris, kaj farante tion li albatigis al peza korpo, en loko kie neniu el tia korpo devintus ekzisti. Estis nenio en ĉi tiu loko, kiam Gideono eliris. Li fermis la pordon per ŝlosilo malantaŭ si; li trovis ĝin ŝlosita kiam li revenis; neniu povis esti enirinta; kaj estis ankaŭ malmulte verŝajna ke la mebloj kapablu per si mem ŝanĝi sian pozicion. Kaj tamen, tute sendube, tie estis io ! Gideono etendis siajn manojn, en la mallumo. Jes, estis io, io granda, io polurita, io malvarma ! "Ĉielo pardonu min ! pensis Gideono; ŝajnas ke ĝi aspektas kiel piano !"

Li rememoris ke li havas alumetojn en la poŝo de sia veŝto, kaj ekbruligis unu el ili.

Efektive ĝi estis piano kiu sin prezentis al lia mirigita rigardo; vasta kaj solena instrumento, ankoraŭ tute malseka pro esti elmetita en la pluvo. Gideono lasis la alumeton bruli ĝis la fino, kaj tiam, denove la mallumo refermis sin ĉirkaŭ lia konsterniĝo. Tiam, per tremanta mano, li ekbruligis sian lampon, kaj alproksimiĝis. De proksime aŭ de malproksime, ne estis dubo: la objekto ja estis piano. Estis ja piano kiu staris tie, arogante, en loko kie ĝia ĉeesto estis malkonfirmo de ĉiuj naturaj leĝoj !

Gideono malfermis la klavaron kaj frapis akordon. Neniu sono perturbis la silenton de la ĉambro. "Ĉu mi estas malsana ?" diris al si la junulo dum lia koro ĉesis bati. Li sidiĝis antaŭ la piano, kolereme obstinis en siaj provoj por rompi la silenton, jen per brilaj arpeĝoj, jen per sonato de Betoveno kiun iam (en pli feliĉaj tempoj) li konis kiel unu el la plej sonoraj verkoj de ĉi tiu potenca komponisto. Kaj ankoraŭ neniu sono ! Li donis sur la klavoj du fortajn batojn per siaj kunpremitaj pugnoj. La ĉambro restis silenta kiel tombo.

La juna advokato abrupte rektiĝis.

- Mi fariĝis tute surda, li laŭte ekkriis, kaj neniu scias tion krom mi ! La plej malbona malbeno de Dio trafis min !

Liaj fingroj renkontis la ĉenon de lia poŝhorloĝo. Li tuj eltiris sian horloĝon kaj metis ĝin al sia orelo : li perfekte aŭdis ĝian tiktakon.

- Mi ne estas surda ! li diris. Estas eĉ pli malbone, mi estas freneza ! Mia menssano forlasis min por ĉiam !

Li promenigis ĉirkaŭ si en la ĉambro malkvietan rigardon, kaj interalie ekvidis la brakseĝon en kiu S^{ro} Diksono sin lokis. Cigarpeco ankoraŭ miskuiĝis ĉe la piedo de la brakseĝo.

"Ne, li pensis, tio ĉi ne povas esti songo. Estas mia kapo kiu deliras, kompreneble ! Tiel, ekzemple, ŝajnas al mi ke mi malsatas; tio sendube estos denove halucino ! Sed, tamen, mi tuj eksperimentos. Mi tuj regalos min denove per bona vespermanĝo ! Mi vespermanĝos ĉe la Reĝa Taverno, de kie tute eblus ke mi devos esti tuj transportata al frenezulejo".

Laŭlonge de sia tuta vojo, sur la strato, kun malsana scivolemo, li demandis sin kiel sin aperigas lia terura malsano. Ĉu li svenbatos kelneron ? Aŭ volos manĝi sian glason ? Kaj estas tiel ke kurante li sin direktis al la Reĝa Taverno, kun la angordona timo malkovri ke la ekzisto de tiu konsumejo estis, ankaŭ ĝi, halucino.

Sed la lumo, la viveco, la gaja bruo de la konsumejo rapide konsolis lin. Li plie ekhavis la kontentiĝon rekoni la kelneron kiu kutime servis lin. La vespermanĝo kiun li mendis, ne ŝajnis al li tro nekohera, kaj manĝante ĝin, li sentis kontentecan, en kiu li povis malkovri nenion nenormala. "Vere, li diris al si, mi retrovas la esperon. Eble mi freneziĝis tro frue ? En tiaj cirkonstancoj, kion farintus Roberto Skilo ?" Ĉi tiu Roberto Skilo estis, ĉu mi bezonas diri tion al vi ?, la ĉefa heroo de la "*Mistero de la Omnibuso*".

Gideon enkorpiĝis en li sian idealon de sagaca inteligenteco kaj firma decido. Tial li ne povis dubi ke Roberto Skilo, en cirkonstanco simila al tiu en kiu li mem troviĝis, certe agintus laŭ la kiel eble plej saĝa kaj plej bona maniero. Restis nur scii tion kion li farintus. "Kia ajn estis lia decido, ankoraŭ diris al si la juna romanisto, Roberto Skilo estus senprokraste plenumanta ĝin. Sed bedaŭrinde li mem vidis tiumomente antaŭ si nur unu farendaĵon, kiu estis reiri al sia ĉambro tuj post sia vespermanĝo. Kaj do estis tio kion li tuj faris, imitante sian noblan heroon.

Sed, kiam li revenis hejmen, li ekkonsciis ke vere neniu inSPIRO venis helpi lin. Kaj li sin tenis stare sur la sojlo, konsternite ekzamenante la misteran instrumenton. Tuŝi la klavaron, unufoje pli, tio estis super liaj fortoj : ĉu la piano gardintus sian nekompreneblan silenton, ĉu ĝi respondintus al li per la tuta tondro de la trumpetoj de la lasta juĝo, li sentis ke lia ektimigo povintus nur pliiĝi. "Ĝi devas esti petolo kiun oni ludis kontraŭ mi ! li pensis, kvankam ĝi ŝajnas al mi tre peniga kaj tre multekosta ! Sed se ĝi ne estas ŝerco, kio ĝi povas esti ? Procedante per eliminado, kiel procedis Roberto Skilo por malkovri la farinton de la murdo de lordo Beleŭo, mi nepre estas pelata konkludi ke tio povas nur esti petolo !"

Dum li tiel rezonis, liaj okuloj falis sur objekton kiu ŝajnis al li nova konfirmo de lia hipotezo : nome, la pagodo el cigaroj kiun Miĥaelo konstruis sur la piano. "Kio estas tio ?" demandis al si Gideon. Kaj, alproksimiĝante, li detruis la pagodon, per pugnobato, "Iu ŝlosilo, li poste diris al si, kia stranga maniero meti ĝin tie !"

Li ĉirkaŭiris la instrumenton, kaj ekvidis, flanken, la seruron de la kovrilo. "Ho ! Ha ! Jen al kio respondas ĉi tiu ŝlosilo ! li daŭrigis. Evidente, ĉi tiuj du petoluloj volus ke mi rigardu internen de la piano ! Strange, vere, pli kaj pli strange !" Post tio li turnis la ŝlosilon en la seruro, kaj levis

la kovrilon.

En kia senhelpeco, en kiaj atakoj de nedaŭra decido, en kiaj abismoj de malespero Gideono pasigis la nokton kiu sekvis, mi preferas ke miaj legantoj neniam sciui tion.

La mallonga kanto de la Londonaj paseroj matene de la morgaŭo trovis lin elĉerpita, lacega, rompita, kaj kun menso ankoraŭ malplena de la plej malgranda projekto. Li ellitiĝis kaj, mizere, rigardis fermitajn fenestrojn, senhoman straton, la lukton de la grizo de mateniĝo kun la flavo de la gaslampo. Estas matenoj kiam la tuta urbo ŝajnas vekigi kun migreno : estis unu el tiuj matenoj, kaj la migreno ankaŭ turmentis la nukon kaj la tempiojn de kompatinda Gideono.

"Jam la tago ! li diris al si, kaj mi ne jam trovis ion ! Necesas ke tio finiĝu !" Li refermis la pianon, metis la ŝlosilon en sian poŝon kaj eliris por iri trinki sian laktokafon. Centafoje lia cerbo turniĝadis kiel muelrado, muelanta miksaĵon de teruroj, de abomenoj kaj de bedaŭroj. Alvoki policon, fordoni al ĝi la kadavron, kovri la murojn de Londono per afiŝoj priskribantaj Ĝonoⁿ Diksonoⁿ kaj Ezroⁿ Tomasoⁿ, plenigi la gazetojn per paragrafoj titolitaj la Misteroⁿ de la Templo, la ĉerkaⁿ Pianoⁿ, S^{ron} Forsisoⁿ kaŭcie liberan : Ĉi tio estis ebla taktiko, facila, kaj eĉ, finfine, sufiĉe sekura; sed, bone pripensita, ĝi tamen havis siajn malavantaĝojn. Tiel agi, ĉu tio ne estis malkaŝi al la mondo tutan serion da detaloj pri Gideono mem, kiuj havis nenion por gajni pro esti malkaŝitaj ? Ĉar, fine, infano estus suspektanta pri la historio de la du aventuristoj, kaj li, Gideono, tuj kredeme akceptis ĝin. La plej mizera advokataĉo estus rifuzanta aŭskulti klientojn kiuj sin prezentis al li en tiel neregulaj kondiĉoj; kaj li, li kompleze aŭskultis ilin. Kaj se eĉ li limiĝus aŭskulti ilin ! Sed li ekvojiris por la komisiono kiun ili taskis al li. Li, advokato, entreprenis komisionon maksimume taŭgan

por privata detektivo ! Kaj kiel lasta aldono, bedaŭrinde, li konsentis preni la monon kiun proponis al li liaj vizitantoj ! "Ne, ne, li diris al si, la afero estas tro klara, mi estos malhonorita ! Mi ruinigis mian karieron por monbileto de kvin pundoj⁽²⁾ !"

Post tri glutoj de tiu varma, viskoza, kaj ŝlima tizano kiu esti rigardata, en la tavernoj de Londono, kiel dekokton de grajnoj de kafarbo, Gideon komprenis ke estis almenaŭ unu punkto pri kiu neniu hezito eblis por li. La afero devis esti aranĝita sen helpo de la polico ! Sed tamen ĝi devis esti aranĝita iel ajn kaj senprokraste. Denove Gideon demandis al si kion farintus Roberto Skilo : kion povas fari honora homo por sin liberigi de honore akiritan kadavron ? Iri demeti lin ĉe la angulo de la najbara strato ? Tio devis vekti en la koroj de preterpasantoj malbonegan scivolemon. Ĵeti ĝin en unu el la kamentuboj de la urbo ? Ĉiaj materiaj obstakloj igis tian entreprenon preskaŭ nepraktikebla. Ĵeti la korpon tra la pordo de vagono, aŭ de la imperialo de omnibuso : bedaŭrinde ! necesis tute ne pensi pri tio. Alporti la korpon sur jakton kaj poste dronigi ĝin, jes, tio estis jam pli bone por koncepti : sed kiom da elspezoj, por homo kun limigitaj vivrimedoj ! La luado de la jakto, la prizorgado de la ekipaĵo, ĉio ĉi estintus ruiniga eĉ por kapitalisto. Subite Gideon rememoris la pavilonojn, en formo de boatoj, kiujn li vidis la antaŭtagon sur la Tamizo. Kaj ĉi tiu memoro estis por li genian trajton.

Komponisto de muziko, ekzemple nomita Ĵimsonoⁿ, tre bone povintus, kiel antaŭe la muzikisto eterne famigita de **Hogarto**, suferi dum sia inspiro de la perturboj de Londono. Li tre bone povintus esti urĝata de tempo, por elfini operon : ekzemple ridigan operon titolita "*Orange Pekoe*"⁽⁶⁾; flirtteman

6 Engla nomo por esprimi oranĝan koloron de nigra teo.

Ĉinan fantazio el la ĝenro de Mikado⁽⁷⁾. Orange Pekoe⁽⁵⁾, muziko de Ĵimsono, "la juna majstro, unu el la plej talentaj majstroj de nia nova angla skolo, la rava kvintetaĵo de la mandarenoj, vigla eniro de la drumo, ktp., ktp.", subite la kompleta persono de la Ĵimsono, kun sia muziko, piedostare stariĝis en la menso de Gideon. Kio estus pli natura, kio estus pli akceptebla, ol la subita alveno de Ĵimsono en trankvila vilaĝo ĉe la bordo de la akvo, akompanata de granda vostpiano kaj de la nefinita partituro de Orange Pekoe⁽⁶⁾ ? La malapero de la menciita majstro, kelkajn tagojn pli poste, postlasante nur pianon malplenigitan de ĝiaj kordoj; tio certe ŝajnus malpli natura. Sed eĉ tio ne estus tute neklarigebla. Oni tre bone povus, konklude, supozi ke Ĵimsono, freneziginta sekve de malfacilaĵoj de ĥoro en duvoĉa fugo, komencis detruiri sian pianon, kaj fine sin ĵetis en la riveron. Ĉu tio ne estis, verdire, katastrofo tute akorde kun juna muzikisto de la nova skolo ?

"Diable, necesos ke tio tiel iru glate ! ekkriis Gideon. Ĵimsono helpos nin !"

7 Opereto datuminta de 1885, verko de la dramisto William S. Gilbert kaj la komponisto Arthur Sullivan.

Ĉapitro XI

Majstro Ĵimsono.

S^{ro} Eduardo Hugo Florkampo anoncinte la intencon stiri sian jakton direkte al Mejdenhedo, ni ne miros ke la majstro Ĵimsono prenis sian elekton al kontraŭa direkto. En la ĉirkaŭaĵo de la ĉarma riverborda vilaĝego Padŭiko, li rememoris esti vidinta, eĉ antaŭnelonge, malnovan surfostan pavilonon poezie ŝirmata de bosketo de salikoj. Ĉi tiu pavilono ĉiam ĉarmis lin per ia aspekto de forlasiteco kaj izoliteco, kiam dum siaj rem-distraĵoj, li pasis proksime de ĝi. Kaj li eĉ intencis situigi tie unu el la scenoj de la *Mistero de la Omnibuso*; sed li devis lastmomente rezigni tion pro la neantaŭviditaj malfacilaĵoj kiujn prezentis al li la bezono de priskribo adaptita al la ĉarmo de la loko. Li rezignis tion, kaj nun li ĝojis pri tio pensante ke li devos utiligi la pavilonon por senfine pli serioza uzo.

Ĵimsono, rolanto kun la plej banala vestmaniero, sed kun aparte plaĉaspektaj sintenoj, ne malfacile konsentigis ke la posedanton de la pavilono ludonu ĝin al li por la daŭro de unu monato. La luprezo, cetere bagatela, estis tuj interkonsentita, la ŝlosilo estis transdonita kontraŭ malgranda mon-antaŭpago, kaj Ĵimsono rapidis reveni al Londono por zorgi pri la transporto de la piano.

- Mi certe revenos morgaŭ matene ! li deklaris al la posedanto. Oni atendas mian operon kun tiom da senpacienco, ĉu vi komprenas ? Mi ne povas perdi minuton por fini ĝin !

Kaj, fakte, ĉirkaŭ la unua postagmeze, la morgaŭo, vi povintus vidi Ĵimsonoⁿ paŝadantan sur la vojo kiu laŭiras la riveron, inter Padŭiko kaj Haverhamo. En unu el siaj manoj,

li tenis korbon enhavantan proviantojn; en la alia, malgrandan valizon en kiu verŝajne sin trovis la nefinitan partituron. Ni estis dum la komenco de oktobro; la ĉielo, ŝtongriza, estis punktata de alaŭdoj, la Tamizo malforte brilis kiel spegulo el plumbo, kaj la flavaj folioj de la maronarboj kraketis sub la piedoj de la komponisto. Tute ne estas sezono en Anglio kiu pli stimulas la vivfortojn, kaj Ĵimsono, kvankam li ne estis sen iaj problemoj, paŝadante zumis arion (eble el sia komponaĵo).

Du aŭ tri mejlojn (3,2 aŭ 4,8Km) norde de Padŭiko, la bordo de Tamizo estas aparte dezerta. Sur la kontraŭa bordo, la arboj de parko haltigas la horizonton, lasante nur duonvidi la supron de la kamentuboj de malnova kampara domo. Sur la riverbordo de Padŭiko, inter la salikoj, elstaras la pavilono, malnova barĝo eluzita, kaj tiel malpurigita de la larmoj de la najbaraj salikoj, tiel difektita, tiel batita de la ventoj, tiel neglektita, tiel hantita de ratoj, tiel evidente transformita al magazeno de reŭmatismoj, ke miaflanke mi havus fortan malinklinon loĝiĝi tie.

Kaj ankaŭ por Ĵimsono estis sufiĉe malgaja momento, tiu kiam li forigis la tabulon kiu servis kiel levponto al sia nova hejmo, kaj kiam li sin trovis sola en ĉi tiu malsana fortikaĵo. Li aŭdis la ratojn kuri kaj salti sub la planko, la pordhokoj de la pordo ĝemis kiel turmentataj animoj; la saloneto estis plene de polvo, kaj havis forlogan odoron de ŝima akvo. Ne, oni tute ne povis konsideri ĉi tion kiel tre gaja hejmo, eĉ por komponisto absorbata de amata verko; sed kiel ankoraŭ malpli gaja por junulo tute turmentata de alarmoj, kaj okupata atendi la alvenon de kadavro !

Li sidiĝis, kiel eble plej bone purigis duonon de la tablo, kaj komencis la malvarman matenmanĝon kiun enhavis sia korbo. Antaŭkalkule al eventuala esploro pri la sorto de Ĵimsono, li taksis necesega ne lasi sin vidi; tiel ke li estis

rezoluta pasigi la tutan tagon sen eliri el la pavilono. Kaj, ankoraŭ por fortigi sian fabelon, li kunportis en sia valizo ne nur inkon kaj plumojn, sed dikan kajeron da muzikpapero, el la plej okulfrapa formato kiun li povis trovi.

"Kaj nun, ek al la laboro !" li diris al si, tuj kiam li satigis sian apetiton. "Necesas ke mi lasu spurojn de la farado de mia rolanto ! Kaj li skribis, per belaj rondaj literoj :

ORANGE PEKOE⁽⁵⁾

Opus 17

J.-B. Ĵimsono

PARTITURO POR PIANO KAJ KANTO.

"Mi ne supozas ke famaj komponistoj tiel komencas sian laboron, pensis Gideon; sed Ĵimsono estas originalulo, kaj cetere, mi estus tre embarasita komenci alie. Dediĉo, nun, jen kiu farus bonegan efekton. Ekzemple : Dediĉite al... nu ! ... Dediĉite al Vilhelmo Eŭarto Ĝojŝtono, de lia respektema servisto J-B. J. Nu, necesas tamen aldoni iom da muziko ! Mi farus pli bone eviti la uverturon : mi timas ke ĉi tiu parto prezentu tro da malfacilaĵo. Se mi provus arion por la tenoro ? Pri la tonalo, ho ! ni estu ultra-moderna ! sep bemoloj !"

Li faris kiel li diris, ne sen malfacilaĵo, poste haltis kaj komencis maĉetadi la pinton de sia plumingo. La vido de folio de muzikpapero ne ĉiam sufiĉas por okazigi inspiron, ĉefe ĉe simpla amatoro; kaj la ĉeesto de sep bemoloj ĉe la tonalo ankaŭ ne instigas al improvizado. Gideon ĵetis sub la tablon la komencitan folion.

"Ĉi tiuj skizoj ĵetitaj sub la tablon helpas restarigi la artan personecon de Ĵimsono !" li diris al si por sin konsoli. Kaj denove li alvokis la muzon, laŭ diversaj tonaloj kaj sur diversaj paperfolioj; sed ĉio ĉi por tiom malmulte da rezultoj ke li estis konsternita. "Estas strange kiel estas tagoj dum kiuj oni estas senverva ! li diras al si; kaj tamen nepre

necesas ke Ĵimsono lasu ion !" Kaj denove li laboregis pri sia tasko.

Baldaŭ la penetra malvarmeteco de la pavilono komencis tute invadi lin. Li stariĝis, kaj je la evidenta ĉagreno de la ratoj, paŝadis tien kaj reen en la ĉambro. Bedaŭrinde ! li ne sukcesis revarmiĝi. "Estas absurde ! li diras al si. Ĉiuj riskoj estas por mi indiferentaj, sed mi ne volas esti trafita de bronkito. Necesas ke mi eliru el ĉi tiu kaverno !"

Li antaŭeniris sur la balkonon, kaj unuafoje rigardis direkte al la rivero. Kaj tuj li ekstremis de surprizo. Kelkcent paŝojn pli for, jakto kuŝis en la ombro de la salikoj. Eleganta kanoto balanciĝis apud la jakto; la fenestroj de ĉi tiu estis kaŝitaj de kurtenoj el neĝa blankeco, kaj flago flirtis ĉe la pobo. Kaj ju pli Gideon ekzamenis ĉi tiun jakton, des pli lia ĉagreno miksiĝis kun konsterno. Tiu ĉi jakto treege aspektis kiel tiu de lia onklo; Gideon eĉ ĵurintus ke fakte ĝi estis tiu de sia onklo, sen du detaloj kiuj malebligis la identigon. La unua detalo estis ke lia onklo sin direktis al Mejdenhedo, kaj do ne povis troviĝi en Padŭiko; la dua, eĉ pli konvinka, estis ke la flago malantaŭe alkroĉita estis amerika flago.

"Tamen, kia eksterordinara simileco !" pensis Gideon. Kaj dum li tiel rigardis kaj pripensis, pordo malfermiĝis, kaj juna sinjorino antaŭeniris sur la ferdekon. En palpebruma daŭro, la advokato estis enirita en sian pavilonon, li ĵus rekonis Juliaⁿ Hazeltinoⁿ. Kaj, observante ŝin tra la fenestro, li vidis, ke ŝi malsupreniris en la kanoton, prenis la remilojn enmane kaj rezolute venis al la loko kie li troviĝis.

"Nu ! Mi estas perdita !" li diris al si. Kaj li lasis sin fali sur sian seĝon.

- Saluton, fraŭlino, diris de la riverbordo voĉo kiun Gideon rekonis kiel estanta tiu de sia posedanto.

- Bonan tagon sinjoro ! respondis Julia. Sed mi ne

rekonas vin, kiu vi estas ? Ho ! Jes, mi rememoras ! Estas vi kiu permesis al mi, hieraŭ, veni akvareli en ĉi tiu malnova pavilono !

La koro de Gideon eksaltis pro teruro.

- Jes ja, estas mi ! respondis la viro. Kaj tio kion mi nune volis diri al vi estas ke mi ne plu povas permesi tion al vi ! Mia pavilono estas luigita !

- Luigita ? ekkriis Julia.

- Ludonita por monato ! rekomencis la viro. Tio ŝajnas ridiga por vi, ĉu ne ? Mi scivolas tion kion ĉi tiu sinjoro ja povas voli fari kun ĝi ?

- Kia romantika ideo ! murmuris Julia. Ĉu li estas sinjoro ? Kiel li estas ?

Tiu ĉi dialogo inter la kanoto kaj la riverbordo okazis tute kontraŭ la pavilono. Ne eĉ unu vorto perdiĝis por la juna majstro.

- Li estas muzikisto, respondis la posedanto, aŭ almenaŭ jen tio kiun li diris al mi ! Veninta ĉi tie por skribi operon !

- Ĉu vere ? ekkriis Julia. Neniam mi revis pri io tiel agrablega. Sed tiam ni povos nokte ŝteliri ĉi tien, kaj aŭdi lin improvizi ! Kiel li sin nomas ?

- Ĵimsono ! diris la viro.

- Ĵimsono, ripetis Julia vane priserĉante en sia memoro.

Sed, verdire, nia juna angla skolo de muziko posedas tiom da bonaj geniuloj ke ni ekscias iliajn nomojn nur kiam la reĝino nomumas ilin baronetoj.

- Ĉu vi certas ke tiu nomo estas ĝusta ? reparolis Julia.

- Li mem literumis ĝin por mi ! respondis la posedanto. Kaj lia opero nomiĝas... atendu... speco de teo !

- Speco de teo ! ekkriis la fraŭlino. Kia stranga titolo por opero ! Dio mia ! Kiel mi ŝatus koni ĝian temon ! Kaj

Gideonu aŭdis ŝvebi en la aero sian ĉarman delikatan ridon. Nepre necesas ke ni konatiĝu kun ĉi tiu S^{ro} Ĵimsono ! Mi certas ke li devas esti tre interesa !

- Pardonu, fraŭlino, sed necesas ke mi foriru ! Oni atendas min en Haverhamo !

- Ho ! Mi ne retenu vin, bravulo mia ! diris Julia. Bonan posttagmezon !

- Kaj por vi same, fraŭlino !

Gideonu sin tenis side en sia kajuto, turmentata de la plej premaj pensoj. Li vidis sin ankrita al ĉi tiu putra pavilono, atendante la alvenon de maloportuna kadavro: kaj jen ke, ĉirkaŭ li, la sciemoj vigliĝis, jen ke fraŭlinoj intencis veni nokte spioni lin, kiel distraĵon ! Ĉi tio signifis por li malfacilegaĵojn; sed ne eĉ estis tio kio plej afliktis lin. Tio kio ĉefe afliktis lin, estis la nepardonebla senprudenteco de Julia. Tiu ĉi juna knabino estis preta konatiĝi kun la unua renkontito; ŝi havis nenian sindeteniĝon, neniujn manierojn de deca homo ! Ŝi familiare babilis al la krudulo kiu estis lia posedanto; ŝi sentis tujan kaj rekte konfesitan intereson por la mizera estulo kiu estis Ĵimsono ! Jam, sendube, ŝi formis la projekton inviti Ĵimsono" veni trinki teon kun ŝi ! Kaj estis por juna fraŭlino kiel tiu ĉi, nur viro kiel li, Gideonu... "Honton al vi, vireca koro !"

Li estis interrompata dum siaj revadoj de bruoj kiu tuj decidigis lin sin kaŝi malantaŭ la pordon. Fraŭlino Hazeltino, sen zorgi pri la defendo de la posedanto, ĵus grimpis sur lian barĝon. Ŝia akvarela projekto gravis al ŝi; kaj ĉar, juĝante laŭ la silento en la pavilono, ŝi supozis ke Ĵimsono ankoraŭ ne alvenis, ŝi decidis profiti de la okazo por fini la artverkon komencitan la antaŭtagon. Kaj ŝi eksidis sur la balkono, lokmetis sian desegn-albumon kaj sian farboskatolon, kaj baldaŭ Gideonu aŭdis ŝin kanti dum sia laboro. Nur de tempo al tempo, ŝia kanto interrompiĝis. Estis kiam Julia ne plu

retrovis en sia memoro, iun el tiuj agrablaj receptetoj kiuj servas por la praktikado de la akvarelarto, aŭ almenaŭ kiuj servis por ĝi en nia bona malnova tempo; ĉar oni diris al mi ke la nuntempaj junaj knabinoj emancipiĝis el ĉi tiuj receptoj al kiuj dek generacioj de iliaj patrinoj kaj avinoj fidele sin submetis; sed Julia, kiu verŝajne studis sub Fosulo, ankoraŭ estis de la malnova skolo.

Gideon, dum tiu tuta tempo, staris malantaŭ la pordo, timante moviĝi, timante spiri, timante pensi pri tio kio tuj okazos. Ĉiu minuto de lia malliberigo alportis al li plialtigon da problemoj kaj senhelpecoj. Almenaŭ li diris al si, kun dankemo, ke tiu ĉi speciala stadio de sia vivo ne povas eterne daŭri. Kaj li diris al si ke, kio ajn okazos al li poste (eĉ se temus pri la punlaborejo! li amare kaj cetere senpripense aldonis), li certe ne povos sin trovi maltrankviligita. Li rememoris ke, en la gimnazio, longaj mensaj adicioj ofte servis al li kiel rifuĝo kontraŭ la enuo de la punstaro aŭ de la malluma ĉambro, kaj ĉi-foje ankoraŭ, li provis sin distri senfine adiciante la ciferojn du al ĉiuj nombroj formitaj de la antaŭaj adicioj.

Tiel sin okupis ĉi tiuj du gejunuloj, Gideon rezolute plenumanta siajn adiciojn, Julia vigle demetanta sur sian albumon farbojn kiuj ĝemis pro sin trovi kunigataj, kiam Providenco sendis en iliajn akvojn vaporŝipon kiu, blovante, kontraŭflue iris la Tamizoⁿ. Ĉie laŭlonge de la bordoj la akvo ŝveliĝis kaj refalis, la kanoj susuris; la pavilono mem, tiu malnova ŝipo delonge kutimita al ripozo, subite reakiris sian iaman vojaĝan humoron, kaj ekplenumis malfortan tangadon. Poste la vaporŝipo pasis, la ondoj glatiĝis, kaj Gideon subite aŭdis krion eligitan de Julia. Rigardante tra la fenestro, li vidis la junan fraŭlinon staran sur la balkono, okupata sekvi per la okuloj sian kanoton kiu, forportata de la fluo, reiris al la jakto. Kaj mi devas diri ke la advokato, ĉi-okaze, montris

mensan rapidecon indan je sia heroo, Roberto Skilo. Per unu menso-streĉo li antaŭvidis tion kio tuj sekvos; per unu sola movo de sia korpo, li sin ĵetis planken, kaj sin kaŝis sub la tablo.

Julia siaflanke ne plene komprenis la gravecon de sia situacio. Ŝi ja vidis ke ŝi perdis la kanoton, kaj ŝi ne maltrankviliĝis pro sia venonta intervidiĝo kun S^{ro} Florkampo; sed ŝi ne timis povi eliri el la pavilono, ĉar ŝi konis la ekziston de la levponta tabulo ebliganta aliron al la riverbordo.

Ŝi ĉirkaŭiris la balkonon, sed por trovi la pavilonpordon malfermita, kaj la tabulon forigita. El tio, ŝi konkludis kun certeco ke Ĵimsono certe alvenis, kaj do sin trovis en la pavilono. Ĉi tiu Ĵimsono devis certe esti tre timema viro, ĉar li suferis tian invadon de sia loĝejo sen fari ajnan signon. Kaj ĉi tiu penso kreskigis la kuraĝon de Julia, ĉar nun, la juna fraŭlino nepre devis peti helpon de la muzikisto, la tabulo estanta tro peza por ŝia solaj fortoj. Do ŝi frapis al la malfermita pordo. Poste ŝi denove frapis.

- Sinjoro Ĵimsono, ŝi kriis, venu, mi petegas vin !
Necesas ke vi venu, frue-malfrue, ĉar mi ne povas eliri de ĉi tie sen via helpo ! Nu, ne estu tiom malplaĉa ! Venu, mi petegas vin !

Sed ankoraŭ neniun respondon.

"Se li ĉeestas, certe li estas freneza !" ŝi diris al si kun malforta tremeto. Sed poste ŝi pensis ke li eble iris promeni per boato, kiel ŝi mem faris. Tiukaze, ĉar ŝi nepre devis atendi, ŝi tre bone povis viziti la kajuton : post tio, sen plia pripenso, ŝi eniris. Kaj mi ne bezonas diri ke, sub la tablo, kie li kuŝis en la polvo, Gideon sentis ke lia koro ĉesis bati.

Unue, Julia ekvidis la restaĵojn de la matinmanĝo de Ĵimsono. "Pasteĉo, fruktoj, kukoj ! ŝi pensis. Li manĝas agrablajn aferojn ! Mi certas ke li estas ĉarma viro. Mi scivolas ĉu li aspektas same bone kiel S^{ro} Forsiso ? S^{ino}

Ĵimsono, mi ne opinias ke tio sonas tiel bone kiel S^{ino} Forsiso ! Sed, aliflanke, estas tiu antaŭnomo de Gideonono kiu vere estas malbelega ! Ho ! Kaj jen ankaŭ iom da lia muziko ! Ĝi estas ĉarma ! *Orange Pekoe*⁽⁵⁾, estis do tio kiun la maljuna bonulo nomis specon de teo !" Kaj Gideonono aŭdis etan ridon. "Adagio molto espressivo, siempre legato"⁽⁸⁾, ŝi poste legis (ĉar mi forgesis diri al vi ke Gideonono estis tre sufiĉe dotita por la tuta literatura parto de la metio de komponisto). "Kiel estas originale, doni ĉiujn ĉi indikojn kaj skribi nur du aŭ tri notojn ! Ho ! Sed jen folio sur kiu ili estas pli multe ! Patosa andanto". Kaj ŝi komencis ekzameni la muzikon. "Dio mia, ŝi diris al si, ĉi tio devas esti terure moderna, kun ĉiuj ĉi bemoloj ! Ni iom rigardu la arion ? Estas strange, sed ŝajnas al mi koni ĝin ! Ŝi komencis zumi ĝin, kaj subite eksplodis per rido. "Sed ĝi estas *Tomi, movu vin por via onklo !*" ŝi laŭte ekkriis, plenigante per elreviĝo la animon de Gideonono. "Kaj Patosa andanto, kaj sep bemoloj ! Ĉi tiu homo certe estas simpla trompanto !"

En la sama momento alvenis al ŝi, de sub la tablo, konfuza kaj stranga bruo, kiel tiu kiun farus kokino kiu ternus; kaj ĉi tiu terno estis sekvata de la bruo de ekbato, kvazaŭ io frapintus la tablon; kaj la ekbato mem estis sekvata de obtuza grumblado.

Julia fuĝis al la pordo; sed tien alveninta, ŝi turnis sin, decidiĝanta spiti la danĝeron. Neniu postkuris ŝin. Nur la bruoj daŭris. Sub la tablo, io sin forlasis al nedefinita vico da ternoj : kaj jen ĉio !

"Certe, pensis Julia, tio estas tre stranga konduto ! Ĉi tiu Ĵimsono ne povas esti mondumano !"

La unua terno de la juna advokato konfuzis en sia antaŭa ripozo la sennombrajn polvojn kiuj dormetadis sub la tablo : nune grava tus-atako postvenis la ternadojn.

8 Latina esprimo por muziko kiu signifus "Tre esprimplena adaĝo, ĉiam ligata"

Julia komencis senti iom da kompato.

- Mi timas ke vi vere ne bone fartu ! ŝi diris iom alproksimiĝante. Mi petegas vin, ne plu longe restu sub ĉi tiu tablo, sinjoro Ĵimsono ! Vere, tio estas malsaniga por vi.

La majstro respondis nur per aflikta tuso. Sed ekde la sekvan momenton, la kuraĝega junulino estis surgenuje antaŭ la tablo, kaj la du kapoj sin trovis vizaĝo kontraŭ vizaĝo.

- Potenca Dio ! ekkriis fraŭlino Hazeltino saltege rektigante sin. S^{ro} Forsiso kiu freneziĝis !

- Mi ne estas freneza ! diris la junulo kompatinde elŝoviĝante el sia kaŝejo. Tre kara fraŭlino Hazeltino, mi ĵuras al vi, surgenuje, ke mi ne estas freneza !

- Vi estas freneza ! ŝi ekkriis tute anhelanta.

- Mi scias, li diris, ke ĉe hasta okulo mia konduto povas ŝajni eksterordinara !

- Se vi ne estas freneza, via konduto estis monstra, ekkriis la juna junulino ruĝiĝante, kaj pruvis ke vi eĉ ne iom zorgis pri miaj turmentoj !

- Mi scias... mi konsentas pri tio ! diris Gideon kuraĝe.

- Tio estis abomena konduto ! insistis Julia.

- Mi scias ke ĝi certe ŝancelis vian estimon al mi ! respondis la advokato. Sed, kara fraŭlino Hazeltino, mi petegas vin aŭdi min ĝis la fino ! Mia agmaniero, kiel ajn stranga ĝi ŝajnas, tamen ne estas nekapabla de klarigo. Kaj la fakto estas ke mi ne volas kaj ne povas plu ekzisti sen... sen la estimo de homo kiun mi admiras... La momento estas malbone elektita por paroli pri tio, mi ja sentas tion, sed mi ripetas mian esprimon : sen la estimo de la sola homo kiun mi admiras !

Ekbrilo de kontentiĝo aperis sur la vizaĝo de fraŭlino Hazeltino.

- Tre bone ! ŝi diris. Ni eliru el tiu ĉi malvarma kaverna, kaj ni iru sidiĝi sur la balkono... Tien ! Kaj nun, ŝi

daŭrigis sidiĝante, parolu ! Mi volas scii ĉion !

Ŝi levis la okulojn al la junulo; kaj vidante lin stara antaŭ ŝi kun tute konfuzita mieno, la kortuŝita infano eksplodis per rido. Ŝia ridado estis tre taŭga afero por ĉarmi la koron de amanto. Ĝi malpeze sonis sur la rivero, kiel kanto de birdo, pli for ripetita de la eĥoj de la riverbordo. Kaj tamen estis estulo kiun ĉi tiu ridado ne gajigis; tiu ĉi estulo estis la malbonsorta admiranto de la juna fraŭlino.

- Fraŭlino Hazeltino, li diris per ĉagrenita voĉo, Dio scias ke mi parolas al vi sen malbona volo; sed mi opinias ke vi montras en ĉio ĉi multe da senzorgeco !

Julia larĝe malfermis al li la okulojn.

- Mi ne povas repreni la vorton ! li diris. Jam vi faris al mi doloregan suferon kiam mi aŭdis vin antaŭ nelonge babili kun la maljuna fiŝkaptisto. Vi elmontris scivolon pri Ĵimsono...

- Sed Ĵimsono fine esti vi mem ! kontestis Julia.

- Ni akceptu tion ! ekkriis la advokato; sed, antaŭ momento, vi ne sciis tion ! Kiu estis por vi Ĵimsono ? Por kio li povis interesi vin ? Fraŭlino Hazeltino, vi ŝiris al mi la koron !

- Ho ! Ne kredinde, tio ĉi transpaŝas la mezuron ! severe rebatis Julia. Kio ? Post esti konduinta per la plej eksterordinara maniero, vi pretendas esti kapabla klarigi al mi vian konduton, kaj jen ke, anstataŭ klarigi ĝin, vi komencas insulti min !

- Fakte ja ! respondis la kompatinda Gideon. Mi... mi tuj ĉion konfidis al vi ! Kiam vi konos la tutan historion, vi povos pardoni min.

Kaj, sidiĝante apud ŝi sur la benkon, li disvastigis antaŭ ŝi sian mizeran rakonton.

- Ho ! Sinjoro Forsiso, ŝi ekkriis kiam li finis, mi tiom forte bedaŭras mian ridon antaŭ momento ! Vi estis tre

ridiga, tio certas; sed mi certigas al vi ke mi bedaŭras esti ridinta !

Kaj ŝi etendis sian manon, kiun Gideono tenis en sia.

- Ĉio ĉi ne donos al vi tro malbonan opinion pri mi ? li tenere demandis.

- La fakto ke vi havas tiom da problemoj kaj mizeroj ? Ne, kompreneble, sinjoro, ne ! ŝi ekkriis.

Kaj, en la ardo de sia movo, ŝi etendis al li sian alian manon, kiun li ankaŭ ekprenis.

- Vi povas kalkuli je mi ! ŝi aldonis.

- Ĉu vere ? eligis Gideono. Nu ! Mi kalkulos je vi ! Mi konfesas ke la momento eble ne estas tre bone elektata por paroli pri ĉio ĉi ! Sed mi havas neniun amikon...

- Nek mi ankaŭ ! diris Julia. Sed ĉu vi ne pensas ke estu tempo por vi redoni al mi miajn manojn ?

- "*Là ci darem la mano !*"⁽⁹⁾ respondis la advokato. Lasu ilin al mi dum ankoraŭ unu minuto ! Mi havas tiom malmultajn amikojn ! li rekomencis.

- Mi pensis ke estis malbona situacio, por junulo, ne havi amikojn ! rimarkis Julia.

- Ho ! Sed mi havas amasojn da amikoj ! ekkriis Gideono. Ne estis tion kion mi volis diri ! Mi sentas ke la momento estas malbone elektata ! Sed, ho ! Julia, se nur vi povus vidi vin tia kia vi estas !

- Sinjoro Forsiso !...

- Ne nomu min per tiu aĉa nomo ! ekkriis la junulo. Nomu min Gideonoⁿ !

- Ho ! Neniam tio ! Lasis eligi Julia. Kaj plie estas ankoraŭ tiom malmulte da tempo ke ni konas unu la alian !

- Sed tute ne ! protestis Gideono. Estas tre longa tempo de kiam ni renkontiĝis en Burnmuto ! Neniam de tiam mi forgesis vin ! Diru al mi ke ankaŭ vi neniam forgesis min !

9 Latina esprimo kiu signifus "Tie ni kunigos la manojn".

Diru al mi, ke vi neniam forgesis min, kaj nomu min Gideonon !

Kaj ĉar la junulino ne respondis :

- Jes, Julia mia, li rekomencis, mi scias ke mi estas nur azeno, sed mi deziras vin konkeri ! Mi havas inferan aferon sur la brakoj, mi ne eĉ havas unu speson por mi, kaj mi min montris al vi antaŭ momento sub la plej ridinda aspekto; kaj tamen, Julia, mi estas rezoluta vin konkeri ! Bone rigardu min en la vizaĝon, kaj diru al mi ke vi malpermesas tion al mi, se vi kuraĝas !

Ŝi rigardis lin; kaj, kion ajn ŝiaj okuloj diris al li, ilia mesaĝo certe ne estis malagraba por li, ĉar li longe restis tute okupata legi ĝin.

- Kaj eĉ, li diris fine, atendante ke mi sukcesu riĉiĝi, onklo Eduardo donos al ni monon por nia mastrumado !

- Ha ! Nu, ĉu vere, ĉi tiu estas nekredebla ! diris forta voĉo malantaŭ lia ŝultro.

Gideonon kaj Julia disiĝis unu de la alia pli rapide ol se elektra risorto disigintus ilin; sed ambaŭ prezentis strange kolorajn vizaĝojn antaŭ la okuloj de S^{ro} Eduardo Hugo Florkampo.

Tiu ĉi maljuna ĝentlemano, vidante la vagan barkon alveni, imagis diskrete veni ĵeti ekrigardon al la akvarelo de fraŭlino Hazeltino. Sed jen ke, per unu ŝtonĵeto, li kaptis du birdojn; kaj lia unua impulso estis por koleriĝi, tio kio cetere estis lia natura inklino. Sed baldaŭ, vidante la ruĝiĝantan kaj timigata juna paro, lia koro konsentis mildiĝi.

- Perfekte, ĉi tiu estas nekredebla ! li ripetis. Vi certe ŝajnas kalkuli je via onklo Eduardo ! Sed nu, Gideonon, mi kredis esti dirinta al vi stari tute for de ni ?

- Vi diris al mi stari for de Mejdnehedo ! respondis Gideonon. Sed kiel mi povis antaŭvidi retrovi vin ĉi tie ?

- Estas iom da vero en tio kion vi diras ! konfesis S^{ro} Florkampo. Estas ĉar, vi vidas, mi opiniis ke estus

preferinde kaŝi nian veran celokon, eĉ de vi ! Tiuj dubindaj friponoj, la Finsinko^j, estintus kapablaj ĝin perforte forkapti de vi. Kaj estas ankoraŭ por malsukcesigi ilin ke mi hisis sur mia jakto ĉi tiun abomenan fremdan flagon ! Sed tio ne estas ĉio, Gideonono ! Vi promesis eklabori : kaj mi retrovas vin ĉi tie, en Padŭiko, ludantan idioton !

- Mi petegas, sinjoro Florkampo, ne estu tro severa kontraŭ S^{ro} Forsiso ! plorpetis Julia. La kompatinda knabo estas en terura embaraso !

- Kio do estas, Gideonono ? demandis la onklo. Ĉu vi batalis ? Aŭ ĉu ĝi estas fakturo por pagi ?

Tiuj ĉi du alternativoj resumis, en la menso de la maljuna radikalulo, ĉiujn malfeliĉojn povantajn trafi ĝentlemanon.

- Bedaŭrinde ! Onklo mia, diris Gideonono, estas eĉ pli malbona ol tio ! Kombinaĵo de cirkonstancoj el vere... vere providenca maljusteco ! La fakto estas ke sindikato de murdistoj estas rimarkinta, mi ne scias kiel, mian virtualan lertecon por forigi de ilin la spurojn de iliaj krimoj ! Ĝi estas tamen omaĝo farita al miaj kapablecoj de legĥisto, komprenu !

Post tio, Gideonono, duafoje ekde unu horo, detale ekrakontis la aventurojn de la granda Erardo.

- Necesas ke mi skribu tion al *La Tempo* ! ekkriis S^{ro} Florkampo.

- Ĉu vi do volas ke mi estu malkvalifikita ? demandis Gideonono.

- Malkvalifikita ! Ba, estu sen timo ! diris lia onklo. La ministerio estas liberala ! Certe ĝi ne rifuzos aŭskulti min ! Dank' al Dio, la tagoj de regado *Tori* finiĝis !

- Ne, tio ne taŭgos ! Onklo mia, diris Gideonono.

- Sed ĉu vi ne estas sufiĉe freneza por persiste voli mem forigi ĉi tiun kadavron ? ekkriis S^{ro} Florkampo.

- Mi ne vidas alian eliron antaŭ mi ! diris Gideonono.

- Sed tio estas sensenca, kaj mi ne povas aŭdi paroli pri tio! rekomencis S^{ro} Florkampo. Mi favore ordonas al vi, Gideon, rezigni ĉi tiun kriman enmiksiĝon!

- Tre bone! diris Gideon, tiuokaze, mi transdonas al vi la aferon, por ke vi faru per la kadavro tion kio ŝajnos al vi bona!

- Al Dio malplaĉu! ekkriis la prezidanto de la radikala klubo. Mi volas nenion por implikiĝi en ĉi tiu abomeno!

- Tiaokaze, necesas ja ke vi lasu min fari kiel eble plej bone por forigi ĝin de mi! rebatis lia nevo. KREDU min, tio estas la plej racia decidiĝo!

- Ĉu ni ne povus sekrete demetigi la kadavron ĉe la konservativa klubo? sugestis S^{ro} Florkampo. Kun bonaj artikoloj kiujn ni poste skribigus en niaj radikalaj gazetoj, tio estus vera servo por helpi la nacion!

- Se vi vidas politikan profiton por eltiri el mia... objekto! diris Gideon, des pli da kialo ke mi cedu ĝin al vi!

- Ho! Ne! Ne! Gideon! Ne, mi pensis ke vi eble kapablas entrepreni ĉi tiun operacion. Kaj mi eĉ aldonas ke, ĉion bone pripensite, mi opinias ke estus treege senutile ke fraŭlino Hazeltino kaj mi plilongigu nian restadon ĉi tie apud vi! Oni povus vidi nin! daŭrigis la respektinda prezidanto, rigardante dekstren kaj maldekstren kun malfido. Vi komprenas, kiel publika homo, mi havas apartajn antaŭzorgojn por preni! Kompromiti min estus kompromiti la tutan partion! Kaj plie, ĉiel, la vespermanĝo proksimiĝas!

- Kio? ekkriis Gideon konsultante sian poŝhorloĝon. Jes ja, estas vere! Sed, granda Dio! La piano devus esti ĉi tie ekde horoj!

S^{ro} Florkampo jam sin direktis al sia barko; sed post ĉi tiuj vortoj li haltis.

- Jes! reparolis Gideon; mi mem vidis la pianon alveni al la stacidomo Padŭiko. Mi mem sciigis al la kamionisto ke li

alportu ĝin ĉi tien. Li diris al mi ke li unue havis alian taskon por fari, sed ke li certe estos ĉi tie plej malfrue je la kvara. Ne estas dubo, la piano estis malfermita kaj oni trovis la korpon !

- Necesas ke vi tuj fuĝu ! asertis S^{ro} Florkampo. Tio estas, ĉikaze, la sola konduto inda je homo !

- Sed ni supozu ke mi eraras ! ĝemis Gideon. Ni supozu ke la piano alvenos, kaj ke mi ne ĉeestos por ricevi ĝin ! Mi estos la unua viktimo de mia malkuraĝo ! Ne, onklo mia : necesas ke ni iru informiĝi al Padŭiko ! Kompreneble, mi ne povas zorgi pri tio : sed vi, nenio malebligas vin fari tion. Nenio malhelpas vin iri iom vagi ĉirkaŭ la policejon, ĉu vi komprenas ?

- Ne, Gideon, ne, kara nevo mia ! diris S^{ro} Florkampo per la voĉo de forte embarasita homo. Vi scias ke mi sentas al vi la plej sinceran korinklinon. Kaj mi miaflanke scias ke mi havas la ŝancon esti anglo, kaj ĉiujn devojn kiujn trudas al mi ĉi tiu titolo. Sed ne, ne la polico, Gideon !

- Tiel vi ellasas min ? demandis Gideon. Diru tion sincere !

- Tute male, infano mia ! Vere tute male ! protestis la malfeliĉa onklo. Mi limigas min proponi singardemon. La komuna saĝo, kara Gideon mia, ĉiam devas esti la gvidilo de vera anglo !

- Ĉu vi permesos al mi diri mian opinion ? sin intermetis Julia. Mia opinio estas ke Gideon... mi volas diri S^{ron} Forsisoⁿ... pli bone farus eliri el ĉi tiu forloga pavilono, kaj iri atendi tien sub la salikojn. Se la piano alvenos, S^{ro} Forsiso povos proksimiĝi kaj enirigi ĝin. Kaj se, male, estos la polico kiu venos, li povos enŝipiĝi sur nian jakton; kaj ne plu estos S^{ro} Ĵimsono ! Sur la jakto, estos nenio por timi ! S^{ro} Florkampo estas tiel respektinda homo kaj tiel eminenta moŝtulo ke neniu iam povos imagi ke li implikiĝis en tia afero !

- Ĉi tiu junulino havas multege da saĝo ! deklaris la prezidanto de la radikala klubo.

- Jes, sed se mi vidos alveni nek pianon nek policanon, demandis Gideonon, kion mi tiukaze devos fari ?

- Tiukaze, diris Julia, vi iros al la vilaĝo kiam nokto estos tute nigra. Kaj mi iros kun vi ! Kaj mi estas tute certa ke neniu pensos suspekti vin. Sed eĉ se iu suspektus vin, mi zorgus komprenigi lin ke li eraris.

- Jen tio kion mi ne povas permesi ! Mi ne povas permesi ke fraŭlino Hazeltino iru kun vi ! ekkriis S^o Florkampo.

- Kaj kial do ? demandis Julia.

Nu S^o Florkampo tute ne inklinis diri al ŝi kial, ĉar lia vera motivo estis ke li timis esti mem, implikata en la labirinto. Sed, laŭ la ordinaran taktikon de la homo kiu hontas pri si, li arogante reagis :

- Ne plaĉu al Dio, kara fraŭlino Hazeltino mia, ke mi daktu al bonedukita junulino la preskribojn de konveneco ! li komencis. Sed finfine...

- Ho ! Ĉu estas nur tio ? interrompis Julia. Nu ! Do ni iru al Padŭiko ĉiuj tri kune !

- Trafita ! malgaje pensis la maljuna radikalulo.

Ĉapitro XII

Kie la granda Erardo lastfoje aperas (nerevokeble).

Oni plezure diras ke la angloj estas popolo sen muziko. Sed, por ne paroli pri la escepta favoro konsentita de ĉi tiu popolo al la virtuloj pri gurdo, almenaŭ estas unu instrumento kiun ni povas konsideri kiel nacian laŭ plena senco de la vorto : ĝi estas, nome, la flaĝoleto, komune nomata la unu-spezan fajfilon. La juna paŝtisto de la erikejo, jam muzikemulo en la tempo de niaj plej maljunaj poetoj, vekas (kaj eble afliktas) la alaŭdon per sia flaĝoleto. Kaj mi volus ke iu citu al mi unu sola brikisto ne scipovanta ludi, per la unuspeza fajfilo, *la Anglajn Grenadistojn aŭ la Maturan Ĉerizon*. Ĉi tiu lasta ario estas, verdire, la klasika peco de la ludanto de flaĝoleto, tiel ke mi ofte demandis al mi ĉu ĝi ne estis origine konceptita por ĉi tiu instrumento. Ĉiukaze Anglio estas la nura lando en la mondo kie tre granda nombro da homoj kapablas perludi sian vivtenon simple per sia talento por ludi la flaĝoleton, kaj eĉ por ludi per ĝi nur unu arion, la neeviteblan *Maturan Ĉerizon*.

Sed, aliflanke, oni devas rekoni ke la flaĝoleto estas instrumento, se ne mistera, almenaŭ ĉirkaŭita de dika tavolo de mistero. Kial, ekzemple, oni nomas ĝin la unuspezan fajfilon, dum mi ne vidas ke iu iam ricevis iu el ĉi tiuj instrumentoj por unu spezo ? Oni foje nomas ĝin ankaŭ la "stanan fajfilon"; kaj tamen, aŭ mi ege eraras, aŭ stano tute ne havas lokon en ĝia konsisto. Kaj fine, mi ŝatus scii en kiu malklara katakombo, en kiu dezerto neatingebla de la homa orelo, okazas la lernado de la ludanto de flaĝoleto ? Ĉiu el ni aŭdis homojn lernantajn pianon, violonon aŭ ĉaskornon; sed la lernanto de la flaĝoleto eskapas el nia observado. Neniam ni

aŭdas lin antaŭ ol li atingis plenan majstradon.

Des pli rimarkinda estis la fenomeno kiu okazis, dum kelka vespero de oktobro, sur vojo trairanta verdan herbejon, ne for de Padŭiko. Sur la seĝo de granda kovrita ĉaro, sidis junulo el modesta aspekto (kaj iom stulta, ni diru la vorton !); la bridoj mole ripozis sur liaj genuoj; la vipo kuŝis malantaŭ li, ene de la ĉaro; la ĉevalo antaŭeniris sen bezoni aŭ stirado aŭ kuraĝigo; kaj la juna koĉero, forportita en sferon pli altan ol tiu de siaj ĉiutagaj okupoj, kun la okuloj levitaj al la ĉielo, tute sin dediĉis al flaĝoleto en D, tute novega, el kiu li pene klopodis eltiri la agrablan melodion de *La Plugisto*. Kaj vere, por observanto kiun la hazardo estus alkondukinta sur ĉi tiun herbejon, ĉi tiu momento estintus neforgesebla intereso. "Finfine, li povintus diri al si, finfine jen la komencanto de la flaĝoleto !" La bona kaj stulta junulo (kiu estis nomita Harkero, kaj estis dungito ĉe luigisto de veturiloj en Padŭiko) ĵus deknaŭafoje sin mem bisis, kiam li dronis en staton de granda konfuzo konsciante ke li ne estis sola.

- Brave ! ekkriis vira voĉo de la rando de la vojo. Jen kiu estas benefika por aŭdi ! Eble nur iom pli da malmildeco en la rekantaĵo ! sugestis la voĉo per kompetenta tono. Nu, ankoraŭ unu fojon !

El la profundo de sia humiliĝo, Harkero ekzamenis la viron kiu ĵus parolis. Li vidis fortikan kvardekjaraĝan knabegon, bruligitan de la suno, razitan, kaj kiu eskortis la ĉaron per tute milita paŝado, turnante klabon en sia mano. Liaj vestoj estis en tre malbona stato; sed li ŝajnis pura kaj plena de digno.

- Mi estas nur kompatinda komencanto, murmuris la malfeliĉa Harkero, mi ne kredis ke iu aŭdis min !

- Nu ! Vi tiel plaĉas al mi ! diris la viro. Vi eble komencas iom malfrue, sed tio ne estas malbono. Nu, mi

mem iom helpos vin ! Faru lokon por mi apud vi !

Ekde la sekva momento, la viro kun milita aspekto sidis sur la sidloko, tenis en la mano la flaĝoleton. Li unue skuis la instrumenton, malsekigis la buŝaĵon, laŭmaniere de spertaj artistoj, ŝajnis atendi inspiron de supre, kaj fine sin riskis en *La Knabino kiun mi forlasis malantaŭ mi*. Lia ludado eble mankis iom da delikateco; li ne kapablis doni al la flaĝoleto tiun subtilan dolĉecon kiu, en iaj manoj, faras per li la indan samvaloraĵon de la arbaraj birdoj. Sed pri la ardo, la rapideco kaj la fluanta facileco de ludado, li estis senrivala. Kaj Harkero aŭskultis lin per ĉiuj siaj oreloj. *La Knabino kiun mi forlasis malantaŭ mi*, unue plenigis lin per malespero, konsciigante lin pri sia propra malsupereco. Sed poste, *La Plezuro de la Soldato* forprenis lin, supre de ĵaluzo, ĝis la plej nobla entuziasmo.

- Viavice ! diris al li la viro kun milita aspekto, prezentante al li la flaĝoleton.

- Ho ! Ne, ne post vi ! ekkriis Harkero. Vi estas artisto !

- Tute ne ! modeste respondis la fremdulo, simpla amatoro, same kiel vi. Kaj mi tuj diros al vi pli bone ol tio ! Mi havas mian propran manieron ludi la flaĝoleton; vi havas alian manieron, kaj mi preferas la vian ol la mian. Sed, vi vidas, mi komencis kiam mi estis ankoraŭ knabo, antaŭ ol mi formi al mi la guston ! Nu, denove reludu al ni tiun arion ! Kiel do tio estis ?...

Kaj li afektis fari grandan strebon por memori *La Plugiston*.

Timema (kaj cetere sensenca) espero ŝprucis en la brusto de Harkero. Ĉu tio eblis ? Ĉu vere estis "io" en lia ludmaniero ? La fakto estas ke li mem, kelkfoje, havis la impreson de ia poezia riĉeco, en la sonoj kiujn li elsendis. Ĉu hazarde, li estus geniulo ? Kaj, dum li metis al si tiun ĉi

demandon, la fremdulo vane plu serĉis, sen sukcesi trovi la arion de *La Plugisto*.

- Ne ! fine diris la kompatinda Harkero. Tio ne estas ĝuste tio ! Jen, jen kiel tio komenciĝas !... Ho ! Nur por montri al vi !

Kaj li prenis la flaĝoleton inter siaj lipoj. Li ludis la tute kompletan arion, poste duan fojon, poste trian; lia kunulo denove provis ludi ĝin, kaj denove malsukcesis. Kaj kiam Harkero komprenis ke li, la timema komencanto, estis donanta veran lecionon al ĉi tiu sperta flutisto, kaj ke ĉi tiu flutisto, sia lernanto, ankoraŭ ne kapablis egali lin, kiel mi diru al vi per kiaj gloraj radioj ilumiĝis por li la kamparo kiu ĉirkaŭis lin ? Kiel, krom se la leganto estas mem amatora flutisto, kiel mi povas komprenigi al li la gradon de idiota vanteco kiun atingis la malfeliĉa knabo ? Sed, cetere, unu sola fakto sufiĉos por bildigi la situacion : de tiam estis Harkero kiu ludis, kaj lia kunulo kontentiĝis aŭskulti kaj aprobi.

Aŭskultante, li tamen ne forgesis tiun kutimon de milita singardemo kiu konsistas en tio, ĉiam rigardi antaŭ kaj malantaŭ si. Li rigardis malantaŭ si, kaj kalkulis la valoron de la diversaj pakaĵoj kiujn enhavis la ĉaro, penante diveni la enhavon de la multnombraj pakaĵoj envolvitaj de griza papero, de la dikegan korbon, de la keston el blanka ligno; kaj dirante al si ke la granda piano, zorge pakita en sia tute nova kesto, povus fine esti sufiĉe bona afero, se ne estis, pro ĝia amplekso, konsiderenda malfacileco uzi ĝin. Kaj la fremdulo rigardis antaŭ si, kaj li videtis, en angulo de la herbejo, etan kamparan drinkejon tute ĉirkaŭitan de rozoj. "Vere, mi tuj almenaŭ provos la insidon !" li konkludis. Kaj tuj li proponis glason da brando.

- Estas ke... mi ne estas drinkulo ! diris Harkero.

- Aŭskultu min ! interrompis lia kunulo. Mi tuj diros al

vi kiu mi estas ! Mi estas serĝento Brulmarko, el la kolonia armeo. Tio sufiĉos al vi por scii ĉu mi estas aŭ ne drinkulo !

Eble la revelado de la serĝento Brulmarko ne estis tiel signifa kiel li supozis tion. Kaj estas en tia cirkonstanco ke la ĥoro de grekaj tragedioj povintus avantaĝe interveni por rimarkigi al ni ke la parolado de la nekonatulo klarigis al ni nur tre nesufiĉe tion kion ĉifonvestita serĝento de la kolonia armeo devis fari, vespere, sur vilaĝa vojo. Neniu pli bone ol tiu ĉi koruso donintus al ni por kompreni ke, tutverŝajne, la serĝento Brulmarko jam antaŭ kelka tempo rezignis la grandan laboron de nacia defendo, kaj, tutverŝajne, devis nun sin forlasi al la tre persona industrio de la marodado kaj la domŝtelado. Sed ne ĉeestis greka koruso en ĉi tiu loko; kaj la batalisto, sen aliaj aŭtobiografiaj klarigoj, kontentiĝis konstati ke estis du tre malsamaj aferoj, regule ebriiĝi kaj tintigi glasojn kun amiko.

En la drinkejo *La Blua Leono*, la serĝento Brulmarko prezentis al sia nova amiko, S^{ro} Harkero, grandan nombron da geniaj miksaĵoj destinitaj por malhelpi la alproksimiĝon de ebriiĝo. Li klarigis al li ke la uzo de ĉi tiuj miksaĵoj estas necesega en la regimento ĉar, sen ili, ne eĉ unu oficiro estus en stato de sufiĉa sobreco por partopreni, ekzemple, en la ĉiusemajnajn revuojn. Kaj la plej efika el ĉi tiuj miksaĵoj estis kombini pindon da dolĉa elo kun kvar spesoj da aŭtenta ĝino. Mi esperas ke, eĉ en la civila vivo, mia leganto kapablos tiri profiton el ĉi tiu recepto, por si mem aŭ por amiko; ĉar la efiko kiun ĝi produktis al S^{ro} Harkero, estis vere tiu de revolucio. La brava knabo devis esti suprenlevita sur sian sidlokon, kie li de tiam montris spiritan inklinon tute dividatan inter rido kaj muziko. Tial la serĝento sin trovis tute nature pelita preni la bridojn de la veturilo. Kaj, sendube, kun la poezia humoro de ĉiuj artistoj, li havis tute apartan inklinon al la plej solecaj belaĵoj de la angla pejzaĝo;

ĉar, post kiam la ĉaro vojaĝis dum kelka tempo sub lia stirado, senĉese la vojoj kiujn ĝi sekvis estis pli senhomaj, pli ombraj, pli foraj de trafikataj stratoj.

Cetere, por doni al vi ideon pri la meandroj kiujn sekvis la ĉaro, sub la veturigado de la serĝento, mi devus ĉi tie publikigi topografian mapon de la grafejo **Mezsaksio**, kaj ĉi tiu speco de mapo bedaŭrinde estas tre multekosta por reprodukti. Sufiĉu do al vi ekscii ke, iom da tempo post la noktiĝo, la ĉaro haltis meze de arbaro, kaj ke tie, kun tenera zorgado, la serĝento levis el inter la pakaĵoj kaj demetis sur amason da sekaj folioj, la senvivan formon de la juna Harkero.

"Kaj se vi vekiĝos antaŭ morgaŭ matene, infaneto mia, pensis la serĝento, estos iu kiu estos tre surprizata !"

El ĉiuj poŝoj de la dormanta ĉaristo, li milde eltiris tion kion ili enhavis, tio ĉefe estis sumon de dek sep ŝilingoj kaj ok pencoj⁽³⁾. Post tio, regrimpane sur la sidlokon, li ekirigis la ĉevalon. "Se nur mi iom scius kie mi estas, tio estus tre bona ŝerco ! li diris al si. Cetere, jen kurbiĝo !"

Li turnis ĝin, kaj sin trovis sur la bordo de Tamizo. Je cent paŝoj de li, la lumoj de jakto gaje brilis; kaj tute proksime de li, tiel proksime ke li ne povis revii ne esti vidata. Tri personoj, unu sinjorino kaj du sinjoroj, senhezite iris renkonte al li. La serĝento hezitis dum sekundo; poste, fidante al la mallumo, li antaŭeniris. Tiam unu el la du viroj, kiu estis el la plej impona aspekto, antaŭenpaŝis meze de la vojo kaj levis supren dikan irbastonon kiel signalon.

- Bravulo mia, li kriis, ĉu vi ne renkontis la veturilon de kamionisto ?

La serĝento Brulmarko ne mankis akcepti tiun ĉi demandon kun certa embaraso.

- Ĉu veturilon de kamionisto? li ripetis per necerta voĉo. Vere, ne, sinjoro !

- Ha ! eligis la impona ĝentlemano, flankenpaŝante por lasi la serĝenton preteriri. La sinjorino kaj la dua el la du viroj sin klinis antaŭen, kaj ŝajnis ekzameni la ĉaron kun la plej vigla scivolemo.

"Mi scivolas tion kion diable ili povas havi ?" pensis la serĝento Brulmarko. Li rapidigis sian ĉevalon, sed ne sen diskrete turniĝi ankoraŭfoje, tio kio ebligis al li vidi la triopon starantan meze de la vojo, kun la tuta ŝajno de aktiva pridiskuto. Tial oni ne miros ke, inter la artikulaciitaj gruntoj kiuj tiam eliris el la buŝo de la improvizita kamionisto, la vorto "polico" aperis ĉe la unua plano. Kaj Brulmarko vipis sian beston, kaj tiu ĉi, galopante kiel eble plej bone (tio kiu estis ankoraŭ nur tre relativa galopo), kuris direkte al Granda Hamerhamo. Iom post iom la bruo de la hufoj kaj la knarado de la radoj estingiĝis; kaj la silento ĉirkaŭis la staran triopon sur la riverbordo.

- Ĝi estas la plej strangege afero en la mondo ! ekkriis la pli maldika el la du viroj. Mi perfekte rekonis la ĉaron !

- Kaj mi vidis pianon ! diris la junulino.

- Certe estis la sama veturilo ! rekomencis la junulo. Kaj tio kio estas plej eksterordinara estas ke ne estis la sama koĉero !

- Devas esti la sama koĉero, Giĉjo ! deklaris la alia viro.

- Sed tiam, demandis Gideonono, kial li forkuris ?

- Mi supozas ke lia ĉevalo foriris per si mem ! sugestis la maljuna radikalulo.

- Sed tute ne ! Mi aŭdis la vipon bruegi kiel draŝilo ! diris Gideonono. Vere, ĉi tio superas la homan racio !

- Mi diros al vi kion ! fine ekkriis la junulino. Ni tuj postkuros kaj, (kiel oni nomas tion en la romanoj ?), sekvos lian spuron ! Aŭ pli ĝuste ni tuj iros en la direkton de kie li venis ! Tien devas esti iu kiu vidis lin kaj kiu povos informi nin !

- Jes, bonege, ni faru tion, estus nur pro la originaleco de la afero ! diris Gideon.

La "originaleco de la afero" sendube konsistis, por li, en tio ke tiu ĉi paŝado permesis al li senti sin tute proksima al fraŭlino Hazeltino. Pri onklo Eduardo, tiu ĉi ekskursaj projekto senfine malpli plaĉis al li. Kaj kiam ili estis farintaj kelkcent paŝojn, en la mallumo, sur senhoma vojo, inter muro ĉe iu flanko kaj fosaĵo ĉe la alia, la prezidanto de la radikala klubo donis signalon por ripozo.

- Tio kion ni faras, prezentas nenian sencon ! li diris.

Sed tiam, kiam ĉesis la bruo de iliaj paŝadoj, alia bruo atingis iliajn orelojn. Ĝi mistere eliris el la interno de la arbaro.

- Ho ! Kio ĉi tio estas ? ekkriis Julia.

- Mi havas nenian ideon ! diris Gideon ŝajnigante voli iri en la arbaron.

La radikalulo svingis sian irbastonon, kiel spadon.

- Gideon ! li komencis, kara Gideon mia...

- Ho ! Sinjoro Forsiso, mi petegas, ne antaŭenpasu ! eligis Julia. Vi ne scias tion kio ĝi povas esti ! Mi tiom timas por vi !

- Eĉ se estus la diablo mem, respondis Gideon liberigante, mi volas iri vidi kio tio estas !

- Neniun hastegon, Gideon ! kriis la onklo.

La advokato alpaŝis direkte al bruo, kiu fakte havis monstran naturon. Oni trovis miksitaj en ĝi la karakterizaj voĉoj de la bovino, de la sireno de ŝipo kaj de la moskito, sed ĉiuj tiuj kombinitaj laŭ la malplej natura maniero. Nigra maso, ne sen ia simileco kun homa formo, kuŝis inter la arboj.

- Estas viro, diris Gideon; estas nur viro ! Li dormas kaj ronkas ! Hola ! li aldonis post momento, li ne volas vekigi !

Gideon ekflamigis alumeton, kaj pro ĝia lumeto, li

rekonis la rufan kapon de la ĉaristo kiu promesis alporti al li la pianon.

- Jen mia viro, li diris, kaj ebriega kiel porko ! Mi komencas diveni tion kio okazintus !

Kaj li sciigis al siaj du kunuloj, kiuj nun kuraĝiĝis kuniĝi kun li, sian hipotezon pri la maniero laŭ kiu la ĉaristo estis kondukita disiĝi de sia ĉaro.

- La abomeninda brutulo ! diris onklo Eduardo. Ni skuu lin, kaj regalu lin per bastonadon kiun li meritas!

- Atentu ne fari tion, mi petegas vin ! diris Gideon. Ni ne devas deziri ke li vidu nin kune ! Kaj plie, vere, onklo mia, mi ŝuldas al tiu ĉi bravulo la plej viglan dankemon; ĉar ĉi tio estas la plej feliĉa afero el ĉio kio povis okazi al mi. Ŝajnas al mi, kara onklo Eduardo mia, ŝajnas al mi, verdire, ke jen mi liberigita !

- Liberigita de kio ? demandis la radikalulo.

- Sed de la tuta afero ! ekkriis Gideon. Ĉi tiu viro estis sufiĉe freneza por ŝteli la ĉaron, kun la piano kaj tio kion ĝi enhavis; tio kion li esperas fari kun ĝi, mi ne scias, kaj ne zorgas por scii tion. Miaj manoj estas liberaj ! Ĵimsono ĉesas ekzisti; ne plu de Ĵimsono ! Gratulu min, onklo Eduardo !... Julia, kara Julia mia, mi...

- Gideon ! Gideon ! eligis la onklo.

- Ho ! Ne estas damaĝo, onklo mia, ĉar ni baldaŭ edziniĝos ! diris Gideon. Vi ja scias ke vi mem diris tion al ni, antaŭ momento, en la pavilono !

- Ĉu mi ? demandis la onklo, tre surprizita, mi tute certas esti nenion dirinta similan !

- Petegu al li, ĵuru al li ke li diris tion, alvoku lian koron ! ekkriis Gideon alparolante al Julia. Li estas senegala en la mondo kiam li lasas sian koron paroli !

- Mia kara sinjoro Florkampo, diris Julia, Gideon estas tiel brava knabo, kaj li promesis al mi tiom plendi, kaj mi bone

vidas ke li faros tion ! Mi scias ke estas granda malfeliĉo ke mi ne havas monon ! ŝi aldonis.

- Onklo Eduardo havas ĝin por du, kara fraŭlino mia, kiel tiu juna fripono antaŭ momento diris al vi ! respondis la radikalulo. Kaj mi ne povas forgesi ke vi estis honte senigita je via riĉaĵo ! Do, dum neniu rigardas nin, kisu vian onklon Eduardoⁿ !... Koncerne vin, mizerulo, li reparolis, kiam tiu ĉi ceremonio estis dece plenumita, ĉi tiu ĉarma fraŭlino estas via, kaj tio certe estas multe pli ol vi meritas ! Sed nun ni rapidege reiru al la pavilono, poste ni varmigu la jakton kaj revenu al Londono !

- Jen tio kio estas perfekta ! ekkriis Gideon. Kaj morgaŭ ne plu estos Ĵimsono, aŭ ĉaro, aŭ piano ! Kaj kiam ĉi tiu bravulo vekigōs, li povos diri al si ke la tuta afero estis nur songō !

- Jes, diris onklo Eduardo, sed estos alia viro kiu havos tre malsaman vekigōn ! La knabo kiu ŝtelis la ĉaron, ekrimarkos ke li tro fanfaronis !

- Kara onklo mia, diris Gideon, mi estas feliĉa kiel reĝo, mia koro saltas kiel pilko, miaj kalkanoj estas malpezaj kiel plumoj; mi estas liberigita de ĉiuj miaj embarasoj, kaj mi tenas la manon de Julia en la mia ! En ĉi tiuj kondiĉoj, kiel mi trovus forton por havi malbonajn sentojn ? Ne, estas en mi loko nur por anĝela boneco ! Kaj kiam mi pensas pri tiu kompatinda malfeliĉa diablo kun sia ĉaro, estas tutkore ke mi ekkrias : "Dio helpu lin !"

- Amen ! respondis onklo Eduardo.

Ĉapitro XIII

La travivaĵoj de Maŭrico (dua parto).

Se nia literaturo konservintus siajn malnovajn tradiciojn de klasikaj sindetenemo kaj ĝentileco, mi ne malnobligus mian dignon de verkisto ĝis priskribi al vi la angoron de Maŭrico; ĉi tiu estas unu el tiuj temoj kiujn la intenseco mem de ilia realismo devus ekskluzivigi de artaĵo iom inda je tiu nomo. Sed la gusto hodiaŭ estas por tiaj temoj; la leganto ŝatas esti enkondukita en la plej sekretajn kaŝfaldojn de la animo de romana heroo, kaj nenio tiom plaĉas al li kiom la speктаĵo de iu tute sanga koro, elmontrita antaŭ li en sia nudeco. Eĉ ĉi tiu konsidero ne sufiĉus por decidiĝi min, se la fia temo kiun mi estas pritraktonta, ne havus krome la avantaĝon de eminenta moraliga efiko. Povu mia raporto malebligi nur eĉ unu el miaj legantoj senkonsidere perdiĝi en krimon, sen sufiĉe ĉirkaŭigi sin per antaŭzorgoj; kaj mi konscios ne esti vane laboranta!

La tagon post la vizito de Miĥaelo, kiam Maŭrico vekigis el profunda dormo de malespero, estis por konstati ke liaj manoj tremis, ke liaj okuloj malfacile malfermiĝis, ke lia gorgo brulis, kaj ke lia digesto estis paralizita. "Kaj tamen Dio scias ke ne estas pro esti multe manĝanta!" diris al si la malfeliĉulo. Post tio li ellitiĝis por pli klarvide pripensi pri sia situacio. Nenio povos pli bone bildigi al vi la malklarajn akvojn en kiuj navigis lia penso ol metoda raporto de la diversaj maltrankviloj kiuj stariĝis antaŭ li.

Tial, por la komforto de la leganto, mi ordigos laŭ nombro ĉi tiujn maltrankvilojn; sed mi ne bezonas diri ke, en la cerbo de Maŭrico, ili miksiĝis kaj kirliĝis ĉiuj kune kiel polva trombo. Kaj, ankoraŭ por la komforto de la leganto, mi

donos titolojn al ĉiu el ili. Bonvolu rimarki ke ĉiu el ili, per si mem, sufiĉus por certigi la sukceson de felietono !

Angoro n°1 : Kie estas la kadavro ? Aŭ la Mistero de Bento Fosulo. Tio de nun estis certa afero, por Maŭrico, ke Bento Fosulo apartenis al la plej nekonata speco de profesiuloj de la krimo. Homo eĉ minimume honesta ne tuŝintus la ĉekon; homo dotita per la plej eta dozo da humaneco ne silente akceptintus la tragikan enhavon de la barelo; kaj nur elprovita murdisto kapablus trovi la rimedojn por malaperigi la kadavron sen ke oni sciu pri tio. Tiu serio de deduktoj havis kiel efikon provizi Maŭricoⁿ per la plej timiga bildo de monstro, Bento Fosulo. Evidente tiu ĉi infera estulo devis nur, por forĵeti la kadavron, defaligi ĝin tra la klapordo de sia vazlavejo (Maŭrico legis ion similan en poparta romano). Kaj nun ĉi tiu viro lukse vivis en orgio, per la mono de la ĉeko. Ĝis nun, tio cetere estis tio kion Maŭrico povis plej bone deziri. Jes, sed kun la kutimoj de freneza malŝparemo de viro kiel Bento Fosulo, okcent pundoj⁽²⁾ povis tre facile ne eĉ daŭri unu semajnon. Kaj kiam ĉi tiu sumo estus forvaporiginta, kion farus poste la timiga persono ? Kaj diabla voĉo, el la fundo de la brusto de Maŭrico, respondis al li : "Tio kion li faros poste ? Li ĉantaĝos vin !"

Angoro n°2 : La tontina⁽¹⁾ fraŭdo, aŭ ĉu onklo Virmastro mortis ? Timinda problemo, kaj de kiu tamen dependis ĉiuj esperoj de Maŭrico ! Li provis timigi Katerinoⁿ, li provis subaĉeti ŝin; kaj liaj provoj nenion donis. Li daŭre konservis la "moralan" konvinkon ke lia onklo Virmastro estis morta; sed tute ne estis facila afero ĉantaĝi subtilan juriston apogante sin nur sur morala konvinko. Sen kalkuli ke, ekde la vizito de Miĥaelo, tiu ĉi ĉantaĝa projekto plaĉis eĉ malpli ol antaŭe al la imago de Maŭrico. "Ĉu Miĥaelo estas homo kiun oni kapablas ĉantaĝi ? Li demandis al si. Kaj ĉu mi estas la homo kiu necesas por ĉantaĝi Miĥaeloⁿ ?" Seriozaj, solenaj,

teruraj demandoj. "Ne estas ĉar mi timas lin, aldonis Maŭrico por trankviligi sin, sed mi ŝatas esti certa pri mia kampo, kaj la malagrableĵo estas ke mi apenaŭ vidas la manieron por atingi tion! Tamen, kiel reala vivo malsamas la romanojn! En romano, mi apenaŭ entreprenus ĉi tiun tutan aferon kiam mi renkontus, sur mia vojo, obskuran kaj misteran knabegon kiu fariĝus mia komplico, kaj kiu tuj vidintus tion kion oni devus fari, kaj kiu, verŝajne, estus enirinta en la domon de Miĥaelo kie li estus trovinta nur statuon el vakso. Post tio, cetere, ĉi tiu komplico ne estus malsukcesinta ĉantaĝi min, kaj plie murdi min. Dum, en la realo, mi ja povus trairi la stratojn de Londono tage kaj nokte, ĝis krevi pro laceco, sen ke ununura krimulo nur degnus atenti min!... Kaj tamen, laŭ ĉi tiu vidpunkto, estas tamen Bento Fosulo kiu preskaŭ ludas tiun rolon!" li penseme daŭrigis.

Angoro n°3 : La dometo de Brundekano, aŭ la ribelema komplico. Ĉar estis ankaŭ komplico, kaj ĉi tiu komplico estis ŝimanta en marĉo en Hampŝiro, kun malplenaj poŝoj. Kion ni povus fari ĉi-flanke? Maŭrico diris al si ke li devintus sendi almenaŭ ion al sia frato, ion ajn, simplan poŝtmandaton por kvin ŝilingoj⁽³⁾, por paciencigi lin provizante lin per espero, biero kaj tabako. "Sed kiel mi povintus sendi ion al li?" ĝemis la kompatinda knabo priserĉante siajn poŝojn, el kiuj li ekzakte eltiris kvar monerojn de unu ŝilingo⁽³⁾ kaj dek ok senvalorajn moneretojn el kupralojo. Por viro en la situacio de Maŭrico, en milito kontraŭ la socio, kaj devante teni per sia nesperta mano, la fadenojn de la plej implikita intrigo, ni devas konfesi ke tiu ĉi sumo apenaŭ sufiĉis. Domaĝe! Johano devos elturniĝi per si mem! "Jes, sed, rekomencis la diabla voĉo, kiel vi volas ke li elturniĝu, ĉu li eĉ estu centoble malpli stulta ol li estas?"

Angoro n°4 : La firmao de ledaĵoj, aŭ fine ni bankrotis!

Londonaj moroj. Pri tiu aparta punkto, Maŭrico ne havis novaĵojn. Li ne jam kuraĝis meti piedon en sian oficejon; kaj tamen li sentis ke li estos devigata pasi tien sen pli prokrasti. Bone ! Sed kion li farus kiam li estus en la oficejo ? Li ne rajtis subskribi ion sub sia propra nomo; kaj, kun la plej bona volo en la mondo, li komencis diri al si ke li neniam sukcesos falsi la subskribon de sia onklo. Sub ĉi tiuj kondiĉoj, li povis nenion por ĉesigi la fiaskon. Kaj kiam la kraŝo fine okazintus, kiam esploraj okuloj ekzamenus ĝis la plej eta detalo la kontojn de la firmao, du demandoj ne mankus esti metitaj al la malkvieta kaj hontinda nesolventulo : 1^e Kie estas S^{ro} Jozefo Finsinko ? 2^e Kion signifis la vizito al la banko ? Kiel facilaj demandoj por meti ! Kaj granda Dio ! Kiel neebliis respondi al ili ! Kaj la viro al kiu ili estus direktataj, se li ne respondus al ili, certe irus en malliberejon, verŝajne irus, he jes !, al la galerpuno. Maŭrico estis razanta kiam ĉi tiu ebleco sin prezentis al lia menso : li haste demetis sian razilon. Jen, iuflanke, laŭ la esprimo de Maŭrico, "la tuta malapero de valora onklo"; jen, aliflanke, tuta serio da strangaj kaj neklarigeblaj agoj, plenumitaj de nevo de tiu ĉi onklo, kaj nevo pri kiu ni scias ke li havis, koncerne la malaperinto, senkompatan malamon. Kia admirinda ŝancaro por juĝeraro ! "Ne, diris al si Maŭrico, ili tamen ne aŭdacos iri ĝis konsideri min kiel murdiston ! Sed, vere, ne estas en la kodo ununura krimo (escepte eble tiu de brulkrimo) kiun, antaŭ la okuloj de la leĝo, mi ne ŝajnas esti plenuminta ! Kaj tamen mi estas absolute honesta homo, kiu iam nur deziris reakiri sian ŝuldon ! Ha ! Leĝo, vere, ne tute taŭgas !"

Estis kun tiu ĉi konkludo tre firmigita en sia menso ke Maŭrico malsupreniris la ŝtuparon de sia domo en la strato Karlo; li ankoraŭ estis nur duonrazita. En la leterkesto, letero. Li rekonis la skribmanieron; estis Johano kiu

malpacienciĝis ! "Vere, la sorto povintus almenaŭ ŝpari tion al mi !" li amare diris al si, kaj li ŝiris la koverton.

Kara Maŭrico, li legis, mi komencas kredi ke vi mokas min ! Mi ĉi tie estas en nigra situacio; ĉu vi scias ke mi estas devigata senpage vivi, kaj eĉ per malfacilaĵo senĉese pli alta ? Mi ne havas littukojn, bone pensu pri tio ! Mi bezonas poŝmonon, ĉu vi aŭdas ? Mi laciĝas pri ĉi tiu ŝerco ! Ĉiuj laciĝus en mia loko. Mi jam estus fuĝinta ekde du tagoj, se nur mi sufiĉe havintus por veturi per trajno. Nu ! maljuna Maŭrico mia, ne obstinu en via frenezo ! Iom provu kompreni mian forlogan situacion ! La poŝtmarko de ĉi tiu letero, mi devos senpage ricevi ĝin ! Mia honorvorton !

Via tre plena frato, J. Finsinko.

"Kia krudulo ! pensis Maŭrico enpoŝigante la leteron. Kion li volas ke mi faru por li ? Mi tuj devos razigi min ĉe barbiro, mia mano ne estas sufiĉe firma ! Kiel mi trovos "poŝmonon" por sendi al iu ? Lia situacio ne estas amuza, mi konfesas tion; sed pri mi, ĉu li imagas ke mi festenas ?... Almenaŭ estas en lia letero io kiu konsolas min; li ne havas groŝmonon, neblas ke li moviĝu ! Vole nevole, li estas tie alnajlita !"

Poste, en nova impeto de indigno : "Li maltimas plendi, la besto ! Kaj li eĉ neniam aŭdis la nomon de Bento Fosulo ! Kion li farus, kion li farus, mi scivolas tion, se li devus suferi ĉion kion mi devas suferi ?"

Sed tio tute ne estis argumentoj kun neriproĉebla honesteco, kaj la skrupula Maŭrico bone konsciis pri tio. Li ne povis maski al si ke lia frato, ankaŭ li, tute ne festenis en la marĉa dometo de Brundekano, sen novaĵoj, sen mono, sen littukoj, sen ombro de kompanio aŭ distraĵo. Tiamaniere ke, kiam li estis razita, Maŭrico fine konceptis la bezonon de

kompromiso.

"La kompatinda Joĉjo, li diris al si, vere estas en nigra situacio ! Mi ne kapblas sendi monon al li; sed mi scias tion kion mi faros por li, mi sendos al li la "*Legu min !*". Tio rekuraĝigos lin, kaj tiam oni pli volonte konsentos kredito al li kiam oni vidos ke li ricevas ion per poŝto !"

Sekve de tio, survoje al sia oficejo, Maŭrico aĉetis kaj sendis al sia frato numeron de ĉi tiu revigliga periodaĵo, al kiu (pro atako de rimorso) li hazarde aldonis la *Atenaumon*, la *Kristanan Vivon* kaj la *Pitoreskan Semajneton*. Tiel Johano estis provizita de literaturo, kaj Maŭrico ĝojis senti balzamon sur la konscienco.

Kvazaŭ la ĉielo volis lin rekompenci, li surpriziĝis, alvenante en sian oficejon, trovi tie bonegajn novaĵojn. Mendoj amasiĝis; la provizejoj malpleniĝis, kaj la prezo de ledο ne ĉesis altiĝi. La administranto mem aspektis kontentega. Koncerne Maŭrico, kiu preskaŭ forgesis ke estas en la mondo io simila al bona novaĵo, li volonte singultus pro feliĉo, kiel infano; li volonte premintus sur sia brusto la administranton de la firmao, iun tute sekan maljunulon kun distaŭzitaj brovoj; li volonte irintus ĝis doni al ĉiu el la dungitoj de siaj oficejoj gratifikon (ho ! malaltan sumon !). Kaj dum sidinte antaŭ sia tablo li malfermis sian poŝtaĵon, ĥoro de malpezaj birdoj kantis en lia cerbo, laŭ ĉarma ritmo : "Ĉi tiu malnova komerco de ledο povas ankoraŭ havi avantaĝojn, avantaĝojn, avantaĝojn !"»

Estis meze de tiu ĉi morala oazo, ke trovis lin iu Rogersono, unu el la kreditoroj de la firmao; sed Rogersono ne estis zorgiga kreditoro, ĉar lia rilato kun la firmao Finsinko datiĝis de longtempe, kaj jam pli ol unu fojon li konsentis pri longaj prokrastoj.

- Mia kara Finsinko, li diris ne sen embaraso, mi devas averti vin pri io kio riskas ĝeni vin ! La fakto estas... mi

trovis min mankantan da mono... multe da kapitaloj ekstere...
vi scias tion kio ĝi estas... kaj... unuvorte...

- Vi scias ke ni neniam kutimis pagi vin je la unua datpago ! respondis Miĥaelo paliĝante. Sed donu al mi tempon por elturniĝi, kaj mi vidos tion kion mi povos fari ! Mi kredas povi promesi al vi ke vi havos almenaŭ fortan partopagon !

- Sed estas ke... jen... balbutis Rogersono, mi lasis min tenti ! Mi cedis mian kreditoraĵon !

- Cedis mian kreditoraĵon ! ripetis Maŭrico. Jen procedo kiun ni ne povis atendi de vi, sinjoro Rogersono !

- He ! Oni proponis al mi cent procentojn, ĝis la lasta guto, kontante ! murmuris Rogersono.

- Cent procentojn ! ekkriis Maŭrico. Sed tio faras al vi ion kiel tridek procentojn de profito ! Neordinara afero ! Kaj kiu estas la aĉetanto ?

- Viron kiun mi ne konas ! respondis la kreditoro. Iu nomita Musko !

"Judo !" pensis Maŭrico, kiam lia vizitanto lin forlasis. Kion ja povis fari judo kun kreditoraĵo ĉe la firmao Finsinko ? Kaj kian intereson li povus havi pagi ĝin per tia prezo ? Tiu ĉi prezo pravigis Rogersono"; jes, Maŭrico mem estis preta agnoski tion. Sed ĝi samtempe pruvis, flanke de Musko, strangan deziron fariĝi kreditoro de la firmao de ledaĵoj. La kreditoraĵo povis esti prezentata de unu tago al la alia, ĉi tiu sama tago, ĉi tiu sama mateno ! Kaj kial ? La mistero de Musko minacis fariĝi malĝoja ekvivalento al la mistero de Fosulo. "Kaj ĉi tio en momento kiam ĉio ŝajnis voli pliboniĝi !" ĝemis Maŭrico albatigante la kapon al la muro. En la sama momento, oni venis sciigi al li la viziton de S^{ro} Musko.

S^{ro} Musko estis judo el radiantata speco, kun provoka eleganteco kaj ofenda ĝentileco. Li deklaris ke li agis en ĉio

ĉi nome de tria partio; li mem nenion komprenis pri la koncerna afero; lia kliento donis al li formalajn ordonojn. La menciita kliento volis enspezi sian elspezon; sed, se la afero tute neeblus ĉe la momento, li akceptus ĉekon pagotan post sesdek tagoj...

- Mi ne scias tion kion ĉio ĉi signifas ! diris Maŭrico. Kia kialo sukcesis instigi vin reaĉeti ĉi tiun kreditoraĵon, kaj je prezo kiel tiu ĉi ?

S^{ro} Musko havis pri tio nek scion, nek supozon; li limiĝis je la plenumo de la ordonoj de sia kliento.

- Ĉio ĉi estas absolute neregula ! fine diris Maŭrico. Ĉi tio estas kontraŭa al komercaj uzancoj. Kiuj estas viaj instrukcioj, en la okazo se mi rifuzus ?

- Mi havas ordonon, en tiu kazo, direkti min al S^{ro} Jozefo Finsinko, la kapo de via firmao ! respondis la judo. Mia kliento tute speciale insistis pri ĉi tiu punkto. Li diris al mi ke estas S^{ro} Jozefo Finsinko kiu sole rajtas ĉi tie... pardonu min, la esprimo ne estas mia !

- Ne eblas ke vi vidu S^{ron} Jozefo; li estas malsana ! diris Maŭrico.

- Tiukaze, mi havas ordonon transdoni la aferon en la manojn de proceduristo. Ni iom vidu ! daŭrigis S^{ro} Musko konsultante sian paperujon. Ha ! Jen ! S^{ro} Miĥaelo Finsinko ! Eble unu el viaj parencoj ? Mi estus tre feliĉa ĉar, se tiu estus, la afero sendube povus konsente akordiĝi !

Fali en la manojn de Miĥaelo; tio estis tro por Maŭrico. Li sin riskis. Ĉeko pagota post sesdek tagoj ! Enkalkulinte ĉion, kion li devis timi ? Post sesdek tagoj, li probable estus mortinta, aŭ almenaŭ en malliberejo ! Tial ke li ordonis al sia administranto doni al S^{ro} Musko brakseĝon kaj gazeton.

- Mi tuj iros subskribigi la ĉekon de S^{ro} Jozefo Finsinko ! li diris. Mia onklo kuŝas malsana en nia domo de la strato Karlo !

Fiakro por iri, fiakro por reveni; denove du pezajn elprenojn de la kvar ŝilingoj⁽³⁾ de lia kapitalo ! Li kalkulis ke, post la foriro de S^{ro} Musko, li havos kiel tutan riĉaĵon en la mondo dek sep soldojn. Sed tio kio estis ankoraŭ pli bedaŭrinda estis ke, por sin eliri el embaraso, li estis nun transportinta sian onklon Jozefoⁿ al Blomsburio.

"Ve ! li diris al si, neutile de nun por la kompatinda Joĉjo enfermi sin en la Hampŝiro ! Kaj pri scii kiel mi povos daŭrigi la trompon, mi volas esti pendigita, se mi havas la plej etan ideon ! Kun mia onklo en Brundekano, jam estis apenaŭ eble; kun mia onklo en Blomsburio, tio ŝajnas al mi super la homaj fortoj. Ĉiukaze super miaj fortoj de mi; ĉar fine estas tio kion faras Miĥaelo, kun la korpo de mia onklo Virmastro ! Sed li, jen ! li havas komplikojn, tiun maljunan mastrumistinon, kaj sendube multajn friponojn el sia klientaro. Ha ! Se nur mi povus trovi komplikojn !"

Neceso estas patrino de ĉiuj homaj artoj. Spronita de ĝi, Maŭrico surprizis sin mem, konstatante la haston, la rezolutecon kaj, fine, la bonegan aspekton de sia nova falsaĵo. Tri kvaronhoroj poste li transdonis al S^{ro} Musko ĉekon sur kiu klare kuŝis la subskribo de onklo Jozefo.

- Jen kiu estas perfekte ! deklaris la juda ĝentlemano ekstarante. Kaj nun mi havas ordonon diri al vi ke ĉi tiu ĉeko ne estos prezentata ĉe la datpago, sed estos saĝe ke vi estu singardema, estu bone singardema !

La tuta ĉambro komencis naĝi ĉirkaŭ Maŭrico.

- Kion ? Kion vi diras ? li ekkriis retenante sin al la tablo. Kion vi volas diri ?... Ke la ĉeko ne estos prezentata ? ... Kial mi devu esti singarda ? Kio estas tiu ĉi tuta frenezo ?

- Ne la plej etan ideon, vere, sinjoro Finsinko ! respondis la hebreo kun bona rideto. Ĝi estas simple mesaĝo kiun oni komisiis al mi ! Oni metis al mi en la buŝon esprimojn

kiuj ŝajnas tiom forte eksciti vin !

- La nomon de via kliento ? demandis Maŭrico.

- Mia kliento provizore volas tion ke lia nomo restu sekreto ! respondis S^{ro} Musko.

Maŭrico sin klinis al li.

- Ĉu ne estas... ne estas la banko ? li murmuris per sufokita voĉo.

- Tre malplezure, mi ne havas permeson por diri pli al vi ! respondis S^{ro} Musko. Kaj nun, se vi bonvolas, mi tuj deziras al vi bonan tagon !

"Deziri al mi bonan tagon !" pensis Maŭrico lasita sola. Ekde la sekvan minuton li ekkaptis sian ĉapelon kaj fuĝis el sia kabineto kiel frenezulo. Estis nur post tri stratoj ke li haltis por grumbli : "Dio mia ! li grumblis, mi devintus deprunti monon de la administranto ! Sed nun tro malfruas. Neeblas reiri por tio ! Ne, estas klare ! Mi estas senmona, absolute senmona, kiel laboristoj sen laboro !"

Li eniris hejmen, kaj melankolie sidiĝis en la manĝoĉambro. Neniam **Neŭtono** faris pensstrebadojn tiel viglan kiel tiu kiun tiam faris ĉi tiu viktimo de la cirkonstancoj; kaj tamen la klopodo restis senfrukta. "Mi ne scias ĉu tio estas ligita al difekto de mia menso, li diris al si, sed la fakto estas ke mi trovas ke mia malbonŝanco havas ion nenatura. Tio indus skribi al *La Tempo*j, por sciigi la kazon ! Kion mi diras ? Tio indus fari revolucion ! Kaj la plej klara en la afero estas ke mi tuj bezonas monon ! Pri la moraleco, mi ne plu devas zorgi pri tio; mi jam delonge preterpasis ĉi tiun fazon ! Estas mono kiun mi bezonas, kaj tujtuj; kaj la nura ŝanco kiun mi havas por akiri ĝin, estas Bento Fosulo ! Bento Fosulo estas krimulo; kaj, konsekvence, lia situacio havas malfortajn flankojn ! Li certe ankoraŭ konservis parton de la okcent pundoj⁽²⁾. Necesas, ĉiapreze, ke mi devigas lin dividi kun mi tion kio restas al li de ĝi ! Kaj, eĉ se

nenion de ĝi restas al li, nu ! mi rakontos al li pri la afero de la tontino. Kaj tiam, kun knabego kiel tiu Fosulo en mia ludo, estos mirinde se mi ne atingos rezulton !"

Ĉio ĉi estis bela kaj bona, sed ankoraŭ temis kapti Bentoⁿ Fosuloⁿ. Kaj Maŭrico ne vidis tre klare la rimedojn. Anonco en la gazetoj, jes, ĝi estis la sola ebla rimedo por atingi Fosuloⁿ. Jes, sed per kiaj terminoj redakti la peton pri rendezuo, en la nomo de kio, kaj kie ? Venigi Fosuloⁿ al Blomsburio, en la domon de la strato Karlo, estus tre danĝere kun tia ulo kiu, samokaze, eksciis la adreson de Maŭrico, kaj ne estis homo kiu ne profitus tion pli poste kontraŭ li. Ĉu aranĝi rendezuon en la domo de Fosulo ? Tre danĝera, tio ankaŭ. Maŭrico tro bone imagis tion kio devis esti tiu domo, malĝoja domaĉo en Holovojo, kun sekreta klappordo en ĉiu ĉambro; domon kie oni povus eniri en somera surtuto kaj en lakitaj botetoj, por eliri unu horon pli poste sub formo de vianda haketaĵo en korbo de buĉisto ! Tio cetere estis la fatala maloportunaĵo de rilato kun tro entreprenema komplico. Maŭrico konsciis pri tio, ne sen eta ekstremito. "Neniam mi revintus ke mi iam devus fine deziri socion kiel tian !" li diris al si.

Finfine brila ideo ekaperis en lian spiriton. Stacio de Vaterlo, publika loko, kaj tamen sufiĉe senhoma dum certaj horoj ! Kaj tio ne estis ĉio ! Sed ankaŭ loko kies nomo nure devis batadigi pli forte la koron de Fosulo; loko kies elekto, por rendezuo, sugestos al la diboĉulo kiun ni konas almenaŭ unu el liaj kulpaj sekretoj !

Maŭrico do prenis paperfolion kaj komencis redakti la skizon de anonco :

"AVIZO _ Vilhelmo Bento Fosulo, se liaj okuloj hazarde falus sur ĉi tiu estanta avizo, estus informita ke li povos ekaŭdi ion avantaĝe por li, la venontan dimanĉon, de la dua ĝis la kvara

posttagmeze, sur la deira kajo de la linioj al antaŭurbo, ĉe la stacio de Vaterlo".

Maŭrico relegis kun la plej viva kontentiĝo la mallongan literaturajon kiun li ĵus improvizis. "Ne malbone, vere ! li diris al si. Ion avantaĝe por li eble ne estas el rigora ĝusteco; sed ĝi estas tenta, ĝi estas originala, kaj entute, oni ne devas ĵuri antaŭ esti permesata aperigi anoncon ! Ĉio kion mi petas de la ĉielo, ĝis dimanĉo, estas povi havigi al mi iom da poŝmono por miaj manĝoj, por la kostoj de la anonco, kaj ankaŭ por... Sed ne, ni ne malŝparu niajn monrimedojn sendante poŝtmandatojn al Johano ! Mi simple ankoraŭ sendos al li kelkajn amuzajn ĵurnalojn. Jes, sed kie trovi monon ?"

Li alproksimiĝis al la ŝranko kie estis enŝlosita lia kolekto de sigelringoj... Sed subite la kolektanto ribelis en li : "Ne, ne; mi ne volas ! li ekkriis. Neniapreze, mi malkompletigos mian sortimenton ! Prefere ŝteli !"

Li rapidis al la salono, kaj haste ekprenis kelkajn kuriozaĵojn antaŭlonge alportitajn de onklo Jozefo, paron de turkaj babuŝoj, ventumilon de Smirno, egiptan nargileon, fusileton certigita kiel aparteninta al bandito de Trakio, kaj manplenon da konkajtoj, kun iliaj nomoj latine skribitaj sur etikedoj.

Ĉapitro XIV

En kiu Vilhelmo Bento Fosulo ekscias ion utilan al li.

Dimanĉon matene, Vilhelmo Bento Fosulo ellitiĝis je sia kutima horo, sed en iom malpli melankolia inklino ol tiu kiun li travivis ekde la malbonvena alveno de la barelo. Estas ĉar, la antaŭtagon de tiu dimanĉo, fruktodona aldono estis farita al lia familio, en formo de pensionano. La pensionano estis alkondukita de Miĥaelo Finsinko, kiu ankaŭ taksis la gastoprezon, kaj garantiis ĝian regulan pagon; sed, sendube pro nova efiko de sia nerezistebla manio por mistifiko, Miĥaelo faris por Fosulo la kiel eble malplej allogan portreton de la maljunulo kiun li loĝigis en lia hejmo. Li lasis la artiston kompreni ke ĉi tiu maljunulo, kiu cetere estis el liaj proksimaj parencoj, devis esti traktita nur kun granda malfido. "Zorgu eviti ĉian intimaĵon kun li ! li diris; mi konas malmultajn virojn kies komerco estas pli danĝera !" Tiel ke Fosulo unue nur tre timeme alpaŝis al sia pensionano; kaj forta estis lia surprizo malkovrante ke tiu ĉi maljunulo, kiun oni diris al li terura, reale estis bonega homo.

Dum la vespermanĝo, la pensionano pelis la komplezon ĝis prizorgi la tri infanojn de Fosulo, al kiuj li instruis amason da strangaj detaletoj pri diversaj temoj; kaj poste ĝis la unua matene, li interparolis kun la artisto en la ateliero de tiu ĉi, mirigante lin per la diverseco kaj certeco de siaj scioj. Unuvorte, la bona Fosulo estis ĉarmita, kaj ankoraŭ nun, kiam li rememoris la bonegan vesperon de la antaŭtago, rideto, delonge malaperinta, reaperis en liaj okuloj. "Tiu maljuna, S^{ro} Finsinko, estas por ni gajno el la plej altvalora ! li pensis razante sin antaŭ la fenestro. Kaj kiam, fininte sian sinlavadon, li eniris en la etan manĝoĉambron, kie la

manĝilaro jam estis surmetita por la matenmanĝo, estis preskaŭ kun la koreco de malnova amiko ke li premis la manon de sia pensionano.

- Mi estas feliĉa vidi vin, kara sinjoro mia ! li diris. Mi esperas ke vi ne tro malbone dormis ?

- Homoj kun hejmmamaj moroj volonte plendas pri la perturbo kiun venigas al ilia dormo la devigo dormi en nova lito ! respondis la pensionano. Kaj mi bone scias ke ĉi tiuj homoj, laŭ la statistiko, formas eĉ pli konsiderindan plimulton ol oni povus supozi. Kaj kiam mi diras : "la devigo dormi en nova lito", vi nature komprenas ke tio estas nur maniero por paroli; ĉar la lito povas esti malnova, kvankam por tiu kiu kuŝas en ĝi, ĝi ŝajnas nova ! Ni tiel havas en nia lingvo amason da strangaj parolturnoj, kaj kiuj valorus la penon esti korektitaj. Sed koncerne min, sinjoro, al kutimiĝinta, kiel mi delonge estis, al vivo de preskaŭ senĉesa ŝanĝiĝo, mi devas diri ke fine mi perfekte dormis !

- Mi ĝojas ekaŭdi tion ! varme diris la instruisto de desegno. Sed mi vidas, sinjoro, ke mi interrompis vin dum la legado de via gazeto !

- La dimanĉa gazeto estas unu el la novaĵoj de nia epoko ! respondis S^{ro} Finsinko. Oni diras ke en Ameriko ĝi eĉ estas pli grava ol ĉe ni. Multaj dimanĉaj gazetoj en Ameriko havas centojn da kolumnoj, kies cetere almenaŭ duono estas destinitaj por anoncoj. En aliaj landoj la ĉiutagaj gazetoj aperas eĉ dimanĉe, tiel ke specialaj gazetoj kiel ĉi tiuj tute ne havas kialon de ekzisto. La nuntempa ĵurnalismo, sinjoro, manifestiĝas laŭ vasteco de malsamaj formoj. Tio kio ne malhelpas ĝin esti ĉie kaj samgrade, la granda agilo de la homaj edukado kaj progreso. Kiu povus kredi, sinjoro, ke tiel nemalhavebla afero, ke tia afero, mi diras, ne ekzistis de ĉiam ? Kaj tamen la gazetoj estas relative lastatempa invento : la unua en dato... Sed ĉio ĉi,

tiom interesa kiom ĝi estu por scii, estas miaflanke nur flankiĝo. Tio kion mi volis demandi al vi, sinjoro, estis jena :
ĉu vi estas, kiel mi, regula leganto de nia nacia gazetaro ?

- Ho ! vi scias, pardonpetis Fosulo, por ni artistoj, la gazetaro ne povas havi la saman utilon kiel por...

- Tiaokaze, interrompis Jozefo, eblas ke vi pasis sen rimarki ĝin, anoncon kiu aperis en diversaj gazetoj dum la pasintaj tagoj, kaj kiun mi retrovis ĉimatene en la *Dimanĉaj Tempoj* ! La nomo, krom malmulte grava varianto, tre similas vian nomon. Se vi bonvolas, mi tuj legos ĝin laŭte al vi !

Kaj, per la tono kiun li uzis por siaj publikaj citaĵoj, li legis :

"AVIZO _ Vilhelmo Bento Fosulo, se liaj okuloj hazarde falus sur ĉi tiu estanta avizo, estus informita ke li povos ekaŭdi ion avantaĝe por li, la venontan dimanĉon, de la dua ĝis la kvara posttagmeze, sur la deira kajo de la linioj al antaŭurbo, ĉe la stacio de Vaterlo".

- Ĉu vere ĝi estas presita sur la gazeto ? ekkriis Fosulo. Ni vidu ! Bento ? Ĉi tio devas esti preseraro. Ion avantaĝe por mi ? Sinjoro Finsinko, permesu al mi peti al vi favoron ! Mi scias kiel tio kion mi estas dironta al vi strange sonos al viaj oreloj; sed komprenu, estas kialoj el tre intima ordo kiuj igas min deziri ke ĉi tiu afereto absolute restu inter ni ! Mi multe volus ke miaj infanoj... Mi certigas al vi, kara sinjoro, ke estas en ĉi tiu sekreto nenio malhonora al mi; kialoj el intima ordo, nenio pli ! Kaj cetere mi finos trankviligi vian konsciencan kiam mi estos dirinta al vi ke la koncerna afero estas konata de nia komuna amiko, S^{ro} Miĥaelo, kiu, konante tion, ne opiniis devi repreni sian altvaloran estimon !

- Unu sola vorto sufiĉis, sinjoro Fosulo ! respondis Jozefo kun unu el siaj orientaj riverencoj.

Duonhoron pli poste, la instruisto de desegno trovis Miĥaeloⁿ en lia lito kun libro; la proceduristo prezentis perfektan bildon de ripozo kaj bonhumoro.

- Saluton, Fosulo, li diris demetante sian libron. Kia vento alportas vin en ĉi tiu horo de la tago? Vi devus esti en la preĝejo, amiko mia!

- Mi vere ne estas iranta al la preĝejo hodiaŭ, sinjoro Finsinko! respondis la artisto. Nova katastrofo minacas ataki min, sinjoro!

Kaj li prezentis al Miĥaelo la gazetan anoncon.

- Kio? Kio estas tio? ekkriis Miĥaelo ekstremitate en sia lito.

Poste, studinte la anoncon dum momento:

- Fosulo, mi tute mokas pri la jena dokumento!

-Kaj tamen, mi ne kredas ke ni povu neglekti ĝin! murmuris Fosulo.

- Mi supozis ke vi jam sufiĉe laciĝis de la stacidomo de Vaterlo! respondis la proceduristo. Ĉu vi estus altirita tien de morba impulso? Nu, vi fariĝis tute amuza de kiam vi perdis vian barbon! Mi komencas kredi ke estis en via barbo ke vi konservis vian saĝon!

- Sinjoro Finsinko, diris la instruisto de desegno, mi multe pripensis pri la nova intrigo kiu ĵus okazis en mia vivo, pro ĉi tiu anonco. Kaj, se vi bonvolas permesi tion al mi, mi tuj klarigos al vi la rezultojn de miaj pripensoj!

- Komencu! eligis Miĥaelo. Sed ne forgesu ke hodiaŭ estas dimanĉo! Neniu fekvorto, aŭ senutila babilado!

- Ni troviĝas antaŭ tri eblaj hipotezoj, komencis Fosulo. 1^a Ĉi tiu anonco povas esti ligita al la afero de la barelo; 2^a Ĝi povas rilati al la statuo de S^{ro} Semitopoliso; fine, 3^a Ĝi povas fondi de la frato de mia mortinta edzino, kiu foriris antaŭ dudek jaroj al Aŭstralio kaj neniam plu sendis siajn novaĵojn. En la unua kazo, la afero de la barelo, mi

konsentas ke sindeteno estus, por mi, la plej saĝa decidiĝo.

- La tribunalo samopiniis kiel vi ĝis nun, majstro Fosulo ! diris Miĥaelo. Bonvolu daŭrigi.

- En la dua kazo, daŭrigis Fosulo, mi havas la devon nenion neglekti pri tio kio povas helpi min trovi la malfeliĉe perditan antikvaĵon !

- Sed, kara amiko mia, vi mem diris al mi, antaŭhieraŭ, ke S^{ro} Semitopoliso eligis vin de ĉia respondeco pri la akcidento ! Kion vi volas pli ?

- Mi opinias, sinjoro, krom eraro, ke la neriproĉebla nobleco de la konduto de S^{ro} Semitopoliso trudas al mi, eĉ pli postuleme, la devon serĉi la Herkulon ! respondis la instruisto de desegno. Mi bone komprenas ĉion pri kio mia konduto estis, ekde la komenco, kontraŭleĝa kaj riproĉinda; des pli da kialo por ke mi, ekde nun, klopodu agi kiel ĝentlemano !

Kaj Fosulo ruĝiĝis ĝis la oreloj.

- Pri tio ĉi ankaŭ mi ne vidas kontraŭdiron ! deklaris Miĥaelo. Mi mem ofte pensis ke mi ŝatus, iam, provi agi kiel ĝentlemano. Sed tio estos por pli poste, kiam mi ĉesigos la aferojn. Mia profesio, bedaŭrinde, faras ĝin provizore preskaŭ nepraktikebla por mi !

- Kaj en la tria hipotezo, daŭrigis Fosulo, se la aŭtoro de la anonco estas mia bofrato Timeo, nu, nature, tio signifas riĉaĵon por ni !

- Jes, sed bedaŭrinde la aŭtoro de la anonco ne estas via bofrato Timeo ! diris la proceduristo.

- Ĉu vi konstatis, sinjoro, esprimon, kiu ŝajnas al mi el la plej rimarkindaj, en ĉi tiu anonco : ion avantaĝe por li ? demandis Fosulo, kun ruza rideto.

- Senkulpa ŝafido kiun vi estas ! respondis Miĥaelo. Tiu ĉi esprimo estas la plej ordinara banalaĵo de nia angla lingvo; ĝi simple pravas ke la aŭtoro de la anonco estas sencerbulo !

Nu ! Ĉu vi volas ke mi tujtuje disskuu vian kartdomon ? Nu ! Ĉu via bofrato Timeo estus homo por fari ĉi tiun eraron, en la maniero skribi vian nomon ! Bento anstataŭ Dento ? Ne estas ĉar, en si mem, la korekto malplaĉu al mi ! Mi male opinias ĝin admirinde taŭga⁽¹⁰⁾, kaj estas eĉ tute rezoluta adopti ĝin de nun, en miaj rilatoj kun vi ! Sed ĉu vi opinias kredebla ke ĝi venas de via bofrato ?

- Ne, fakte, ĝi ne ŝajnas tre natura de lia flanko ! akceptis Fosulo. Sed kiu scias ĉu la kompatindulo ne suferis spiritan perturbon en Aŭstralio ?

- Tiel rezoni, Fosulo, diris Miĥaelo, ni povus ankaŭ supozi ke la aŭtoro de la anonco estas Ŝia Moŝto Reĝino Viktorino, tute brulanta pro deziro estigi vin baronon. Mi lasas vin mem decidi ĉu tio estas verŝajna, kaj tamen, same kiel via hipotezo koncerne la spiriton de via bofrato, tio ne kontraŭas al naturaj leĝoj. Sed ni devas nur konsideri en ĝi la verŝajnajn hipotezojn; tiel ke, kun via permeso, ni senprokraste malakceptu Ŝian Moŝton Viktorinoⁿ kaj vian bofraton Timeoⁿ ! Nun venas via dua ideo, tio estas ke la anonco rilatus al la perdo de la statuo. Ĉi tio eblas; sed, tiukaze, de kie venas la anonco ? Ne de la italo, ĉar li konas vian adreson, kaj ankaŭ ne de la persono kiu ricevis la keston ĉar ĉi tiu persono ne scias vian nomon. La fervoja oficisto ? vi diros al mi en ekfulmo de saĝeco. Jes, ĉi tiu viro povas ekscii vian nomon ĉe la oficejo de la stacidomo, li povas esti eraranta pri unu el viaj antaŭnomoj, li povas ne koni vian adreson. Ni do akceptu la fervojan oficiston ! Sed jen demando : ĉu vi reale sentas fortan deziron renkonti ĉi tiun personon ?

- Kaj kial mi ne sentus tion ? demandis Fosulo.

- Se la menciita oficisto deziras vidi vin, respondis Miĥaelo, tio estas, nenia dubo pri tio !, tio estas ĉar li

10 "Bent", en la originala angla versio, signifus klinita, dorskurba, deprimita.

retrovis sian libron, iris al la domo kie li demetis la statuon, kaj, bone notu ĉi tion, Fosulo, nun agas instigate de la murdisto !

- Mi bedaŭrus ke tiel estus ! diris Fosulo. Sed mi daŭre pensas ke mi havas devon, rilate al S^{ro} Semitopoliso...

- Fosulo, interrompis Miĥaelo, ne da ŝercoj ! Ne provu fabeli al via laŭleĝa konsilisto ! Ne provu ŝajnigi vin kiel la mortinta **Regulus** ! Nu ! Mi vetas unu vespermanĝon ke mi divenis vian veran penson ! La vero, Fosulo, estas ke vi ankoraŭ kredas ke la anonco venis de via bofrato Timeo !

- Sinjoro Finsinko, respondis la instruisto de desegno kies la honesta vizaĝeto denove koloriĝis, vi tute ne estas patro de familio kaj zorgoplena por perlabori vian ĉiutagan panon ! Gŭendolino, mia filino, kreskas; ŝi estis konfirmaciata ĉi-jare. Infano kun granda promeso, tiom kiom mi povas juĝi ! Nu ! Sinjoro kaj amiko, vi komprenos miajn sentojn kiel patro, kiam mi diros al vi ke ĉi tiu kompatinda infano, pro manko de lecionoj, ankoraŭ ne kapablas danci ! La du knaboj iras al la kvartala lernejo; tio kio, fine, tute ne estas malbonaĵo. For de mi la ideo senvalorigi la instituciojn de mia lando ! Sed mi sekrete nutris esperon ke la plejaĝa, Haroldo, kapablus iam fariĝi instruisto de muziko, kiu scias, eble virtuozo ? Kaj la eta Otono montras tre firman alvokiĝon por la religia stato. Mi verdire ne estas homo kun ambicio...

- Nu ! Nu ! eligis Miĥaelo. Konfesu tion ! Vi ankoraŭ kredadas ke estas la bofrato Timeo !

- Mi ne kredas tion, respondis Fosulo, sed mi opinias ke tiu povas esti li. Kaj se pro mia neglektemo, mi perdus ĉi tiun okazon de riĉaĵo, kiel mi kuraĝus rigardi en la vizaĝon miajn kompatindajn infanojn ?

- Kaj tiel, rekomencis la proceduristo, vi intencas...

- Iri al stacidomo de Vaterlo, post momento ! diris

Fosulo, maskovestite !

- Iri tien sola ? demandis Miĥaelo. Kaj vi ne timas la danĝerojn de la aventuro ? Ĉiuokaze, ne forgesu sendi al mi leteron, ĉi-vespere, de la malliberejo !

- Ho ! Sinjoro Finsinko ! Mi kuraĝiĝis ĝis esperi... ke eble vi konsentus... akompani min ! balbutis Fosulo.

- Ke mi denove alivestiĝu, kaj dimanĉe ! ekkriis Miĥaelo. Kiel vi malmulte konas miajn vivprincipojn !

- Sinjoro Finsinko, diris Fosulo, mi havas nenium rimedon, mi scias tion, pruvi al vi mian dankemon. Sed lasu min meti demandon al vi : se mi estus riĉa kliento, ĉu vi akceptus riski vin ?

- He ! Amiko mia, ĉu vi do imagas ke mi havas kiel profesion vagi en Londono kun miaj alivestitaj klientoj ? demandis Miĥaelo. Mi donas al vi mian vorton ke, eĉ por la tuta oro de la mondo, mi ne konsentintus zorgi pri afero kiel via ! Sed mi konfesas ke mi sentas veran scivolemon vidi kiel vi kondutos en tiu renkontiĝo. Tio tentas min ! Tio tentas min, Fosulo, pli ol oro, ĉu vi aŭdas ? Mi certas ke vi estos ridigeĝa !

Kaj li eksplodis per rido.

- Nu ! Maljuna Fosulo mia, li diris, estas nenia maniero rifuzi ion al vi ! Preparu la tutan materialon de la maskiĝado ! Je la unua kaj duono mi estos en via ateliero.

Ĉirkaŭ la dua kaj duono, tiun saman dimanĉon, la vasta kaj malĝojiga vitra halo de la stacidomo de Vaterlo dormis, silenta kaj senhoma, kiel templo de mortinta religio. Tie kaj tie, ĉe kelkaj el la multnombraj kajoj, trajno pacience atendis. Tie kaj tie eĥiĝis la bruo de paŝadoj, kaj temp' al tempe, sin miksis kun ĝi la albato de ĉevalhufo kontraŭ la sekega pavimo en la ekstera korto kie haltadis la fiakroj. La kajo de la antaŭurbaj trajnoj dormetis, kiel la aliaj. Gazetaj kioskoj estis fermitaj; rustaj kurtenoj el fero kaŝis tie la

romanojn de S^{ro} Ridero Hagardo, kies riĉe ilustritaj kovriloj gajigas kaj revigligas preterpasante la animon de la vojaĝanto en la labortagoj. La maloftaj oficistoj kiuj deĵoris, sencele vagis, kiel somnambuloj. Kaj, apenaŭ kredebla afero, vi ne eĉ renkontintus tie, je tiu horo, la plenaĝan sinjorinon (en pelerino kaj kun malgranda vojaĝsako en la mano), kiu tamen ŝajnis esti esenca parto de niaj kajoj de stacidomo.

Ĉe la menciita horo, se iu konanta Ĝonoⁿ Diksonoⁿ (el **Balarato**) kaj Ezroⁿ Tomasoⁿ (el Usono de Ameriko), hazarde troviĝus antaŭ la granda enirejo de la stacidomo de Vaterlo, li havus la kontentiĝon vidi ĉi tiujn du fremdulojn elfiakriĝi kaj eniri la biletejon.

- Sed, nu, kiujn nomojn ni prenos ? demandis la eks-Ezro Tomaso, fiksante sur sian nazon la okulvitrojn el fenestrovitro kiuj tiutage estis rezervitaj por li dank'al escepta favoro.

- He ! Knabo mia, koncerne vin, ni ne havas elekton ! respondis lia kunulo. Vi devos nomi vin Bentoⁿ Fosuloⁿ aŭ tute nenio ! Koncerne min, mi havas la ideon ke, hodiaŭ, mi nomos min Depomo. Beleta nomo de iam, Depomo, kaj kun ĉarma parfumo de malnova cidro de **Devono**. Pri tio, diru do, se ni komencu iom malseketigante nian gorĝon ? Ĉar la renkontiĝo minacas esti malfacila travivaĵo !

- Se tio ne tro ĝenus vin, mi pli bone ŝatus atendi ke ĝi estu finita ! respondis Fosulo. Jes, ĉion bone pripensinte, mi atendos ke la renkontiĝo estu finita ! Mi ne scias ĉu vi havas la saman impreson kiel mi, sinjoro Finsinko, sed la stacidomo ŝajnas al mi tre senhoma, kaj tute plena de tre strangaj eĥoj !

- He ! He ! Amiko mia, ĉu ne ? Vi kredus ke ĉiuj tiuj senmovaj trajnoj estas plenplenaj de policanoj, atendantaj nur signalon por sturmi al ni ! Ha ! Estas tio kion oni nomas

konsciencan, rimorson, kompatinda Fosulo mia !

Per paŝado kiu tute ne estis milita, la du amikoj finfine alvenis sur la deira kajo de la antaŭurbaj trajnoj. Ĉe la kontraŭa fino ili malkovris la maldikan vizaĝon de viro apoganta kontraŭ kolono. La viro estis evidente droninta en profunda pripensado. Li havis la okulojn mallevitajn, kaj ŝajnis ne rimarki tion kio okazas ĉirkaŭ li.

- Hola ! Diris mallaŭte Miĥaelo. Ĉu ĉi tiu estus la aŭtoro de via anonco ? Tiukaze, mi devus diskrete malkuniĝi !

Fine, post sekundo de hezito :

- Vere, li pli gaje rekomencis, domaĝe, mi riskos la petolon ! Rapide, turnu vin kaj transdonu al mi la okulvitrojn !

- Sed vi ja diris al mi ke vi lasas ilin al mi hodiaŭ ! protestis Fosulo.

- Jes, sed ĉi tiu viro konas min ! diris Miĥaelo.

- Ĉu vere ? Kaj kiel li estas nomata ? ekkriis Fosulo.

- Diskreteco devigas min silenti pri tio ! respondis la proceduristo. Sed estas iu afero kiun mi povas diri al vi : se estas li kiu estas la aŭtoro de via anonco (kaj devas esti li, ĉar li havas la malserenan mienon de komencantoj en krimo), se estas li kiu estas la aŭtoro de la anonco, vi povas iri sen timo, amiko mia, ĉar mi tenas la knabegon en mia manko !

La interŝanĝo estanta dece farita, kaj Fosulo trovanta sin iom konsolita de ĉi tiu bona novaĵo, la du viroj antaŭeniris rekte al Maŭrico.

- Ĉu estas vi kiu ŝatus vidi sinjoron Vilhelmoⁿ Bentoⁿ Fosuloⁿ ? demandis la instruisto de desegno. Mi estas Fosulo !

Maŭrico levis la kapon. Li vidis antaŭ si personon el preskaŭ nepriskribebla senvaloreco, kun blankaj gamaŝoj kaj ĉemiza kolumo tro malsupren faldita, kiel tiuj kiujn portis

pentrolernantoj antaŭ tridek jaroj. Je dekkelke paŝoj malantaŭ li staris alia individuo, pli alta kaj pli fortika, sed kies vizaĝo apenaŭ eblis seriozan fiziognomikan esploron, estanta preskaŭ tute kaŝita de lipharoj, vangharoj, okulvitroj, kaj ĉapelo el mola felto.

La kompatinda Maŭrico, ekde tri tagoj, tute ne ĉesis konjekti la probablan aspekton de la homo kiun li imagis esti unu el la plej danĝeraj banditoj de la londona domaĉaro. Lia unua impresado, ekvidante la veran Fosuloⁿ, estis iom da elreviĝo. Sed dua ekrigardo al la paro konvinkis lin ke, malgraŭ la ŝajno, li ne eraris pri la reala karaktero de la ricelanto de kadavroj. La fakto estas ke jam neniam antaŭe li vidis virojn tiamaniere vestitajn. "Evidente individuoj kutimiĝintaj vivi margene de la socio !" li pensis.

Poste, direktante sin al la viro kiu ĵus parolis al li, li diris : "Mi deziras interparoli kun vi, private !"

- Ho ! respondis Fosulo, la ĉeesto de S^{ro} Depomo ne povas ĝeni min. Li scias ĉion !

- Ĉion ? Ĉu vi scias pri kio mi venis paroli kun vi ?
ekkriis Maŭrico. La barelon !...

Fosulo fariĝis tute pala : sed estis lia virta indigno kiu paligis lin.

- Do fakte estas vi ! li siavice ekkriis. Malŝatindulo !

- Ĉu mi vere povas paroli antaŭ li ? demandis Maŭrico, montrante la komplikon de la knabego.

La finomo kiun ĉi tiu ĵus direktis al li, venanta de tia homo, apenaŭ emociis lin.

- Sinjoro Depomo ĉeestis dum la tuta afero ! diris Fosulo. Estis li mem kiu malfermis la barelon. Via kulpa sekreto de nun estas same konata al li kiel al via Kreinto kaj al mi !

- Nu ! Do, komencis Maŭrico, kion vi faris per la mono ?

- Mi ne scias pri kiu mono vi volas paroli ! energie respondis Fosulo.

- Ha ! Necesas ne ŝerce trompi min ! deklaris Maŭrico. Mi malkovris kaj sekvis vian spuron. Vi venis al la stacidomo, ĉi tie mem, poste esti alivestinta vin kiel ekleziulon (sen timi la sakrilegio pro tia alivestiĝo !), vi alproprigis al vi mian barelon, vi malfermis ĝin, vi malaperigis la korpon kaj enspezis la ĉekon ! Mi diras al vi ke mi iris al la banko ! li kriis. Mi sekvis vin paŝon post paŝo, kaj viaj neadoj estas stulta infanaĵo !...

- Nu, nu, Maŭrico, ne ekbolu ! subite diris S^{ro} Depomo.

- Mihaelo ! ekkriis Maŭrico. Denove Mihaelo !

- Sed jes, denove Mihaelo ! ripetis la proceduristo.

Denove kaj denove, knabo mia, ĉi tie kaj ĉie ! Sciu ke ĉiuj paŝoj kiujn vi faras, estas kalkulitaj ! Detektivoj kun pruvita lerteco sekvas vin kiel via ombro, kaj venas raportoj al mi pri viaj movoj ĉiun tri kvaronhorojn. Ho ! Mi ne rigardis la elspezon. Mi faras aferojn malavare !

La vizaĝo de Maŭrico fariĝis el malpura grizo.

- Ba ! li diris, ne gravas al mi ! Male, mi estas nur pli komforta por nenion kaŝi. Ĉi tiu viro enkasigis mian ĉekon; tio estas ŝtelo, kaj mi volas ke li redonu al mi la monon !

- Aŭskultu min, Maŭrico ! diris Mihaelo. Ĉu vi kredas ke mi volas mensogi al vi ?

- Mi tute ne scias ! respondis Maŭrico. Mi volas mian monon !

- Nur mi tuŝis la korpon ! diris Mihaelo.

- Vi ? ekkriis Maŭrico retroirante de unu paŝo. Sed tiam kial vi ne deklaris morton ?

- Kion diable vi volas diri ? demandis lia kuzo.

- Finfine, ĉu mi estas freneza, ĝemis Maŭrico, aŭ ĉu estas vi kiu estas tia ?

- Mi kredas ke devas plivole esti Fosulo ! hazardis

Miĥaelo.

Kaj la tri viroj rigardis unu la alian, mirigitaj.

- Ĉio ĉi estas terura ! reparolis Maŭrico. Terura ! Mi ne komprenas eĉ unu vorton de tio kion oni diras al mi !

- Ankaŭ ne mi, honorvorton ! diris Miĥaelo.

- Kaj plie, je la nomo de la ĉielo, kial vangharoj kaj lipharoj ? ekkriis Maŭrico montrante per la fingro sian kuzon, kvazaŭ ĉi tiu estintus fantomo. Ĉu estas mia cerbo kiu deliras ? Kial vangharoj kaj lipharoj ?

- Ho ! Ĉi tio estas nur detalo sen graveco ! haste asertis Miĥaelo.

Denove estis silento, dum kiu Maŭrico estis en mensa inklinio simila al tiu en kiu li troviĝintus, se oni ĵetintus lin en la aeron, sur trapezo, ekde la supro de la katedralo Sankta Paŭlo.

- Ni iom resumu ! fine diris Miĥaelo. Krom se ĉio ĉi vere estas nur sonĝo, en kiu kazo mi ja ŝatus ke Katerino hastu alporti al mi mian laktokafon ! Do mia amiko Fosulo ĉi estanta, ricevis barelon, kiun laŭ tio kion ni nun vidas, estis destinita al vi ! La barelo enhavis la kadavron de viro. Kiel kaj kial vi mortigis lin...

- Neniam mi frapis lin ! protestis Maŭrico. Jes, jen tio kion mi ĉiam timis ke oni suspektos min ! Sed iom pripensu, Miĥaelo. Vi scias ke mi ne estas el tiu speco ! Kun ĉiuj miaj mankoj, vi scias ke mi ne volas tuŝi haron de la kapo de aliulo ! Kaj, cetere, vi scias, ke lia morto signifis mian ruiniĝon. Estas en Brundekano li estis mortigita, en tiu malbenita akcidento !

Subite, Miĥaelo eksplodis per tiel fortega kaj tiel longa rido ke liaj du kunuloj supozis, sen ombro de ebla dubo, ke lia racio ĵus forlasis lin. Vane li strebis reakiri sian kvieton; ĉe la momento kiam li fine kredis sin sukcesonta, nova ondo de neretenebla ridado alkuris kaj skuis lin. Kaj mi devas aldoni

ke, el ĉi tiu tuta drama intervidiĝo, ĉi tio estis la plej malĝoja epizodo : Miĥaelo sence rideganta, dum Fosulo kaj Maŭrico, kunigitaj de la sama teruro, interŝanĝis rigardojn plenajn de maltrankvilo.

- Maŭrico, fine balbutis la proceduristo inter du ridondoĵoj, mi nune komprenas ĉion. Kaj ankaŭ vi, vi baldaŭ komprenos ĉion, per ununura vorto kiun mi tuj diros al vi ! Sciu do ke, ĝis la momento de antaŭ nelonge, mi ne divenis ke ĉi tiu korpo estis tiu de onklo Jozefo !

Tiu ĉi eldiro iom mildigis la streĉiĝon de Maŭrico; sed por Fosulo, male, ĝi estis kiel lasta ventoblovo estinganta la lastan kandelon, en la nokto de lia malforta panikiĝanta cerbo. Onklo Jozefo, kiun li lasis antaŭ unu horo en sia salono de la strato Norfolk, okupita eltranĉi malnovajn gazetojn ! Kaj jen ke estis ĉi tiu sama onklo Jozefo kies korpon li ricevis antaŭ ses tagoj, en barelo ! Sed, tiukaze, kiu li estis, li, Fosulo ? Kaj la loko kie li troviĝis, ĉu ĝi estis stacidomo de Vaterlo aŭ frenezulejo ?

- Fakte, ekkriis Maŭrico, la korpo estis en stato kiu devis malfaciligi lian rekonon ! Kia stultulo mi estis ne pensinte pri tio ! Nu ! Nun, dank'al Dio ! Ĉio klariĝas ! Kaj mi diros al vi, kara Miĥaelo mia; nu ! ni estas savitaj, vi kaj mi ! Vi prenos la monon de la tontino, vi vidas ke mi ne provas trompi vin, kaj mi, mi povos zorgi pri la led-firmao, kiu estas funkcia kiel ĝi neniam funkciis ĝis nun ! Mi permesas al vi tuj iri deklari la morton de mia onklo; ne zorgu pri mi; deklaru la morton, kaj ni estas tiritaj el embaraso !

- He ! Jes, sed bedaŭrinde mi ne povas deklari la morton ! diris Miĥaelo.

- Vi ne povas ? Kaj kial tio ?

- Ĉar mi ne povas montri la korpon, Maŭrico ! Mi perdis ĝin !

- Haltu momenton ! ekkriis la led-komercisto. Kion vi

diras ? Kiel ! Ne eblas ! Estas mi kiu perdis la korpon !

- Jes, sed ankaŭ mi perdis ĝin, knabo mia ! diris Miĥaelo kun miriga sereneco. Ne rekonante ĝin, ĉu vi komprenas ? Kaj suspektante ion neregulan pri ĝia deveno, mi rapidis por... forigi ĝin !

- Ĉu vi forigis ĝin ? ĝemis Maŭrico. Sed vi ankaŭ povas retrovi ĝin. Ĉu vi scias kie li estas ?

- Mi ŝatus scii tion, Maŭrico, mi donus multon por ekscii tion ! Sed fakte mi ne scias tion ! respondis Miĥaelo.

- Potenca Dio ! ekkriis Maŭrico kun okuloj kaj brakoj levitaj al la ĉielo, potenca Dio ! La led-komercio fiaskas ! Denove, Miĥaelo estis skuita pro ekridego.

- Kial vi ridas, stultulo ? kriis al li lia kuzo. Vi perdas eĉ pli ol mi ! Se vi havus por du cendoj de koro, vi tremus en viaj botoj, pro multe da aflikto ! Sed, ĉiuokaze, estas iu afero kiun mi devas diri al vi ! Mi volas havi tiujn okcent pundojn⁽²⁾ ! Mi volas havi ilin, ĉu vi aŭdas min ? Kaj mi havos ilin ! Ĉi tiu mono estas mia, jen tio kio estas certa ! Kaj via amiko ĉi estanta devis fari falsajon por akiri ilin. Donu al mi miajn okcent pundojn⁽²⁾, donu ilin al mi tuj, ĉi tie mem, sur ĉi tiu kajo, aŭ mi iros rekte al Metropola Polico, kaj mi rakontos la tutan aferon !

- Maŭrico, diris Miĥaelo metante la manon sur lian ŝultron, mi petegas vin, provu prudentiĝi ! Mi certigas al vi, ke ne estas ni kiuj prenis ĉi tiun monon ! Estas la alia viro ! Ni eĉ ne pensis priserĉi en la poŝojn !

- La alia viro ? demandis Maŭrico.

- Jes, la alia viro ! Ni transdonis onklon Jozefoⁿ al alia viro ! respondis Miĥaelo.

- Transdonis ? ripetis Maŭrico.

- Laŭ formo de piano ! respondis Miĥaelo tutsimple.

Belega instrumento, aprobata de [Rubinstino](#)...

Maŭrico levis la manon al sia frunto kaj denove mallevis

ĝin, ĝi estis tute malseka.

- Febro ! li diris.

- Ne, ĝi estis Erardo ! diris Miĥaelo. Fosulo, kiu vidis ĝin de proksime, povos certigi al vi ĝian aŭtentikecon !

- Sufiĉas pri pianoj ! diris Maŭrico kun granda tremeto. Ĉi tiu... ĉi tiu alia viro, ni revenu al li ! Kiu li estas ? Kie mi povos trovi lin ?

- He ! Tie kuŝas la malfacilaĵo ! respondis Miĥaelo. Tiu ĉi viro posedas la objekton ekde... ni iom pensu... ekde la pasinta merkredo; ĉirkaŭ la kvara. Mi imagas ke li devas esti survoje al la Nova Mondo, kompatinda diablo, kaj terure hastema alveni tien !

- Miĥaelo, petegis Maŭrico, pro kompatato al parenco, zorge pripensu pri viaj paroloj, kaj denove diru al mi kiam vi seniĝis je la korpo !

- Merkredon vespere, neniu eraro eblas pri tio ! rebatis Miĥaelo.

- Nu ! Ne, konstateble, tio ne povas okazi ! ekkriis Maŭrico.

- Kio do ? demandis la proceduristo.

- Eĉ la datoj estas vera frenezaĵo ! murmuris Maŭrico. La ĉeko estis prezentata al la banko marde ! Ne estas la plej eta spuro de saĝo en ĉi tiu tuta afero !

Ĉe tiu momento, junulo vigle kaptis la brakon de Miĥaelo. La supre dirita junulo hazarde pasis apud la grupo de niaj tri amikoj, en la antaŭa momento; subite li eksaltis kaj sin turnis.

- Ha ! li diris, mi ne eraras ! Jen sinjoro Diksono !

La trumpet-sono mem de la lasta juĝo ne pli timigus Fosuloⁿ kaj lian kunulon. koncerne Maŭrico, kiam li aŭdis sian kuzon alvokata, de fremdulo, per ĉi tiu fantazia nomo, li estis ankoraŭ pli plene konvinkita ke li estis viktimo de longa, groteska kaj abomena inkubsonĝo. Kaj kiam poste Miĥaelo,

kun la nekredebla hirtaĵo de siaj vangharoj, sin liberigis de la teno de la fremdulo, kaj fuĝis; kaj kiam la stranga vireto kun la faldita kolumo rapidmove sekvis lian ekzemplon; kaj kiam la fremdulo, ĉagrenita pro vidi la ceteron de sia predo eskapi, translokis sian viglan tenon al Maŭrico mem. Tiu ĉi, pro troo de sia konsternego, povis nur duonvoĉe murmuri al si : "Mi bone diris tion !"

- Mi almenaŭ tenas unu el la anoj de la bando ! diris Gideon Forsiso.

- Kion vi volas diri ? balbutis Maŭrico. Mi ne komprenas !

- Ho ! Mi kapablos komprenigi al vi ! firme rebatis Gideon.

- Aŭskultu, sinjoro, vi faros al mi veran servon se vi komprenigos al mi kion ajn el ĉio ĉi ! subite ekkriis Maŭrico, kun bolanta impeto de konvinko.

- Vi intencas profiti pro tio ke vi ne venis en mia domo kun ili ! rekomencis Gideon. Sed ne tio ! Mi tro bone rekonis viajn amikojn ! Ĉar ili ja estas viaj amikoj, ĉu ne ?

- Mi ne komprenas vin ! diris Maŭrico.

- Vi certe ne estas sen aŭdi paroli pri ia piano, ĉu ne ? sugestis Gideon.

- Ia piano ? ekkriis Maŭrico nervoze kaptante la brakon de la junulo. Do estas vi kiu estas la alia ulo ? Kie ĝi estas ? Kie estas la korpo ? Kaj ĉu estas vi kiu enspezis la monsumon de la ĉeko ?

- Vi demandas kie estas la korpo ? eligis Gideon. Jen kiu estas strange ! Ĉu reale vi bezonus la korpon ?

- Ĉu mi bezonus ĝin ? kriis Maŭrico. Sed mia tuta sorto dependas de ĝi ! Estas mi kiu perdis ĝin ! Kie li estas ? Konduku min al ĝi !

- Ha ! Vi volas rehavi ĝin ? Kaj via amiko, sinjoro Diksono, ĉu ankaŭ li volas revidi ĝin ? demandis Gideon.

- Diksono ? Kion vi deziras kun via Diksono ? Ĉu estas Miĥaelo Finsinko kiun vi nomas per ĉi tiu nomo ? He ! sed certe, ankaŭ li volas ĝin ! Ankaŭ li perdis la korpon ! Se li konservintus ĝin, la tontina⁽¹⁾ mono ekde nun estus lia !

- Mihaelo Finsinko ? Kompreneble ne la proceduristo ? ekkriis Gideon.

- Sed jes, la proceduristo ! respondis Maŭrico. Kaj la korpo, kie ĝi estas, pro la ĉiela amo ?

- Jen do kial li antaŭhieraŭ sendis al mi du klientojn ! murmuris Gideon. Ĉu vi scias kiu estas la adreso de la privata hejmo de S^{ro} Finsinko ?

- Strato de la Reĝo, 233. Sed kiuj klientoj ? Kien vi iras ? ĝemis Maŭrico sin alkroĉante al la brako de Gideon. Kie estas la korpo ?

- He, ankaŭ mi perdis ĝin ! respondis Gideon.
Kaj li hastege forkuris.

Ĉapitro XV

La reveno de la granda Vanco.

Mi ne provos priskribi la animstaton en kiu troviĝis Maŭrico eliranta de la stacidomo de Vaterlo. La juna ledkomercisto estis, nature modesta; neniam li havis troigitan ideon pri sia intelekta valoro; li plene konsciis pri sia nekapablo verki libron, ludi violonon, distri elektindan societon per lertaĵoj, unuvorte, plenumi neniun el tiuj rimarkindaj agoj kiujn oni kutime konsideras kiel la privilegion de geniulo. Li sciis, li akceptis, ke lia rolo en ĉi tiu mondo estis tute banala. Sed li kredis, aŭ almenaŭ li estis kredinta ĝis la lastaj tagoj, ke liaj kapabloj regis la postulojn de lia vivo. Nu, jen tio ke, konstateble, li devis sin deklari venkita ! La vivo fine estis supera ! Tial, kiam li eliris el la stacidomo de Vaterlo, la kompatinda knabo vidis antaŭ si nur unu celon : rehejmeniri ! Same kiel malsana hundo izoligās sur la sofo, Maŭrico sopiris nur refermi malantaŭ si la pordon de la domo de la strato Karlo; soleco kaj kvieteco, ha ! per sia tuta animo li sopiris al ili.

La vesperaj ombroj komencis fali kiam li estis finfine vidanta ĉi tiun rifuĝejon. Kaj la unua afero kiu prezentiĝis al liaj okuloj, proksimiĝante, estis la longa figuro de viro staranta sur la perono de sia domo, kaj okupata jen tiri la ŝnuron de la sonorilo, jen ĵeti al la pordo viglajn piedbatojn. Ĉi tiu viro, kun sia vestaĵo ŝirita kaj tute kovrita de koto, aspektis kiel malbelega ĉifonulo. Sed Maŭrico tuj rekonis lin : li estis lia frato.

La unua impulso de la pliaĝa frato estis, kompreneble, sin turni kaj forkuri. Sed la malespero neniigis lin ĝis ekde nun indiferentigi lin antaŭ la plej malbonaj katastrofoj. "Ba !

li diris al si, ne gravas !" Kaj, eltirante el sia poŝo sian ŝlosilujon, li silente grimpis la ŝtupojn de la perono.

Johano turnis sin. Lia fantoma vizaĝo montris eksterordinaran miksaĵon de laceco, honto kaj furiozo. Kaj kiam li rekonis la ĉefon de sia familio, malĝoja brilo lumiĝis en liaj okuloj.

- Malfermu ĉi tiun pordon ! li diris flankeniĝante.

- Estas tio kion mi faras ! respondis Maŭrico dum, interne, li diris al si : "Ĉio estas finita ! Li odoras murdon !"

La du fratoj nune estis en la vestiblo de la domo, kies pordo ĵus fermiĝis malantaŭ ili. Subite Johano kaptis Maŭricoⁿ ĉe la ŝultroj kaj skuis lin kiel terhundo skuas raton.

- Aĉa besto ! li kriis, mi rajtintus frakasi al vi la vizaĝon !

Kaj li denove reskuis lin, kaj per tiom da forto ke la dentoj de Maŭrico klakis, kaj ke lia kapo albatigiĝis al la muro.

- Neniu perforto, Joĉjo ! fine diris Maŭrico. Ĝi povas bonefiki nek al mi nek al vi.

- Fermu vian bekon ! respondis Johano. Estas via vico aŭskulti !

Poste li eniris en la manĝoĉambro, sinkis en fotelon kaj, demetinte unu el siaj ŝuoj sen plandumo, kaptis per siaj du manoj sian piedon, kvazaŭ por revarmigi ĝin.

- Mi estas lamulo por la vivo ! li diris. Kio estas por vespermanĝo ?

- Nenion, Joĉjo ! diris Maŭrico.

- Nenion ? Kion vi volas diri per tio ? demandis la Granda Vanco. Ne provu trompi min, ĉu ne !

- Mi volas diri ke estas nenio ! simple respondis lia frato. Mi havas nenion por manĝi, kaj nenion por aĉeti ion por manĝi ! Mi mem, hodiaŭ, mi nur povis havi sandviĉon kaj tason da teo.

- Ĉu nur sandviĉon ? rikanis Vanco. Kaj mi supozas ke

vi havas la cinikecon plendi pri tio, plie, ĉu ne ? Sed, vi scias, infano mia, zorgu pri vi ! Mi nun eltenis ĉion kion mi kapablis elteni. Tio estas finita ! Kaj mi tuj diros al vi tion kio estas pri tio ! Nu ! Mi intencas vespermanĝi, kaj tuj, kaj bone vespermanĝi ! Prenu vian kolekton de sigelringoj, kaj iru vendi ĝin !

- Ne eblas hodiaŭ ! respondis Maŭrico. Estas dimanĉo !

- Mi diras al vi ke mi volas vespermanĝi, ĉu vi aŭdas ?
kriegis la duenaskita frato.

- Sed tamen, Joĉjo, se tio ne eblas ! argumentis la plejaĝa.

- Malbenita idioto ! kriis Vanco. Ĉu ni ne estas la mastroj de la domo ? Ĉu oni ne konas nin, en la hotelo, kie kuzo Parkero invitis nin por vespermanĝi kiam li venis en Londono ? Nu, galope forkuru ! Kaj se vi ne estos revenita post duonhoro, kaj se vi ne alportos al mi unuakvalitan vespermanĝon, mi detruos ĉiujn meblojn, kaj poste mi rekte iros al la polico kaj rakontos la tutan historion ! Ĉu vi komprenas tion kion mi diras al vi, Maŭrico Finsinko ? Ĉar se vi komprenas tion, vi pli bone faru forkuri !

La ideo eĉ ridetis al la malfeliĉa Maŭrico kiu tremis pro malsato. Do li rapidis iri mendi vespermanĝon kaj reveni hejmen, kie li trovis Johano ankoraŭ okupata luli sian piedon kiel malsanan bebon.

- Kaj kion vi volas trinki, Joĉjo ? demandis Maŭrico, per sia plej karesa voĉo.

- Ĉampanon, evidente ! El tiu malnova ĉampano pri kiu Miĥaelo ĉiam parolas al mi kiam mi renkontas lin ! Nu, rapide al la kelo, kaj atentu ne tro skui la botelon ! Sed unue, iom aŭskultu ! Vi tuj pretigos por mi fajron, kaj bruligos por mi la gason, kaj fermos por mi la ŝutrojn ! Jen la nokto venita kaj mi malvarmas ! Kaj poste vi metos la tablotukon kaj la manĝilaron ! Kaj poste... diru do ! Iru serĉi por mi

anstataŭajn vestojn !

La manĝoĉambro havis relative kutiman aspekton kiam alvenis la vespermanĝo. Kaj ĉi tiu vespermanĝo mem estis bonega : densa supo, fileoj de soleo, du ŝafkotletoj kun tomata saŭco, bovrostaĵo provizita de terpomoj, pudingo, peco de Ĉestra fromaĝo; unuvorte, esence angla manĝo, sed, kiel deziris la Granda Vanco, "el unua kvalito".

- Ha ! Dio estu laŭdata ! ekkriis la juna vojaĝanto altabligante. (Kaj lia ĝojo devis esti, verdire, tre vigla, por tiel surprize revenigi lin al la pia ceremonio de la tablopreĝo, pri kiu li delonge perdis la kutimon !) Sed ne ! li daŭrigis, mi iros manĝi en tiu brakseĝo tien, apud la fajro, ĉar jam du tagoj dum kiuj mi frostas, kaj mi bezonas plene revarmigi min ! Mi tuj iros sidiĝi tien, kaj vi, Maŭrico Finsinko, vi staros inter la tablo kaj mi, kaj servos min !

- Sed, Joĉjo, mi ankaŭ malsatas ! diris Maŭrico.

- Vi povos manĝi tion kion mi lasos ! rebatis la Granda Vanco. Ha ! Infano mia, ĉi tio estas nur la komenco de nia finaranĝo ! Vi malgajnis la decidigan partion; vi devos pagi ! Detenu vin veki la britan leonon !

Estis io tiel nepriskribeble minaca en la okuloj kaj en la voĉo de la Granda Vanco, dum li elĵetis ĉi tiujn proverbajn parolturnojn, ke la animo de Maŭrico terurigiĝis.

- Nu ! rekomencis la parolanto, donu al mi glason da ĉampano, antaŭ mia fileo de soleo ! Kaj mi kiu imagis ke mi ne ŝatis tion, la fileon de soleo !... Diru do, li aldonis kun nova ekkolero, ĉu vi scias kiel mi alvenis ĝis ĉi tie ?

- Ne, Joĉjo, kiel mi scius tion ? respondis la troservema Maŭrico.

- Nu ! Mi venis sur la piedojn ! kriis Jahano. Jes, mia amiko, mi paŝadis sur miaj dek fingroj la tutan vojon de Brundekano, kaj mi almozpetis sur la tuta longo de la vojo ! Mi ŝatus iom vidi vin almozi, Maŭrico Finsinko ! Tio ne estas

tiel facila kiel vi povus supozi ! Mi ŝajnis min kiel fiŝkaptiston el **Blajzo**, viktimo de ŝiprompado. Mi ne scias kie ĝi troviĝas, Blajzo; kaj vi, ĉu vi scias tion ? Sed mi pensis ke ĝi ŝajnis nature, por tiel diri tion sur la landvojo. Mi almozpetis al malbona stulteta knabo kiu reveni de la lernejo, kaj li donis al mi du pencojn, kaj diris al mi volvi por li ŝnuron ĉirkaŭ lia turbo. Kaj mi faris tion, kaj tre bone, sed li deklaris ke tio ne estis bona ! Kaj li kuris post mi postulante de mi siajn du pencojn ! Post tio, mi petis almozon al maroficiro. Tiu ĉi ne konfidis al mi sian turbon, li simple nur donis al mi broŝureton pri alkoholismo, kaj tuj post, li turnis al mi la dorson ! Tio estas ĉio kion mi ricevis de li. Mi petis almozon de maljunulino kiu vendis spickukon; ŝi donis al mi kukon de unu penco. Sed la plej forta estis sinjoro kiu, ĉar mi plendis pro manko da pano, respondis al mi ke ekzistis por ĉiu anglo bonega rimedo por havigi al si panon, kaj tiu rimedo estis rompi fenestran vitron ĉe la unua vidata domo, por esti metita en malliberejon... Kaj nun, alportu la rostaĵon !

- Sed... sed, riskis Maŭrico, kial vi ne restis en Brundekano ?

- En Brundekano ? ekkriis Johano. Kaj per kio mi vivintus tie ? Per "*Legu min !*" kaj per naŭza gazetaĉo de la Savarmejo ? Ne, ne, necesis ĉiapreze ke mi foriru el Brundekano ! Mi kredite gastis en gastejo kie mi ŝajnis min kiel la Grandaⁿ Vancoⁿ, de **Alhambro**. Vi same farintus, sur mia loko ! Sed jen tio ke ni komencis paroli pri varieteoj, kaj pri la tuta mono kiun mi gajnis tie per miaj kantoj ! Kaj poste, jen ke gasto de la gastejo petis al mi kanti "*Ĉirkaŭ viaj belegaj formoj*". Kaj tiam, kiam mi decidiĝis kanti ĝin, jen ke ĉiuj konsentis por aserti ke mi ne estis la Granda Vanco ! Mi vane kontraŭstaris ilin, ili obstine rifuzis kredi min ! Tiel estas ke finiĝis miaj rilatoj kun la landa gastejo ! malgaje daŭrigis la junulo. Sed, ĉefe, estis la ĉarpentisto...

- Nia proprietulo ? demandis Maŭrico.

- Li mem ! diris Johano. Li alvenis tiun matenon kun la nazo en la aero, kaj jen li kiu volas scii kien la akvobarelo iris, kaj kio fariĝis la litkovriloj ! Mi diris al li ke li iru al diablo. Kion alian mi povus diri al li ? Sed jen li kiu diras al mi ke ni lombardis aferojn kiuj ne estis niaj, kaj ke li pagigos nin ! Vere, mi bonege regalas min ! Mi rememoris ke li estas surda kiel trunko, kaj mi komencis elkraĉi al li multajn insultojn, sed tre ĝentile, kaj tiel mallaŭte ke li ne kapaplis aŭdi eĉ unu vorton. "Mi ne aŭdas vin !" kiun li diris al mi. "He ! Mi bone scias tion, ke vi ne aŭdas min, kaj feliĉe por vi, aĉa besto, aĉa porko, aĉa kornulo !" kiun mi respondis al li kun mia plej gracia rideto. "Mi estas iom duonsurda !" kiun li blekis al mi. "Mi sidus sur pingloj, se vi ne tia estus, idioto, fekaĵo !" kiun mi murmuris al li, kvazaŭ mi prezentis klarigojn al li. "Mia amiko", kiun li fine diris al mi, "mi estas surda, estas vere, sed mi ja vetas ke la polica komisaro kapablos aŭdi vin !" Kaj, post tio, li foriris, tute furioza. Li foriris al iu flanko; mi ja foriris al alia. Mi lasis al li, por kompensi sin, la alkohol-lampon, la "*Legu min !*", la gazetaĉon de la Savarmeo, kaj tiun alian periodaĵon kiun vi sendis al mi ! Kaj, pri tio, necesis ke vi estu morte ebria por sendi al mi tian aferon ! Oni parolis en ĝi nur pri poezio, pri la ĉiela globo ! Kaj en longaj disvolvadoj, dek sinsekvaj kolumnoj ! Diru do, ĝi estas la katalogo de la frenezulejoj kiujn vi tien sendis al mi ! La *Ataneumo*, mi memoras la titolon ! Potenca Dio, kia gazetaĉo !

- Vi volas diri : la *Atenaumo*, reĝustigis Maŭrico.

- He ! Ne gravas al mi kiel vi nomas ĝin ! diris Johano. Sed mi trovas vin vere miriga pro esti sendinta ĉi tion al mi ! Tio ne malhelpas, amiko mia, mi komencas resaniĝi ! Nun alportu al mi la fromaĝon, kaj denove glason da ĉampano ! Ha ! Miĥaelo pravas laŭdi ĉi tiun ĉampanon ! Pri tio, vi povas

servi vin ! Restas iom da fiŝo, tute komplete kotleto, kaj tiu peco da fromaĝo. Jes, Miĥaelo, jen homo kiu plaĉas al mi ! Li ja kapablas legi vian *Atenaumon*, ankaŭ li; sed almenaŭ li scias ne aspekti tiel ! Almenaŭ li estas gaja, bonkarakterata, li ne havas tiun funebran mienon kiu ĉiam mallogis min ĉe vi ! Sed, diru do, mi eĉ ne metas al vi la demandon, ĉar mi tuj divenis tion kio okazis. Via elturniĝo... tute malsukcesis, ĉu ne ?

- Pro kulpo de Miĥaelo ! diris Maŭrico malsereniĝante.

- Miĥaelo ? Kio koncernas lin en ĝi ?

- Estas li kiu perdis la korpon, jen tio kio koncernis lin ! respondis Maŭrico. Li perdis la korpon de la maljuna Jozefo, kaj neeble nun deklari la morton !

- Kiel ? demandis Johano. Sed mi kredis ke vi ne volis deklari la morton ?

- Ho ! Ni ne plu estas tie ! diris lia frato. Ne plu temas pri savo de la tontino⁽¹⁾, sed pri savo de la led-firmao !

Temas pri savo de la vestaĵoj kiujn ni havas sur la dorso, Joĉjo !

- Malrapidigu iomete la muzikon ! diris Johano, kaj klarigu vian rakonton ekde la komenco !

Kaj Maŭrico faris kiel ordonis lia frato.

- Nu ! Kion mi diris al vi ? ekkriis la Granda Vanco kiam li estis aŭdinta la malgajan raporton.

- Sed, vi scias, mi tuj diros ion al vi ! Mi, ĉiuokaze, mi ne intencas esti senigita de la parto kiu apartenas al mi !

- Ha ! Ekzemple, mi ŝatus scii tion kion vi intencas fari ! diris Maŭrico.

- Mi tuj diros al vi, sinjoro ! rebatis Johano per la plej decidita tono. Mi tutsimple transmetos mian kazon en la manojn de la unua proceduristo de Londono, kaj post tio, ĉu vi fiaskos aŭ ne, mi zorgos pri tio kiel pri la aferoj de la luno !

- Sed tamen, Johano, ni estas surŝipe de la sama boato !

murmuris Maŭrico.

- Surŝipe de la sama boato ? Ha nu ! Mi vetas kun vi ke ne ! Ĉu mi faris skribfalsaĵon, mi ? Ĉu mi provis maski la morton de onklo Jozefo, mi ? Ĉu mi enpresigis anoncojn, cetere absolute stultajn kaj mokindajn anoncojn, en ĉiuj ĵurnaloj, mi ? Ĉu mi detruis statuojn kiuj ne apartenis al mi, mi ? Verdire, mi ŝatas vian aplombon, Maŭrico Finsinko ! Ne, ne, ne ! Tro longtempe mi konfidis al vi la administradon de miaj aferoj; nun mi konfidis ilin al Miĥaelo. Miĥaelo cetere estas knabo kiu ĉiam plaĉis al mi. Kaj mi malpacience deziras finfine vidi iom klare en mia situacio !

En tiu momento, la du fratoj estis interrompataj de sonorado, kaj Maŭrico kiu timeme duonmalfermis la pordon, ricevis el la manoj de komisiito, leteron kies adreso estis de la mano de Miĥaelo. La letero estis redaktita jene :

"AVIZO _ Maŭrico Finsinko, en la okazo se la estanta avizo falus antaŭ liaj okuloj, estas informita ke li ekscios ion avantaĝe por li, morgaŭ matene lundon, je la deka, en miaj oficejoj, 42, aleo Kancelario.

Miĥaelo Finsinko".

Obeeme, Maŭrico, tuj kiam li tralegis ĉi tiun leteron, transdonis ĝin al sia frato.

- Ha ! Jen maniero por skribi bileton kiu plaĉas al mi ! ekkriis Johano. Neniu alia ol Miĥaelo povus iam skribi tion !

Kaj Maŭrico, en sia deprimado, ne eĉ kuraĝis protesti por siaj aŭtororajtoj.

Ĉapitro XVI

En kiu la ledaĵoj feliĉe reakiras valoron.

La morgaŭon matene, je la deka, la du fratoj Finsinko^j estis enkondukataj al la granda kaj bela ĉambro kiu servis kiel aŭdienco por ilia kuzo Miĥaelo. Johano sin sentis iom resaniĝinta el sia elĉerpiĝo, sed kun unu el siaj piedoj ankoraŭ en pantoflo. Maŭrico, fizike, ŝajnis malpli difektita; sed li estis dek jarojn pli aĝa ol la Maŭrico kiu forlasis Burnmutoⁿ antaŭ ok tagoj. Anksieco sulkigis lian vizaĝon per profundaj faltoj, kaj lia nigra hararo abunde griziĝis ĉe la ĉirkaŭaĵoj de la tempioj.

Tri homoj atendis la fratojn Finsinko^{jn}, sidantaj antaŭ tablo. Meze estis Miĥaelo mem : estis dekstre Gideono Forsiso, maldekstre maljuna viro kun okulvitroj, kaj respektinda arĝenta hararo.

- Mia vorto, estas onklo Joĉjo ! ekkriis Johano.

Maŭrico frotis al si la okulojn, pli mirigita ol li jam estis de ĉiuj inkubsonĝoj de la antaŭaj tagoj. Poste, subite, li antaŭeniris al sia onklo, tute tremante pro furiozo.

- Mi tuj diros al vi tion kion vi faris, maljuna friponeto ! li kriis. Vi forkuris !

- Saluton, Maŭrico Finsinko ! respondis onklo Jozefo, sed kun pli da malamikeco ol supozigus ĉi tiuj indulgemaj paroloj. Vi ŝajnas malsana, amiko mia !

- Neutile tumultiĝi, sinjoroj ! observigis Miĥaelo. Maŭrico, provu plivole rigardi la faktojn tutfronte ! Via onklo, kiel vi vidas, ne devis tro suferi pro la skuo de la akcidento; kaj kora homo kiel vi certe nemankas esti kontentega !

- Sed tiam, se tiel estas, balbutis Maŭrico, kio estis la

korpo ? Ĉu vere eblus, ke tiu afero kiu kaŭzis al mi tiom da zorgo kaj alarmo, kiu tiom uzis al mi la menson, ĉi tiu afero kiun mi vojaĝigis per miaj propraj manoj, estis nur la kadavro de iu ajna fremdulo ?

- Ho ! Se la ideo tro afliktas vin, vi povas ne iri ĝis tio ! respondis Miĥaelo. Nenio malpermesas vin supozi ke la korpo apartenis al viro kiun vi ŝance renkontis plurfoje, eble iu samklubano, eble eĉ iu kliento !

Maŭrico lasis sin fali sur seĝon.

- He ! li ĝemis, mi malkovrintus la eraron, se la barelo venintus ĝis mia domo ! Kaj kial ĝi ne venis tien ? Kial ĝi iris ĉe Fosuloⁿ ? Kaj per kia rajto Fosulo permesis al si malfermi ĝin ?

- Parolante pri tio, Maŭrico, diru do al ni tion kion vi faris kun antikva Herkulo ? demandis Miĥaelo.

- Tio kion li faris kun ĝi ? Li frakasis ĝin per haketilo por viando ! diris Johano. La pecoj ankoraŭ estas ĉe ni, en la kelo !

- Ĉio ĉi tute ne gravas ! haste deklaris Maŭrico. La plejgravaĵo estas ke mi retrovis mian onklon, mian fraŭdan kuratoron ! Ĉiuokaze, li apartenas al mi ! Kaj ankaŭ la tontino⁽¹⁾, ĝi apartenas al mi ! Mi postulas la tontinon⁽¹⁾ ! Mi asertas ke onklo Virmastro mortis !

- Urĝas ke mi ĉesigu ĉi tiun frenezaĵon, diris Miĥaelo, kaj tio unufoje por ĉiam ! Tio kion vi asertas, estas bedaŭrinde preskaŭ vera : en ia senco, mia kompatinda patro mortis, kaj jam delonge ! Sed tio ne estas en la senco de la tontino⁽¹⁾ kaj mi esperas ke, en tiu ĉi senco, multaj jaroj pasos antaŭ ol li mortos. Nia kara onklo Jozefo vidis lin ĉi-matene mem. Li diros al vi ke mia patro vivas, kvankam, ve ! lia inteligenteco estingiĝis por ĉiam !

- Li ne rekonis min ! diris Jozefo.

Kaj por rekoni la meritojn de tiu ĉi maljuna tedulo, ni

devas aldoni ke lia voĉo, dirante ĉi tiujn vortojn, tremetis pro sincera emocio.

- Nu ! Mi rekonas vin en tio, sinjoro Maŭrico Finsinko ! ekkriis la Granda Vanco. Mil diabloj, kian idioton vi montris vin !

- Koncerne la ridindan kaj bedaŭrindan servutecon, en kiu vi reduktis onklon Jozefoⁿ, daŭrigis Miĥaelo, ankaŭ tio jam daŭris tro longe ! Mi ĉi tie preparis akton per kiu vi redonas al via onklo lian tutan liberecon, kaj kvitigas lin de ĉia devo rilate al vi ! Vi unue, se vi bonvolas, surmetos sur ĝi vian subskribon !

- Kio ! kriis Maŭrico, kaj ke mi perdas miajn 7.800 pundojn⁽²⁾, kaj mian komercon pri ledaĵoj, kaj ĉio tio sen ia profito interŝanĝe ! Multan dankon !

- Via ŝuldosento ne surprizas min, Maŭrico ! komencis Miĥaelo.

- Ho ! Mi scias ke mi devas nenion atendi de vi alvokante viajn sentojn ! respondis Maŭrico. Sed ĉi tie estas fremdulo, ke cetere la diablo forprenu min se mi scias kial, kaj estas li kiun mi apelacias. Sinjoro, li daŭrigis direktante sin al Gideon, jen mia rakonto : mi estis senigita de mia heredaĵo dum mi estis nur infano, orfo ! Ekde tiam, sinjoro, mi havis nur unu revon, kiu estis reakiri mian kapitalon. Mia kuzo Miĥaelo povos diri al vi pri mi ĉion kion li volos : mi mem konfesos ke mi ne ĉiam regis la cirkonstancojn. Sed mia situacio tamen ne estas malpli ol tiu kiun mi priskribis al vi, sinjoro ! Mi estis senigita de mia heredaĵo ! Iu orfa infano estis ŝtelita de 7.800 pundoj⁽²⁾ ! Kaj mi aldonas ke mi havas la rajton kun mi ! Ĉiuj artifikaĵoj de S^{ro} Miĥaelo tute ne superregos kontraŭ justeco !

- Maŭrico, interrompis Miĥaelo, permesu al mi aldoni etan detalon, kiu cetere vi ne povus malplaĉi al vi, ĉar ĝi reliefigas viajn kapablojn kiel verkisto !

- Kion vi volas diri ? demandis Maŭrico.

- Fine, respondis Miĥaelo, mi domaĝos vian modestecon !

Ke do sufiĉu al mi sciigi al vi la nomon de persono kiu ĵus tre atente studis unu el viaj plej freŝdataj eseoj en kompara literaturo ! La nomo de tiu persono estas Musko, mia kara amiko !

Estis longa silento.

- Mi devintus konjekti ke ĉi tiu viro venis de via flanko ! murmuris Maŭrico.

- Kaj nun vi subskribos la akton, ĉu ne ? diris Miĥaelo.

- Sed diru do, Miĥaelo ! ekkriis Johano kun unu el tiuj bolantaj impetoj kiuj estis kutimaj al li. Kaj mi, kio mi fariĝas en ĉio ĉi ? Maŭrico forfalis, mi bone vidas tion ! Sed mi, kial mi sekvus lin tien ? Kaj plie ankaŭ mi ja estis ŝtelita, ne forgesu tion ! Ankaŭ mi ja estis orfo, tute same kiel li, kaj lernanto en la sama lernejo !

- Johano, diris Miĥaelo, ĉu vi ne pensas ke vi pli bone farus fidi al mi ?

- Certe, vi pravas, amiko mia ! respondis la Granda Vanco. Vi ne volus profiti de la senkulpeco de orfo, mi ĵurus tion. Kaj vi, Maŭrico, vi tuj subskribos la koncernan dokumenton, aŭ mi koleriĝos, kaj vi scias, mi vidigos al vi ion kio mirigos vian malfortan cerbon !

Kun subita kaj vere neatendata volonteco, Maŭrico deklaris sin preta subskribi la rezignon. Sekretario de Miĥaelo venis alporti la dokumentojn, la subskriboj estis laŭregule surmetitaj, kaj tiel Jozefo Finsinko, unufoje pli, sin trovis libera homo.

- Kaj nun, miaj amikoj, aŭskultu tion kion mi proponas fari por vi ! tiam rekomencis Miĥaelo. Prenu, Maŭrico kaj Johano, jen akto kiu igas vin solaj posedantoj de la led-firmao ! Kaj jen ĉeko, samvalora al la tuta mono deponita en la banko sub la nomo de onklo Jozefo ! Tiel ke vi povas imagi

vin, kara Maŭrico mia, ke vi ĵus finis viajn studojn en la Komerca Instituto. Kaj, ĉar vi mem diris al mi ke la ledoj rekreskis, mi imagas ke vi baldaŭ pensos preni edzinon. Jen, antaŭzorge al ĉi tiu feliĉa evento, eta geedziĝa donaco ! Ho ! Ne jam la mia ! Mi zorgos doni al vi ion alian kiam vi decidis la daton de la geedziĝo ! Sed akceptu, ekde nun, ĉi tiun donacon... je la nomo de S^{ro} Musko !

Kaj Maŭrico, ruĝegiĝinta, eksaltis al sia ĉeko.

- Mi nenion komprenas en la komedio ! Observigis Johano. Ĉio ĉi ŝajnas al mi tro bela por esti vera !

- Ĝi estas simpla translokigo ! respondis Miĥaelo. Mi elaĉetas de vi onklon Jozefoⁿ, jen ĉio ! Se estas li kiu gajnos la tontinon⁽¹⁾, ĝi estos mia; se estas mia patro kiu gajnos ĝin, ĝi ankaŭ estos mia. Tiel ke mi ne devas tro plendi pri la akordiĝo !

- Maŭrico, kompatinda maljunulo mia, ĉi tio senspirigas vin ! komentis la Granda Vanco.

- Kaj nun, sinjoro Forsiso, daŭrigis Miĥaelo sin turnante al la mutan personon, vi vidas kunigatajn antaŭ vi ĉiujn krimulojn kiujn vi estis tiel dezirema trovi ! Ĉiuj escepte Fosuloⁿ, tamen ! Fosulo, komprenu, havas socian mision : li sin dediĉis al la arta regenerado de junaj knabinoj. Tial mi faris al mi skrupulon ĝeni lin, je horo kiam mi scias lin aparte okupatan. Sed vi povos, se vi volos, arestigi lin en lia pensiono : mi konas la adreson, kaj volonte diros ĝin al vi. Kaj pri la ceteron de la bando, jen ĝi antaŭ viaj okuloj, kaj mi timas ke la spektajĝo havu nenion allogan. Vi devas decidi tion kion vi faros kun ni !

- Tute nenio, sinjoro Finsinko ! respondis Gideon. Mi kredas esti komprenanta ke estas ĉi tiu sinjoro, kaj li indikis Maŭricoⁿ, kiu estis, kiel ni diras en nia ĵargono, la *fons et origo*⁽¹¹⁾ de la tuta aventuro; sed laŭ tio kion mi pensas ankaŭ

11 Latina esprimo signifanta "fonto kaj origino".

kompreni, li jam estis larĝe pagita. Kaj plie, por paroli al vi tutsincere, mi ne vidas tion kion iu gajnus en publika skandalo. Mi miaflanke povus nur perdi en ĝi. Kaj male, mi ne kapablus tro laŭdi aventuron kiu valoris al mi la feliĉon konatiĝi kun vi ! Jam vi havis la afablecon sendi al mi du klientojn...

Miĥaelo ruĝiĝis.

- Estis la minimumo kiun mi povis fari por pardonpeti pro kelka ĝeno kiu okazis al vi iom pro mia faro ! li murmuris. Sed estas ankoraŭ io kion necesas ke mi diru al vi ! Mi ne volus ke vi havus tro malbonan opinion pri mia kompatinda Fosulo, kiu certe estas la plej sendanĝera homo en la mondo. Ĉu vi ne povus veni, ĉi-vespere mem, por vespermanĝi en lia kompanio ? Ĉe la restoracio Verejo, ekzemple, ĉirkaŭ la sepa. Kion vi pensas pri tio ?

- Mi promesis vespermanĝi kun unu el miaj onkloj, kun amikino ! respondis Gideon. Sed mi petos liberigi min por ĉi tiu vespero... Kaj nun, kara sinjoro Finsinko, lastan punkton kiun mi volas submeti al via decido : ĉu vere ni povas nenion por la kompatinda diablo kiu forprenis la pianon ? La memoro pri tiu ĉi malfeliĉulo turmentas min kiel rimorso !

- Bedaŭrinde ! Ni povas nur kompati lin ! respondis Miĥaelo.

FINO